

eLIBRO

Eugen Kumičić

Surprizitaj nuptofestantoj



INKO

Eugen Kumičić

SURPRIZITAJ NUPTOFESTANTOJ

El la kroata tradukis: Stanko Rukelj

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-096-1

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

JUNIO 2001

I

En la paroĥa preĝejo de Luĉica la maljuna pastro don Jure Ratkoviĉ legis mallaŭtan diservon. Al li respondadis malforta, malsupren fleksita maljunuleto, la pedelo Fran. Estis antaŭkristnaska sezono. Forta vento, furioza tempesto muĝis kaj knaris ĉirkaŭ la preĝejo. La pastro kaj la pedelo rigardis al la vitroj de la altaj fenestroj apud la altaro, kiuj tremis kaj skuiĝis pro la vento. Jam tagiĝis. La palaj flamoj de la vaks-kandeloj sur la altaro senĉese tremetas. Frosta aero cirkulas en la malgranda preĝejo, kaj humida malvarmo leviĝadas de sur la pavimita, frotita planko. En la preĝejo troviĝas kelkaj kriptoj, kaj sur ĝiaj ŝtonaj kovriloj estas ĉizitaj mortintokranioj kaj sub ili longecaj fort-artikaj ostoj. Ĉi tiuj ostoj certe prezentas brakojn de mortinto. La piedoj de piaj Luĉicanoj forfrotis ankaŭ la ŝtonajn kovrilojn kaj la ĉizitajn kraniojn kaj la ostojn.

Al la meso venis kelkaj virinoj kiuj surgenuis sen ordo en la nigriĝintaj kaj vermotruaj benkoj. Iom for de la virinoj en unu angulo genuis maljunulo, envolvita en varman kaj longan vintran surtuton. La alta kolumo de la mantelo, en kiun la tuta homo sintiriĝis, estis levita. Nur la verto de la griza kapo videblis. Li mallevis ĝin sur la brakojn, kiujn li metis sur la benkon antaŭ si, ŝovinte unu manon en vastan manikon de la alia.

Jam pasis kelkaj minutoj depost kiam la sonorilo ektintis

signante la komencon de la meso, la pastro jam kelkfoje turnis sin ĉe la altaro, kaj tiam virino haste eniris la preĝejon. La maljunulino ne fermis la pordon tuj post si, la malvarma frapo de la vento envadis la preĝejon kaj trafis la kalvan pikilforman kapon de la maljuna sonorigisto.

—Baptanino, ĉu vi hejme ne havas pordon? Ĉu decas veni en la preĝejon nun? Estas jam la epistola momento! — ek-murmuris la sonorigisto, turnante sin al la virino kiu forgesis fermi la pordon.

—Fran, mallaŭte, mallaŭte! La pastro flustrante admonis la sonorigiston.

Ankaŭ la maljunulo en la dika mantelo koleris pro la virino kaj murmurante skuis sian kapon.

Kiam la ventobruo ĉesis, aŭdeblis mallaŭta legado de la pastro, la flustrado de la preĝantaj maljunulinoj kaj la lanta trenado de la vasta sonorigista piedvesto el dika ŝtofo. Ili estas iaspecaj pantofloj.

La meso finiĝis, kaj la frosta aero forpelis la homojn el la preĝejo, kaj do ili pli rapide ol kutime disiĝis malaperante en la etaj kurbaj stratoj.

Kiam la pastro venis en la sakristion, li senvestis sin kaj spirblovinde en la manojn, diris:

—Malvarme, malvarme kara Fran!

—Kion fari kontraŭ tio, sinjoro! Nenio stranga, ja Kristnasko estos post kelkaj tagoj. Ĉio en sia propra tempo! — kuraĝigis sin la maljunuleto vagante tra la sakristio.

—Fran, mi dirus, ke vi iomete tremas!

—Mi... mi, sinjoro? Ĝis kiam la benita akvo en la aspergilo ne glaciigis, ĝis tiam Fran vintron ne konas! Alispecan vin-

tron mi trasuferis en Odesa, — mansvingis Fran kaj eklulis sin sur siaj kruroj.

—He, ho! sesdek jaroj estas jam for! Tiam alia sango fluis en viaj vejnoj.

—Sinjoro, vi ne konas malbonon! — ekskuis la ŝultrojn la sonorigisto, rememorante pri siaj junaĝaj jaroj, kiujn li travivis surmare.

—Nu, nu, Fran, ankaŭ mi iom trasuferis! — asertis la pastro kaj tuj daŭrigis: — Hodiaŭ la maljuna Tomo povas doni al vi du glasetojn da brando...

—Bona homo! He, facile al li!

—Ĉu Tomo ĉeestis la meson? Mi eksciis, ke li iom malsanas.

—Kio damaĝas lin? Li tenacas kiel vera siliko! Ŝajnas ke li estas almenaŭ dek jarojn pli juna ol mi. Jes, jes vera siliko! Ja mi konjektas, ke nin ne forpelos mortigulo; oni devos mortigi nin per maleo. Se mi tiel bonfartus kiel Tomo, mi ĝisvivus la centan jaron! — findiris Fran spirblobante en siajn manojn.

La paroĥestro poste foriris hejmen, dum la pedelo fermita la pordojn, fortrenis sin malantaŭ la preĝejon por vidi, kiel aspektas la maro.

Sur la orienta bordo de Istrio, sur alta klifo, sur tenaca roko, kiu el la maro vertikale leviĝas, ariĝis ĝis ĉirkaŭ kvindek domoj de la urbeto Luĉica. La urbeto situas super la maro kvarcent futojn alte. Ĝia bordo ravigas ĉies okulon per sia sovaĝa kaj trista beleco. Ĝi tuta estas kruta, nur kelkloke alirebla. La rokan deklivon sekvas kalva klifo, mistera plantaro intime verdas ĝis la posta promontoro, kiu etendas sin en la maron kvazaŭ malglata langego. Malantaŭ la promontoro malfermiĝas malviva golfo, kaj sub la grandegaj krutaĵoj blan-

kas fajna sablo sur la malprofunda strando. El la tenebra maro, malantaŭ la interrokaĵo leviĝas teruraj striitaj elstarantaj klifoj kaj malglataj ŝtontraboj, sur kiuj kaŭras korvoj kaj grizaj kolomboj. Ĝuste super la marnivelo gapas mallumaj aper-turoj de humidaj kavernoj al la golfeto. Dumtajde la akvo transversas sin muĝe bruante. Fore de la maro verdas malof-taj arbaretoj; malaltaj piceoj videbletas el inter la gruzo kaj ŝtonaro. Inter la ŝtonbaraĵoj ŝovas sin el la ŝtonaro unuopaj olivarboj, ie-ie ankaŭ ope. La flavaj riveretoj, trafosintaj al si flueojn inter la rokoj de la kalvaj klifoj, krute malsupreniĝas en la maron, dividante unu rokon de la alia, kiuj aspektas kvazaŭ nigraj fortikaĵoj, se oni nokte observas ilin de sur la maro. Ĉiu rivereto dumsomere senakviĝas.

La bordo de Luĉica aspektas grandioze kaj tristece. Se oni admiras ĝin, sidante fore en barko, oni ne povas perokule sufiĉe ĝui pro la teruraj klifegoj. La grizaj kaj akraj krutaĵoj ne povas la koron ĝojigi, nek vigligi, nek mildigi. Se oni rigardas ilin dum ili kviete en la maro speguliĝas, la animo trankvilas, la koro batas pli lante, dolĉaj kaj senonaj sentoj enfluas la bruston, kaj la okulrigardo malleviĝas laŭ la krutaĵoj al la ravaj profundoj, kie rebrilas la lazura ĉielvolbo. La maro prezentas sin kiel nemezurebla senfino, samkiel la ĉielo mem. Observante la tenebrajn ŝtontrabojn kaj rokojn, kiel ili longiĝas kaj malaperas en la senfinon sub la nigra barketo, la penso mergiĝas pli kaj pli profunden, ĝis kiam ĝi subite ĉesas animtreme... La fiŝo klupeo ekplaŭdis sur la kvieta supraĵo, oni ekstremetas, la spirito kursvingiĝas en la malvarmajn profundojn, timo ekokupas la koron, ĉar oni opinias, ke ĉio ĉirkaŭa estas sorĉita ĝiseterne, ke nenie ekzistas vivo. La okulo ankoraŭ vagas en la blujaj profundoj; sed kiam oni ri-

markas aron da mevoj, kaj kiam oni aŭdas super la kapo susuron de la flugiloj, ilian ĉirpon, oni ekobservas la ĉielon sekvan la flugon de la liberaj mevoj, oni enluliĝas en sentimentalajn pensojn...

Spirante tiun prispicitan kaj salecan odoron de la marakvo, oni pensas tute pri nenio...

Ĉe la norda flanko de la urbo Luĉica staras la malnova paroĥa preĝejo inter la maristaj domoj kaj la duone ruiniĝinta murego, kiu estas for de la preĝejo je kvin da paŝoj. Ĉi tiu, per hedero ĉirkaŭkreskita murego, per kiu en la antikvaj tempoj estis ĉirkaŭbarita tuta Luĉica, nun leviĝas nur ĉe la norda flanko. En la fendiĝinta murego troviĝas pluraj breĉoj kaj truoj, kie la tempesto grincas kiel serpento en fendaĵo. Se oni ŝovas la kapon en iun de tiuj breĉoj, oni povas vidi preskaŭ la tutan golfon de Rijeka kaj la ŝtonozajn kaj per tempesto razitajn montojn, kiuj etendas sin de Uĉka ĝis Senj.

La sonorigisto Fran, lulante sin sur la feblaj kaj kurbaj kruroj, venis ĝis tiuj breĉoj; sed enŝovinte sian pikilforman kapon en iun el ili, li tuj retiris ĝin. La malvarma kaj furioza frapo de la vento fermigis liajn okulojn. Muĝante kaj fajfante la tempesto ĵetadas sablon kaj polvon de sur la rando de la murego. Ĝi roras tra la mallarĝaj breĉoj kaj ululas tra la truoj. Ĝi tremigas kaj skuigas la oldan hederon kaj kirlas la balaĵon en la anguloj de malvasta strateto. La sonorigisto, tenante sian bluan nazon, klopodas ĵeti rigardon al la maro. Li volas vidi, ĉu malfeliĉe boato en la golfo troviĝas; sed la vento akre pikas la vizaĝon kaj senkompate frapas la palpebrojn. Jen li enŝovas la kapon en la truon, jen li haste eltiras ĝin. La razitaj kaj sulkigitaj vangoj nigriĝis violkoloro pro la malvarmo; la mallarĝaj lipoj, turnitaj en la buŝon trans la sendenta makzelo

kuntiriĝis eĉ pli, kaj la elstaranta mentono etendas sin en la venton kvazaŭ intencanta trahaki kaj malfortigi ĝin. La sonorigisto havas longan kolon, kaj kiam li entiras ĝin inter siajn ŝultrojn, la olda nigriĝinta haŭto faldiĝas kaj sulkiĝas kiel ĉe la kolo de testudo, kiam ĝi retiras la kapon sub sian kirason.

La suno jam iomete leviĝis super la insulon Krk. La oraj strioj disverŝiĝas super la kirlantan akvon kiu fumas kaj blankas kiel delikata neĝo, fluganta sagorapide super la ondoj. Nur ie-ie vidiĝas ŝaŭmantaj ondegoj ruliĝantaj al la bordo de Istrio.

La sonorigisto rerigardas al la maro kunpremante siajn palpebrojn. Nun ŝajnis aperi io en la fumo de la furiozaj ondoj; sed tio ne estis blanka sed iom pli griza, kiel tolo, kiel malseka velo. Fran ankoraŭ pli streĉis siajn larmajn okulojn al la malgranda velo kaj io nigriĝis en la mara kremo. Tio estas boato, tio estas ĝia trunko, tio estas ĝiaj nigraj flankoj, kiuj montras sin leviĝantaj sur la ondoj, kiuj malaperas en salajn verdecajn abismojn. La sonorigisto kompatas la malfeliĉulojn en la barko. Ja kie ili povas savi sin, kie ili povas alboridiĝi sub tiaj egaj klifoj?

La maljuna Fran nun fortrenis sin, haste lulante, al Tomo Bariloviĉ, al la riĉa negocisto, por sciigi, kion li vidis surmare, kaj por trinki glaseton da brando. La domo de la negocisto staras proksime de la preĝejo.

La maljuna Tomo, sidante apud la fajrejo sur malalta benketo, varmigas siajn manojn ĉe la granda flamo, kiu alten kraĉas inter du aŭ tri grandaj potoj. La plenpufaj, glataj kaj ruĝaj vangoj malverigas la fakton, ke la maljunulon premas sepdeko da jaroj. Lia edzino Tonka, maljunulino kun malgranda kaj

rekta staturo, aranĝas potojn ĉirkaŭ la fajro kaj koleras pro la fumo en la kuirejo.

—Bonan matenon! — ekmurmuris la sonorigisto, balanciĝinte en la kuirejon. Lia buŝo moviĝis kvazaŭ maĉanta ion.

—Burasko, burasko, kara Fran! Verdire, mi ĉinokte sentis malvarmon je du litkovriroj pli ol hieraŭ. Oldulinjo, donu al li glaseton da brando; ĉu vi ne vidas, ke li komplete kuntiriĝis pro la malvarmo? — diris Tomo al sia edzino.

—Mi estas sufiĉe maljuna, sed tia tempesto ankoraŭ ne muĝis, nek tondris en la kamentubo kiel nun. Al diablo, ĉi fumo; ĝi elmordos miajn okulojn! Fran ĉu vi ŝatus sekan figon antaŭ la brando; ni havas ilin, dankon al Dio, ankoraŭ du plenajn kestojn, — fanfaronis Tonka.

—Vi havas ĉion, ĉion, kara baptanto, sed kia utilo de figoj, ĉar mi ne havas dentojn, — plendis Fran, montrante perfingre sian sendentan makzelon.

—Maljunaj, jes maljunaj ni estas jam, kara Fran! — kapjesas Tonka.

—Kiom ajn ni estas maljunaj, tian tempeston ni ne travivis ankoraŭ. Ĝi tiel disflamis, ke la maro bolas, ĝi tondras kaj tremas, kvazaŭ ĝi detruos la kampanilon. Ĵus mi venis el de post la kirko; io malbona okazas, velo vidiĝas en la maro.

—Ĉu, pro Dio! Dum tia vetero! — miras Tomo.

—Ho diaj homoj, ĉu ili havas prudenton! Ja, ĉu estas saĝe eliri el haveno dum tia vetero! — lamentas Tonka, frotante siajn okulojn pro la fumo.

—Certe ili estis kaptitaj surmare. Malbono, ho malbono trafis ilin! — balbutas la sonorigisto.

—Ve al ĉiu, kiu hodiaŭ ne estas sub sia tegmento! — vespiras Tonka.

—Fran, vi certe trompiĝis, tio nur ŝajnis al vi, — rimarkis Tomo.

—Kunprenu la lornon, baptano, kaj ni ekiru, ke vi konvinkiĝu, — rediris Fran, rigardante la manojn de la baptanino, kiu portas botelon kun la brando.

—Mi ja diris, mi jam vespere diris, kiam komencis muĝi, ke la tempesto ne pasos sen akcidento. Dio scias, kion signifas ĉi tiu vento!

—Rakontis al mi la Italo, kiu riparas malnovajn ombrelojn en la kabano ĉe la kirko, ke rabistoj ie super Bakar, tie malantaŭ la montaro, mortigis kelkajn homojn. He, kiu vagas ĉirkaŭ la mondo, tiu scias ĉiaĵojn! — murmuris Fran.

—Jes pro tio venis la tempesto! Nuprenu nun, Fran tenu, varmigu vian koron. Kion alie? Ni maljunaj estas, maljunaj, — Tonka balancis sian kapon.

La sonorigisto prenis la glaseton de la brando en sian magran kaj kvazaŭ malnova vakso flavan manon, viŝis la buŝon per la mandorso de la alia, ekridetis al la glaseto, ekpalpebrumis kaj fortrinkis; kaj luliĝinte tutkorpe, skuante la kapon, eldiris trans la makzelo.

—Kvazaŭ fajro!

—Ĝi estas antaŭpasintjara, Fran! Pli bona ne ekzistas de Pula ĝis Rijeka! — laŭdas sin Tomo malsuprenirinte de sur la kameno.

En tiu momento haste venis al la sojlo de la kuirejo junulo stature malalta kaj tenaca.

—Kio okazis, Antonio? — demandas Tomo la junulon.

—Barko surmare, — respondis Antonio basvoĉe, daŭre starante sur la sojlo kaj kructenante fortajn brakojn antaŭ la larĝa dekolta brusto.

—Ĉu vi, Antonio, ŝatus iom da brando? — proponis al li Tomo.

—Ne. Barko estas surmare, — li svingis per sia iom granda kapo, de kiu montriĝis nigra kaj vila hararo el sub la marista malpura ĉapo.

Ŝajnas, kvazaŭ la granda kapo premas la mallongan, tenacan kolon. La vestaĵo de Antonio estas ĉifonita, ie eĉ fliko flikon kovras. Estas furioza malvarmo, sed li kvazaŭ ne sentas ĝin, ĉar la pantalono sur unu gambo estas kuspita ĝisgenue. Pro la malvarmo kaj la vento lia suro ruĝiĝis surkrure. La karno ĉi tie estas firma, kvazaŭ silika.

Tonka, ekrigardante al lia nigreca vizaĝo kaj lia mallonga vila barbo, diris:

—Antonio, varmigu vin iom ĉe la fajro.

—Granda estas la tempesto, la barko frakasiĝos, — rediris la junulo.

—Kiu povus tion scii? — la sonorigisto skuis siajn ŝultrojn.

—Jes, ĝi frakasiĝos! ree diris Antonio, kaj liaj okuloj ekbrilis. La okuloj estas grandaj, nigraj kaj brilaj.

Tomo kaj Antonio nun ekiris al la malnova murego, kie ili renkontis kelkajn maristojn, traktantaj pri la sorto de la barko. Tomo preninte unue inter la genuojn la baskojn de la larĝa kaj longa palto, por ke la vento ne faldu ilin, metis en unu breĉon de la murego flavan lornon, rimarkis la barkon kaj spektante ĝin diris al la aliaj:

—Ili pereis, pereis! Ŝajnas, ke ĝi estas Istria barko, jes, de nia bordo. Ĝi estas malgranda kutro. Ĝi havas nur parton de velo, nu jen, jen, la barko turniĝas al ĉiuj direktoj; certe la stirilo rompiĝis. Jes, ili pereis. La vento kaj la ondoj laŭplaĉe portas la barkon; sed aŭdu, homoj, al mi ŝajnas, ke ili tro mal-

rapide moviĝas. Mi vetus, ke ili trenas, ke ili elklusas la ankron post si de sur la poŭpo.

—Eble neniuj troviĝas en la barko. La forteco de la maro, la ondoj eble forportis ilin de sur la ferdeko, — rimarkis fosisto.

—Ankaŭ tio estas ebla, sed necerte estas tiel, — kapbalancis maristo.

— Homoj, ne babilu, pri sensencaĵoj! Ĉu vi opinias, ke mi vane fordonis tri orajn frankojn por mia lorno? Ja mi vidas ilin, kvazaŭ sur mia manplato. Jes, jes, kvaropo ariĝis sur la poŭpo.

—Ho povraj, ho zorgoplenaj homoj! — lamentis maljunulino

—Vi povis, baptanino, resti hejme, ĉe ŝpinilo, — ekgrumbliis Tomo.

—Ankaŭ mi vidas, ke ili tro malrapide moviĝas malgraŭ tia potenco de la vento. Certe ili havas ankron post la poŭpo. Ili ĵetis ĝin esperante, ke la vento ĉesos, kaj por veni ĝisborde antaŭ la tagiĝo, — asertis Antun Ŝabariĉ, maljuna ŝipano.

—Mi diras, ke sur la barko ne troviĝas taŭga maristo. Kiu ne taŭgas por la maro, li paŝtu siajn kaprojn hejme. Se ili havus iom da prudento, ili levus la ankron, aŭ eĉ pli, ili detranĉus la ŝnuron kaj direktiĝus per tia malgranda velo, sub la bordon de Cres. Tie estas malpli intensa maro kaj malplia vento, — koleris Tomo.

—He, facile al ni ĉi tie! — kapbalancis Antun Ŝabariĉ.

— Se ili povus veni sub ĉi tiun kabon, por ŝirmi sin en la golfeto, ĉar se ili ruliĝus al la sama direkto, ili venus ien sub la urbon, kaj tie eĉ muso ne savus sin, se iu troviĝas en la barko, — konkludis la maljuna Tomo.

La homamaso ariĝadis malantaŭ la kirko. La boato, malgranda kutro kun unu masto, alproksimiĝante la bordon, ĝuste pasis la longecan rifan promontoron Ŝipak kaj la malgrandan golfon sub ĉi tiu promontoro. En la golfeto la maro estis pli kvieta. La homoj divenadis, kien la boato venus, se tiel pelata per la vento kaj per la grandegaj ondoj.

—Se ili ne foriĝos for de la bordo, ili frakasiĝos ĉe Sadriŝĉe, se miaj okuloj ne perfidas min, — diris Antun Ŝabariĉ.

—Tie ili ne saviĝos; nu ni faru ion. Ni iru sur la klifojn, ni kunprenu kelkajn ŝnuregojn, kaj ek, ni savu ilin se eble, — ekkriis la negocisto Stipe, filo de la maljuna Tomo.

—Mi iras serĉi ŝnuregojn, — diris Antonio kaj forkuris kriante: — Helpon, homoj helpon! Boato, la boato rompiĝos!

—Anoncu al la pastro, ke li venu al la kabo. Li benos la mizerulojn, li rekomendos iliajn spiritojn al la Dio, se Dio ne kompatos savi iliajn vivojn, — parolis Tomo kun ĉagrena voĉo, viŝante la larmojn de la okuloj.

La tuta urbeto maltrankviliĝis, la dompordoj malfermiĝadis, la homoj intervokadis sin, kuniĝadis kaj kuris portante longajn ŝnurojn sur altajn klifojn, kiuj altiĝas super la ravineto Sadriŝĉe. Ĉi tiu krutejo, ĉi tiu kaldrono, vastiĝas iom sude de la loko Luĉica, granda kvazaŭ ronda halo, kaj malfermita ĝuste al la tempesto, al la nordorienta vento, tiel ke ĝi ricevas rekte la ondojn, kiuj venas en ĝin kun tiu vento. Ĉe tri flankoj de la ravino la rokoj leviĝas vertikale el la maro. Ĉe ĝiaj randoj la klifoj estas pli altaj ol la hororaspekta, super la maron elstaranta roko en la mezo.

Jam estis la oka horo. La tago estis serena, la ĉielo travidebla. Nur super la nordorienta montaro de Kvarner kirliĝas grizaj nuboj. La malsupraj finoj de tiuj nuboj pendas kvazaŭ

disŝiritaj purpuraj ĉifonegoj, origitaj per la ruĝo de la sunradioj. La maristoj luĉicanoj disŝutiĝis laŭ la rokoj super la ravino de Sadriŝe.

Sur la rifo elstaranta de la kalva kabo malantaŭ Luĉica ariĝis kelkaj virinoj, maljunuloj kaj pli aĝaj infanoj. La vento, muĝante inter la klifoj, kuspadis la robojn ĉirkaŭ la korpojn kaj skuis la malaltajn kaj maldensajn juniperojn. La infanoj klakante per dentoj, tremante pro la malvarmo, mute rigardis la boaton. La pastro vestita kiel por sepulto, tenis en la mano malgrandan krucifikson, kaj liaj palaj lipoj lante moviĝis, flustris ardan preĝon.

La ĉagreno, kiu reflektiĝis sur la vizaĝoj de tiuj homoj, estis pli intensa ol la horora neniigo, etendiĝanta sur la maro. Kun larmoplenaj okuloj la homoj rigardis al la marsupraĵo, kiu antaŭ ili bolis, kaj la preĝo estiĝis pli arda, vidante ĉie ŝaŭmon, fumon, furiozon, morton. Ĉe la suda horizonto interkisis sin la maro kun la ĉielo. La malkvietaj ondoj baŭmas ĉi tie, ili altiĝas al la kvietaj kaj malvarma ĉielo.

La barko ŝoviĝas al la bordo, ĉiuj okuloj estas direktitaj al ĝi. La kolosaj ondoj ĵetas ĝin sur siajn pintojn, lavas ĝian ferdekon, transverŝas sin tra ĝin, faligas ĝin en la konfuzajn kaj verdecajn akvovalojn. Ĉirkaŭ la barko la maro bolas, la akvo kirliĝas, ĉie volviĝas fumo, ĉie disigita ŝaŭmo, muĝado, krakado, furioza horora neniigado.

La homoj ne ŝiras for siajn okulojn de la malfeliĉa barko, kiun la ondoj alpelis sub la klifojn. Ĉiuj klinas sin de super la rokoj, kaj la barko troviĝas sube, kvazaŭ en abismo. Kvar homoj troviĝas en ĝi; la povruoj tenas sin je la rompita floso, por ke la ondoj ne forportu ilin de sur la ferdeko, por ke la ondoj ne transverŝu ilin en la profundon. Kiam la barko res-

tas sur la ondo, la suno eklekas ĝian lavitan ferdekon kaj ekbrilas ĉe ĝia nigra trunko.

Fine jen la mizeruloj en la golfeto. La pastro krucsignas la barkon per la krucifikso, li benas ĝin per la sankta akvo, aspergante la abismon. La larmoj tremetas sur lia pala vizaĝo. La homoj mallaŭte singultas. La kompatindaj ŝipanoj sur la barko ankoraŭ estas vivaj, sed antaŭ ili elstaras al la ĉielo nigriĝintaj klifoj, kiuj rebatas la tondradon de la ondoj per infera rikanado kaj horora rorado.

Meze de la golfeto el la maro montras sin rifo, grandeta kiel fiŝista barko. Inter la rifo kaj la nigriĝinta kaj ĉirkaŭmordita klifbazo la maro estas malprofunda, ĝis homa talio. La rifo estas for de la bordo je dekkvino de paŝoj. En la krutejo la maro impetas muĝante, sturmas la klifon hurlante, ĝi frakasigas per krakego, retiriĝas la surfo, ĝi impetas, klakas, kapriolas, tondras, bolas, ŝaŭmas, sonoras, veas kaj knaras.

Granda ondo enŝovis la barkon inter la rifon kaj la bordon, sur tiun malprofundaĵon. La barko per la masto frapis la elstarantan klifon, la masto rompiĝis kaj falis en la maron kune kun la velo. Kiam la ondo retiriĝis de sur la malprofundaĵo, ĝi kuntiris la barkon, kiu per la flanko frapis la rifon. Ĉimamente la maristoj elsaltis sur la rifon. La barko rompiĝis kaj dum momento malaperis frakasita en la ondoj. La homoj super la klifoj respiris, vidinte tiujn povrulojn sur la rifo, je kiu ili gluiĝis kiel hirudoj. Sur la klifoj oni intervokas sin, ordonas, oni mallevas la ŝnuregojn en la ravinon. Nun oni povas vidi la malfeliĉajn ŝipanojn kaj la rifon, sed nun ĉio malaperas en la ŝaŭmo, kiam ondo superverŝas ilin. La vento svingas la ŝnuregojn, unu venis al la rifo. Unu ŝipano kaptis ĝin kaj enŝovis sin en la pretan kaptilon, kiu premis lin sub la akseloj.

Tiuj sur la klifego, kie estas la pastro, signalis svingante per manoj al la aliaj, kiuj estas super la krutejo, ke ili tiru la ŝnuregon. La luĉicanoj komencis levi la malfeliĉulon, kaj la homoj ekkriis: — Unu estas savita! Unu estas savita!

La luĉicanoj haŭlas la ŝnuron, sed ili ne vidas la homon, kiu ligis sin per ĝi, ĉar li pendas super la maro sub la elstaranta roko, nur ili sentas ion pezan je la ŝnuro. La maristoj tiras kaj tiras, Antonio estas plej proksima al la rando de la klifego, la muskoloj sveliĝis, la okuloj brilas, per siaj fortaj kruroj li apogis sin al la rokoj, la tendenoj en li krakas. La ŝnuro movis kelkajn ŝtonojn, tiuj ruliĝis, kaj unu frapis la kapon de la ŝipano, kiu pendis sub la klifo. Kiam ili eltiris lin, la verto estis trafendita, la vizaĝo sangmakulita. Oni unue opiniis, ke li estas jam mortinta; sed kiam oni rimarkis, ke li spiras, kvaropo lin levis kaj forportis lin en la urbeton, en la domon, kiu estis plej proksima, kaj ĝi estis la domo de la maristo Antun Ŝabariĉ.

Kiel estis savita la unua, tiel estis savitaj ankoraŭ du, sed tiuj ne vundiĝis. Sur la rifo restas ankoraŭ unu. Laŭ la diroj de la savitoj, li estis knabo de dekkvin jaroj. Oni ankaŭ eksciis, ke la barko estis el Jelenŝĉica, kiu situas for de Luĉica je du horoj sude.

La knabo tenis sin longtempe sur la rifo, kaj la vento kvaŭ ne volis alĵeti la ŝnuregon. Ĉiuj jam perdis la esperon savi lin. Kiam la luĉicanoj demandis, el kiu familio devenas ĉi tiu knabo, la savitoj respondis, ke li en Jelenŝĉica ne havas patron nek patrinon, nek iun ajn el parenkaro, ke li estas trovito, alportita el Triesto. Aŭdinte tiujn vortojn, Antonio komencis krei, kiel rabia.

—Mallevigu min sub la klifon, mi firme ligos min. Inter la

rifo kaj la bordo la maro estas malprofunda; kiam la ondo retiriĝos, mi saltos sur la rifon, mi kunligos la knabon apud min, kaj kiam mi signalos esti preta, vi levu min.

—Ne, ne frenezu, Antonio! — alkriis multaj. — Ne, vi mortigus vin!

Antonio faris lazon ĉe la fino de la ŝnurego, kaj enŝoviĝinte en ĝin, li malespere ekululis:

—Tenu la ŝnuron, aŭ mi mem ĵetos min sub la klifon.

La maristoj ekprenis la ŝnuron kaj komencis malrapide mallevi lin. Iom poste la ŝnuro ekestis malpeza. Antonio estis jam en la maro. La homoj sur la klifoj miris, preĝis kaj kruccsignis. Retiriĝanta ondo retiris Antonion sur la rifon. Okulmove, li kaptis la knabon je la zono. Liaj okuloj ekbrilis pro nemezurebla ĝojo. Li ekrigardis al la pala kaj timigita vizaĝo de la povrulo, li ĉirkaŭprenis lin firme kaj ekkriis: —Tiru!

La maristoj laŭ la signalo de sur la alia klifo komencis levi la duopon. La amaso dankas al Dio, pro la kompatato, ke per tia mistera maniero estos savitaj la homaj vivoj, kiuj jam estis en la faŭko de la timinda morto.

—Tiru, tiru! — ĝoje kriis la amaso.

Antonio kaj la knabo balancas je apenaŭ tri klaftoj super la maro, la sango premiĝis en koroj de la homoj sur la klifego. Ĉiuj ŝtoniĝis. La ŝnuro, jam ĉirkaŭrongita de la akraj ŝtonoj, derompiĝis kvazaŭ maldika fadeno. La malfeliĉuloj falegis en la maron. Giganta ondo, rompante kaj tondrante envagis en la malprofundan golfeton, kovris ilin kaj superverŝis. La ondego muĝante kaj surfante retiris sin, kaj tiuj de sur la klifo rimarkis homon, kiu etendiĝis ventrokuŝe inter akraj ŝtonoj de la rifo. Tiu estis Antonio. Li ekstaris, rektiĝis dummomen-

te, ĉirkaŭrigardis la golfeton kaj rimarkis sur la kresto de la ondo, kiu ruliĝis al la rifo, du kunmetitajn manojn inter la dispecigita ŝaŭmo. Antonio rapide kuŝiĝis sur la rifon, firmiĝis sur ĝin, kaj kiam la ondokresto transversis lin, li reekstaris. Li malespera ĉirkaŭrigardis la maron, sed ĉie ŝaŭmo, ĉie klakado, ĉie timinda neniaĵo...

La popolo sur la klifoj genuiĝis. La vento siblas kaj fajfas, frakasiĝante kontraŭ la rokoj kaj skuigante la mallumajn juniperojn. Sub la serena kaj lazura ĉielo etendiĝas senfina maro. Laŭ la blanka supraĵo verŝiĝis la suna oro. La pastro preĝas al Dio por la paca spirito de la mortinto. La larmoj malsekigas lian palan kaj ĉagrenomienan vizaĝon. La vento disportas la gutetojn de la sanktigita akvo. La popolo singultante respondadas al la preĝo de la pastro.

Nelonge poste Antonio estis savita, kiam li kaptis la ŝnuron.

La amaso ekiris nun en la urbeton, interparolante pri la barkorompigo kaj pri ĉio, kio okazis. Bonaj homoj akceptis en siajn domojn la du savitojn, kaj la grave vundita mastro de la boato troviĝis jam duonhore en la domo de Antun Ŝabariĉ. La vundita Mato Bartoliĉ estis negocisto el Jelenŝĉica. Ĉiun semajnon li, unu aŭ du foje, kutimis veturigi vinon, oleon kaj aliajn artiklojn en Rijekon per sia barko, kiu jen sub la klifo rompiĝis.

Unu horon post la barkorompigo, la maljuna Fran sonorigis funebre en la malluma kaj malvarma turo. La malĝoja sono, anoncante la teruran morton de la droninto, perdiĝis kaj malviviĝis en la bruoj de la vento.

La maljuna Tonka, trenante sin ĉirkaŭ la fajrujo kaj ploran-

te pro la okazinta akcidento kaj kolerante pro la fumo, parolis lamentante.

—Ho ci maro, malbona maro! Jam sufiĉe ci forglutis, sufiĉe da ostoj blankas en cia fundo! Ja kial kara Dio tiel destinis? Ho povra knabo! Tiel morti, sen pastro, sen sankta oleo kaj sen krucifikso enmane!

—Ne utilas lamenti! Tiel ĉiam estis; iuj mortas en ondoj, kaj aliaj en lito, — respondis Tomo, ŝia edzo, metinte zorge en sian picon dikan ardaĵon, kiu saltetis sur lia polmo.

—Jes, jes, ĉiu havas sian destinon! — kapbalancis Tonka. — Ja ankaŭ nian, — je tiu ĉi "nian" oni subkomprenas pri ilia filo Stipe, — ankaŭ nian povus trafi akcidento. Ho, nigra tago, neniam cin ĝisvivu la luĉicanoj!

—Estus pli bone, ke vi silentu! Kiel povas io tia trafi vian oldan kapon? — riproĉis Tomo sian edzinon, embarasiĝinte pro timo, ke tiu nigra tago tamen povus veni.

—Mi scias kion mi parolas, mi scias! Jam plurfoje mi diris al Stipe, ke li estu singarda kaj ke li ne eliru el la haveno dum tempesto. Kaj kial tiom peni senĉese? Ĉu ni ne havas sufiĉe da ĉio en la domo kaj ĉirkaŭ ĝi? Ja ankaŭ vi sufiĉe trasuferis en via vivo! Ĉu iutage ni ne lasos ĉion? Ĉu ne sufiĉos nur kelkaj terbuloj kaj kvar bretoj?

Ni devas labori, dum ni vivas kaj dum ni povas labori! — diris Tomo. — Ĉu vi scias ion pri la mondo! Jen, kia saĝo virina! Vi parolas kaj babilas pri ĉiaĵoj; nu vi alimaniere kaj pli malserene aspektus, se morgaŭan matenon vi ne havus pelveton da varma kafo! Ho, ho! Estas pli facile plori ol droni! — mansvingis Tomo, sidiĝante ĉe la fajrujo en varma palto.

Ankaŭ mi sufiĉe, dum mia vivo, vartis infanojn kaj zorgis

pri la domo kaj ĉirkaŭ ĝi, ja tiu ĉi fumo formordis jam miajn okulojn kaj la vidkapablon!

—Jes, oldunjo, vi estis! Sed rilate al Stipe, lasu lin libera. Li scias bone pri la stirilo kaj pri la velo! — asertis Tomo rigardante en grandan poton, en kiu estis kuirata kontentiga peco da bovaĵo, kiu jam flavigis la bolantan akvon.

La negocisto Stipe, mezurante sakojn de sukero, kafo kaj faruno sur granda pesilo en la vestiblo antaŭ la kuirejo, aŭskultis la interparolon de siaj gepatroj. Stipe estas je ĉirkaŭ kvardek jarojn aĝa. Li preskaŭ ne estis videbla el inter tiuj sakegoj, pro sia malaltstature kaj dikeco. Li ridetis kaj evidentiĝis ke li estas viro kun klara kaj sana menso. La maljuna patro transdonis ĉiujn negocojn al sia filo. Tio estas riĉa familio. Stipe estas vidvo. Levante la sakojn sur la pesilon, li ekŝercis kun la patrino por iom ĝojigi ŝin.

—Kara panjo, nun denove vi havas kaŭzon plori almenaŭ unu monaton longe. Mi scias, vi rememoros ĉiujn maristojn ĝis nun dronintajn. Mi komprenas, vi ploras, ĉar ankaŭ al vi ne mankas ankoraŭ cent jaroj ĝis la momento, kiam la spiro nin perfidos. He, morti oni devas, kara panjo! Sen ŝerco, oni devas foriri en la ombron sub la tilion!

Sur la tombejo en Luĉica estis granda disbranĉiĝinta tilio. Morti aŭ iri sub la tilion, en Luĉica estas la sama nocio.

—Ho, kara Stipe, vi ŝercas facile, ĉar vi ne scias, ke mi ne povas miajn okulojn fermi, dum nia domo tremas pro tempesto, dum vi forestas el sub nia tegmento! Akcidento okazas, dum oni plej malmulte pensas pri ĝi, kaj pri malfeliĉo oni ne devas preĝi, kutimis diri via forpasinta avo.

—Kion oni fari povas, panjo! La maro kiel la maro! La knabo dronis, li ne ekzistas plu, al li estas bone nun, li finis sian

taskon, sed se li vivus plu, li eble suferus pro malvarmo, malsato kaj pro ĉiaj malbonoj.

—Jes, jes, li finis sian vojon; nun li estas en paradizo, — kapbalancis la maljunulino.

—Des pli bone al li! Mi opinias, ke estas pli bele en la paradizo, inter la sanktuloj kaj anĝeloj, ol sur la malgranda kuro, kie li estis ŝipanaĉo, malsata kaj ĉifonvestita, — ŝercis Stipe.

—Parolu vi, filo, kio ajn plaĉas al vi, sed mi ne volas iri for de ĉi tie, ĉar mi scias, kiel ĉi tie estas; sed kiel estas tie, kie la knabo estas nun, pri tio malmultaj povas ion diri! — svingis Tomo per la kapo.

—Kiel oni diras, tiu knabo havis neniun parencon en Jenŝĉica. Ke li estas trovito. Panjo kara, vi scias, ke Antonio estas pli bona ol multaj aliaj; sed jen, oni ne ŝatas rilati kun li. Tiuj orfoj spertis multajn amarecojn! Povra Antonio! Mi satigos kaj trinkigos lin dek tagojn, tuj poste li venos al ni. Kiu pli sindone oferus sin al proksimulo, ol li faris hodiaŭ? — demandis Stipe atentante por precize mezuri la kafsakegon.

Stipe bezonis Antonion jam samtage, kiam rompiĝis la boato de Mato Bartoliĉ. Oni serĉis Antonion dum la tuta posttagmezo, sed vane.

Antonio Marola estas trovito. Ĉirkaŭ tridek jarojn li aĝas. Malriĉa virino, Kata, alportis lin el Triesto, kiam li aĝis apenaŭ unu jaron. En lia kvina jaro mortis Kata, kaj li restis tutsola en tiu ĉi mondo. Bonaj homoj nutris kaj vestis lin, por ke li ne pereu pro mizero. La vilaĝa infanaro ludis kun Antonio, sed se ili ekdisputis, ili primokis lin, ĉar li estis trovita, kaj ili nomis lin bastardo. Ju pli aĝa li estiĝis, des pli li sintiriĝis for de la aliaj infanoj. Lia plej kara amuzo estis fiŝkaptado.

Kiam li superruzis iun fiŝon per delikata hokkaptilo kaj el-tiris ĝin el la maro per fajna fibro, liaj nigraj okuloj briletis de ĝojo. Li lerte manipulis per la hokkaptilo, li atente rigardis la nigrajn fadenojn, ĉu orfiŝo, tinuso, salvelino aŭ pagelo ekavidos, por tiel aliĝi la jam kaptitan fiŝeton surborde, kies blanka ventro ŝveliĝis kaj ruĝaj brankoj disiĝis spirante venenan aeron sur la dura klifo. La sunradioj rebrilis ĉe la malsekaj skvamoj de la kalcitranta fiŝo je la hoketo, ĉu pro doloro aŭ timo, kiam Antonio supren tiris ilin. Ili tiam saltetis sur la malmola ŝtono, kaj kiam ili trankviliĝis, ili elspiradis, rememorante pri la ĉarma libero, kiun ili ĝuis en la frida marprofundaĵo. Antonio tiam kolektis sekajn branĉojn, subtilan onobrikon kaj sekan salvion en arbareto apud la maro, li preparis malkompaktan brulaĵkolekton kaj ekfajriginte ĝin li blovis intense, ke la vangoj ŝvelpufiĝis, la okuloj larmis pro fumo. Nun la fumo kvietiĝis, la ligno ardiĝis, sur la karbo, kiu palis kontraŭ la arda suno, la fiŝetoj ruĝiĝadis, siblis kaj grilis, kuntiriĝante kaj fumante. Sur la rifoplana, griza kaj soleca bordo, sub la lumblua ĉielo, en la varma aero, sidante sur rodita kaj eroziita klifo, super la maro mem, speguliĝante en la travidebla kaj blanka akvo, li rapide ŝiris la viandon de sur la fiŝostaro, kun la vizaĝo nigriĝinta kaj la korpo duonnuda, Antonio tenis la fiŝon per unu mano ĉe la kapo, per la alia, ĉe la vosto.

Antonio estis fort- kaj firmstatura. Jam kiel dekjara knabo, li laboris eĉ plej malfacilajn laborojn silente kaj suferante ĉian penon, nur por panpeco aŭ por pelvo da lento. Iĝinte dekdujara, lin prenis en sian hejmon la maristo Antun Ŝabariĉ. Krom aliaj laboroj, Antonio zorgis pri la infanoj de Ŝabariĉ:

pri la eta Marko kaj pri lia pli juna fratino Marija. Foje li laboris ankaŭ alie, sed plej ofte ĉe la negocisto Stipe.

(Post la akcidento Antonio kvazaŭ malaperis en la teron. Nenie en Luĉica oni povis vidi lin. Dum pluraj horoj li sidis sur la klifo apudborde, li gapis en la maron kaj eĥas la vorto "trovito". Li decidis nepre trovi la malfeliĉan knabon. Li kaŭris surborde kaj rigardis la maron, kaj la duan tagon de serĉado aspektis enmare ĉe la plena lunlumo kvazaŭ granda makulo en la akvo.)

Li spasme skuiĝis per la tuta korpo, kaj haltinte dummomente, li rapide ekkuris al la maro. Li rigardis. Homo kuŝis en la akvo. Duono de la korpo estis sur la malprofunda duno. La kapo estis en la maro, kun la vizaĝo turnita al la fundo. Antonio alpaŝis en la maron, li prenis la korpon ĉe la ŝultro, levigis kaj trenis ĝin eksteren. Li kuŝigis ĝin duonside. Genuinte li kliniĝis al la kadavro kaj ekrigardis al ĝi. Malsekaj kaj ĉifonitaj vestoj ĉirkaŭtordis la junan korpon. La luno rebrilis ĉe la pala kaj blua vizaĝo. El la nigra senorda hararo gutis akvo. La genuoj estis nudaj kaj rompitaĵ; la frunto rompita, duloke. En la verdetaĵoj blankis la kraniostoj. Ankaŭ la makzelo rompiĝis. Sango ne ekzistis.

Antonio prenis la droninton je la mano. Ĝi estis malseka kaj malvarma. Li lasis ĝin. Tiam li metis sian manon sur la rompitan frunton, li rigardis al la blua lavita vizaĝo, li moviĝis, kaj tiam raŭke kaj dolore elbuŝigis: —Bastardo! — li forŝovis la kadavron...

Poste sidiĝinte apud la kapo de la mortinto, li sinkis en pensadon. Longtempe poste li eksentis malvarman nokton; li rememoris pri la varma ĉambro en la domo de Antun Ŝaba-

riĉ, li rememoris pri lia filino Marija, kiu ĉiam estis tiel bona al li, kaj li ekploris...

Frumatene Antonio prenis la kadavron surbraken kaj ekgrimpis laŭ ŝtonozaj krutaj padoj. Portante la kadavron, li haste marŝis de ŝtono al ŝtono laŭ deklivoj, tra arbaretoj kaj trans riveretoj. Jen li kaŝiĝis de la lunlumo, jen li kaj la mortinto, nur momente estis superverŝitaj de la lunlumo. Finfine li alvadis antaŭ la tombejon de Luĉica. Tie staris ruiniĝinta mortintdometo. Antonio eniris kaj metis la mortinton sur la portilon. Nun li denove ekrigardis al la kadavro. Grandaj larmoj komencis rapide guti laŭ la vangoj. Li falis surgenuen kaj preĝinte laŭte mallongan preĝon li ekstaris kaj denove ekrigardis dolorsente kaj karese al tiu blua vizaĝo. Kisinte la frakasitan kaj malvarman buŝon de la mortinto li eliris el la dometo viŝante la larmojn de sur la nigreca vizaĝo per la mandorso de sia vejnoŝvela mano.

II

Unu horon post la ŝiprompiĝo la paroĥestro venis en la domon de la maristo Ŝabariĉ konfesigi kaj komunii la vunditan Bartoliĉ. La paroĥestron akompanis multaj luĉicanoj. La ĉambreto, en kiu kuŝis la povra mastro de la rompita barko, pleniĝis de la popolo. Maton oni metis sur altan liton, kiu okupis preskaŭ la duonon de la ĉambreto. Li kuŝis iom levita kaj li spiris malfacile. Jela Ŝabariĉ kaj ŝia filino Marija zorge ellavis, purigis kaj bandaĝis la teruran vundon sur la kapo de la malsanulo.

La pastro preĝis longe, rigardante al la tristeca lito, kaj kiam li finis preĝi, li ordonis al la virinoj, ke ili tuj anoncigu al li, se Bartoliĉ rekonsciiĝos kaj povos paroli. Ĉiuj ĉeestantoj opiniis, ke Mato ne resaniĝos pro la grava vundo kiun faris la granda ŝtono, kiam oni levadis lin el la krutejo Sadriŝĉe.

—Ĉu vi sciigis Jelenŝĉicon pri la malfeliĉo? Se estas destinite al li translokiĝi en la eternon, estus bone, ke iu lia venu ĉi tien. Eble ili povus trovi lin ankoraŭ vivan, — diris la paroĥestro forirante.

—Jes sinjoro, ni sciigis. Jen, ĵus antaŭ nelonge ni sendis la malgrandan Johanĉjon kun letero. La knabo estas lerta piediranto; post du horoj tuta Jelenŝĉica ekploros, — rediris la maljuna Jela al la paroĥestro.

—Bone, Jela, bone! No, kiu skribis la leteron? Bona Dio,

mildigu afliktdoloron al la maljunaj gepatroj de tiu ĉi malfeliĉa junulo, — suspiris la paroĥestro.

—Terura malfeliĉo trafis ilin! Stipe, nia bona Stipe, konas la patron de Mato. Li skribis la leteron; kion alian ni povis, li devis sciigi la veron! — ŝi klakis per la manoj.

—Ĉu iun vorton li elparolis de kiam li estas en la lito?

—Ne, bona sinjoro.

—Li estas grave vundita, sed se la cerbo ne estas difektita, li tamen povus resaniĝi. Ni Dion konfidu! — diris la pastro, ekrigardante al la ĉielo kun konfidenca mieno.

—Ĉio estas en diaj manoj! Kiam ni lavis kaj purigis la vundon, li dolore ekĝemis kelkfoje. Ni vokis lian nomon, metadis vinagron sub lian nazon, frotis liajn tempiojn; sed li eĉ okulon ne malfermis, — diris Jela.

—Diru al ni, sinjoro, ĉu vere li ne mortos? — demandis Marija la paroĥestron mallaŭte.

—Ja, kiu tion povus scii, kara infano! Prizorgu lin, Dio rekompencos al vi! Jela, mi sendos al vi iom da bovaĵo; iom da supo ne damaĝos lin. Kiel dirite, mi petas, sendu iun por sciigi min, se li rekonsciiĝos, — diris la paroĥestro, kaj salutis la ĉirkaŭstarantojn, forirante el la domo.

La maristoj longe konversaciis, kaj fine ili ĉiuj eliris el la domo, postlasante en ĝi nur Jelan kaj Marijan. La maljuna Jela ekiris en la ĉambron al Marija por vidi, kiel fartas la malsanulo. Reveninte en la kuirejon, ŝi batis per vergo grandan nigran katon, kiu sterniĝis sur la varmaj brikoj ĉe la fajrujo. Jela surmetis kelkajn dikajn ŝtipojn sur la fajron kaj klopodis prepari ian tagmanĝon. La eniro en la ĉambron, kie kuŝas la

malsanulo, situas ĉe la kuirejo. La pordo estas duonfermita. La patrino kaj la filino mallaŭte konversaciis kaj atentis, ĉu Mato ekmovos sin aŭ ekparolos ion. La malfacila spirado de la vundito interrompdis la silenton, kiu estiĝis, kiam la virinoj ĉesis paroli. Ĉi tiu modesta maristdometo situis fronte al la maro. Kun frunto blanka. En la fenestroj verdis maĵurano kaj bazilio. La floroj estas de Marija. Ŝi vartis kaj priverŝadis ilin kaj per ili ŝi ornamis sian bruston ĉiudimanĉe kiam ŝi iris al la ĉefmeso. Bildoj de diaj sanktuloj pendas sur blankaj kaj kelkloke sur flaviĝintaj vandoj en la ĉambreto. Super la lito ruĝas en flava kadro sankta Nikolao, la patrono de la maristoj. Ĉe la kapkuseno pendas vitra ujeto kun sanktigita akvo. Al granda najlo apud la akvo estas alligita fasko da velkiĝintaj olivbranĉetoj, kiujn oni brulos dum tondrado aŭ hajlo. La sankta kaj odora fumo havas potencon forpeli nigrajn kaj grizajn nubojn, ĉiujn sorĉistinojn kaj malbonajn spiritojn kiuj svarmas en iliaj sinoj. Sanktigitaj olivbranĉetoj estas uzataj de virinoj en Luĉica ankaŭ por aliaj intencoj. La maljuna Jela resanigis plurfoje sian Marijan, dum ŝia infanaĝo, kiam malbona okulo de najbarino damaĝis, pro envio, ĉar Marija estis bela kaj fortstatura knabeto. Kontraŭ sorĉo ne ekzistas pli efika kuracilo ol olivfumo.

En la ĉambreto estas ĉio pura, kaj ĉiu objekto staras sur sia loko. Grandaj kestoj estas vicigitaj laŭlonge de la vando, ŝranko brilas inter la fenestroj, kaj sur ĝi ruĝflavas pomoj en malgrandaj tasoj. Laodoro de la pomoj disvastiĝas tra la ĉambreto. Sur la ŝranko estas granda horloĝo tegita per oro sub sonorilforma vitro. Super la ŝranko estas enbatitaj en la vandon du kejoj, sur kiuj estas malgranda breteto, kaj sur ĝi granda ŝipo, du futojn longa. La ŝipo havas tri mastojn, la veloj fla-

viĝis. Sur la poŭpo estas hisita flago el papero, sed per sia koloro ĝi prezentas neniun standardon en la mondo. Ĝi estas verko de la ĉarma Marija.

La brakoj de Mato kuŝas trankvile apud la korpo, kiu etendiĝis sub la violkolora kovrilo. Lia kapo estas pansita per blankaj tukoj sub kiuj montras sin nigra hararo. La supra parto de la frunto estas blanka kvazaŭ neĝo, kaj la malsupra varias al pli nigra koloro. Kontraŭ la lito sidas Marija kaj de tempo al tempo ekrigardas al la vizaĝo de Mato. La okuloj estas fermitaj, kaj la longaj nigraj palpebroj malsupreniĝis al la iom ŝvelinta blua haŭto sub la okuloj. Mallonga nigra barbo ĉirkaŭrandas lian vizaĝon, sur kiu luktas la morto kun la vivo. Super la dolore tordita lipo nigras bela kaj supla liphararo. La supra vico de la blankaj kaj fortikaj dentoj brilas inter la palaj lipoj, kiuj de tempo al tempo iomete ektemas.

—Ĉu li moviĝas? Ĉu li spiras pli facile? — demandis la patrino el la kuirejo.

—Ne, li kuŝas trankvile.

—Ho, povra junulo!

—Ne timu, panjo, vi vidos, ke li resaniĝos.

—Dio plenumu vian esperon!

—Ni scias nenion; sed mi konjektas, io parolas en mia koro, ke li ne mortos.

—Estus domaĝo, se pereus tiel tenaca kaj bela junulo!

Marija ekrigardis la doloran vizaĝon de Mato, kaj pensis: la patrino prave diras, ŝi ekparolis laŭte:

—Jes, jes, li ne mortos, li havas firman konstitucion, nun mi rimarkis, kiel fortikajn brakojn li havas.

—Nia bapitano Stipe rakontis al mi... for vi olda cindrulino,

ŝic; ŝic! — koleris Jela pro la kato, — jes, li rakontis al mi, ke Mato estas bona kaj prudenta junulo.

—Ankaŭ mi aŭdis, kiam Stipe rakontis.

—Ve, malseka estas lia vestaĵo, kvazaŭ la tutan nokton li kuŝis en marprofundo. Ja, kiel ne, apud tia vento. Multege da maro transversigis trans la boato! — lamentis Jela, pendigante la veston sur la fulgecajn kejlajn super la fajrejo. Mi timas ke la vesto sekiĝos antaŭ, ol li povos restariĝi.

—Jes, tiel estos, kara Marija.

—Ke almenaŭ la kuracisto venu ĝustatempe, por ne riproĉi al ni, ke ni ne faris ĉion eblan.

—Aĥ, la kuracisto ne zorgas pri malriĉuloj! La sinjoroj, kara mia, ĉiuj egalas! KREDU al mi, Marija, mi estas pli aĝa, kREDU al mi, malfeliĉo por ni, se ni bezonos rilati kun ili. Kia utilo de kuracisto? Se destinite, Dio scias, kial destinite!

—Panjo, ne parolu tiel!

—Kuracisto estas homo, kiel ni ĉiuj, kia helpo de ili! Mi scias pri grandan nombron da homoj, kiujn ili sendis en la tombon!

—Vi ne pravas, kara panjo! Mi kaj vi ne vizitis lernejon, ni nenion scias, sed kuracistoj lernas pri ĉiaĵoj en grandaj urboj, ili ankaŭ mortintajn homojn sekcas kaj distranĉas.

—Hontinda ago, ĉu ili ne abomenas homan korpon! Marija, ne parolu al mi pri tio, ĉar mi tuj rememoras mian Markon! Sufiĉe mi penis pri li, multfoje mi persvadis lin, ke la pastra profesio estas la plej utila kaj la plej bela en tiu ĉi mondo. Jes, vanas paroli aŭ peti, la gefiloj ne taŭgas, kiel iam antaŭe! Se li estus obeinta min, mi certe savus mian spiriton, sed tiele, Dio scias kien sankta Miĥaelo dum la juĝtago pelos min. Ne estus malkomforte por Marko, se li menciis kel-

kiam ankaŭ mian nomon dum nigra meso! Ho, gefiloj! Li ne volis obei min, kaj jen li nun en Vieno tranĉas mortintajn homojn! Kia lernejo? Mi miras, kial la imperiestro permesas tion en sia loko. Certe la tuta urbo malbonodoras! Ĉu ne estus pli bone por li, se li estus paroĥestro ĉi tie en Luĉica? Kiu el ni pli bone vivas, ol la sinjoro paroĥestro? Pastro, paroĥestro! Ho, kara Marija! Nur turni sin du, tri foje ĉe la altaro, kelkfoje diri: Sinjoro estu kun vi! Kaj jen enpoŝiĝo de kelkaj dekoj da moneroj, konforme al la speco de la sankta meso. Aldone tion, ankaŭ entombigoj, geedziĝoj, bapttoj kaj alio! Ili ricevas ankaŭ salajron de la imperiestro, Dio donu ĉian bonon al li, jes, jes salajron; ja kiu alia raportus al la imperiestro, se ne paroĥestro, kiom da homoj naskiĝis, por esti soldatoj sur liaj ŝipoj? Bone mi scias, ke la ŝoseo-inspektisto Zvane alportas al la paroĥestro salajron ĉiumonate el la imperiestra kaso.

—Ĉiuj ne povas esti pastroj kaj episkopoj, — flustre Marija diris el la ĉambro. La knabino, rigardanta al la pala kaj bela vizaĝo, aŭdis nur kelkajn vortojn de sia patrino.

—Vi pravas, kara mia, sed nia Marko facile povis atingi tion. Lia voĉo konvenas al pastro, ja, la tuta preĝejo reeĥus dum la ĉefa meso. Predikoj ankaŭ. Ĉiuj luĉicanoj suspire plorus en la preĝejo!

—Kiel vi parolas pri tio? Kiu diris al vi, ke la episkopo ĝuste lin sendus al Luĉica?

—Kial ne, karnjo!? Ĉu vi ne scias, ke ĉiuj luĉicanoj peticius al la episkopo, por sendi lin al ili? Ja ankaŭ Marica de Tomo, la patrino de Stipe, ploris eksciinta, ke Marko ne estos pastro.

Jela daŭre parolis pri sia filo Marko, kiu lernis medicinon en Vieno, kaj pri liaj kapabloj, kiuj farus el li la unuan Istri-

an pastron. Marija ne aŭskultis ŝin plu, ĉar ŝi rigardadis al la dolora kaj suferoplena vizaĝo de la maristo.

—Marija, kial vi ekmotis?

—Kion vi deziras, panjo? — flustris la knabino.

—Kiel li nun fartas? Ho ve, la vesto neniam sekiĝos ĉe tia fajro!

—Panjo, parolu pli mallaŭte. Al mi ŝajnas, ke li spiras pli facile.

—Povra junulo.

—Jes, jes, pli trankvile li spiras. Ankaŭ la vizaĝo iom reviviĝas. Mi esperas ke li baldaŭ ekparolos.

—Bone, bone, karnjo mia; sed ŝanĝu ankaŭ la malsekigaĵon sur lia kapo.

—Ĉu la patro venos baldaŭ?

—Mi ne scias, Marija.

—Ĉu vi scias kien li foriris?

—Li iris vidi, kiel fartas la aliaj du savitoj. Granda malbono trafis ilin! Venontfoje ili atentos pli! Nu, kia utilo? Kiu povas kontraŭi tian venton? — la virinoj eksilentis.

Marija, restariĝinte mallaŭte, proksimiĝis al la lito kaj apogis sin al ĝi ĉe la piedoj de Mato. Ŝi mallevis sian belan kapon en la polmon de sia dekstra mano kaj sinkis en melankoliajn pensojn.

Marija surhavis nigran jupon, kun pezaj kaj densaj faldoj, kiu falis laŭ ŝia svelta kaj plenforma korpo. Sur ŝia ĉarma vizaĝo vidiĝis melankolia konsterniĝo kaj dolora angoro. Amaro enverŝiĝis en ŝian animon. Granda tristeco krispigis la tutaĵon de vejnetoj super la profundaj okuloj, akra doloro premis ŝiajn nigrajn brovojn, dolĉa kaj indulgema kompatato verŝiĝis laŭ ŝia tuta korpo. La nigra kaj glate kombita hararo pre-

zentis modestan kaj subtilan ĉarmon de ŝia malserena frunto. La brilaj okuloj de Marija, evidente konsternitaj, ripozis sur la suferplena vizaĝo de la vundita junulo. La knabino longtempe karesis lin per siaj mildaj rigardoj, observante kaj rigardante jen la frunton, jen la buŝon, kaj jen la fermitajn okulojn de la malsanulo. Kiam ŝi eksentis larmojn sur siaj palpebroj, ŝi venis al la fenestro kaj rigardis al la maro, kiu ankoraŭ ŝaŭmis. La vento iom malintensiĝis, kaj la nebulo super la maro kelkie disŝiriĝis. Nun estis eble vidi la verdajn kaj konfuzajn ondojn kaj ilian salan akvon, kiu flugis kiel nebulo trans la ondanta surfaco. Marija, starante proksime ĉe la vitro kaj malklariginte ĝin per sia elspiro, viŝis ĝin kaj denove rigardis al la maro. Kiam la vitro denove malklariĝis, ŝi perfingre surskribis: Mato.

Marija lernis legi kaj skribi de la bona maljuna paroĥestro. Spektante tra la larmoj, per kiuj la okuloj estis surverŝitaj, la malaperiĝintajn literojn de sur la vitro, ŝi ekaŭdis ĝemspiron el la lito. Ŝi haste turnis sin kaj ekiris al la malsanulo. Mato denove suspiris kaj malferminte duone siajn okulojn, movis la manon.

—Ĉu vi ion deziras? — Marija ekflustris timeme, dum ŝian vizaĝon traflugis ĝojo.

Mato pli malfermis la okulojn, ekrigardis suferante la knabinon kaj peze elspiris.

—Panjo, panjo! — Marija ekvokis mallaŭte.

—Kio okazis, mia kara?

—Venu ĉi tien, li konsciiĝis.

—Jen mi, — diris Jela enkuranta en la ĉambron.

Ekpreninta la manon de Mato, ŝi palpis la pulson, kaj ne povinta trovi ĝin, ŝi ekbalbutis.

—Ja kie tio okazos? Ĉu li ion diris, ĉu li moviĝis en la lito?

—Li malfermis la okulojn.

Jela kapskuante demandis dube:

—Aŭskultu min, kara junulo, ĉu vi ŝatus iom da supo? Unu aŭ du kuleroj ne malutilos al vi. Ĉu vi aŭdas! Ĉu vi fartas iom pli bone? Parolu, kompatinda, diru al ni kion ajn vi volas, kiel se vi estus en via propra domo.

—Panjo, li ne povas aŭdi vin, — elbuŝigis la knabino per dolorsenta voĉo. La virinoj eksilentis. Sur la vizaĝo de Marija estis videbla angoro. La malsanulo moviĝis, leĝere ektermis, suspiris kaj tute malfermis la okulojn. Konsternita li ekrigardis la virinojn, volis diri ion, sed lia vorto perdiĝis en la gorĝo, nur febla kaj nekomprenebla voĉo eliris el lia buŝo.

Marija prenis lian dekstran manon, kliniĝis super la lito kaj super lia vizaĝo kaj demandis lin:

—Kiel vi fartas?

Mato rondpromenis okule tra la ĉambro, rigardis la patron kaj ŝian filinon, kaj kunpremis la palpebrojn malrapide.

—Ne timu, kara! Vi frapiĝis; nenia malbono, konfidu Dion!

—Jela konsolis lin.

—Panjo, li ne povas aŭdi vin, — suspiris la knabino ripete.

Mato ekrigardis al Marija kaj ekridetis al ŝi kun apenaŭ rimarkebla dolora rideto.

—Kiel vi fartas? — Marija denove demandis kaj komplete rigardis lian vizaĝon.

—Aŭdu min, kara amiko, obeu min kaj akceptu kuleron da supo.

Mato kapneis.

Marija kaj Jela kompreninte ekrigardis unu la alian: — Li ne mortos.

La povra Mato, rigardante al la virinoj per malklaraj duonestingitaj okuloj, malfacile ekflustris:

—La maristoj?

—Ĉiuj savitaj, ĉiuj! — Marija trompis lin.

—Jes, ĉiuj! — ripetis la patrino.

—Ĉu ĉiuj?

—Trankviliĝu, kara amiko, ne timu, nenia malbono, — konsolis lin Jela.

—Kie mi troviĝas?

—Ĉe Antun Ŝabariĉ, — respondis Marija.

Mato, milde ridetinte al la knabino, elbuŝigis:

—En Luĉica?

—Jes, jes, en Luĉica, — eldiris la virinoj.

—Mia boato? — Mato suspiris.

—Ne pensu nun pri via malfeliĉo, — respondis Jela.

—Jes, ne pensu; ne indas zorgi, gravas, ke vi ĉiuj savis viajn vivojn, — parolis Marija.

—Min doloras...

—Kie doloras? — demandis la virinoj.

—En la kapo.

—Ŝtono vundis vin, oni diras, — flustris Marija, rigardante lin konsolige.

—Ĉu iu povus..., — Mato ne povis findiri.

—Parolu, kara, parolu. Ĉion ni faros laŭ via plaĉo, — Jela instigis lin.

—Pastron... terure al mi...

—Trankviliĝu, trankviliĝu! — Marija petis lin.

—Ho, panjo mia! — Mato ekĝemis.

—Mi tuj iros por alvenigi la pastron, — diris Jela kaj ekiris

al la paroĥdomo. Dumvoje ŝi rakontis, ke Mato denove parolas.

La vizaĝo de Mato komencis sereniĝi, kaj en la koro Marija sentis grandan ĝojon. La okuloj de la maristo pleniĝis per febla brilo. Li milde rigardis la knabinon kaj mallaŭte diris:

—Ĉiuj do estas savitaj?

—Jes, ĉiuj, nu ne parolu tro, ankaŭ al vi Dio donos sanon.

—Ho, panjo mia, hieraŭ mi ne konjektis...

—Diru, diru, kion via koro deziras?

—Mi ne konjektis, ke tia malfeliĉo trafos min.

—Dio volis tiel.

—Sed kiu estas vi, bona knabino?

—Mia patro nomiĝas Antun Ŝabariĉ.

—Mi konas lin...Ho ve al mi, ho mia kapo! — ĝemis la kompatinda Mato.

—Estu pacienca iom; ni zorgos alvenigi kuraciston.

—Sed ĉu vi sciigis jam iun en Jelenŝĉica?

—Jes, tuj post la akcidento.

—Vi estas bonaj homoj! — Mato suspiris kaj dankeme kaj karese rigardis al Marija.

Marija diris pudore.

—Kiu ja ne kompatus vin?

—Kie estas miaj maristoj?

—Ĉe niaj najbaroj. Ili estas sanaj; ili nur malvarmumiĝis; ja la tutan nokton vi estis en la akvo.

—Jes, jes, bona knabino.

—Vi sufiĉe suferis ĉi nokte!

—Mi tute ne konjektis...

—Ripozu, kara amiko! — Marija petis, ĉar li parolis kun granda peno.

- Kiel rekompenci al vi?
—Ne parolu tiel! — Marija diris afable.
—Mirakle mi savis mian vivon...
-

Liaj nigraj okuloj ekbrilis kaj pli malfermiĝis. Perokule li sekvis la karan vizaĝon de la bona Marija. Ĉi tiu ĉarma virgulinino ŝajnis al li kiel anĝelo gardanto, kiu venis el la ĉielo al lia kapkuseno por konsoli kaj mildigi lian kordoloron. Spektante la knabinon, li pensis pri morto, sed ĉi momente spasmis lian animon.

En tiu ĉi sama tago dum krepusko Maton vizitis la maljuna paroĥestro, la negocisto Tomo Bariloviĉ kaj lia filo Stipe. La povra Mato povis jam pli facile paroli. Ili konsolis lin kaj kuraĝigis parolante, ke li estas ankoraŭ juna kun fortika konstitucio, kaj ke li, post nelonge, per Dia helpo, ellitiĝos kaj resaniĝos.

Mato kaj Stipe konis unu la alian jam laŭvide. Ili intervidiĝis jam kelkfoje sur la bordo de Rijeka.

La savitaj maristoj ĉiel deziris viziti sian vunditan mastron la saman vesperon, sed tion ne permesis la familianoj, ĉe kiuj ili estis loĝigitaj, zorgante, ke ili tiel ĉifonvestitaj ne malvarmumu.

(Dum la familianoj zorgis pri la vundita Mato, al Luĉica venis liaj gepatroj, kiujn tuj sciigis pri la akcidento de ilia filo la domestro Antun Ŝabariĉ. La emocia kaj karesa renkontiĝo de la gepatroj kun la vundita filo estis larmige kortuŝa. La gepatroj de Mato, kiuj de antaŭe konis la familion Ŝabariĉ, estis feliĉaj, ke ilia filo Mato kuŝas ĝuste en ilia domo. Sekvis paroloj kaj rakontoj pri la akcidento, ĝis la krepusko. Marija

adiaŭis la ĉeestantojn, kaj ŝiaj rigardoj renkontiĝis kun la rigardoj de la vundita Mato. La sekvontan tagon Maton vizitis liaj fidelaj maristoj Menego kaj Pero kaj ili decidis, ke ili vespere revenos al Jelenŝĉica, kun la patrino de Mato. Ili pli frue ne povas.)

—Kial? — demandis Mato.

—La estro de ĉi tiu komunumo invitis nin veni al li la hodiaŭan posttagmezon, — respondis Pero.

—Nu iru. Mi scias kial li invitas vin; li volas priserĉi vin kaj poste skribi al la distrikta sidejo, ke la boato rompiĝis en lia komunumo, kaj ke tiuj ĉi bonaj homoj savis viajn vivojn. Diru al li nur la veron, ĉion vi sinsekve diru, — diris al ili ilia mastro.

Pero kaj Menego ekiris al la komunumestro kaj trovis tie en lia kancelario tri virojn el Luĉica. Ili venis por diri, kio okazis sur la klifoj, kaj kiel la Luĉicanoj savis la maristojn. Tiu ĉi triopo estas nurnuraj amikoj, kiujn la komunumestro havas en Luĉica. La urbestro Ermano Murelli antaŭ multaj jaroj ekloĝis en Luĉica.

Kiam la maristoj venis en la malluman ĉambbron, la estro proponis al ili sidlokojn. Pero kaj Menego, time ĉirkaŭobservis, kaj tiam eksidis sur malnovajn kaj malsolidajn seĝojn. En la ĉambro estis multe da disĵetitaj paperoj kaj flaviĝintaj kaj polvigataj gazetoj. En ĉi tiu malordo sterniĝis la urbestro sur larĝa brakseĝo, kaj li ridetis kaj ridetis al la maristoj, kiuj oblikve rigardis lin, dezirante baldaŭ fini la viziton.

La edzino de la urbestro Anastazija kaj ilia filino Ida alportis sur larĝaj teleroj rompitaĵajn juglandojn kaj tranĉitajn panpecojn kaj du botelojn da ruĝa vino. La urbestro verŝis ĝin en glasojn kaj regalis la homojn.

—Nu, nu, ek, trinku glason da vino, kaj tiam ni ekiros al la laboro!

Li parolis afable, dolĉe kaj ridetante laŭ sia maniero, kiel kutime. Lia vizaĝo estis rondforma kaj ruĝa, mallonga kaj larĝa liphararo movis sin laŭ la supra lipo dum la parolo. La urbestro estis pli juna ol lia edzino Anastazija.

—Kia estas via nomo? — la magra kaj alta Anastazija demandis Menegon.

—Menego Paĉiĉ.

—Kaj vi kara amiko?

—Mi?

—Jes, jes, vi! — ripetis Anastazija, rigardante en lian vizaĝon per siaj malgrandaj okuloj ruĝiĝintaj pro inflamo.

—Mi nomiĝas Pero Streha, — respondis la maristo.

—Vi ambaŭ venas el Jelenŝĉica? — daŭrigis la urbestro.

—Jes, ambaŭ, — la maristoj respondis samtempe.

—Tiel, tiel, sed trinku ankoraŭ unu glaseton. Ida, enverŝu al ili; tian ili ne trinkas ĉiutage! — ridetis Murelli altirante la veŝton super sian grandan ventron, kiu preskaŭ ripozis sur la dikaj kaj mallongaj kruroj.

—Prenu ankaŭ pecon da pano, ne hontu; vi sentu kiel en via hejmo, — instigis ilin la mastrino klopodante, ke ŝia nigrohaŭta kaj iom flaveta vizaĝo estu afabla. Ŝiaj vangoj estis tute sulkigitaj per densaj faldoj, kaj grizaj haroj el du verukoj, kiuj troviĝis inter la faldoj, memorigas pri kota flavonigra flako, el kiu elstaras vostoj de anasoj mergiĝantaj kun la kapoj en akvo, sulketante la surfacon.

—Diru al mi, kara Streha, kiam vi ekiris el Rijeka kaj kie la tempesto atakis vin? Diru al mi ĉion, kiel plej bone vi scias.

—Jes, mi volas, — respondis Menego.

—Nu, diru do vi. Mi demandis la amikon Streha. Nu, ne gravas, — diris la urbestro.

—Silentu, Menego, la sinjoro urbestro demandis min, sed se ĝuste vi deziras paroli, vi povas libere, — diris Streha.

—Estas tute same! — Menego supren movis la ŝultrojn.

—Ĉial, estas same, — la malgranda Streha klinis la kapon gladante ĝin.

—Ek, ek, karaj amikoj, ĉu unu aŭ la alia; ne gravas kiu parolos. Tio estas egala! — permane svingis la dika urbestro.

—Tion ankaŭ mi diras! — konfirmis Streha.

—Kion vi diras, kara amiko? — demandis Anastazija.

—Li diras, ke li opinias, ke estas same ĉu parolos li aŭ mi, — klarigis Menego.

—Kompreneble, ke estas egale! — ekkoleretis la urbestro.

—Ja, ankaŭ mi tiel diras! — ekkriis samtempe Streha kaj Menego.

Ida, la filino de la urbestro, fraŭlino tridek jarojn aĝa, aldonis per sia sibla voĉo:

—Ja ne implikiĝu en la parolon de la alia!

—Silentu, stultulino! — kolere riproĉis ŝin ŝia patrino. — Se ankaŭ vi komencos, tiam ĝis morgaŭ ni ne venos al la fino.

Ida ofendiĝis. Ruĝiĝinte laŭ sia pala vizaĝo, ŝi ekstaris kaj eliris el la ĉambro lamante. Ida tre similis al sia patrino.

La triopo el Luĉica sidis kaj trankvile fumis, sorbetante la vinon kaj ŝmacante per la buŝoj.

Anastazija koleris, ĉar ŝi vane klopodis fari afablan rideton per siaj magraj lipoj, kiuj malkovris ŝian sendentan makzelon, La faldoj sur ŝia vizaĝo ondetis. La grizaj haroj de la veruko movis sin kvazaŭ anasvostoj super kota marĉo.

—Nu, parolu jam, ĉu unu aŭ la alia! Parolu do vi! — permanente Anastazija svingis al Menego.

—Noktomezo estis kiam ni atingis, — komencis paroli Menego.

—Tiel, jes, ĉirkaŭ noktomezo, — enfalis Streha en la parolon. — Ni velis pelataj per la vento, sidante ĉe la stirilo, konversaciante kaj fumante.

(Nun la maristoj, — Menego kaj Streha, — daŭrigis sian rakonton pri la ŝiprompiĝo kaj pri la maniero, kiel ilin savis bonaj homoj. La ruza Murelli deziris el tiu akcidento havigi al si ordenon. Li klopodis konvinki la savitojn, ke ili ne estus savitaj, se li ne ordonus al homoj savi la malfeliĉulojn. Ĉi tiujn memglorigojn konfirmis liaj tri viroj, bedaŭrinde luĉicanoj, kiuj servis al li. Finfine oni faris protokolon, kiun Menego kaj Streha atestis per siaj kruccignoj, ĉar ili ne scipovis skribi.)

Iom poste la urbestro gvidis la maristojn al la domsojlo. Salutinte ankoraŭfoje, li revenis en la ĉambron frotante ĝoje la manojn kaj saltetante.

—Kion vi opinias? — demandis la edzino, streĉante la vangosulkojn, kaj verve rigardante lin al la okuloj.

—Sen dubo, kara Anastazija! — respondis ŝia Ermanno, ridetante acide kaj skrabe rigardante al ŝia sulkigita vizaĝo.

La amikoj de la urbestro longtempe trinkis mute, en la kancelario de la komunumo, kaj fumis el mallongaj pipetoj. La luĉicanoj ne estimis tiujn virojn, kiuj nur ĉiuokaze kapjesadis al Murelli.

—Tiu procentegulo Stipe aŭ eĉ la paroĥestro povus damaĝi al miaj kalkuloj, — flustris Ermanno al sia edzino en la orelon.

—Ne babilu, malsaĝulo, sed klopodu, ke tiuj homoj eliru el

la domo. Ili fortrinkos la tutan barelon! Kial ili disverŝus nian vinon en nia domo! — Anastazija rediris al li mallaŭte.

La saman tagon vespere ekiris Menego, Streha kaj la patro de Mato al Jelenŝtica. La patro kisinte la filon, viŝis kelkajn larmogutojn esperante, ke li baldaŭ renkontos lin hejme.

Du tagojn post la ŝiprompiĝo, frumatene, Antonio envenis haste en la domon. Jela, rimarkinte lin, surpriziĝis, kiam ŝi vidis lin tiel ĉifonitan, palan kaj nekombitan.

—Antonio, pro Dio, kie vi estis? Kiuj malbonoj trafis vin?

—Mi trovis la dronintan knabon.

—Kio!?

—Jes, mi trovis lin.

—Kie vi trovis lin?

—La maro elĵetis lin sur la sablon.

—Kaj kion vi tiam faris?

—Mi alportis lin en la tombejon.

Antonio eniris en la ĉambron. Ĉiuj estis surprizitaj. Li rigardis al Marija kaj volis eliri, sed la knabino haltigis lin dirante:

—Kio okazas al vi, Antonio? Ni serĉis vin ĉie.

—Ankaŭ mi serĉis kaj mi trovis lin, — li respondis abrupte.

Post kiam Mato aŭdis, ke la knabo dronis kaj ke Antonio trovis la korpon, liajn okulojn plenigis larmoj, kaj li diris:

—Li dronis do, sed vi ĉiuj diris, ke li foriris al Jelenŝtica tuj post la ŝiprompiĝo.

—Tro malbone vi fartis hieraŭ kaj antaŭhieraŭ, kaj ni ne volis malĝojigi vin, — pretekstis Marija.

Antonio mirigita rigardas al Mato, kvazaŭ kolera, kvazaŭ

li enuius, ke Mato kuŝas en tiu varma lito kaj ke Marija lin flegas.

La knabino diris al Antonio:

—Aŭskultu, vi ne fartas bone; vi tremas pro malvarmo.

Antonio timeme rigardis ŝin kaj iris en la kuirejon apud la fajrejon, kie jam flagris dikaj ŝtipoj.

Pasis kelkaj horoj kaj la kompleta Luĉica eksciis, ke la kadavro de la droninta trovito estas sur la tombejo. Deko de la vilaĝa infanaro ariĝis ĉirkaŭ la kirketo sur la tombejo. La pli aĝaj ne volis rigardi tra la fenestreto en la mortintejon, sed ili levas la pli junajn sur siajn ŝultrojn. La knaboj indiferente rigardis la mortintan troviton, kiu kuŝis sur la portilo, kaj ili rakontis al la aliaj pri la aspekto de liaj vizaĝo, manoj, kaj pri la aspekto de la rompita frunto.

La trovito estis entombigita.

Post du semajnoj da malsanperiodo Mato komencis ellitiĝi, sed li ne eliris el la ĉambro. Ĉiutage li fariĝis pli kaj pli ĝoja, kaj tiel ankaŭ Marija kaj ŝia patrino. Li parolis, ke li konstruos novan boaton tuj post la resaniĝo kaj ke li ne timas la maron. Pasis unu monato, kaj Mato tiom plifortiĝis, ke li povis ekiri al Jelenŝĉica. Li sentis malĝojon en sia koro, ĉe la penso, ke li forlasos la domon de Ŝabariĉ kaj la ĉambreton, en kiu li tiom trasuferis kaj en kiu oni regalis lin per la plej atenta amo kaj per neeldirebla oferemo.

Mato ne povis trovi ĝustan vorton kiel danki al Jela kaj Marija, kiam li adiaŭis ilin.

—Kiam vi komplete resaniĝos, vizitu nin. Ne troviĝas Luĉica en alia parto de la mondo, — diris Jela al li.

Ankaŭ la patrino de Mato kaj lia patro Andro, kiuj venis por rehejmigi lin, dankis al la virinoj pro la amo kaj pro ĉiu bono.

Mato rigardante al la nigraj kaj malsekaj okuloj de Marija kaj premante ŝian manon, kiu tiomfoje lavis kaj bandaĝis lian vundon, elbuŝigis kun tremanta voĉo:

—Marija, mi neniam forgesos vin.

La ĉarman junulinon surverŝis ruĝo ĉe la kolo kaj la vizaĝo, kaj ŝi ŝtelmove viŝis larmojn de feliĉo...

Pasis la vintro. Jam kvin monatoj pasis de la boatrompiĝo en Sandriŝĉe. En Luĉica kolektiĝis multaj sinjoroj el proksimaj urbetoj. La urbestro Ermano Murelli festis raran solenaĵon. Pro lia granda sinoferemo dum tiu boatrompiĝo en Sadriŝĉe, oni premiis lin per ordeno kun ora kruceto.

Sorbetante kafon kaj fumante sufiĉe altprezan cigaron, Isidoro Maletti, la urbestro de Jelenŝĉica, diris al la urbestro de Luĉica:

—Aŭdu, Murelli, ĝi ja estis mirinda spektaklo, la rompiĝo de boato sub viaj klifoj.

—Ankaŭ mi opinias tiel, — respondis Murelli, la urbestro de Luĉica, — ankaŭ mi opinias ke ĝi estis interesa spektaklo. KREDU al mi, mi bedaŭras, ke en tiu tago mi ne estis en Luĉica. Nur la sekvantan tagon mi revenis el Triesto, kie mi vizi-tis miajn parencojn.

III

Duonhoron de piedirado de Luĉica al la nordo serpentumas inter la montoj "La nigra rivero" malleviĝante krute al la marbordo. La fluejbordoj altiĝas kun la perakve glatigitaj rokoj. Nelonge for la marbordo sekvas kaskadoj unu post la alia, la fluejo estiĝas pli profunda kaj pli larĝa, kaj fine ĝi falas sur longan sablejon, nomata "Kolonoj". La sablejo havas longecon de iaj cent paŝoj. Super la sablejo elstaras rifa roko, kiu etendas sin en la maron kiel alta kabo. Kiam laŭ la rivereto eksturmas akvo, ĝi alrulas teron kaj gruzon sur la platan sablejon, sed la ondoj pelataj el la suda flanko ĉion forviŝas, tuj post la estiĝo de seka sezono. La ondoj, disverŝiĝantaj laŭ la sablejo, rulas sur ĝi ŝtonojn, ŝovas ilin al la kabo, tiras ilin post si dum retiriĝado, kaj la ŝtonoj estiĝas pli kaj pli etaj, ĝis kiam la maro ilin globigas, blankigas kaj glatigas. Ju pli proksime al la maro, des pli la ŝtonglobetoj estas pli etaj. La sablejo malleviĝas laŭgrade en la akvon. Dek paŝetojn for la bordo la akvo atingas ĝis la kolo de homo. La dunoj blankas kvaŭ neĝo, ili brilas, se la suno al ili kliniĝas. Ankaŭ la marfundo blankas proksime de la bordo, sed iom fore, maldika ŝlimsablo verdas transirante en grizan koloron. La fundo tiam estiĝas tenebroverda pro la musko, kiu ĉirkaŭkreskas la ŝtonojn dikajn kiel homkranioj, kaj pro la maraj plantoj, kiuj moviĝas apenaŭ percepteble kaj kreskas inter tiuj ŝtonoj. Dum la kvieto, la maro estas tiom trankvila kaj tiom travide-

bla kaj inertia, ke ĝi aspektas kiel plej pura kristalo, ke oni preskaŭ kredus esti vidanta sekan fundon, se ne videblus hela arĝenta strio, kie la akvo interkisas kun la bordo. Pli fore de la musko, la fundo malaperas, kaj la marvasto tenebriĝas, ĝis ĝi fine konvertiĝas al blua kaj al pli hela koloro, kiu ravigas la okulon, kiu plenigas la bruston per dolĉa sopiro kaj per reva nostalgio. La sablejo "Kolonoj" etendas sin de la okcidento al la oriento. Ĉe la orienta flanko el la maro montriĝas glata rifo, granda kiel malgranda tablo. Dum alta tajdo, ĝi estas super la maro je unu futo. La rifo estas for de la bordo je tri paŝoj, kaj la ĉirkaŭanta maro atingas al plenkreskinta homo apenaŭ ĝis genuo. Sur tiu ĉi glata roko la virinoj lavas tolaĵon, kiam oni en Luĉica ne havas akvon kaj se la marĉetoj de la riveretoj sekiĝas.

Iun tagon fine de la monato julio la ĉarma Marija, la filino de la maristo Ŝabariĉ, lavis tolaĵon sur ĉi tiu glata roko. La tutan tagon la suno apogas sajn radiojn sur la sablejon eksponitan al ĝi. La brulanta aero vibris super la kalva kaj la ŝtonorika bordo kiel delikata kaj travidebla nebulo. Antaŭ Marija sterniĝis trankvila kaj nemezurebla maro, interkisante kun la ĉielo en malproksimego de la brilanta horizonto. La glata surfaco kvazaŭ estus kunfandita kun la lazura ĉielo. La bordoj de Istrio, la bordoj de la insuloj kaj insuletoj, la krutaĵoj kaj la arbaretoj, la blankaj kirketoj sur la montetoj, la grizaj vilaĝetoj kaj la malhelaj urbetoj kaj unuopaj vilaĝdomoj, ĉio tio duobliĝante spegulis sin kviete kaj rave en la bluaj profundoj. La suno jam kliniĝis al la okcidento. La ombroj de la klifoj falis al la maro kaj la ombroj de la juniperoj kaj de la montkrestoj longiĝis laŭ la promontoro kiel pintoformaj makuloj, kiel disŝiritaj ĉifonegoj. La oraj radioj, ŝutiĝante tra la inter-

krutejo, per la rivereto dispartigitaj montoj kaj trans la ravinoj, ardigis la sablon kaj per punca oro surverŝis la belan knabinon. Marija, starante en la akvo, fleksiĝis super la rifon, sur kiu ŝi lavis la tolaĵon.

La klara aero, la brilo de la subiranta suno, la akvodoro, laodoro de salvioj kaj oleastroj, varma spiro de la varmigitaĵoj, ĉiu tiu rava beleco de la varma somera tago, ĉio tio ĉirkaŭis la ĉarman, junan kaj sanan knabinon.

La frapoj de ŝia lavbatilo rompas la grandiozan silenton per reeĥoj en la kanjonoj kaj de sur la rokoj.

Fininte la lavadon, Marija eliris el la maro, singarde irante laŭ la sablejo. La suno jam kaŝiĝis de sur la sablejo. Ŝi komencis kolekti la tolaĵojn, kiujn ŝi sternis sur la ŝtonegoj por sekigi ilin, ŝi ekaŭdis kelkajn ŝtonojn ruliĝantajn en la maron. Ŝi rigardis al la bordo kaj ekvidis homon kiu grimpis sub la klifoj, super la maro mem.

—Antonio, ĉu estas vi? — mirante ekkriis la konsternita Marija.

—Jes, — respondis Antonio.

—Kie vi grimpas? Vi ja freneziĝis! — admonis lin la knabino.

—Ne timu, mi ne falos en la maron.

—Sed kie vi estis?

—Mi fiŝkaptis tie malantaŭ tiu promontoreto. Mi eĉ iom kaptis.

—Ho, kia utilo el fiŝoj! Atentu, ke vi ne trempu vin en la akvon!

Antonio, grimpante, proksimiĝis al la sablejo. En la ombro

sub tiuj rifoĵoj ŝajnis al Marija, ke ŝi jen vidas lin, kaj kiam li malaperis, ŝi timis, ke li falus en la maron. Kaj kiam li fine saltis sur la sablon, la knabino demandis lin:

—Kie estas viaj fiŝoj? Vi ja diris, ke vi kaptis kelkajn.

—Ili ne estas logaĵavidaj, — li rediris kaj komencis eligadi la fiŝojn el sub la ĉemizo.

—Ho, sufiĉan nombron da ili vi kaptis! — ĝojis la knabino ridetante.

—Kelkajn, sed via patro koleros; mi jam devus esti hejme.

—Kial, Antonio?

—Li sendis min kolekti brulolignon, sed mi, vidinte tian belan maron, opiniis, ke ne noktiĝos baldaŭ, kaj ke mi povos malsupreniri sub la rokojn por ĉasi por vespermanĝo.

—Kie estas la ligno?

—La faskon mi postlasis ĉe la vojo sur la monto. Mi aŭdis antaŭ ne longe vian lavobatilon, kaj mi venis.

—Venu, Antonio, helpu al mi kolekti la tolaĵojn. Tian soifigan varmegon ni ankoraŭ ne havis.

—Tuj, tuj, — diris Antonio. Lia vizaĝo sereniĝis rigardante la bonan knabinon.

—Mi esperas, ke ni atingos hejmen ĝis la vespera Anĝelus. Vi scias, ke mia patrino tuj maltrankviliĝas.

—Ankoraŭ pli frue, Marija! Kiom da irado ni havas de ĉi tie?

—Duonon da horo, aŭ pli. Kiel varmege estas hodiaŭ! Bela vetero, — diris la knabino enpenŝiginta.

—Bela, jes bela. Ankaŭ la maro estas trankvila, tute trankvila, — respondis Antonio mallaŭte kaj iel timeme.

—Kion vi diras?

—Ĉu mi?

—Jes, ion vi diris.

—Ke la maro estas trankvila.

—Hodiaŭ neniuj boatoj rompiĝos, — rimarkis Marija rigardante laŭ la bordo.

—Ankaŭ la boato de Bartoliĉ...

—Ja kiel Mato trafis vian menson? — embarasiĝis Marija.

—Mi ĉiam pensas pri Mato, — rediris Antonio per amara voĉo.

—Ĉu tiel?

Post mallonga paŭzo Antonio demandis ŝin, rigardante suden.

—Ĉu vi... ĉu vi ne pensas?

—Kial vi demandas min pri tio?

—Mato estas bona, jes, bona.

—Mi scias, ke li estas bona, — ŝi rediris ruĝiĝante.

—Dimanĉon li venos ree en Luĉican, se li havos tempon.

—Mi antaŭĝojas pro lia alveno; jes, mi kaj miaj gepatroj, — Marija honteme elbuŝigis.

—Jes, jes, vi ĝojas...

—Bonan homon ĉiu deziras.

—Mato estas bona, jes, bona.

—Ĉu vi ne ŝatus vidi lin? sen vi Antonio, li probable ne vivus nun. Vi multon helpis ĉe la akcidento. Mato ofte parolas pri vi.

—Ĉu li parolas pri mi? Hodiaŭ estas ĵaŭdo, li hodiaŭ iras al Rijeka, kaj sabaton li revenos al Jelenŝĉica...

—Kiu diris al vi, ke li hodiaŭ iras al Rijeka? — ekrigardis Marija en liajn okulojn.

—Mi konas lian novan boaton. Jes, sabaton li revenos al Jelenŝĉica, kaj dimanĉon li venos al Luĉica.

—Nu diru al mi, kie vi vidis lian boaton.

—Mi vidis ĝin antaŭ ne longe tie de sur la promontoro, kie mi hakis la brulolignon. La boato glitas laŭborde, kaj ĝi certe baldaŭ eliros el tiu golfeto.

—Ĉu ĝi estas ankoraŭ malproksime? — demandis la knabino ridetante al li.

—Ne estas malproksime, — li rediris per haka voĉo.

—Tiel!..., — Marija elbuŝigis, kaj ŝia frunto malsereniĝis ek-krigardinte al la vizaĝo de Antonio.

—Jes, ĝi montriĝos ĉe la promontoro antaŭ ni. Ni atendu ĝis kiam la boato venos ĉi tien.

La knabino ruĝiĝis.

Dum ŝi poste ordigis la tolaĵojn en pakaĵon, Antonio diris al ŝi kun amara kaj nestabila voĉo:

—Ĉu vi aŭdas?

—Kio estas aŭdebla?

—Ĝi ne estas malproksime.

—Antonio, ni iru hejmen.

—Ĉu vi ne aŭdas la remilojn?... Ni atendu, — li diris kun neklara voĉo.

Marija ekrigardis al la malalta kaj longa promontoro, kiu de sude fermas la golfeton, kie troviĝas la sablejo "Kolonoj". La knabino aŭskultis, kaj ŝia vizaĝo sereniĝis. Aŭdiĝis alterna plaŭdado de remiloj. Malantaŭ la pinto de la malalta promontoro jam videblis la masto de la boato. Marija ridetis. La boato proksimiĝis al la ekstremaĵo de la promontoro, kaj la masto kaj la velo malkaŝiĝis pli kaj pli. Fine aperis ankaŭ la nigra ŝipotrunko.

La frunto de Antonio sulkiĝis...

Kvar maristoj, starantaj sur la ferdeko, apogis sin sur lon-

gajn remilojn, kiuj kurbiĝis en la fortikaj manoj de la maristoj. La maristoj jen klinis sin antaŭen kaj etendis sin, kaj jen baŭmante rektiĝis. Po du remiloj ĉiuflanke trempiĝis en la maron kaj ŝmacoŝpruce leviĝis el ĝi. Antaŭ la boato gliteglate ster-niĝis arĝentoblua akvo. Ĉe la pinto de la promontoro la bo-ato turniĝis en la golfeton, kaj pasante sub la klifoj, ĝi baldaŭ alrampis proksime de la sablejo.

Marija ekiris hejmen, sed veninte al la apikaj klifoj, kiuj elstaras el la maro proksime de la sablejo, ŝi apogis sin kun la pezaĵo sur altan ŝtonon. Nun la boato alrampis sub la klifon, sur kiu Marija atendis. Tiu ĉi klifo altas je unu masto.

—Aŭskultu, Menego, al mi ŝajnas, ke tie sur la sablejo es-tis Marija de Ŝabariĉ, — diris Mato sub la klifo ne vidante la knabinon.

—Se estis ŝi, ŝi ne estas malproksime, — respondis Streha.

—Ne, ŝi ne povas esti malproksime, ĉar de tiu promontoro ni ne remsvingis pli ol kvindekfoje. Min malofte trompas mia okulo; tuj kiam ni venis sub la kabon, mi tuj rekonis ŝin, — asertas Mato.

—Kaj tiu homo kun ŝi estis certe Antonio, — volis diri Menego.

—Lin ankaŭ mi rekonis! — balancis Streha per sia kapo.

—Ne babilu! Kion vi scias? — Streha malaprobis malesti-me.

Marija atente aŭskultis tiun ĉi mallongan parolon sur la boato. Arda ruĝo superverŝis ŝian kolon kaj la ĉarman viza-ĝon. Ŝia koro batis forte en la brusto. Antonio sidante sur malalta ŝtono, apogis siajn kubutojn sur la genuojn kaj mal-levis sian grandan kapon en la polmojn. Liaj okuloj morne

rigardis al la pinto de la masto kiu moviĝis super la klifo. Lia vizaĝo aspektis malsarena.

La boato lante turnis sin sub la klifo, foriĝis de ĝi je kelkaj remsvingoj kaj ekveturis laŭlonge de la sablejo al la kabo. Marija rimarkis la frontan parton de la ŝipeto. Sur la ferdeko troviĝis ordigitaj hejtŝtipoj kaj kelkaj kaĝoj plenigitaj per kokidoj. Jam videblis duono de la boato. Ĉe la masto sur la ferdeko kuŝis kelkaj meleagroj. Ili estis kunligitaj duope. Inter la meleagroj kuŝis unu bovido, kaj iom fore ankoraŭ kelkaj kaĝoj da kokidoj kaj kokinoj. Ĉiu besto plendis kaj lamentis per siaspeca voĉo. Sed jen ankaŭ la kapoj de la maristoj, jen la nigra kaj la krisphara kapo de Mato! La tuta barko jam malkaŝiĝis. La koro de Marija vibris pro ĝojo. Mato staris sur la poŭpo. Li apogis sin al la remilo, direktis per la stirilo ŝovante ĝin dekstren aŭ maldekstren, laŭbezzone. Mato ekrigardis al la bordo, li rimarkis Marijan, li remetis la remilon en la barikon kaj ekkriis:

—He, hoj! Menego, Streha, ŝija, ŝija! Tio signifas: veturu reen!

—Ho, he karulino ora! Mi sciis, ke vi ne estas malproksime. Vi observas nin, kaj eĉ: "Bonŝancon!" vi ne diras! Kiel, kiel estas, Marija? — ĝoje demandis ŝin Mato.

—Varme, Mato, varme! — respondis Marija ridetante al li.

—Jes, vere, surmare samkiel surborde! — aldonis Streha, viŝante la ŝviton de sur la frunto per la mandorso.

—Vi, karulino, malfrue rehejmiĝos. Marija, jen rigardu ĉi tiun maron, ho, kvazaŭ oleo!

—Mato, vi laciĝos remante ĝis Rijeka, se ne ekblovos, — rediris Marija.

—Ekblovos poste, kiam malvarmiĝos, — elspiris Menego.

—Marija, kion vi faris sur la sablejo? — demandis ŝin la mastro Mato.

—Mi lavis. Pro granda seksezono, en la riveretoj akvo ne troveblas, — plendis la knabino.

—Palumbo eĉ guton ne trovus! — kapklinis Streha.

—Marija, mi rekonis vin de tiu promontoro.

—Mi sciis, Mato, ke vi veturas.

—Tiel do?

—Jes, Antonio rimarkis vin.

—*Che nuovo*, kia novaĵo, Antonio? Ĉu fiŝoj troveblas? — demandis lin Mato.

—Ĉiujn mi povus baki surventre, — respondis Antonio bruske.

—Ĉu la dentoj doloras vin, ke tian acidan mienon vi mont-ras? — ŝercis Streha.

—Remu, remu, Rijeka estas malproksime! — Antonio montris la maron al ili.

—Kiel estas hejme? Marija, ĉu alvenis via frato el Vieno? — daŭrigis Mato.

—Li venos post kelkaj tagoj.

—Tiu Vieno, oni diras, estas grandioza urbo! — eksvingis Streha per la manoj.

—Kion vi scias! En la mondo ekzistas pli grandaj kaj pli belaj urboj. Kion ja vi vidis? Vi ne vojaĝis pli fore ol al Rijeka aŭ Pula! — asertis Menego.

—He, rakontojn mi aŭdis! — respondis Streha iom kolere.

—Marija, se la vetero konvenos, postmorgaŭ mi venos al Luĉica. He, Menego, Pero! enmarigu la remilojn! Kial, pro diablo, vi babilas? Voga! Remu! Streĉu! Marija, adiaŭ! — krietis la juna mastro, la ĉarma Mato.

—Feliĉon, feliĉon! — ekkriis Marija rigardante al la boato, kiu ektangis kaj moviĝis per la unua forta remstreĉo.

—Adiaŭ, karulino! Salutu viajn familianojn! Se Dio permesos, ni baldaŭ vidos nin, — kriis Mato.

—Feliĉon! feliĉon! — ekdeziris al li la knabino.

Iom poste la boato komencis kaŝiĝi post la kabon, sed antaŭ ol ĝi malaperis, Mato turnis sin al la klifo kaj eksvingis permane al la knabino. La sulko, kiu nigris sur la trankvila kaj blanka surfaco, kaj ankaŭ la larĝaj kaj unu de la alia egale distancitaj ŝaŭmcirkloj, kie estis la remiloj enmergitaj, markis la vojon, kie la boato pasis.

Marija enpense rigardis al la maro kaj al la sulko kiu fine trankviliĝis kaj senmoviĝis. La suno ankoraŭ origis la montojn de la insulo Cres kaj ĝiajn verdajn kverkajn arbaretojn. La ruino de la antikva monaĥejo sur la sama insulo, sur la mistera Porozina, estis ardigita per oraj radioj, kaj la fenestroj de la malgranda kirketo de Sankta Antonio, kiu leviĝas apud la monaĥejo spegulis kvazaŭ flava flamo. Giganta ombro de la Istria montaro jam kovris la trankvilan maron.

La brusto de Marija lante moviĝis supren kaj malsupren, ŝia koro batis trankvile, kaj malantaŭ la promontoro, el la silenta golfo, oni aŭdis obtuzajn plaŭdojn de la remiloj, oni aŭdis ĝojkrietojn. La montara aero komencis malleviĝi sur la maron, movante per la varmego sekigitajn salviojn kaj zumante inter la pingloj de la juniperoj. Malgrandaj ondetoj vibris kaj nigrigis la marom ĉe la sablejo. La malprofunda fundo ŝajnis luliĝi. La leĝeraj blovetoj de ĉi tiu vespera venteto svingiĝis al la vasta maro, sed ili malaperis iom for la bordo.

Antonio sidis kaŭre sur ŝtono. Liaj okuloj estis malklaraj kaj angoraspektaj.

Liaj nigraj okuloj gapis al la maro mute kaj dolore, kaj la spirado de Marija ŝajnas al li veni el sub la grizaj klifegoj. Ankaŭ li volus elspiri, sed lian koron ĉirkaŭvolvis serpento, kiu premis ĝin kaj turmentis, nu ĝi ne povis frakasi tiun venenitan koron. La granda maro sternis sin antaŭ li, kaj li bedaŭris, ke Marija ne troviĝis en ĝ profundo. Li volus salti en la akvon de sur la klifo, por kuniĝi kun ŝi. Tie sube, inter la mola musko li forte brakumus ŝin, neniun tion vidus, nek ŝi, nek tiu... tiu Mato...

—Antonio, ni iru hejmen, — fine diris Marija, ekrigardinte al la kabo, malantaŭ kiu la boato kaŝiĝis.

—Jes.

Irante laŭ la kruta vojeto, ili pli kaj pli foriĝadis de la maro. Ie ĉe la duono de la vojo, Marija apogis sin kun la pezaĵo sur la malaltan ŝtonomuron. Rimarkinte grandan faskon de la bruloligno, ŝi demandis mallaŭte:

—Aŭskultu, vi ŝarĝis vin tro; ĉu via pezaĵo ne pezas tro?

—Ne, — diris Antonio rigardante al la tero.

Ĉiuj vejnoj sur lia nigreta vizaĝo pufiĝis.

—Se almenaŭ vi kunportis iun malnovan sakon, por ke la ligno ne premvundu viajn ŝultrojn.

—Ni iru, ni iru! — li rediris kun malklara voĉo kaj piednuda ekmarŝis laŭ la abraziita ŝtonaro.

Tiel grimpante ili krepuske atingis la imperiestran ŝoseon. Tie ili ambaŭ apogiĝis al malalta muro, por denove ripozi. Ĝis la hejmo ili devis piediri ankoraŭ preskaŭ duonon da horo. Marija viŝante la ŝviton de sur sia frunto, rimarkis viron vestitan laŭ la sinjora vestmodo. La homo malrapide promenis

laŭvoje al Luĉica, kaj ludis kun eta blanka hundo, devigante ĝin transsaltadi palison.

—Kiu estas tiu sinjoro? — Marija demandis Antonion.

—Kie?

—Tie, jen, survoje, li iras al ni. Ŝajnas al mi konata.

—Jes, estas li! — rediris Antonio kaj montris per fingro al granda domo, kiu blankis inter la arbotrunkoj sur unu monteto proksime de Luĉica.

—Ĉu estas li maljuna aŭ juna? — daŭrigis Marija, ĉar ŝi vidis lin nur momente sur la vojo, kiu kurbiĝas ĝuste tie.

—La juna...ĉu vi ne konas lin?

—Mi konas lin, mi vidis lin nur dum momento, — respondis Marija, kaj ŝia frunto malsereniĝis. Post ioma paŭzo ŝi flustris ripete: — Ankaŭ mia frato venos baldaŭ el Vieno.

—Jes, Marko venos.

—La studado nun finiĝas.

—La studado?

Marija kaj Antonio ekiris nun al Luĉica. Ili marŝis haste kaj aŭskultis la paŝbatojn de la juna viro, kiu fine atingis ilin. Proksimiĝinte al Marija, li salutis ŝin per afabla voĉo:

—Bonan vesperon, belega knabino! Jen, vi ŝvitas, karulino, sub tiu pezaĵo. Kiel bela vi estas... bela Marija; vi nomiĝas tiel, ĉu?

—Jes, mi nomiĝas tiel.

—Sed vi eĉ ne resalutis al mi!

—Marija, baldaŭ noktiĝos; ni iru pli rapide! — Antonio admonis ŝin.

—Ne hastu tiom! Sed, jen, ankaŭ vin mi konas; jes ankaŭ vin! Vi estas Antonio... Antonio, — la sinjoro silabumis, glatante sian vangon per la mano.

—Nature, vi konas min! — Antonio respondis kolere, irante kelkajn paŝojn antaŭ Marija.

—Nu, belega Marija, kiel vi fartas? — la sinjoro ekflustris, rigardante al ŝia vizaĝo per siaj nigraj kaj grandaj okuloj.

—Mi bone, — respondis la knabino.

—Sed, bone, bone! Jes, jes, mi sciiĝis, ke negocisto el Jelenŝtica venas ĉi tien...

—Oni klaĉas pri ĉiaĵoj, — Marija diris mallaŭte.

—Tiel, tiel! Ĉu nuptofesto baldaŭ okazos?

Marija ruĝiĝis dirante nenion.

—Vere, do vere! He, se ĉiuj sonoriloj sonoras, do io okazas! Sen ŝerco, mi hieraŭ eksciis pri tio, — diris la sinjoro kaj levinte sian ĉapelon li viŝis per silka tuko sian altan frunton.

—Eĉ se tio estus vero? — ekflustris Marija.

—Mi bedaŭras, ke Luĉica perdus la plej belan knabinon, — li daŭrigis kaj ekpalpis ŝian vangon per sia forta mano.

Marija retiriĝis sub la pezaĵo kaj saltis foren je du paŝoj.

—Jen, mi ne sciis, ke mi estas tioma timigulo! Nu kial vi timas min? Ĉu estas mia kulpo, ke vi estas tiom kara kaj ĉarma?

—Lasu min, ni ne konvenas unu al alia! Vi devus honti, jes, honti...

—Mi, honti? Pro kio?

—Jes, vi estas sinjoro...

—Ĉu tio gravas?

—Mi neniun malbonon faris al vi iam ajn. Mi iras laŭ mia vojo, vi iru laŭ la via.

—Vi, ke vi ne faris malbonon al mi? Vi faris, karulino, vi faris! Vi vundis mian koron por ĉiam! — li flustris, por ke lin ne aŭdu Antonio.

—Pri via koro mi ne zorgas!

—Jes, kara Marija, de kiam vi kreskis, mia okulo ĉiam postsekvas vin! Mi neniel povas sufiĉe ĝurigardi vin!

—Evitu min, vi frenezetulo! Lasu min libera! Pro vi mi eĉ el la domo ne povas eliradi.

—Estu kvietaj, karulino! Mi forlasos vin, sed vi devas akcepti tiun ĉi malgrandan skatoleton. Tio pruvas, ke mi pensis pri vi ankaŭ en Vieno.

—Kion mi faris al vi! Lasu min, foriĝu for mi!

—Marija, rigardu, jen, rigardu, kiel belaj tiuj ĉi ringoj estas. Prenu ilin, karulino, prenu; neniu scios.

—Ho, panjo mia! — Marija suspiris, ne sciante, kion fari kaj kiel liberigi sin de la tentulo.

—Marija, kara Marija, kial vi tiel traktas min? Kvietiĝu, vi belega knabino! Neniun kialon vi havas timi min.

—Ĉu vi Dion ne timas?

—Se vi plenumos mian peton, ĉio estos bonorde kun vi! Aŭdu min, karulino, — li diris kaj prenis ŝian manon, — aŭdu min, venu morgaŭ...

Marija eltiris sian manon el lia, forpuŝis lin kaj ekkriis:

—Antonio, atendu min, Antonio, haltu!

La vizaĝo de Antonio ardiĝis per nigra ruĝo, kaj nenion demandante pri la evento kun Marija, li saltis al tiu sinjoro, prenis lin ĉe la gorgo per unu mano, kaj per la alia batis tiel forte lian bruston, ke li tuj falis sur la ŝoseon.

(Alfredo Saletti estis konsternita. Rekonsciiginte el la unua embaraso, li tuj ekpensis pri venĝo. La filo de la riĉulo, procentegulo kaj sangsuĉulo de la honesta ĉemara popolo, — de

la maljuna Saletti, li opiniis, ke li rajtas fari ĉion volatan. Venĝo okupis ĉimomente lian animon kaj pensojn.)

Dum Alfredo cerbumis en arbareto kiel venĝi al Antonio, ĉe la fajrejo sidis la maljuna Ŝabariĉ fumante el malgranda pipeto kaj rigardante al la svarmantaj muŝoj sur la vandoj kaj sur la fulgonigra breto. La kuirejo estis lumigita malintense. Sur la fajrejo flagris kelkaj ŝtipoj. La flamolumo falis sur la maristan sulkigitan vizaĝon kaj sur liajn magrajn brakojn. Jela, lia edzino, bakis sur la ardaĵo kvar fiŝojn, ŝmirante ilin per granda meleagra plumo, kiun ŝi trempis en ujeton kun oleo. La fiŝetoj ĉirpetis kaj fumis, kaj tra la kuirejo vastiĝisodoro de la oleo kaj eliris tra la malfermita pordo en la mallargan strateton.

—Atentu, oldunjo, ke la fiŝoj ne brulu! — Antun admonis la edzinon. — Ja kion diri, ke ankoraŭ Marija ne venas, nek Antonio?

—Ili estas probable proksime. Marija havis multe da tolaĵo. Ni estas malmultaj en la hejmo, sed tamen granda kvanto ariĝas. Antonio kunprenis ankaŭ hokfiŝkaptilojn, kaj li certe sinokupis per fiŝkaptado.

—Kion fari pri la fiŝoj?

—Mi kuiris iom da terpomoj. Ja, jes, anstataŭ fumi, ĉu vi ne povus senŝeligi kaj distranĉi ilin?

—Donu ilin ĉi tien, Jela, donu.

—Sed antaŭ tio, elprenu la pipon el la buŝo. Ho, diaj viroj! Vi ĉiam nur ŝatas fumon sub viaj nazoj! Antun, pli bone estus enmeti tiujn monerojn en la preĝejan almozoskatolon, ol elspezi ilin por tiu seka foliaro! Jes, jes, tio pli utilos al via spirito! Ja, viaj koro kaj pulmo finbrulos!

—Ne brulos, se ne brulis ĝis nun. Sed donu la pelvon kun

la terpomoj ĉi tien, — diris la maristo, kaj preninte la pelvon inter siajn genuojn, li komencis senŝeligi la terpomojn.

—Vi do vidis la boaton de Mato? — diris Jela post ioma paŭzo.

—Jes, mi vidis ĝin veturi apud la bordo. He, Mato estas laborema, nu kial esti alia! Jes, kiel vera vermo! Ja, ĉiam laboranta! Mi vetus je ĉi tiuj terpomoj kaj je ĉi tiuj fiŝoj, ke li jam forgesis la akcidenton okazintan pasintvintre.

—Kiam oni alportis lin povran en nian domon, mi ne kredis pri lia resaniĝo. Dio tion volis! — Jela svingis per siaj manoj.

—Li asertas, ke lin neniam doloras la korpoparto kiu estis frapita.

—Lia cerbo iom skuiĝis. Jes, jes, maljunulo, en nia mondo estas tiel! Ĉio, ĉio estas destinita! Tiu malfeliĉo eble alportis feliĉon en nian hejmon. Mi scias, ke nia Marija ne svatiĝas en Luĉica. En nia hejmo ne estas same kiel estis antaŭe, kiam nia Marko foriris en Vienon. Oni nuntempe strebas al mono, sed ni, oldulo mia, ne havas ĝin; jes, jes, ni ne havas ĝin! — Jela suspiris kaj daŭrigis: — Nur sendi kaj sendi, ĉiufoje skribas Marko, jen por tio, jen por tio, ja kiel ni povas havigi ĝin tiome? Malbonaj tempoj estiĝis, malmulte da vino, la oleo mankas, ĉion, kion ni priŝparis, foriris kun Marko en Vienon.

—Ne lamentu, Jela! Marko finstudos, kaj li utilos al ni.

—He, he, se infanoj estus tiaj, kiel iam antaŭe estis! Marko estas sinjoro, sed ni, kiuj ni estas? Povruloj, malriĉuloj! Se Dio estus doninta al mi ankoraŭ unu filon, tiu ne spertus tiujn altajn studojn!

—Jela, turnu la fiŝojn. Do vi opinias, ke Mato svatos nian Marijan?

—Kion vi volas, ke mi diru al vi? — Jela skue movis per siaj ŝultroj. — Mi dirus ke io koviĝos el tio. Ja kiom foje Mato kutimis veni al Luĉica, antaŭ la rompiĝo de lia boato? Nun ne pasas dekkvin tagoj sen lia vizito al ni. Taŭgan kaj honestan bofilon Dio donus al ni! Feliĉan baldaŭan fianĉiĝon! Kompreneble, mi ŝatus, ke mia filino restu en nia hejmo, nu, ne estas Jelenŝĉica trans Karlovac! — Jela findiris kaj renversis la fiŝojn sur grandan pladon.

En tiu momento io falegis antaŭ la domo. Antonio faligis la pezaĵon de sur sia ŝultro. Marija, senŝarĝinte sin antaŭ la pordo, silente eniris en la kuirejon kun teren klinita kapo.

—Nu kial vi, karulino mia, malfruis? Ĉu vi ankaŭ sekigis la tolaĵojn sur la sablejo? — demandis la patrino.

—Jes, panjo, mi sekigis ĝin, por ne porti ĝin malseka supren, — respondis Marija rearanĝante la veston ĉe sia sino.

—Nu, ni sidiĝu nun, ke la fiŝoj ne malvarmiĝu. Marija, vi certe malsatiĝis kaj laciĝis, — diris la patro verŝante oleon sur la terpomojn kiu fumis en la pelvo.

—Kie estas Antonio? — nun diras Jela.

—Ni kune venis; certe li estas antaŭ la domo, — diris la knabino kun malfirma voĉo.

La maljuna Ŝabariĉ alvokis Antonion, kiu eniris senvorte, rigardante embarasite laŭ la kuirejo.

Ĉiuj sidiĝis kaj komencis manĝi. Kiam Jela rimarkis ke ŝia Marija silentas kaj estas iel embarasita, ŝi zorgeme demandis:

—Marija, mi rigardas vin kaj observas, kial vi tiel mutiĝis, kial vi estas tiel deprimita kaj trista?

La patro observis la filinon okuloblikve kaj kvazaŭ li ektimus. Marija apogis sian maldekstran kubuton kontraŭ la tablo, kaj malleviste la kapon en la manon, ŝi rigardis la patri-

non. Ŝiaj lipoj spasmis ploroprete, ŝi ion elbuŝigis, sed la vortoj sufokiĝis en la gorgo, grandaj larmeroj komencis ruliĝi laŭ la kara vizaĝo kaj guti sur la maldelikatan tablotukon.

—Karulino, doloro mia, ja kial vi ploras, ja kiaj malbonaĵoj vin atakis? — demandis la timanta patrino kun miro.

Ĉar Marija ne respondis, la patro demandis Antonion:

—Aŭskultu, vi estis kun ŝi, ne turmentu nin, diru kial ŝi ploras?

—Jes, mi estis kun ŝi, ŝi ploras... ĉiu plorus. Jes, jen, tiele mi lin! — diris Antonio raŭke, etendinte rapide sian dekstran manon al Ŝabariĉ kaj kunpremite la pugnon konvulsie. El liaj nigraj, profundaj okuloj fulmobrilis viva flamo, lia frunto malsereniĝis, la brovoj spasme tremetis.

—Panjo! — elspiris Marija kaj per la manoj kovris la okulojn kaj la larmorositan vizaĝon.

—Marija, mia kara ido, diru, pro Dio, kio okazis al vi? — Jela ekĝemis.

—Mi ne scias kion fari plu; li ĉiam ĝenas min, — singultis la knabino.

—Vin ĝenas, kiu, Marija? Diru al via patrino.

—Karulino, ne ploru, diru al ni, kia malbono trafis vin. Marija, ne konduitu infanece, parolu! — elbuŝigis la pala kaj timigita patro.

Marija komencis paroli, ke Alfredo kelkan tempon jam tentas ŝin kaj ke ŝi tion ne volis diri, por ne malĝojigi ilin. La maljunuloj paralizigiĝis kvazaŭ ŝtoniĝintaj pro timo kaj amara malĝojo. Kiam Antun koncentriĝis, li ekkriis kunpremite la pugnon:

—Ho, rusto, kanajlo! Vi ekkonos, kiu estas Antun Ŝabariĉ!

—Mia zorgo! — ekkriis la dentogrincanta Antonio.

—Diaj homoj, gardu vin de malbono! — eklamentis Jela.

—Li falegis sur la ŝoseon kvazaŭ sako, kiam mi frapis lin. Ankoraŭfoje mi renkontos lin! — diris Antonio minacante kaj svingante per sia fortika dekstra mano.

—Kiu falegis? — demandis la konfuzita Jela.

—Li, la juna; jes, kvazaŭ sako.

—Antonio, kion vi faris? — Jela svingis kaj klakis per siaj manoj, kaj daŭrigis suspirante: — Ho, povra mi! Kion ni povas kontraŭ ili! Fatala malĝojiga tago hodiaŭ trafis nin! Se almenaŭ mia Marko estus hejme; kio helpus nin? Malfeliĉo trafis nian hejmon! Ne, ne, nur Dio povas helpi al ni!

—Ĉu, ke tiu kanajlo tentu mian filinon! Prave vi faris, Antonio! Ja per fusilo mi pafus lin kiel rabian hundaĉon!

—Antun, ĉu vi Dion ne timas? Ja ankaŭ li estas baptita! Ni gardu nin de tiu familio surmonte, vi mem scias, ke jam la tuta Luĉica sufiĉe suferis pro ili. Malbone por ĉiu, kiu havas rilaton kun la maljuna Saletti! Kia patro, tia filo. Trankviliĝu, kara Antun, al Dio preĝu, por ke la malbona spirito ne devojigu vin. Ni devas ne peki, ĉar se Dio tuŝus lin per fingre, lia orgojlo..., —Jela ne findiris, ĉar ŝia edzo interrompis ŝian parolon.

—Ne kriaĉu, edzino! Vi ne ekkonis la mondon! Se oni pekas pervorte, oni tamen ne vendis al diablo sian spiriton. Mi diris, ke mi mortpafus lin, sed tamen mi ankoraŭ ne pafis al li! Marija, filino mia, trankviliĝu, ne ploru! Jes, jes! Tiaj estas la sinjoroj! Ĉion tiuj friponoj forrabis, konfiskis, senhăutigis nin, kaj nun ili volas ankoraŭ profani nian sangon. Malbono, malbono por ni, ĉar ni ne estas mastroj en niaj domoj. Ili alvagas ĉi tien malsataj kaj ĉifonvestitaj, kaj nun ili estras super ni; por ili ŝvitas niaj povraj fosistoj, ĉion kio valoras en Luĉi-

ca ili forrabis trompe kaj ruze. Kion ni povas kontraŭ ili? Dio ne pagas ĉiusabate, kaj la imperiestro estas malproksime, li ne konas niajn suferojn!

—Ĉu justo ne ekzistas en la mondo? Antun, pri niaj turmentoj ni sciigos la sinjoron paroĥestron kaj Stipen, ili helpos al ni, ili diros kion fari, — kapjesis Jela.

—Mia zorgo! — premdiris Antonio tradente.

—Viro, pripensu, kion vi parolas! — Jela riproĉis lin. —Vi estas povra orfo, kaj li eminenta sinjoro. Trankviliĝu, Antonio, vi ne povas helpi al ni. Alfredo invitos ĝendarmojn, ili katenigos vin kaj forpelos en kelkarceron.

—En karceron!... Ili forpelu! — Antonio aldonis malklare, kaj rigardante al Marija li paliĝis.

—Jes, en karceron, kie vi pereos pro malsato kaj malvarmo. Kaj vi, Marija, obeu vian patrinon; evitu la avidulon kaj fidu Dion. Ankaŭ lia patro estis tia, jes, la maljuna Saletti. Ĉar ili jam ĉion forrabis, almenaŭ nun ni povus vivi libere, sed jes, pro ilia petolemo ili faras ĉion ajn!

—Vi pravas, oldunjo! Tiaj vortoj taŭgas! Ho, friponoj! He ankaŭ ilin frapus la fina tempero! Ili rabis ĉion de ni. Se mi ne estus tiom peninta surmare, hodiaŭ mi ne havus eĉ sekan panpecon! — Antun permane frapis la tablon.

—Kaj nun, kiam mi pasas apud niaj vitlaŭboj, forprenitaj per la friponaĵo de Saletti, ankoraŭ nun min la koro doloras, — plendis Jela.

—Atendu, ke mi diru! Mia mortinta patro prunteprenis de Saletti kvindek forintoj, jes, kvindek. Estiĝis plagaj jaroj, la ŝuldo kreskis kaj kreskis, mi ĵuras per mia animo, ke tiujn vitojn mi ne donus eĉ kontraŭ mil forintoj. Tiam mi estis juna, mi forestis de la hejmo. Jes, mi ne eraras, la patro ŝuldis

tiujn kvindek forintoj dum kvin jaroj, kaj tiam li malbenis, Dio pardonu, kaj la advokatojn kaj la justecon. Sed kion povas fari la plej bona kaj la plej justa juĝisto kontraŭ tiaj kanajloj?

—Marija, trankviliĝu kaj obeu vian patrinon! — la maljunulino konsolis sian solan filinon, karesante ŝian frunton.

—Panjo, mi pli ŝatus renkonti diablon, ol lin.

—Jes, ido mia, evitu lin, kaj se li proksimiĝos al vi, nur silentu, ne respondadu al li. Marija, vi vidos, li lasos vin en paco. Forviŝu nun la larmojn, kaj ni kuŝiĝu. Kia utilo de lamentado? Multaj laboroj atendas la morgaŭon, ni fruiĝi devas.

Antonio ekstaris kaj enpoŝigis du hokfadenojn.

—Sed, kien vi? — Jela demandis lin.

—Kapti fiŝojn; morgaŭ estos vendredo.

Kiam Antonio surpaŝis la domsojlon, li dummomente atendis kaj rigardis al la malluma mallarĝa strateto. Li surhavis bluan tolan pantalonon kaj ruĝan flikitan ĉemizon. Lia dorso okupis preskaŭ la tutan spacon de la mallarĝa pordo. La lumo de olelumigilo faladis sur la malnovan, kelkloke trugigitan pajlan ĉapelon de Antonio, sur lian fortikan nukon, sur la ĉifonitan vestaĵon kaj sur la firmajn nudajn piedojn.

La familio Ŝabariĉ samtempe spektis la grandajn ŝultrojn de Antonio. Sur la flikoj de la ĉemizo ankoraŭ troviĝis pecetoj de la sekaj lignoŝeloj defalintaj de sur la alportitaj brulligno-

La nigra hararo, la pajla ĉapelo, kaj la ruĝa ĉemizo malaperis en la mallumo. La familianoj interrigardis sin. Jela suspekto balancis la kapon, konjektante grandan malfeliĉon.

Jam pasis ĉirkaŭ tri horoj post kiam la lastaj sunradioj malaperis de sur la ŝtonoza montaro de Velebit. La nokto estis

malluma. La blua ĉielo ŝutiĝis per grandaj steloj. Sur malalta plata monteto, kiu kaŝas sin en la mallumo proksime de Luĉica, brilas vico da lumigitaj fenestroj de la granda domo. Antaŭ tiu ĉi sinjoreca domo sterniĝas vasta ebenaĵo, kiun enkadrigas muro homstature alta. Sub la muro kruta deklivo malleviĝas ĝis la montopiedo, ĉirkaŭ kiu kurbiĝas la imperiestra ŝoseo. De la muro ĝis la ŝoseo mem, laŭ tiu krutejo, elkreskis densa kverka arbaro.

Malfrue en la nokto laŭ la ŝoseo iras malalta, fortika viro, singarde observante ĉirkaŭ si. Kvankam estis densa mallumo, tamen tiu viro ne paŝis meze de la blanka ŝoseo, sed laŭrande en plia mallumo sub la arbaro, kiu nigris super la ŝosea remparo kvazaŭ malluma bordo de insulo. Kiam la viro venis al loko kie li transsaltis la fosaĵon, li eniris la arbaron, grimpis tra pteridoj kaj arbedoj ĝis la muro sub la ebenaĵo, sur kiu en la trakvila nokto blankis la sinjoreca palaco.

La viro estis Antonio. Li ne foriris fiŝkapti, kiel li estis dirinta al la Ŝabariĉanoj antaŭ proksimume du horojn, sed li venis antaŭ la domon de Saletti.

Antonio apogis sin, starante sur trunko, per ambaŭ kubutoj kontraŭ la muron, kaj rigardis al la lumigitaj fenestroj. La kverkopintoj lante moviĝis pro la spiro de la nokta brizo. Inter la branĉoj susuris la foliaro. La okuloj de Antonio brilis en la mallumo sub dika kverka branĉo. La fenestroj estis malfermitaj. En la ĉambroj pendis orumitaj lumigiloj. La brizo ŝvebigis la blankajn altajn kurtenojn. La lumo el la ĉambroj disverŝis sin laŭ la arboverdaĵo. En unu ĉambro brue tintis kordoj, kiujn iu plukis. Kun la kordosono fandiĝis arĝenteca voĉo. Elvira Saletti kantis, sed ne kiel aliaj junulinoj en Luĉica, ne kiel maristaj filinoj. La voĉo aŭdiĝis jen pli silente, jen pli

laŭte, tiam plorsingulte, suspire, kaj tiam, kvazaŭ ŝi kverus. Antonio aŭskultis kaj miris, li rememoris pri la altsona gorgo de Marija kaj pri ŝiaj kantetoj, kiujn li komprenis, kiuj tiom ĝuigis la koron. La kantado ĉesis. Sur la malfermita fenestro aperis blanka bildo. Virino. La virino venis al la fenestro pro, — Antonio. Liaj pensoj svarmis, li plej ŝatus foriri, sed li ne devis, ne devis...

Ne sciante kion fari, kaj por forpeli iujn obskurajn pensojn, li komencis nombri la fenestrojn. Estis multaj. Surtere dekdu, meze granda pordo, supre ankaŭ dekdu, kaj ankoraŭ plus unu, dektri, jes dektri. Kaj super la granda dompordo troviĝis unu vitra, ke tie oni povas eliri el ĉambro. Por ne elfali la forĝistoj faris feran kradbarilon. — Granda domo estas tio, — Antonio ekpensis, — ankaŭ la episkopa en Triesto similas. — Kiam li rememoris pri Triesto, lia frunto malsereniĝis kaj spasmon li eksentis en sia koro...

Li reobservis la domon. Sur la tegmento elstaris supren du vergoj. Ĝiaj pintoj brilis. Nun li opiniis, ke povus esti vero tio, kion la sonorigisto Fran rakontis pri tiuj vergoj. Oni certe trompis Franon dirinte al li, ke en ĉi tiujn palisojn batas la tondroj kaj ke per ili la fulmotondroj en la teron eniras!

Antonio estis pensanta, kiam el la domo elpuŝiĝis viro. Antonio deprenis sian ĉapelon, ke tiu viro ne rimarku lin en la malluma verdaĵo. La viro komencis promeni antaŭ la domo. Antonio kurbiĝis sub la muro. Nur la supra duono de lia granda kaj taŭza kapo elstaris. Liaj okuloj moviĝis malrapide traborantaj la mallumon kaj rigardsekvante la promenantan viron.

Iom poste aperis alia silueto iom for la domo.

—Kiu estas? — demandis la promenanta.

Antonio skuiĝis rekoninte la voĉon de Alfredo.

—Mi estas, sinjoro, mi, Lovro.

—Kie vi estis? Ts, silentu! Venu ĉi tien, — alvokis lin la juna bienulo.

—Jen mi, sinjoro, kion vi ordonas? Mi trinkigis la ĉevalojn.

—Parolu pli mallaŭte! Mi devas ion diri al vi.

—Bonvolu, sinjoro! Vi scias, ke mi eĉ en la maron saltus pro vi! — ekflustris Lovro, dum io svingiĝis aere. Li estis depreninta sian ĉapelon.

—Venu ĉi tien, al la arbaro, for de la domo, — diris Alfredo, ekirinte laŭ mallarĝa ebenaĵo al Antonio, kiu sin tuta kuntiriĝis.

—Kie estas Luko? — Alfredo demandis la kaleŝiston Lovron.

—Se vi ordonas, mi serĉos lin.

—Iru, sed singarde. Vi tuj venigu lin ĉi tien.

Kiam iom poste revenis Lovro kun Luko, la nobelo mallaŭte diris al ili:

—Aŭskultu, mi ŝercon ne konas! Ĉu mi povas konfidi al vi?

—Sinjoro!? — la servistoj elbuŝigis samtempe.

—Vi povas helpi al mi pri io...

—Kompreneble, ni povas, — respondis la servistoj mirigitaj.

—Infanoj vi ne estas plu, sufiĉe prudentaj vi estas, sed nur singarde! Mi ne dubas, ke vi sukcesos.

Lovro kaj Luko mansvingis, kvazaŭ dirante: Nia zorgo!

—Prenu, jen tion, kaj poste vi ricevos pli, — promesis la nobelo mallaŭte, enpremante al ĉiu monbileton en la manojn.

La donacitoj ekrigardis unu la alian, palpis la paperojn, kiuj eksusuris en iliaj manoj, kaj metis ilin en siajn poŝojn.

—Nun vi aŭskultu min! Mallaŭte! Mi ne ŝatus, ke iu rimarku nin. Vi, do, estas pretaj plenumi ĉiun mian ordonon?

—Ni estas.

—Vi konas la triestan bastardon, kiu loĝiĝis en domo de maristo?

Antonio ekstremis sub la muro. Lia vizaĝo ekflamis kun febra ardo, kunpremite la dentojn kaj la pugnojn, li streĉis siajn orelojn por ne preterlasi eĉ unu vorton.

—Ni konas, li estas Antonio.

—Granda malbonulo li estas!

—Kanajlo! — blovdiris Lovro.

—Mortigi lin! — ekflustris Luko.

—Vi scias, ke li estas impertinenta kaj aroganta.

—Li ne volas depreni ĉapelon antaŭ vi, — diris Lovro.

—Vi rakontis al ni, ke li iutage minacis al vi per pugno, sen kaŭzo, — ekparolis Luko.

—Jes, tiel estis! Sed aŭskultu! Hodiaŭ krepuske mi renkontis tiun junulinon kaj lin sur la ŝoseo. Kiam mi persvadis la junulinon, li atakis min, kaj batinte min al la brusto, li faligis min.

—Malbonulo! Li batis vin embuske! — diris Lovro.

—Jes, neatendite. Ĉu vi scias nun, kial mi alvokis vin?

Luko kaj Lovro timidaj ekrigardis unu la alian.

—Vi devas kaŝobservi lin, kaj kiam okazo oportunos, ataku, finbatu lin ĝis la sankta oleo (ĝismorte). Atentu, ke neniu vidu vin. Ts! Aŭskultu! Plejbone estus..., — proponis Alfredo, etendinte rapide la manon en la mallumon anstataŭ fini siajn vortojn.

La servistoj ektimis, komprenante la signon.

—Jes, per tranĉilo, se vi renkontos lin sola ie. Luko vi timas?

Mi ne timas, sinjoro, sed kie trovi lin? — ŝanceliĝe respondis la servisto.

—Serĉu lin ie ĉemare. Do, kiel mi diris, unue tranĉilon en la koron, kaj tiam lin kun kelkaj ŝtonoj en sakon, kaj ”plonĝ” en la maron, — instruis ilin la nobelo.

—Luko, kion vi opinias? — timide diris Lovro.

—Vi estas perfiduloj! Ĉu vi faros aŭ ne? Mi ripetas al vi, ke tiu hundaĉo devas morti! Nur singarde, neniuj interesiĝos pri li; ja vi scias, ke li estas bastardo.

—Malfacila afero, jes, malfacila! — kapbalancis Luko.

—Ne frenezu! Nenia danĝero por vi. Oni iun tagon diros, ke li malaperis. La popolaĉo divenados, kio okazis kun li, sed kvin tagojn poste, kiu plu pensos pri li?

—Peza tasko! Jes, jes, ankaŭ nia haŭto iom valoras, — Luko komencis marĉandi.

—La sinjoro estas bona, li mem bone scias, ke oni per pendumiloj povus premii nin! — Lovro daŭrigis la opinion de Luko.

—Cent forintojn mi jam donis al ĉiu, ankoraŭ tiom, eble eĉ pli, vi poste ricevos.

—Mi akceptas! — ekflustris Lovro.

—Ankaŭ mi! — decidis Luko.

—Bone, nun mi vidas, ke vi estas homoj! Sed ankoraŭ pli mi laborigos vin. Ĉu vi konas la filinon de la maristo Ŝabariĉ?

—Belega estaĵo! — la servistoj elbuŝigis dampite.

—Al mi plaĉas tiu junulino, ŝi ĉiel devas...

—Mi komprenas, — diris Luko, — sed kiel, kie?

—Vi observu kien sola ŝi iras. Pridemandu.

—Tio estas pli facila ol la unua, — respondis Luko skuan-
te la ŝultrojn.

—Atentu, ke oni ne elflaru viajn intencojn. Mi restos hej-
me tutajn tri monatojn; sufiĉan tempon vi havas.

—Ni faros laŭ via deziro. He, viaj muskoloj estas tenacaj,
sed se necese, ni ligos ŝin, — sufloris Luko.

Antonio skuiĝis, kvazaŭ iu surtretis lian koron.

—Kion, se oni ekscios! Se la junulino akuzus nin? — sus-
pektis Lovro.

—Ne frenezu! Ne estas ŝi tiom stulta! Kredu, ŝi silentos, —
asertis Alfredo.

—Kiu tion povus scii! Ja kie oni povas renkonti ŝin sola? —
Lovro balancis la kapon.

—Sufiĉaj lokoj ekzistas! En la monto, apud la maro, aŭ ie
alie, — Luko svingis per la mano.

—Silentu! Nun sufiĉe! Ne perdu la tempon. Se iu el vi eĉ
unu vorton elsiblus, mi mortpafos lin! — minacis nobelo al ili.

—Estos laŭ via deziro, — Luko promesis al li.

—Nun foriĝu de mi, ĉiu laŭ sia vojo. Se vi sciiĝos pri io, vi
tuj anoncu al mi.

Iom poste Antonio aŭdis la malproksimiĝantajn paŝbatojn,
kiuj grincetis sur la sablo, per kiu estis surŝutitaj la vojetoj sur
la ebenejeto antaŭ la domo. Antonio leviĝis malrapide kaj
ekrigardis en la mallumon. Ĉimomente Alfredo eniris la do-
mon. La okuloj de la bastardo ŝutis fajron en la malluman
nokton. En lia koro la sango ekbrulis, en lia tuta korpo ĝi ŝan-
celiĝis kaj ĉiuj liaj vejnoj pufiĝis, la naztruoj vibris larĝiĝante,
liaj dentoj grincetis pro doloro kaj furiozo, la lipoj kuntiriĝis.
Lia fereca mano eligis mallongan maristan tranĉilon el la zo-
no, kaj la akra pinto de tiu ĉi tranĉilo ektremis en la spasme

kunpremita pugno kaj pale ekbrilis en la nokta mallumo sub la muro...

Antonio remetis la tranĉilon al la zono, apogis sin kontraŭ la muron kaj direktis siajn rigardojn al unu fenestro de la domo de Saletti. En lia kapo bruis la sango. Rigardante tiun domon, liajn pensojn ekŝiĝis ideo bruligi ĝin, sed rememorinte pri Marko, pri la frato de Marija... li amare ekridis.

Antonio direktis siajn okulojn al la sama fenestro. En la domo brulis eĉ ne unu kandelo. Subite sur la fenestro ekflirtis io blanka. Antonio surgrimpis la muron kaj ekkuris laŭ la ebenejo al la domo, sub la fenestron.

En la densa nokta mallumo ekblankis ies manoj kaj vizaĝo en la fenestro. La manoj moviĝis, kaj apud la dommuro malleviĝis blanka letero, per fadeno ligita. Antonio haste ĝin maligis, kaj tiam ligis sur la saman fadenon alian leteron, kiun li elprenis el sia brusto. Elbuŝiginte neniun vorton, li ekrapidis laŭ la plataĵo, ensaltis en la arbaron kaj malleviĝis laŭ la kruĵaĵo, sur la ŝoseon. Kiam li post kelka tempo alproksimiĝis al la urbeto Luĉica, li ĉirkaŭiris ĝin, kaj veninte super la maron, sur la randon mem de la grandaj rokoj, li kuŝiĝis surventre teren. Apoginte la kapon per la brakoj, li mute enrigardis al la fronto de la domo de Marija kiu nigris antaŭ li iom for de la maro...

La nokto estas varma, la aero filtrita per la marodoro. La maro verŝadis sin obtuze trans la obskuraj rifoj kaj tra la teruraj kavernoj sub la koroditaj klifegoj. Antonio entiris sin inter du ŝtonojn, kie troviĝis iom pli mola tero, etendis sin kaj ekdormis profunde.

Sur la griza oriento ekflamis plena luno. La granda bulo, ĉirkaŭita de nebulo, pli sangokolora ol ora, leviĝis el malan-

taŭ Velebit. Leviĝinte je du lancoj sur la ĉielo, ĝi surverŝis la korpon de Antonio per sia brilo. Lia larĝa dorso lante leviĝis kaj malleviĝis. La lunlumo rampis laŭ lia krispa nigra hararo, de sur kiu defalis la pajla ĉapelo, laŭ la plenforma etendita korpo kaj laŭ la vejnoplennaj kaj nudaj piedoj. Lia kapo malleviĝis sur la ruĝetan teron, kiun li premis per unu vango. Li dormis kvazaŭ murdita; vidinte la ruĝetan kaj suplan teron trempitan per likva lunlumo, antaŭ lia vizaĝo, kiu treege brunigis, oni ekpensus, ke ĝi eligis sangon.

IV

Impona estas la orienta bordo de Istrio. La alta montara ĉeno leviĝas el la blua maro, en kiu ĝi spegulas sin, ondante per siaj kalvaj kapoj, laŭlonge de Preluka kaj gaja Volosko ĝis la tenebra urbeto Plomin. Laŭ la krutejo de la montarĉeno disvolviĝis kaj viciĝis multe da rokoj kaj montetoj. La glata imperiestra ŝoseo trenas sin jen apud la maro mem, kaj jen ĝi levas sin super la ravinojn, sub kiuj ĝi ne povus pasi, sen elĉizi la pasejon tra duraj rokoj. Tiu ĉi ŝoseo tuŝanta plurajn urbe-tojn kaj vilaĝojn, alserpentumis ankaŭ al Luĉica. Antaŭ Luĉica ĝi larĝiĝis, kaj tiel en Luĉica ĝi estigis ĉefan placon. Se oni rigardas suden, ankaŭ tie la sama ŝoseo blankas precipe ĉe la kurbejoj apud la montoj, tiam ĝi malaperas en la ravinojn de la riveretoj. Ĝi kondukas ĝis Jelenŝĉica nur kurbiĝante.

La paroĥo de Luĉica konsistas el pluraj malgrandaj vilaĝoj, vilaĝetoj kaj domoj unuopaj, soldomoj. La loĝantoj de tiuj gajaj vilaĝetoj vizitadas al la urbo Luĉica nur dimanĉe kaj festotage, por preĝi al bona Dio, por aŭdi antaŭ la urbestra domo pri deziroj kaj ordonoj de altranga sinjoraro de diversaj kompetentecoj, kaj fine por ion aĉeti en la butikoj de la negocisto Stipe.

En Luĉica estas du pastroj: la paroĥestro kaj ankoraŭ unu maljuna. Tiu kvankam emerito kaj oldaĝa, tamen ĉiudimanĉe servas la malgrandan meson frumatene. La paroĥestro servas la grandan kantatan meson kun prediko. Al tiu okazo kutimis

eksonori jam je la naŭa horo, kaj finsonori nur je la deka. Unue ekklakas la malgranda sonorilo, kiu ĉeflanke fendigis. Ĝia sono estas malagraba; kvazaŭ el rompita potu. La luĉicanoj ofte interparolas pri tiu sonorilo, kaj ĉiam revenas al konkludo, ke ĝi ankoraŭ taŭgas por Luĉica. Post la malgranda sonorilo, eksonas la meza. La sono de ĉi tiu sonorilo ŝajnas al la luĉicanoj tre malgaja, probable pro tio, ĉar ĝi estas funebra sonorilo, kiu ofte anoncas, ke iu el ili ekiris longan vojon.

La maljuna Fran penige sonoris, kaj kiam infanoj alkuris antaŭ la turon kriante: "Fran, la sinjoro paroĥestro jam estas en sakristio!", li prenis ambaŭ ŝnurojn, de la granda kaj la malgranda sonorilo kune, kaj tirante ĉiujn tri sonorilojn samtempe, li avertis la popolon rapidi en la preĝejon.

Iun dimanĉon sonoris la meza sonorilo. La suno jam suprensaltis alten. Ega varmego ŝoviĝis en la golfon de Kvarner. Sufoka aero vibris super la griza ŝtonaro kaj ŝtonbaraĵoj, super la arbaretoj kaj super la flaviĝinta herbaro. Sur la ĉielo vidiĝis eĉ ne unu nubfloketo, nur super la suda horizonto leviĝis super la maro longaj helaj nebuloj kvazaŭ tuloj. La maro estis blanka. Meze de la golfo, en la larĝa fluo, rebrilis suna oro, kaj ene de tiu ĉi oro rampis, svarmis juveloj.

Laŭ la ŝoseo, kondukanta al Luĉica, de la sudo kaj la nordo, homamaso rapidis al la granda meso. La homoj iris ope. Sur montdeklivo videblas deko, iom fore eniras la valeton kvino, kaj sur alia monteto aperas denove kelkaj aroj. Ekzistas ankaŭ unuopuloj, tiuj estas kurbiĝintaj maljunulinoj, kiujn la pli junaj atingis, salutis kaj postlasis. Laŭ la ŝoseo blankis la ĉemizmanikoj de gajaj vilaĝaninoj. Buntkolorajn silkajn kaptukojn ili surmetis super siaj ruĝecaj kaj sanaspektaj vizaĝoj por

ŝirmi sin de la suno. La knabinoj ne iras solaj; kune enmiksiĝis junaj maristoj. Ili devestis siajn jakojn kaj transmetis ilin surŝultren. La ĉapelojn ili ŝovis nuken. Ŝercante kaj koleretigante la knabinojn, ili viŝis ŝviton de sur siaj vizaĝoj per blankaj tukoj, kiujn ili tenis en siaj manoj tuttempe. La knabinoj de tempo al tempo ekridis, revenĝante sammaniere, riproĉante la petolemajn maristojn, ili koleretis pro ili, ne pro la diroj, sed se iu pinĉus ĉe plenforma kubuto, kaj nur tiam, se ili eksentus doloron ĉe la freŝa kaj sana karno pinĉita.

Tiu tuta popolo estas gaja, senzorga kaj kontenta. Ja kial ne esti tia! Ili dum tiuj ses pasintaj labortagoj sufiĉe penis kaj ŝvitis, kaj hodiaŭ ili iom ripozos, iom kantos en la preĝejo, ili aŭskultos la predikon de la sinjoro paroĥestro, kiu estas vera patro al ĉiu, ĉiuj lin estimas kaj amas, kiu multfoje ĝislarme kortuŝis ilin, kiu predikas tiel bele kaj kore, jes, tiel bele, kiel neniu pastro, nek en Jelenŝĉica, nek en Lovran, nek en Plo-min. Nur posttagmeze, post la beno! La bonaj virinoj eksidos en ombbron antaŭ la domo de najbarino, ili interparolos pri rikolto, pri vino, pri enamiĝintaj gefianĉoj, pri malsana bap-tanino, pri reveninta maristo, ili pridemandos ankaŭ, pri kio leterskribas la soldatoj de sur la imperiestraj ŝipoj kaj pri centoj da aliaj aferoj. Dum krepuskobeata freŝeco, kiam la freŝaj ombroj kovras la kvietan diecan maron, juna maristo surmetas sian jakon ŝultren, li plukas bukedeton da fratina bazilio, kaj ekiras kantante en foran vilaĝeton al sia karulino, kiu atendas lin ĝoja kun rideto, ne povante sufiĉe ĝui rigardante lian junan kaj altan staturon vestita en puraj festovestaĵoj. Li, por montri sian horloĝon je arĝenta ĉeneto, elpoŝigos ĝin kaj diros al sia amata trezoro, ke jam estas malfrue, ke baldaŭ li devas hejmen iri. Sed ankaŭ pasintfoje li diris la samon,

tamen jam duonokto pasis, kiam li surpremis lastan kison al la ardaĵ kaj ruĝaj lipoj de sia trezoro...

Ankoraŭ sonoras la meza sonorilo... La homoj rigardadas la sunon kaj diras: "Franina baldaŭ finsonoros! Ho, kiel varme estos en la preĝejo! Ĉio, ĉio finbrulos sub tia suno!"

La fajna polvo sur la blanka ŝoseo estas kvazaŭ ardigita; la polvita ruĝa papavo en la fosaĵo apud la ŝoseo fleksiĝas pro la terura varmego, la ora spikaro tute ne luliĝas. Ne ekzistas laŭbo, krom malsolida ombro de malofta olivarbo, kiu tuberiĉa kreskas sub la muro de la ŝoseo. La homoj tra palpebroj rigardadas al la maro tra la ebena de la tremetanta lumo, kompatante la ŝipetojn, kiuj rigidiĝis en la blanka kvieto. Ili-aj veloj pendas senmove kaj splene respugliĝante precize sub la nigra renversita trunko.

Franina ankoraŭ ne prenis la ŝnuron de la granda sonorilo, sed la homoj jam rapidas kaj rapidas. Ju pli proksime al la urbeto, des pli la aroj de la homoj pligrandiĝas kaj kunfandiĝas. La malhela Luĉica jen montriĝas kaj jen rekaŝiĝas malantaŭ la monteto, kiam ili malaperas en la valeton, kie malsupren fluas profunda rivereto al la maro. La fluejo estas seka, la ruĝa tero en ĝi fendetiĝis pro la varmego. Ne ekzistas akvo eĉ por palumbo. Oni reeltordas sin sur la deklivon de la monto, kaj jen urbeto staranta antaŭ ili. Ŝajnas, ke la kampanilo balanciĝas tra la vibranta aero. Sur la muregoj, detruigantaj, verdas maljuna hedero, la ora kruco sur la preĝejo gaje rebriilas. La domo de Stipe blankas, la vitroj de ĝiaj fenestroj flamas de sunradioj.

Kiam la homoj proksimiĝis al la urbeto, la knabinoj haltis iomete ĉe vojkurbiĝo. Ĉi tie ili malligis bluan grandan tukon, kiun ili portis enmane, kaj sub la suno ekbrilis malgrandaj

ŝuetoj, kiuj difektiĝus dum longa vojo. Tiam ili iom malligas siajn opankojn, kaj dum ili surpiedigas siajn ŝuetojn, iuj pli kuraĝaj maristoj turniĝus, se ili ne hontus pro ĉeesto de pliaĝulo, jes, ili turniĝus por admiri blankan ŝtrumpon kaj eĉ pli plenforman kruron.

Kiam ĉiuj aroj proksimiĝis al Luĉica, atingis ilin laste belstatura ĉarma junulo. Lia vizaĝo estis ruĝa kaj ŝvitanta, kaj el liaj okuloj ardis ĝojo, rigardante la gajan kaj allogan amason.

—Bonan matenon, homoj! — salutis la junulo.

—Halo, Mato! Bonan matenon! Kiel estas? — ĝojkriis tenaca junulo kun brulanta vizaĝo.

—Varme, mi fandiĝos.

—Supozeble vi havas gravan aferon en Luĉica, aŭ vi iun plezure vizitas, ĉar vi ekiris el Jelenŝĉica dum tia varmego, — pikis lin gaja knabino.

—He, kiu scius! Eble ambaŭ aferoj! — svingis Mato senzorge.

—Nenio stranga! — ĝojkriis maristo.

—Estu gajaj, kaj ni ŝercu ankaŭ venontjare! — rediris Mato.

—Ja, pro animo mia, ne ekzistas pli bela en Jelenŝĉica! Jes, jes, ŝi estas bela kaj ĉarma, sed tio ne estas plej grava! Ŝi estas bona, laborema kaj kvieta, kaj tio plej gravas ĉe virino, kiu onidire povas alĝustigi eĉ plej malĝentilan krudulon, — filozofis maljuna maristo, kies profundaj haŭtsulkoj etendiĝis laŭ lia frunto, kaj kuniĝis ĉe la mezo super la tuberoïda nazo.

—Ankaŭ ŝia patrino! Ne ekzistis pli bela junulino ol ŝi! Jes, jes, pomo ne falas for de sia pomujo. Ho, multon pekus tiu, kiu ion malbonan dirus kontraŭ Jela Ŝabariĉ! Ne ekzistas pli honesta virino en Luĉica ol ŝi estas. Jes, jes, neniam aŭdiĝis,

ke la najbarinoj blasfemus ŝin. Ŝi ne estas babilema muelilo por senĉese klakadi antaŭ alies sojlo! — elspiris maljunulino, frotante sian vizaĝon, plenan kun profundaj sulkoj, per sia magra mandorso, je kiu pendis rozario.

—Ĉu vi, Mato, scias, ke hieraŭ venis la frato de Marija el Vieno? — demandis lin maristo.

—Ja, kiel, mi sciu, mi nur hodiaŭ matene venis el Rijeka.

—Ho, pro hundopiedo, kiel ĉarma junulo! Vere ni ĉiuj multe bedaŭras, ke li ne estiĝos sacerdoto. Ni havus junan paroĥestron. Sed sciu, mi ne dirus, ke la nuna paroĥestro ne estas la vera anstataŭanto de Dio en la preĝejo kaj ekster ĝi. Nu, kion ni povas, li jam sufiĉan neĝon posedas ĉi tie, — diras maljuna maristo, malkovrinte sian kalvan kapon kaj mont-rante ĝin kvazaŭ la lunlumon briligus la nuna suno.

—Jes, bona, bona homo estas nia paroĥestro, sed ankaŭ nia, nu, kiel diri? Jes ankaŭ nia estas bona paŝtisto, sed ŝajnas al mi, kion mi scias? Jes, mi dirus tamen, ke li tro foriĝas de la popolo; jes, tiel, tiel! Jes, mi dirus ke tio ne estas bone! La pastro estu pastro nur en la preĝejo, sed ekster ĝi li estu ankaŭ simpla homo, simile al ni ĉiuj. Li vivas kune kun ni, li konas ĉiujn niajn zorgojn, kaj, kredo al mi, li povus multfoje helpi al ni. Ho juna mi estas, sed mi rimarkas, ke malbonaj tempoj ekestis, — kapjesis Mato.

—Prave vi parolas! Tia diro estas ĝusta! La pastroj kiuj konstante gapas en librojn, tiuj nur taŭgas, mia Mato, por grandaj urboj, sed por ni taŭgus iu kiu komprenas nin. La episkopo devus sendi al ni paroĥestron, filon de fosisto! — asertis maljuna maristo, frapante per la mandorso de la dekstra al la polmo de la maldekstra mano.

—Ĉu vi, Mato, jaŭdon posttagmeze veturis sub niaj klifoj al Rijeka? — demandis juna maristo.

—Jes; ho ve, sufiĉe ni remis tiutage! Neniu bloveto de ia ajn vento!

—Ĉu la boato bone navigatas? Ĝi estas pli bela ol la antaŭa, — aldiris la maristo.

—Ĝi glitas kvazaŭ per sebo ŝmirita, — fieris Mato.

—Ĉu vi ankoraŭ kelkfoje rememoras pri la akcidento, kiu trafis vin la pasintan vintron? — demandis lin junulino rigardanta lian ĉarman vizaĝon.

—Kia utilo estus de tio? Pli konvenas forgesi tiajn malagrablaĵojn! — diris Mato kaj svingis permane.

—Certe vi nun pli atentis; ĉu vi ne timas la maron? — redemandis la junulino.

—Kial timi! Oni ne dronas ĉiutage!

Mato estis diranta tion, dum Fran prenis ĉiujn tri ŝnurojn.

—Sinjoro paroĥestro jam estas en la sakristio; ĝustatempe ni alvenis, — diris maristo.

Post momento ili iris en la urbeton. Mato ekiris tra la malgrandaj sratetoj, kaj li alpaŝis sur la sojlon de la domo de Ŝabariĉ. Tie li haltis kaj ĵetis sian rigardon al la kuirejo. Neniu estis ene. Sur la fajrejo bolis en kelkaj potoj. La kato sternis sin meze de la planko, sur granda orkolora makulo, kiu falis en la kuirejon tra la malfermita fenestro. En la kuirejo estis ĉio pura kaj ordigita, kvazaŭ la Ŝabariĉanoj iun atendus.

—He, homoj! Ĉu neniu estas en la domo? — ekkriis Mato.

La junulo eniris en la kuirejon, kaj kiam post ioma atendo neniu respondis al li, li denove kuraĝe ekkriis:

—Homoj, Dio donu sanon! He, ĉu vi ĉiuj foriris en la preĝejon?

En la ĉambro iu moviĝis, la pordo malrapide malfermiĝis, kaj la ĉarma Marija, vestita festotage, pudore elflustris:

—Ho, Mato!

Kaŝrigardante al liaj nigraj okuloj, ŝi ekridetis paradize, kaj ruĝiĝinte ŝi mallevis sian belegan kapon.

—Bonan matenon, Marija!

—Feliĉodona ĝi estiĝu!

—Ĉu la viaj estas en la preĝejo? Kiel vi fartas, karulino? — demandis Mato, okupita rigardante ŝian beatan vizaĝon.

—Ho, ne estas malbone, ne! Jes, mi estas sola; ĵus la niaj foriris al la diservo. Mi jam estis ĉe la frua meso ĉi matene.

—Ankaŭ mi same en Jelenŝĉica. Ho, kia varmego! Mi ja rostiĝis dumvoje!

—Formetu vian jakon, eniru en la ĉambron, — proponis la knabino.

Mato obeis. Li forĵetis sian jakon kaj la ĉapelon sur la liton kaj eksidis ĉe la fenestro.

—Ĉu vi scias, ke mia frato alvenis hieraŭ?

—Tion la homoj dumvoje diris al mi. Ho, mi ĝuste ŝatus ekkoni lin! Se li similas al vi, Marija, tiam li estas tre...

—Nu, kial vi ne findiras?

—Pro kio vi ruĝiĝas? Vi komprenis min, Marija...

—Mato!

—Ja, rigardu al mia vizaĝo, sed ne al la planko!

—Vi do ne konas mian fraton?

—Jes kaj ne; Du Luĉicanoj vizitas altajn studojn, jes du; ŝajnas al mi, ke mi jam ie vidis ilin. Mi opinias, ke via frato estas tiu altstatura kaj forta sinjoro kun nigra, krispa hararo.

—Jes, tiu estas li, sed tiu alia estas...

—Kiu?... Jes, jes, tiu riĉa...

—Vi konas ankaŭ lin?

—Jes, mi konas; sed via vizaĝo iom malsereniĝis...

—Ĉu mia?

—Jes, via... Marija, kiom mi memoras pri via frato, li tute similas al vi. Jes, mi konas lin nur laŭvide, ja vi scias, ke mi ne estis ofte en Luĉica...

Marija eksentis ardan ruĝon.

Karulino, sidiĝu ĉi tie apud mi, jen tiel, nun estas bone!... Jes, kara mia, mi ne venadis ofte al Luĉica antaŭe. Sed nun, depost la rompiĝo de mia boato lastan vintron, mi ekkonis bonajn homojn... Jen, la lito, sur kiu mi preskaŭ mortis...

—Ho, Mato, ne permesu al mi rememori tiujn tagojn!

—Karulino, nek patrino nek fratino, se mi havus ŝin, flegus min tiel pacience kiel vi...

—Marija, aŭskultu al mi! Se ne okazus tiu malfeliĉo...

La tuta korpo de la knabino ekskuis. Mato prenis ŝian manon. Kaj lia, kaj ŝia, ambaŭ manoj tremetis.

—Marija...

La knabinon trafluis eksterordinaraj skusentoj. Per siaj nigraj brilaj okuloj ŝi ĉarme kaj intime ekkaresis la belan kaj vervan vizaĝon de Mato.

—Kara Marija, ja, kion diri? Vi mem scias, jes, karulino, vi certe scias; mi venas ĉi tien en vian domon, mi dezirus, sed vi...

—Mato!

—Jes, karulino, mi tute hontas, ĉar mi ankoraŭ nenion diris al vi!

La knabino premis lian manon apenaŭ senteble.

—Trezoro mia, estas malfacile, sed tion diri al vi, mi devas, ĉar jam tempas: jes, Marija mi venadas al Luĉica nur pro vi...

Marija verve rigardis al liaj okuloj. La vortoj de Mato dolĉe dormigis ŝian koron; torento da amdoloro kunfluis en ŝian animon. Tremetis la malsekaj lipoj, kaj en ŝian karan vizaĝon abrupte enfluis sango, febre ardigante ĝin, vastiĝante tra la plenforma kolo ĝis la luksoaspekta brusto, kiu dolore ŝveliĝis pro la fortaj korbatoj.

—Karulino amata, mi devas diri, ja, mia koro krevas, mi mem ne scias pro kio; jes, Marija, sciu, ke vi estas pli kara al mi ol la suno kaj mia sano. Marija, kiel vivi sen vi? Jes, kara mia ununura, se vi ne ŝatus min kiel edzon, mi bedaŭrus, ke mi ne dronis, mi dezirus...

—Mato, ĉu vi ne timas Dion? — elspiris la knabino, kaj ŝiaj jam malsekaj okuloj pleniĝis per abundaj larmoj. Ŝi ekstremis tuta. Laŭ ŝia vizaĝo traflugis brilo.

Mato tenere altiris ŝin al si, li ĉirkaŭzonis per sia dekstra brako ŝian fleksosveltan korpon.

—Marija, estu mia edzino!

—Mato!

—Ĉu vi ne simpatias min?

—Jes... vin, — suspiris la knabino rigardante al li, ŝi sinkis sur liaj genuoj en dolĉa senzorgo.

Mato fleksis ŝin al sia brusto, metis la manojn sur ŝia arda frunto, klinis ŝian kapon iom nuken kaj kisis ŝin al la varmaj ŝvelaj lipoj.

La floranta korpo de Marija tremetis en lia brakumo. Ŝi apogis sian kapon al lia fortika ŝultro kaj ambaŭ silentis ...

—Marija, vi do amas min? — ekdemandis Mato per trem-raŭka voĉo.

La knabino levis sian kapon, ŝi rigardis al li tra la larmoj, ŝi dolĉe ekridetis kaj elbuŝigis mallaŭte:

—Jes, mi ĉiam pensas pri vi.

Mato kisis ŝian karan vizaĝon kaj verve brakumis ŝin...

La feliĉuloj ektemis kaj embarasitaj ekrigardis al la pordo de la kuirejo.

Ili ekaŭdis mornan kaj basan suspiron, kvazaŭ oni disŝirus ies koron per malakra tranĉilo, kaj ĝi mortante ekĝemis.

—Kiu estis en la kuirejo? — demandis Mato.

—Mi ne scias. Ĉu vi ne aŭdis paŝbatojn?

—Mi aŭdis. Ŝajnas al mi, ke iu ekĝemis kaj dentogrincis, kaj tiam elkuris el la kuirejo.

—Eble estis Antonio, — Marija diris mallaŭte kaj timeme.

—Antonio!?

—Jes, Antonio. Li estas vera strangulo; multfoje mia sango glaciigis en la koro, dum li rigardas min iel malserene kaj kolere, sed mi scias, ke li estas bona kiel pano.

—Li kaŝe aŭskultis nin... Mirindega konduto.

—La povrulo!

—Ĉu ne, ke li estas trovito?

—Jes, la trovito.

—Mi kompatas, ke li neniun parencon havas en la tuta mondo.

—Li havas nin, ni zorgas pri li kiel pri nia familiano. Nu ni ne kulpas, ke li estas tiel ĉifonita kaj hirta; ni proponas vane al li pli bonan vestaĵon, sed li neniel volas preni ĝin. Antonio estas bonanima; li saltus eĉ en la maron pro mi aŭ pro mia frato Marko.

—Sed kie estas via frato, Marija?

—Certe surstrate antaŭ la poŝtoficejo. Tagmeze li certe venos. Ankaŭ la meso tiam finiĝos.

—Marija, hodiaŭ mi devas ion diri al viaj gepatroj, ja ankaŭ vi tion deziras?

—Mato, ne diru! — Marija rapidis subtile por defendi sin.

—Ja, kiel ni povas geedziĝi sen scio de la viaj?

—Jes, sed...

—Nu, kio okazas kun vi, Marija? Ĉu vi ne volas, ke mi parolu kun via patro?

—Parolu, sed sen mia ĉeesto, — ekridetis la knabino kaj ŝiaj okuloj malklariĝis.

—Nu, estu tiel! Ho, Marija, vi ne konjektas kiom mi estas feliĉa! Ĉu vi volos iri al Jelenŝĉica?

La knabino riproĉis lin per ĝoja rigardo, kvazaŭ dirante: Ja, kial vi eĉ demandas min?

Tiam ili ekstaris, ili alproksimiĝis al la malfermita fenestro. Marija brakumis la kolon de Mato kaj apogis sian kapon sur lian ŝultron. Nenion parolantaj ili rigardis al la blua maro. La suna oro transverŝis sin sur la trankvilan surfacon, sur la rokan bordon, laŭ la maĵoranoj kaj bazilioj sur la fenestro kaj laŭ iliaj ĉarmaj kapoj.

—Kara Marija, rigardu la maron! Jes vi, karulino mia, se ĝi estus ĉiam tiel trankvila, mi nun ne starus apud vi, — suflo-ris Mato karesante ŝian nigran kaj delikatan hararon.

—Tio estas vero, Mato, — ekridetis la knabino kaj pli firme ĉirkaŭbrakis lin, timante, ke ŝi povus perdi lin.

Ĉimomente aŭdiĝis el la kuirejo:

—Ho ve, kiam ni hodiaŭ tagmanĝos? Kien ŝi, pro Dio, for-iris? La fajro tute estingiĝis!

Marija ekrigardis Maton kaj dampe elbuŝiĝis:

—Ho, mi forgesis pri la tagmanĝo! Ho ve, kion la patrino diros?

—Marija, Marija, ja kie vi estas, ho, neniam mizera estu, kie vi estas, — vokis Jela.

Mato kaj la knabino montriĝis ĉe la pordo. Jela surpriziĝis.

—Jen ni! Mi kulpas pri ĉio!

—Ho, vi estas ĉi tie!? Sed kiam vi venis? Ve, mia fajro! Marija, kial vi ne zorgis iom? Ho, juneco, juneco!

La vangoj de Marija ardis; ŝi ne sciis, kien rigardi.

—Mi zorgis, sed la lignoj ne taŭgas, — diris la knabino embarasite.

—Kial vi eksplikas! Ke la lignoj ne taŭgas? Ili estas sekaj, kiel miaj ostoj. Sed, kiel vi, Mato, fartas? Ho, kiel varme estis en la preĝejo! Estas domaĝe, ke vi ne estis ĉe la sankta meso! La sinjoro paroĥestro diris al ni multajn belajn vortojn, kaj li ĉiam parolas kaj klarigas; kaj, ĉu vi opinias, ke la homoj estos pro tio iom pli bonaj? Jen, eĉ ne en unu poto bolas akvo! Mato, ĉu vi jam vidis mian filon? Jes, jes, hieraŭ vespere li venis. Ankaŭ pri vi ni esperis. Ho, pafilo ne mortigu lin!

—Kiun, Jela? — demandis Mato.

—Mian filon, mian Markon.

—Ja kial?

—Mi ĉiam bedaŭros, ke li ne estas nia paroĥestro. Jes, ankaŭ vin ni atendis, kaj pro tio ni prenis ankaŭ iom da bona viando, kaj nun jen, ĉio ankoraŭ estas kruda. Kion ni povas nun? Iom pacienca vi estu, se vi estas malsata.

—Ho, pri mi estas facile! Unu horon pli- aŭ malpli frue, estas egale, — respondis Mato ridetante.

—Marija, vi estas ruĝa kiel omaro. Mato, Mato, vi ion flustris en ŝian orelon! — diris Jela rigardante al la junulo, kvazaŭ volante diri: Jes, vi opinias, ke vi povas ruzi kontraŭ mi kaj trompi min!

— Ne mi, Jela, eĉ unu vorton mi ne diris.

—He, eĉ se jes! Vi estas juna kaj sana, pro tio vi ne pereigis vian animon!

—Nu, kial ni nun muelas ĉiaĵojn! Vi, Jela, preparu la tagmanĝon por ni, kaj se vi pravas, ke mi ion flustris al Marija, ni parolos pri tio post la tagmanĝo.

—Mato! — riproĉis lin Marija.

—Bone, bele, kvazaŭ ŝtelisto, kiam patrino ne estas hejme! Tiel do, Mato, tiel? Kaj jen ŝi, tiu ĉi sanktulino! — ŝercis Jela alkoksinginte siajn manojn.

—Nek mi estas sanktulino, nek Mato ŝtelisto estas! Komprenu, panjo! — diris Marija ridante sonore.

—Vi kara Jela scias laŭ vi mem, ke ekzistas aferoj, kiujn oni povas anonci nur kvar-okule.

—Ho, kiel vi Mato estas saĝa kaj sprita! Ĉu vi opinias, ke mi neniam estis juna. Kредu al mi, mi eĉ nun ne kun ĉiu kompareblas. En nia regiono ne ekzistas plu sango kia tiam, kiam mi estis tiom jaraĝa kiom Marija nun estas. Jes, jes, tiam la knabinoj kvazaŭ estis el siliko. Kiam ili edziniĝis, ili ne velkis jam post duono de jaro. Ĉio, ĉio iel renversiĝis en la mondo. Se nun virino naskas, ŝi bezonas dekkvin tagojn por elvolvi sin el la lito, dum al mi sufiĉis nur du tagoj da postakuŝa ripozo; niaj maristoj kaj la soldataro ĉion venenigis! Ja kiam okazis en tiamaj tempoj en niaj regionoj, ke iu havus flikitan haŭton sur la kolo? Ho, Dio kara, kio fariĝos el tiu ĉi mondo? Neniam, jes...

—Panjo, ni tagmanĝos krepuske! — Marija interrompis ŝian parolon.

—Jes, karulino, vi pravas! Nu, nu, lasu min senĝena nun! —

diris Jela kaj komencis inciti la fajron kaj pli konvene aranĝi la potojn.

En tiu momento en la domon eniris Antun, la patro de Marija, kaj rimarkinte Maton, li salutis lin:

—Ho, Mato! Bonan tagon! Kia bono okazis?

—Malbono ne evitas nin! — Mato respondis ŝerce.

—Malbono!? — Antun ekmiris.

—Jes, ĝuste tiel! La tutan horon pli malfrue vi tagmanĝos hodiaŭ ol kutime.

—Sed ĵus min atakis malforteco.

—Dum vi preĝis al Dio en la preĝejo, Marija interparolis kun mi, kaj dum la konversacio ŝi forgesis pri la potoj.

—Ĉiuj malbonoj forpasu kune kun ĉi tiu, kara Mato. Sed, ĉu vi jam renkontiĝis kun Marko? Nun, ĝuste nun li venos hejmen. Mi renkontis lin sur la ŝoseo, kaj mi diris al li, ke li venu baldaŭ, ĉar mi opiniis, ke la tagmanĝo estas jam preta.

—Li jam iras, mi aŭdas liajn paŝbatojn, — diris Marija.

Kaj vere, antaŭ la domo aŭdiĝis grincetado de sinjorecaj ŝuoj.

Altstatura, ĉarma junulo haste enpaŝis en la kuirejon

—Ho, ho! Ŝajnas al mi, ke la tagmanĝo ankoraŭ ne... ho jen! Ĉu estas vi, Mato? Jes, jes, laŭ la priskribo de mia fratino, plejble estas vi. Kiel vi fartas, kara amiko? Mi prenu vian manon! — Marko salutis la junan mariston.

—Jes, sinjoro, mi estas: Mato Bartoliĉ. Vi jam scias mian nomon.

—Ho jes. Multajn rakontojn mi jam aŭdis pri vi dum tiu mallonga tempo de mia restado hejme, oni diris, ke vi estis atendata hodiaŭ.

—Kion fari? Hodiaŭ estas dimanĉo! Nenio grava estis far-

enda hejme, kaj mi ekiris laŭ la ŝoseo direkte al Luĉica. Ja en tiu ĉi domo mi sentas min kvazaŭ en mia domo, kaj ne estus dece, se mi ne vizitus viajn gepatrojn kelkatempe.

—Ĉu neniun alian pli? — aldonis Marko ridetante kaj akcentante ĉiun vorton.

Mato ĵetis rigardon al Marija, kaj kiam li rimarkis ŝin ruĝiĝanta, li ruĝiĝis same.

—Marko, vi ĉiam emas paroli vantaĵojn! — riproĉis lin lia patro.

—Ne koncernas vin pro kio Mato vizitas nin! — ekŝercis Marija mallaŭte.

—Marko, hontu iom! Ne koncernu vin pri tio, kio ne rilatas al vi! Vi persiste klopodas inciti Marijan kaj tiklas ŝin senĉese, de kiam vi venis hejmen, — diris Jela ridetante.

—Li ŝercu iom! Bele estas, kiam la sinjoroj estas bonhumoraj, — mansvingis Mato.

—Mato, jen, li baldaŭ fariĝos nia kuracisto, — Antun aplombe fieris, montrante permane al la filo.

—Sinjoro Marko certe ne restos en Luĉica. Ja kion fari ĉi tie? En la tuta Luĉica ne ekzistas pli ol kvin malsanuloj! — ridetis Mato.

—Ho, kia utilo de li!? — ekkriis Jela kaj afable rigardis al sia filo.

—Aŭskultu, Marko, aŭskultu! Nia panjo ĉiam ion kontraŭas al kuracistoj, — aldonis Marija.

—He, tio estas malnovaj paroloj! Ŝi volus aŭdi min prediki al la luĉicanoj; sed mi ne scius kion! Ĉu mi pravas, kara panjo?

—Filĉjo, vi prave parolas! Mi eĉ mian vidpovon ŝanĝedonus por tio! Sed nun, mi povra maljunulino, kion povas fari?

Se tiel okazis, estu tiel pro la gloro de Dio! Ja, ĉu tiel aŭ aliel, egale mallonge daŭras. Jes, jes, nur ĝis la tombo. Ĉio rapide forpasas; la juneco, la fiereco kaj la sano!

—Nu, nu, oldunjo, formetu tiujn babilojn! Ili estas kvazaŭ antaŭ-pasintjara burasko! Ni hodiaŭ tagmanĝos kiel alta sinjoraro! Mi malsatiĝis kiel lupoj! — plendis la maljuna Antun.

—Envenu la ĉambron, tuj ĝi pretiĝos. Vi, oldulo, alportu vinon; la pli bonan vi prenu.

Antun deprenis de sur la bretaro grandan argilan kruĉon, li levis pordon ĉe la planko, kaj li descendis en la kelon laŭ la kruta rondŝtuparo. El la kelaperturo frapis humida aero odoranta je vino, je peklitaj rapoj kaj saŭkraŭtoj, je malnovaj vazoj kaj bareloj.

—Terura varmo surpremis nin! Plejbone estus tagmanĝi en la kelo. Kaj nun, ek al la tablo, kara amiko! Jen, ni ankoraŭ ne tagmanĝis kune! — ĝojkriis Marko, kaj preninte la manon de Mato, li pelis lin en la ĉambron.

—Se ne ĝis nun, ek de nun ni pli ofte tagmanĝos! — diris Mato svingante alte per la mano.

Iom poste Marija kaj Jela plenigis la telerojn per la supo, kaj ĉiuj sidiĝis al la tablo. La ruĝa vino gaje respeguliĝis en granda botelo; vaporo de la varma supo leviĝis trankvile al la plafono de la ĉambro. La viroj demetis siajn jakojn.

—Sinjoro Marko, vi pardonos, — senkulpigis sin Mato, ĵetinte sian jakon sur la liton.

—Ja, ne zorgu! Jen mi; unu, du, tri, nun estas bone! — elspiris Mato deĵetinte la jakon, la veŝton, la kolumon kaj la brakumojn sur la liton.

Marko denove sidiĝis, allokiĝis, kaj dolĉe ekmanĝis.

—Filĉjo, ĉu vi ne hontas? — riproĉis lin la patrino.

—Kial?

—Ja vi komencis manĝi, sed vi eĉ ne krucosignis vin!

—Jes, vi pravas, panjo, — diris Marko kaj krucosignis sin.

—Sciu, en grandaj urboj oni al kutimiĝas al ĉiaj malbonoj. Jen, en Vieno ne estas tia kutimo.

—Mi ne sciis, ke en Vieno estas senkreduloj, — skuis Jela per siaj ŝultroj.

—Ĉu senkreduloj? — Antun primokis sian edzinon.

—Ja, eĉ pli malbonaj ol senkreduloj! — refutis lin la maljunulino.

Marko tordis supren la manikojn de sia ĉemizo, kaj ne plu aŭskultis la vortojn de sia patrino. Li estis tre ĉarma junulo, ĉirkaŭ dudekkvin-jara. La dekoltita, fortika kaj blankhaŭta kolo super la larĝa brusto, iom pli malhela haŭtkoloro de la sana vizaĝo kaj liaj gajaj nigraj okuloj, ĉio atestis, ke Marko posedas tenacan kaj kiel siliko fortikan kompleksion. Li manĝis, kiel manĝas sanaj kaj malsataj junaj homoj. Li rigardis al la fratino kaj al Mato per siaj brilaj okuloj, kiuj permanente radiis gajan mienon. Li estas eksterordinare ĝoja kaj kontenta en tiu ĉi malgranda ĉambreto, en tiu ĉi modesta marista domo kiu respeguliĝis en la kalma maro de sur la imponaj klifoj.

—Marko, ĉu vi ŝatus pli de la supo? — Jela demandis sian filon.

—Jes, enverŝu pli, ĉar tian mi ne manĝas ĉiutage en Vieno.

—Sed, kara filĉjo, kiu kredus, ke tie kie vivas nia imperiestro, povas vivi ankaŭ la filo de la maristo Ŝabariĉ, — kapbalancis Jela.

—Sed mi ne manĝas kun la imperiestro! Kредu min: la supo en Vieno estas vera postlavaĵo. Kaj ĉu vi opinias, ke oni tie

plenigas poton per rizo kiel ĉe ni? Jes, oni preskaŭ laciĝas kaptante kelkajn grajnoj, kiuj sur ĝi flosas kvazaŭ vermoj.

—Sinjoro Marko, ĉu en Vieno ekzistas pli da domoj ol en Triesto? — demandis Mato.

—Dekoble pli, dekoble!

—Ho, kion ni povra?! Mi naskiĝis en Luĉica kaj mi mortos ĉi tie vidinte nenion krom ĝis Rijeka, — suspirante aldonis Jela.

—Nu, aŭskultu min filĉjo, vi tamen ne vidis ĉion! Mi estis en Londono tri fojojn! Ĝi estas urbego, kara mia! Jes, kiel de ĉi tie ĝis Rijeka, ĉie domoj apud domoj, ĝis senfino, — Antun mansvingis tien kaj reen ĉiudirekten. — Ho, sufiĉan nombron da urboj mi vidis, kvindekon certe!

—Sed aŭskultu, Londra (Londono) estas ĉemara urbo, dum Vieno ne havas marhavenon. Mi ne povus vivi en senmara urbo, — asertis Mato.

—Al ni la sinjoro paroĥestro parolis, ke ekzistas grandaj urboj en la nova mondoparto, nu kiel ĝi nomiĝas? — demandis Marija embarase.

—Ameriko, — instruis ŝin la frato.

—Jes, jes, Meriko, — asertis Jela.

—Ĝi estas granda lando, tiu Ameriko; tie vivas ankaŭ tute nigraj homoj, — rakontis Antun al sia edzino.

—Ve, Dio savu nin kontraŭ ili! — aldonis Jela krucosignante sin.

—Kial vi krucosignas vin, ja ankaŭ ili estas same bonaj kiel ni! — sciigis ŝin Antun trankvile. —La ŝipestro ofte parolis al ni, ke ekzistas landoj, kie tiaj nigraj homoj manĝas nin blankulojn, sed mi ne kredas al tio, ĉar mi scias, ke la sinjoraro ofte ŝerce kredigas povrulojn pri ĉiaĵoj. Kiel vi opinias, Mato?

—Mi ne scias kion diri! — la junulo skuigis la ŝultrojn.

—Enmonde ekzistas ĉiaj malbonaĵoj! — elspiris Jela.

—Ekzistas ankaŭ bonaĵoj, kara panjo! — korektis ŝin Marko.

—Ĉiel, Jela? Iuj penas perkape, aliaj per remiloj. Sed, mi opinias, ke ne estas agrable strabi al libroj, — diris Mato.

—Ja vi falis sur la kapon! Ĉu vi opinias, ke nia Marko ĉiam nur al libroj strabas? — demandas Antun ridetante. —Ĉu vi ne konas ĉiajn amuzojn en grandaj urboj; la muzikojn, la dancaĵojn, la teatrojn, la ...

—La teatrojn, la prezentejojn, — korektis Marko la patron.

—Sed, kio denove estas tiu teatro? — demandis Jela rigardante sian filon, timante, ke tio estas ankaŭ malbono.

—Ja, mi jam dekfoje parolis al vi, ke en Rijeka estas granda domo, — diris Marija. —La pasintan jaron mi mem troviĝis sub ĝia tegmento. Kelkaj homoj parolis antaŭ aliaj aŭskultantoj kiuj sidis en etaj ĉambretoj triope aŭ pli, kvazaŭ teleroj sur la bretoj. Tiuj antaŭe kverelis kaj mortigadis inter si. Ankaŭ malsupre meze de la domo sidis trankvile multaj homoj, nur kelkfoje ili kriis kaj frapadis per polmoj al polmoj.

Marko atente kaj serioze aŭskultis la vortojn de sia fratino.

—Sed, ĉu vi komprenis tiujn homojn, kial ili kverelis? — demandis Mato. —Kun kiu vi estis en tiu domo?

—La negocisto Stipe kondukis min kun nia najbarino. Mi komprenis eĉ ne unu vorton, ĉar ili parolis itallingve.

—Ja, kial ili ne parolis kroate? — demandis Jela mirante.

—Se ili parolus kroate, ĉiuj rijekanoj komprenus ilin. Mi vizitas Rijekon ĉiusemajne. Mi rilatas kun multnombra popolo, kaj ĉiuj komprenas min parolantan nian lingvon, — eldiris Mato.

—Por sinjoroj konvenas la itala lingvo, dum la kroata estas por ni malriĉuloj, — mansvingis Antun.

—Kial? — demandis Marko skuiĝinte malagrabla.

—Kiu povus tion scii! La sinjoro paroĥestro diras, ke nia lingvo taŭgas same kiel ĉiu alia, eĉ pli bela ol multaj aliaj, dum la urbestro diras, ke nia lingvo estas por tiuj kiuj paŝtadas kaprinojn, — rediras Antun.

—Kara paĉjo, alportu botelon da vino, kaj forlasu politikon; tiuj aferoj ne koncernas vin.

—Kion li ja scias pri la politiko! — aldonis Jela ridetante.

—Silentu, maljunulino, ne implikiĝu en la virajn aferojn, sed alportu iom da nigra kafo. Ĝi ne malutilos post ĉi tiuj fiŝoj.

Tiel ŝercante kaj parolante, finiĝis la tagmanĝo. Kiam Jela alportis kafon, Marko diris al sia fratino:

—Marija, mi petas, riardu, ĉu mi havas cigaron en la jako.

—Eĉ ne unu vi havas, — respondis la knabino traserĉinte ĉiujn poŝojn de la jako.

—Mi havis kelkajn, sed mi forfumis ilin dumvoje, — plendis Mato, ke li ne povas regali sinjoron Markon.

—Sendu iun al butiko por alporti kelkajn; ja kie estas Antonio? He, Antonio! — ekvokis Marko.

—Li ne estas hejme, — diris Marija embarase rigardante al Mato.

—Kien li devojiĝis? — demandis Antun.

—De frumatene mi ne vidis lin. Probable li kaptas fiŝojn, — respondis Jela.

—Mato, vi konas lin? Ho, li estas bonanima homo! — diras Marko.

—Mi konas, sed iel strang-kondata li aspektas.

—Jes, strang-kondata; foje pasas po du tagoj ĝis li elbuŝi-

gas vorton, kaj lastatempe li daŭre estas pli kaj pli malgaja kaj silentema. Dio scias, kio kirliĝas en lia kapo, — diris Jela svingante per sia kapo.

Marija eliris el la domo por aĉeti cigarojn. Ĉiuj en la ĉambreto silentiĝis. Post ioma paŭzo la silenton interrompis Antun, kiu demandis Maton:

—Ĉu vi ekiros hejmen antaŭ la vespero?

—Jes, jes, post ioma friskiĝo, — respondis Mato kaj tiam li ekpensiĝis.

La junulo intencis ion diri, sed li ne povis pro ekcitiĝo, kiu evidente kreskis sur lia vizaĝo.

—La sunvarmego bruligis vin hodiaŭ, — diris Jela, — nu, ni amikiĝis, kaj vi promesis post la akcidento, ke vi kelkiam vizitos nin.

—Mato ne ekirus al Luĉica dum tia varmego, se lian koron ne logus bela junulino en nia loko! Ĉu jes, ke mi trafis? — diris Marko ridetante.

—Iel simile, jes, — elbalbutis Mato, kaj lia bela vizaĝo ruĝiĝis.

—Nu, diru al mi ŝian nomon, kaj mi amike konsilos kaj instruos vin. Nu, Mato, ke ni aŭdu! Se vi deziras, mi svatos por vi kaj mi kun ŝia patro pretigos vian gefianĉiĝon.

—Sinjoro Marko, vi facile parolas, sed mi ...! Vi ne oferos multajn paŝojn por trovi tiun, pro kiu mi venadas al Luĉica. Nu, aŭskultu, kial heziti se ni troviĝas nun ĉe la temo? Vi deziras, ke mi diru, kio premas mian koron...

Ĉiuj eksilentis, dum Mato daŭrigis per necerta voĉo:

—Kara mia amiko Antun, vi..., — sed li ne findiris, ĉar la vorto haltis en la gorgo.

—Ek, Mato, vi malpeziĝos! — kuraĝigis lin Marko.

—Antun, pardonu al mi, ke mi nomas vin amiko. Mi tiel ne rajtas, ĉar vi povus esti mia bopatro. Vi scias...

—Mato, mi aŭskultas vin, — diris Antun post longa atendo, rigardante tra la fenestro.

—Vere dirite, aŭskultu, mi volus, ke vi donu vian Marijan al mi kiel edzinon. Mi esperas, ke vi ne kontraŭos; mi estas juna, ankaŭ sub propra tegmento, kvankam mi spertis akcidenton ĉi-vintre, tamen mi ne devas vagi ĉirkaŭ alies sojloj. Mia patrino maljuniĝis kaj malfortiĝis, en la hejmo estas bezonataj junaj muskoloj, kaj via Marija al mia koro alkroĉiĝis.

—Mato, mi vidas, ke vi destiniĝis unu al la alia! Bone, mi ĝojas elkore kaj ĉian feliĉon mi deziras al vi. Vi pridiskutu kun Marija pri tio, kaj se ŝi konsentos, Dio donu, ke tiu ĉi momento estu feliĉiga! — elbuŝigis Antun turninte sin al la maro, por ke iu ne rimarku liajn malklariĝintajn okulojn.

—Mato, kvazaŭ vi ambaŭ naskiĝis unu por la alia! Vi estas junaj kaj sanaj; laboru kaj ŝparu kaj ne mankos pankrusto al vi. Mi ne volas laŭdi min, sed ĉiu patrino estus fiera pri mia Marija. Vi, Mato estas saĝa kaj laborema, iom da havaĵo vi havas, ankaŭ al Marija ni donos iom, kiom ni povas. Ŝi ne foriros el nia domo kvazaŭ orfo, ja ni ne estas malriĉaj kiel preĝejaj musoj! — finis Jela viŝante la larmojn per la antaŭtuko.

Ĉimomente Marija surpaŝis trans la sojlon, portanta cigarojn enmane. Ŝi ekrigardis al la frato kaj li per grava mieno ekridetis al ŝi. La mokrideto de Marko, la silento en la ĉambro kaj embaraso sur la vizaĝoj de ĉiuj, alforĝis ŝin al la sojlo; tiel surprizita ŝi restis tie kun la malsupren klinita kapo.

—Marija, — Jela elbuŝigis, — ĵus ni parolis pri vi.

La ĉarma knabino ruĝiĝis kole kaj la vange ĝis la nigra kaj brila hararo. Ŝi rigardis teren.

—Mato volas, ke vi estu lia edzino, kaj se vi konsentas, ni ankaŭ konsentos, — diris ŝia patro. —Nu, Marija, ne hontu! Vi ne estas infano plu, venu pli proksimen!

—Panjo! — ekĝemis la knabino, kaj proksimiĝinte al la lito, ŝi apogis sin al ĝi kaj tie kaŝis sian vizaĝon.

Marko saltopaŝis al la fratino, li kaptis ŝian kapon per siaj ambaŭ manoj kaj perforte movigis ŝin for la lito. Marija tiam kaŝis la vizaĝon per siaj manoj, sed Marko forigante ŝiajn manojn ekdemandis:

—Nu, karulino, ĉu vi amas lin aŭ ne?

—Marko, Marko? — Marija petis, sed ŝia voĉo ĝoje tremetis.

—Ĉu jes, aŭ ne?

—Lasu ŝin! — minaceti la patrino.

Mato alpaŝis al la junulino, kaj preninte ŝian manon, li dolĉavoĉe demandis:

—Kara Marija, diru, trankviligu nin ĉiujn, diru al mi, ĉu vi volas iri kun mi al Jelenŝĉica?

Marija diris nenion, sed ŝi tenere svingiĝis al lia brakumo kaj enŝovis sian kapon en lian sinon. La okuloj de Mato ĝoje brilis sentante ŝian varmetan elspiron ĉe lia brakumo. La elspiro hejtis lian rapide pulsantan koron, kiu ne povis trankviliĝi kaj mildiĝi. El la okuloj de Jela ekŝtormis torento da larmoj, vidante sian filinon en la brakumo de la viro, kiu sin kope malvarma kuŝis en ĉi tiu lito antaŭ ok monatoj.

—Estu feliĉaj! — singultis Jela. —Vi ne ekkonu malbonaĵojn kaj dolorojn! Dio benu vin kaj donu sian gracon por la sano kaj la honesto!

Dum Jela parolis, Marko enverŝis la ruĝan vinon en la glasojn. Al la ĉarma junulo, kun nudigita brusto, la vizaĝo iom ruĝiĝis kaj la okuloj ĝoje brilvibris sub la densaj brovoj. Marko levis la glason supren, skuis sian ĉarman kapon por tiamaniere alĝustigi la suprajn buklojn de sia nigra hararo, kiuondiĝis belaspekte. Li alte tenis la glason, soleneco transversiĝis sur la vizaĝo. La larĝa maniko de lia blanka ĉemizo sinkis sub la kubuton, dum lia forta nuda brako, ŝajne, verŝos en ĉi tiun ĉambreton la tutan feliĉon de la vasta universo.

—La glasojn enmanen! — Marko ekkriis, kaj kiam ĉiuj obeis lin, li per sia forta kaj sonora voĉo ekklamis: — Gratulon al Marija kaj Mato!

La glasoj ektintis. La maljuna Antun ridetis kaj viŝis la larmojn de sur sia sulkiĝinta vizaĝo.

—Ke mi kisu vin, franjo kara, — diris Marko kaj surpremis ardan kison unue al la lipoj, kaj poste li kisadis ŝin ĉe la vangoj, ĉe la frunto kaj kie ajn li povis, ĉar la fratino klopodis ŝirmi sin per siaj manoj.

—Marko, kial vi tiel bonhumoriĝis? — demandis lin la patrino.

—Bonhumoriĝis! Ja, en mi bolas cent vivoj! Vidante vin ĉiujn tiel feliĉaj, tio ĉi ĝojigas min.

—Sed, ĉu ankaŭ vi iun serĉis en la vasta mondo? — aldonis Jela. — Ho, vi estas sinjoro, la via vestos sin per pluŝo kaj silko, sed ne en tia ĉi robo! Eĉ pli, ŝi surhavas ĉapeleton, kvaŝaŭ Bodolinoj (insulaninoj en Venecio). Ankaŭ sunombrelon, por ke ŝin la suno ne bruligu. Ĉu vi venigos ŝin al ni en Luĉican, ke ŝi ellernu de sia bopatrino kiel kreskigi fazeolojn kaj terpomojn?

—Ankoraŭ sufiĉan tempon mi havas por tio, kara panjo, — Marko respondis enpensiginta.

— Kiam li fariĝos kuracisto, li facile trovos edzinon! Sufiĉe da ili estas troveblaj en la vasta mondo, — rimarkis la patro.

La saman nokton ĉirkaŭ la dekunua horo altstatura viro promenadis laŭ la imperiestra ŝoseo, ĝuste apud la deklivo sur kiu la nobelo Saletti konstruis sian domon. La nokta promenanto haltadis kaj aŭskultis ĉu io aŭdeblus el la arbaro, kiu sterniĝas de la ŝoseo ĝis la montopinto. La promenanto haltis kaj turnis sin al la arbaro. Tra la arbustraro traŝoviĝas iu kvazaŭ nutraĵon serĉanta nokta besto. Tuj poste el la arbaro transsaltis la fosajon sur la ŝoseon fortika malalta viro.

—Antonio, — flustris Marko, — ĉu ŝi atendas min?

—Jes, ŝi atendas.

—Mi ne vidis vin de hieraŭ, ĉu vi transdonis mian leteron?

—Jes, hieraŭ vespere.

—Ĉu ŝi ne donis leteron por mi?

—Ne.

—Antonio, koran dankon! Preskaŭ unu jaron mi ne vidis ŝin. Sen via helpo mi neniam povus paroli kun ŝi. Dankon! — Marko diris kaj prenis lian dekstran manon kaj firme premis ĝin.

—Iru, ŝi atendas. Vi amas ŝin?

—Jes, mi amas. Vi estas feliĉa nescianta la signifon de tiu ĉi vorto.

—Mi!? — Antonio malklare elbuŝigis.

—Jes, vi ne scias...

—Ankaŭ mi estas homo.

—Kompreneble, kiel ĉiu alia.

—Ne, mi ne estas homo; ĉiu ajn libervole povas mortigi min. Mi ne estas homo.

—Ja, kiu do vi estas?

—Aliaj havas gepatrojn. Sed mi ne havas. Oni trovis min, aŭskultu, trovito mi estas, — Antonio elpremis teruran voĉon.

—Kio okazas kun vi hodiaŭ, Antonio? — Marko demandis kaj retiriĝis abrupte unu paŝon. Malkomforto sieĝis lin, vidinte antaŭ si la ekscititajn okulojn de Antonio.

—Ekiru, ŝi atendas vin.

—Silentu, iu venas.

—Neniu iras.

—Antonio, mi iros tien tra la arbareto, dum vi iru ĉirkaŭe, samkiel pasintjare.

—Jes.

—Gardu, ke iu ne surprizu min.

—Mi gardos, sed vi pardonu al mi, — Antonio elbuŝigis per petanta voĉo.

—Pardoni? Pro kio?

—Vi timiĝis pro mi. Pardonu. Min bruldoloras ĉi tie, — li diris kaj metis sian manon ĉe la koron.

—Vi parolos pri tio venontokaze. Ni ekiru!

Ili disiĝis. Marko tragrimpis la arbareton ĝis la muro, kiu ĉirkaŭas la ebenaĵon antaŭ la domo de Saletti. Li transsaltis la muron kaj iris laŭrande de la ebenaĵo en alian arbareton for de la domo je centoj da paŝoj. En la arbareto disiĝas la vojejoj kvazaŭ reto. Estas jam noktomezo. Marko iris laŭ streta vojeto kaj subite haltis. Antaŭ li ekblankis io simila al homa vizaĝo. Marko alkuris, li disiĝis siajn brakojn kaj elflustris: — Elvira! — Li altiris brusten la sveltan kaj junan virinon.

V

La maljuna nobelo Saletti estis tre severa, ŝparema kaj riĉaĵavida homo. En lia domo oni ne ŝiris panon senlabore. Ĉiuj servistoj ĉiam estis okupitaj per senĉesa laboro, krom Lovro kaj Luko, kiuj, per preteksto kutimis vagi en Luĉican, por ekscii ion pri Marija de Ŝabariĉ. La servistoj senĉese spionis la junan knabinon, klopodante sciigi, kie ŝi iras; singarde kaj ruze ili demandadis bonintencajn homojn en espero, ke ili tamen ion priflaros, per kio ili povus trankviligi sian mastron. Ili tutkorpe sentis jukon pro granda kaj blinda senpacienco, tial ili plej baldaŭ intencis plenumi la teruran taskon, kaj akiri la promesitan premion.

Alfredo tute ne dubis pri la plenumo de la intenco, ĉar li plene fidis la lerton kaj fidelon de siaj servistoj. Ĉu li, Alfredo Saletti, jes, Saletti, la nobelo, riĉa kaj sciplena, multon sperinta, ĉu li, kiu triumfis tiomajn gravajn venkojn eksterlande, ĉu nun li elprovu ŝancokonspiron en tiu bagatela entrepreno? Tiuj pensoj ŝajnis ridindaj por Alfredo, kaj se ili enkapiĝus al iu alia, ili aspektus eĉ malsaĝaj.

(La servistoj Luka kaj Lovro ĉiun vesperon kuniĝadis kun Alfredo por raportoj pri la plenumo de la farendaj taskoj. La malsukcesintaj servistoj ne povis fieri, sed Alfredo instigis ilin pli kaj pli. Liajn pensojn insidis Antonio. Iun tagon li rememoris pri evento el sia knabaĝo. La krompatrino de Antonio venis kun povra kaj ĉifonita Antonio al la maljuna Saletti pe-

tante helpon, montrante lin. La maljuna Saletti forpelis ŝin el sia domo, kaj la etan Antonion li forpuŝis per piedo kontraŭ lian dorson, ke li falis sur Alfredo, kiu tie ludis. La furioza Alfredo prenis bastonon kaj frapis la kapon de Antonio, ke li eksangis.

Alfredo sopiris amon kaj belan Marijan. Li samtempe konsideris pri Antonio, kiu ĝenis liajn intencojn kaj, kiun li ĉiamaniere devis forigi. Siajn pagservulojn li urĝigis fari la taskon baldaŭ, senkonsidere pri la konsekvencoj. Intertempe Luka ŝance renkontis Jelan. Ŝi estis reveninta el la montaro, kie ŝi rikoltis, ŝanceliris portante kunligaĵon de hordeo ĝis la montopiedo kaj tie ŝi intencis ripozi. Luka aliris komencante interparolon. Li sciiĝis, ke ŝia Marija la venontan matenon ekiros al la montaro por alporti la restantan pezaĵon de la hordeo. Luka adiaŭis Jelan kaj forkuris al Alfredo. Jam noktigis. Antaŭ la palaco de Saletti Alfredo kaj Luka faris diablecajn planojn por la venonta tago sen konjekto, ke Antonio ilin aŭskultas. Li kaŭris ĉe la muro, atendante okazon por transdoni leteron de Marko al Elvira. Li tiel aŭdis la tutan teruran planon de Alfredo, kiu promesis allogan premion, se la krimago sukcesos senrimarke. Antonio sukcesis transdoni la leteron de Marko al Elvira kaj rapide forkuris al sia amiko...)

Nur duono da horo pasis ankoraŭ, kaj de sur alta promontoro disvastiĝis basa voĉo laŭ la marebenaĵo kaj ĝi fine reehis sub la klifoj de la mallumaj golfetoj.

—Antonio, ĉu vi estas tie? — revokis malklare nokta fiŝkaptisto el sub la klifoj.

—Jen mi estas ĉi tie super "La Kolonoj". Remu!

Antonio surgrimpis la kabon, sub kiu troviĝas la sablejo nomata "La Kolonoj", por de tie alkrii al la amiko Joso, kiu

kutimis tie fiŝkapti. Antonio nun komencis malsupreniri al la maro, permane firme sin tenante kaj atentante kien meti la piedon, jen unu, jen la alian. Kiam li atingis la maron, li sidiĝis sur rokon, lavita kaj ĉirkaŭmordita per ondoj, li ekrigardis al la malluma golfeto, de kiu aŭdiĝis la remilplaŭdado. La boato de Joso rampis laŭ la glata akvosurfaco al la kabo. Ambaŭflanke de la boato plaŭdis po unu remilo. La barko kun siaj remiloj aspektis en la mallumo kiel granda, nigra kaj ekzotika birdo, kiu malvigle dormeme ŝancelas super la trankvila maro, trempante en ĝin la ekstremaĵojn de siaj pezaj flugiloj.

—Antonio, kie vi estas? — Joso ekkriis, kaj direktis sin sub la kabon, ĉar li en la mallumo ne rimarkis sian amikon.

—Jen mi ĉi tie! Ankoraŭ dufoje vi remsvingu. Tiel rekte, atentu ke vi ne frapu kontraŭ la rokon!

La boateto albordiĝis kisinte la bordon per sia pruo, ĝin gratis la rokaĵo kaj la boato skuiĝis retroen pro tia malsensitiva kaj obtuza kiso. Ĉimomente Antonio ensaltis en ĝin kaj ĝi tiel intense ekluliĝis, ke la marakvo elŝprucis el sub la pufa boattrunko.

—Antonio, atentu! Mia boato ne estas draŝejo! Preskaŭ ni renversiĝis.

—Ĉu vi kaptis iom?

—Ho, ho, du, tri funtojn. Mi jam opiniis, ke vi ne venos ĉinokte, — Joso diris tranaze.

—Kien ni iros nun?

—Jen prenu la remilon! Ni iru al "la ripozejo" kie mi ĝis nun estis. Ĉe tiu klifo, vi scias, oni nomas ĝin, precipe la infanoj, "La kokino". Tie ankaŭ salvelinoj troviĝas.

—Ĉu vi Joso havas iom da logfiŝoj por "grasumi" la maron?

—Mi ne havas kaj ili ne estas bezonataj, ĉar la fiŝoj hok-
avidigis kvazaŭ ili karesmon fastis. Ĉie nurnuraj glutaviduloj!
Ho, kia utilo de la fiŝoj, se ni ne havas trinkaĵon?

—Baldaŭ ni havos vinon; la vinberoj jam moliĝas.

—Mi ja deziras ĝin. Se donos Dio, post la dekanto, mi trin-
kos propravole, ke mi stumble ruliĝos antaŭ la kelo.

—Ebriiĝo estas peko!

—Nu kelkiam, kiel sur la foirejo pasintjare diris la viro ven-
danta tolojn el Karlovac.

—Kion li diris?

—He, memorkapablan kapon mi havas! Domaĝo, ke mi ne
vizitadis lernejojn! La viro diris, ke ne estas hontinde, se oni
ebriiĝas ĉiun vlahan (fremdulan) jaron!

—Diablaĵo! Kion ja signifas por vi, tiu ĉi vlaha jaro?

—He, pri tio ankaŭ mi ne scias! Antonio, ne remu plu! Jen,
ĉi tie ni enĵetos la fiŝkaptilojn.

—Ĉu ni ne mallevos la ankron?

—Vi certe opinias; tiun ĉi truan ŝtonpecon? — diris Joso
ridante.

Vere li ne havis ankron, sed li havis ligitan grandan ŝton-
blokon je longa eluzita ŝnurego.

—Malrapide mallevu la ŝtonon, por ne fortimigi la fiŝojn,
— konsilis Antonio.

Post kiam ili ankrigis, aŭ pli korekte, ŝtonankrigis, Joso
demandis:

—Antonio, ĉu vi havas bruligilon? Mi deziras iom prifumi-
gi mian nazon.

—Mi havas kelkajn alumetojn; jen prenu!

Joso streĉis sin trans la boateto kaj etendis sian longan bran-
kon, prenis la alumetujon kaj ekbruligis la pipon. La alumet-

to ekflamis kaj prilumis la malnovan, abraziitan fiŝ-boaton, la magran kaj flavecan vizaĝon de Joso, lian tordan buŝon, la hokoidan nazon kaj iom da blua kaj kvieta maro.

—Joso, antaŭ la tagiĝo, do baldaŭ, ni surbordigos la boaton, sur la sablejon de "La Kolonoj".

—Kial? — miris Joso tenante perdente la mallongan fumingon de la pipo.

—Ĉu vi konas tiun sinjoron?

—Ĉu tiun de sur la monto super Luĉica?

—Jes tiun...

—Diru nu, Antonio!

—Morgaŭ matene Marija de Ŝabariĉ ekiros monten por alporti kunligaĵon da hordeo.

—Feliĉon al ŝi! Ŝi portu ĝin senfine! Ŝi plenigu la tutan domon per ĝi!

—La sinjoro kaj lia servisto Luka... ĉu vi konas lin?

—Jes, jes.

—Ili postsekvos ŝin monten.

—Ili nu iru! Kiel vi ja parolas? Kvazaŭ vin pikis mara erinaco.

—La sinjoro intencas malĉastigi ŝin.

—Malĉastigi?

—Jes, malĉastigi; kiel alimaniere diri?

—Malĉastigi?

—Kanajlo! Ni dronigu lin! Joso krakodiris skuiĝante ke la boato eklulis.

—Ĉu vi ekiros do kun mi?

—Kompreneble, volonte, kvazaŭ nuptofesti! Ja mi mortbattos lin!

—La maljuna Saletti vendis aŭkcie la havaĵon de via patro.

—Li estas kanajlo! Ja li aĉetis ĝin, sur ĝi mia patro servutas. Jes, mi mem ne scias kiamaniere li trompis kaj prirabis nin! Sperta ruzulo li estas! Tombo elĵetu liajn ostojn! Ho, ts! Antonio io hokiĝis, — diris Joso kaj komencis tiri la fadenon en la boaton.

Joso jen tiras, jen iom lasas, kaj li retiras, malrapide kaj atente por ne interrompi la fadenojn. Fine sur la supraĵon ekplaŭdis granda kaj larĝa salvelino. Joso levis la fiŝon en la boaton, li kunpremis ĝin per siaj genuoj, eltiris la hokon el ĝia buŝo, kaj ĵetinte ĝin al la fundo de la boato, li diris serioze:

—Ĝi pezas ses funtojn minimume! Deca manĝopeco surtable eĉ de nia sinjoro paroĥestro ĝi estus!

En la silento de la malluma golfeto nun aŭdiĝis la saltado de la fiŝo sur la malfirmaj bretetoj kiuj tegis la boatfundon. Post la trankviliĝo de la fiŝo, en la golfeto ree ekregis la sama rigida silento, kiun interrompas de temp' al tempo kvieta levo kaj mallevo de la akvo, kiu dormeme verŝis sin kaj ensorbiĝis en la fragilan kaj porozan markremon, per kiu garniĝis la rokaĵo ĝuste ĉe la marsurfaco. Aŭskultante la mallaŭtan marsuforon kaj la dampan, mildan kluk-klukadon de la akvo, oni opinius, ke ankaŭ la klifegoj suspiras en la mallumo, ke ankaŭ ili vivas, ke ankaŭ ili ĝuas la markisadon, la karesan petoladon kun la densa kaj longa musko. La glata marblua ebena lante ŝveliĝas kaj leviĝas kvazaŭ dolĉe dormiĝinta marfeino, sonĝanta pri grandaj kaj brilaj steloj, kiuj respeguliĝas de sur la ĉielvolbo en la misteraj marprofundoj, kiuj flagretas ĉirkaŭ ŝia orhara kapo.

—Joso, ankoraŭfoje ni enĵetos la fiŝkaptilojn, kaj poste ni iros al la sablejo. Vidu, tie malantaŭ la montoj jam la ĉielo heliĝas.

En kavo io ekflirtis.

—La palumoj jam vekiĝas, — ekstremis Joso, kaj daŭrigis:
—He, estas ankoraŭ nokto! La manoj jukas vin...

—Kial, Joso?

—Kion diri?... Marija estas bela knabino...

—Vi do ŝatus draŝi la sinjoron? — demandis nun Antonio per necerta voĉo.

—Ĉu vi ankaŭ?

—Mi ne scias, sed se li povus li neniigus min.

—Kian utilon li havus el tio?

—Joso, ili estas malbonaj homoj.

—Mi jam diris, dronigi lin!

—Jen, mia tranĉilo! Mi akriĝis ĝin; se ili atakos min, mi disŝiros iliajn ventrojn!

—Ĉu tiel? Tranĉ! Kaj la intestojn eksteren! — montris Joso svinganta permane laŭlonge de la ventro de Antonio, de la umbiliko ĝis la brusto.

—Joso, mi opinias ke oni rajtas defendi sin.

—Kompreneble, oni rajtas, kaj laŭleĝe kaj laŭjuste. Ankaŭ imperiestroj defendas sin, se iu atakas ilin.

—He, tie temas pri armeoj.

—Defendanta sin, oni kondutas kiel armeo! Ĉu vi vere timas tiujn fiulojn?

—Jes, liaj servistoj intencas mortigi min.

—Li havas multajn servistojn?

—Lovro kaj Luka.

—Kiu tion diris al vi? Ne kredu, Antonio! Nu, eĉ se deko da tiaj atakus vin, al ĉiuj vi frakusus iliajn kraniojn!

—Neniun mi timas, sed kiel mi defendos min, se ili sturme atakus min nepretan?

—Se estas vero, kion mi aŭdas, Antonio estu singarda! Nu, kial ili intencas mortigi vin? Kiam vi akiris malfavoron de ili?

—Mi ne scias, Joso...

—Atenton! Vi rakontis al mi antaŭ tri aŭ kvar tagoj, ke vi faligis tiun kanajlon, kaj por revenĝi, li ordonis al siaj ser-vistoj, ke ili murdu vin.

—Jes, jes, tiel iel...

—Sed, ĉu ne konvenus pli, ke ni superruzu ilin?

—Kiel?

—Se ili estus mortintaj, ili neniel povos mortigi vin...

—Joso, mi ne volas peki fatale. En tiu ĉi mondo mi ne vi-vas bone; kaj mi deziras, ke en la alia estu al mi pli bone.

—He, mi ne saĝumus tiel, ĉar ili ne estas honestaj homoj!

—Baptitaj ili estas, samkiel ni! Joso, mi ne volas, krom se ili devigos min. Homa sango ne estas hunda. Dio scias, ke mi ne prisoifas ilian sangon, kaj li juĝos al ĉiu.

—Ĝuste bonege vi hakparolas! Tiel ne scipovas eĉ nia pa-roĥestro! Antonio, vi estas admirenda homo!

—Aŭskultu, Joso! — Antonio diris post ioma silento, — per-mesu, ke mi demandu vin pri io: Ĉu vi memoras vian patri-non?

—Ne precize; mi ne plenumis la duan jaron, kiam ŝi mor-tis... Ĉu vi, Antonio, aŭdas birdflirtadon en la mallumaj roko-kavoj? — Joso demandis mallaŭte kaj krucosignis sin.

—Ĉu via patro estis en Luĉica, kiam la patrino mortis?

—Ne estis; nu, kial vi demandas min pri tio? Ĉu vi ne aŭ-

das, ke la birdoj pli intense flirtas kaj blekas? Vere, Antonio, ĉiun fojon, kiam dumnokte mi fiŝkaptas ĉi tie kaj kiam mi memore pensas pri la forpasinta patrino, la birdoj moviĝas kaj translokiĝas ĉirkaŭ la rokokavo, kvazaŭ ili ĉirpante kaj siblante plendas. Nu, diru, kial vi demandas min pri tio?

—Kial... kial? — mi ne scias...

—Mia patro estis surmare kiam la patrino oni entombigis. Tion mi klare rememoras, ĉar post la patrina forpaso, min prenis la onklino...

—La onklino Kata?

—Jes, Kata, ĉe kiu ni vivis kelkajn jarojn ĝis kiam la patro revenis de sur la maro.

—Sed kial mi troviĝis ĉe via onklino?...

—Antonio, kial vi timiĝis? Via voĉo sonas kvazaŭ ĝi venas el tombo.

—Via onklino tre karesis min; kiel mi atingis en ŝian domon?

—Jes, ŝi tre amis vin. Mi neniam forgesos la tagon, kiam ŝi alportis vin...

—El... el Triesto...

Super la golfeto, sub la mallumaj klifoj, traflugis strigeo senflirte, ĝi terure kaj revenĝe eksiblis kaj malaperis en la mallumon.

—Jes, el Triesto. Ĉu vi forgesis pri nia ludado antaŭ la domo de la onklino, sur la ŝtonaj ŝtupoj?

—Poste la aliaj infanoj primokis min, ke mi estas bastardo.

—Ne zorgu pro tio! Ja ankaŭ mi estus kvazaŭ ne havanta patrino.

—Almenaŭ la patron vi havas.

—Sed, se li estus droninta?

Antonio kaj Joso eksilentis rigardante al la fiŝkaptiloj. Tuta horo jam pasis.

Super la orientaj montoj la noktaj vualoj delikatiĝis kaj ŝiriĝis. La ĉielo nubokrispiĝis. La norda brizo descendis desur la montaro de Kastav al la maro kaj nigrigis ĝian surfacon meze de la golfo.

—Josoj, ni kunvolu la fiŝkaptilojn! Jen, jam tagiĝas.

—Laŭ via deziro.

La fiŝistoj ordigis la fiŝkaptilojn, ili enmanigis la remilojn, fiksigeis ilin ĉe la ŝanceligitaj kejlaj, kaj la barko eklulis kiel kukurbo kaj faris sulkon ĉirkaŭ la kabo. Kiam ili venis al la sablejo ili per sia tuta potenco kurbigis la malnovajn remilojn. La fiŝboato eksvingiĝis kiel sur sebo, ĝi gratis per sia fundo la ŝlimon kaj ĝi firme puŝiĝis sur la malaltan dunon.

—Eĉ duonon de ĝi ni alsabligis sur la senakvan sablon, — ĝojkriis Josoj.

—Ĝia fundo memoros ĉi tiun alsabligon!

Ili elĵetis sur la sablon kelkajn mallongajn kaj malsekajn bretetojn, kiuj kovradis la fundon de la boato. Kiam ili mem elsaltis surbordon, ili metis la mukajn bretetojn antaŭ la boaton, kaj preninte ĝin ĉiu ĉe sia flanko ili tiris la boaton sur la bretetoj je kvin paŝoj for de la maro. Tion fininte, ili prenis la bretetojn, la remilojn, la fiŝojn kaj la ankroŝnuregon, kaj ĉion ĉi ili kaŝis en groton for de la sablejo. Se ili restigus la remilojn sur la boato, certe Josoj poste ne povus trovi ĝin sur la sama loko, ĉar la infanoj kiuj kutimas ĉiutage venadi al la maro, enmarigus ĝin por amuziĝi remante sub la klifegoj.

La fiŝistoj tiam ekiris al la montaro. Antonio silente marŝis antaŭ sia amiko. Josoj, svingante per la manoj, mezuris longajn paŝojn kaj spiregis ŝvitante. Lia maldekstra kruro estis

nefleksebla, kaj la dekstra etendiĝis flanken el la genuo, kvazaŭ ĝi rompiĝus ĉe la artikolo. Dum ĉiu paŝo, lia magra kaj alta korpo, — la plej alta en la tuta Luĉica, — kliniĝis super la dekstran kokson, dum la malrekta kruro duoncirkulis antaŭen paŝanta.

Belega tago estiĝos. En la valetoj brizis freŝa matena venteto, kiu milde karesis la vizaĝojn de la fiŝistoj, ankaŭ iliajn nudigitajn brustojn ŝovante sin en la sinojn de iliaj ruĝaj flikitaj ĉemizoj. La montokrestoj kaj la foraj insuloj jam plene distingiĝis. La juna ĉarma lumo ĉie ŝveliĝis, kreskis, trapenetris la ombrojn, ĉie dispersis ilin. Tiu ĉi konsoliga lumo, la pura kaj milda aero, la naturo, kiu vekigis el plifortiga dormo, la leĝeraodoro, kiun oni sorbas volupteme, la grandioza tagnaskiĝo ege impresis la nervojn, la koron kaj la animon de, — Antonio...

—Kien do ni grimpas? — koleretis Joso.

—Ni jam iris longan distancon de la maro. Nun ni trahakos trans tiu ĉi monto, kaj jen ni ĉe la valetoj de Ŝabariĉ! Maria venos sendube.

—Ni kaŝos nin post ŝtonmuro. La hodiaŭan tagon Saletti memoros! — minacis Joso.

—Vi devas fari nenion, krom se mi diros. Ili havos pafilojn. Pa... Pafilojn!? — konsterniĝis Joso kaj haltis ekstarante sur la rekta kruro, dum la alia restis levita.

—Jes, pafilojn! Vi jam timas, vi tiom ŝajnigis vin kuraĝa en la boato.

—Mi ja ne volas sperti la pafilefikon ĉe mia korpo.

—Tial ni devas nin gardi.

Antonio kaj Joso kvazaŭ ne laciĝis irante laŭ la krutaj paŝoj. Fine ili ĝislamis al la kampo de Ŝabariĉ. Tiu ĉi kampero

troviĝas sub kruta elstarajo de la plej alta monto. Ĝi estas eta kaldrono, kiaj multnombre troviĝas en la karsta regiono. La kampo havas diametron je cent paŝoj, kiun ĉirkaŭas alta ŝtona muro. En la mezo de la kampo troviĝas aro da hordeogarbaj. Tie estas garboj en kvanto de du kunligaĵoj. Joso kaj Antonio kaŝis sin apud la muro ekster la kampo, en la fosaĵon protektanta kontraŭ torento tiun ĉi malgrandan havaĵon de Ŝabariĉ. Ili sidiĝis, kaj en malproksimo sub la montaro distastiĝadis la matena saluto al la patrino dia. La fiŝistoj demetis siajn ĉapojn, kruccsignis sin, kaj fininte la preĝon, Joso diris:

—Hodiaŭ Fran fruiĝis.

—Silentu aŭ parolu pli mallaŭte; Marija ne malfruos.

—Ni aŭdos ŝin tuj post kiam ŝi venos sur la kampon.

—Jes, ŝi kutime kantas.

—Bela knabino ŝi estas, sed diru, ĉu estas malvarme al vi?

—Ne.

—Mi vere tremas pro malvarmo. Sciu, en la montaro ni troviĝas; ĉi tie ĉiam estas malvarme, verdire, mi ŝvitiĝis laŭvoje. Rigardu, la tuta ĉemizo ĉifoniĝis. Mi havis kudrilon, sed mi perdis ĝin. Ĉu vi havas monon? Mi aĉetus ĉemizon ĉe Stipe.

—Mi ne havas, sed Stipe kreditos vin. Li estas bona homo.

—Mi ne ŝatas ŝuldojn, ĉar mi hontas, — diris Joso kaj glatumis sian longan kolon.

—Silentu, mi aŭdas ies paŝojn.

La fiŝistoj kurbfleksiĝis sub la muron. El la monto trans la kampo vere aŭdiĝis leĝeraj piedbatoj.

—Ĉu ŝi estas? — ekflustris Joso.

—Mi opinias; sinjoroj havas ŝuojn, dum ŝiaj opankoj ne klakas kontraŭ la ŝtonoj.

—La amikoj eksilentis, rigardante unu la alian vizaĝe. Ti-umomente super la kampeto ekkantis mallaŭta virina voĉo: ”Mara haste la maron alpaŝas”.

—Ŝi! — Antonio elbuŝigis kaj ruĝiĝis.

—Antonio, kion ni faros?

—Nenion, silentu! Ni atendu, ĝis kiam ŝi descendos en la kampon, — diris Antonio kaj iom leviĝis por vidi, kie ŝi estas.

—Kial ŝi hezitas sur la monto?

—Ŝi staras sur ŝtono, — respondis Antonio kaj li amplek-
sis ŝian gracion staturon per siaj grandaj okuloj.

La suno, la juna matena suno, jam ŝutis siajn orruĝajn radiojn laŭ la montara regiono. La svelta staturo de Marija pitoreske reliefiĝis sur la blua ĉielo banante sin en tiuj brilaj radioj. La knabino ŝajnis al Antonio pli alta ol ŝi vere estis. Ŝi rigardis la maron. Ŝiaj okuloj vagis laŭ la trankvila marsupraĵo kaj la verdaj bordoj de la malproksimaj insuloj, serĉante etajn kaj kvietajn velojn. Ŝi melankolie ekridetis al la maro, ŝi ĉirkaŭrigardis la naskiĝregionon kaj observis la fumon leviĝanta maldiligente super la vilaĝaj dometoj. Tiam ŝi aŭdis magran bovineton, kiu muĝis ie sub monto, ankaŭ la malsatajn ŝafojn, kiuj blekis ĉe la kruta flanko de Luĉica. La naztruoj de Marija vastiĝis, la brusto ŝveliĝis spirante la puran aeron, tra kiu solviĝis laodoro de salvio kaj piceo kaj laodoro de la mola tero. La griza ŝtonaro, la rokoj homalte altaj helis kaj rebri-
lis pro la abunda nokta roso, ili kvazaŭ ŝajnus vekigi por ĉerpi la varmon de vivodonaj radioj de la potenca suno. En la maldensa herbaro ĉio viva rampis kaj svarmis, ĉio susuris inter la koroniloj kaj piceoj, ĉio viglis kaj spiris, la tuta naturo ekvi-

vis. Super Marija en la klara aero griza alaŭdo ŝvebis kaj ĝoje pepis; super la montego flugis aglo, svingante kaj susurante per grandajflugiloj, kaj pli supre sur la ĉiela firmamento, trankvile naĝis orumitaj nuboflokoj.

Jam tagiĝis.

Antonio ne demetis siajn okulojn for la knabino prilumita de la suno, dum Joso pensis pri la pafilo de Saletti kaj permane li palpis sub la flikita ĉemizo sur la brusto. Li gladis permane sian ruĝan kaj magran bruston, li palpis siajn ripojn, kiujn oni povis nombri facile sub la mizera haŭto. Joso kapbalancis pensante, kiel li fartus, se ie aŭ tie plumbo inter liaj ripoj traflugus, li streĉis sian kolon, malfacile englutis salivon, kaj lia eksterordinare granda adampomo en la gorĝo eksaltis, ĝi ŝtreĉis la haŭton kiel ĉe meleagro, kiun oni grasigas por kristnaskaj festoj per juglandoj aŭ per maiza polento. Joso tiam rigardis siajn magrajn krurojn, kiuj longiĝis antaŭ li sur la tero kaj trans la fosaĵo. Lia vizaĝo sereniĝis, la grizaj okuloj ĝoje palpebrumis pensante, ke ankaŭ la difektita kruro taŭgus, se necesus forkuri.

—Ts, ts! Ĉu Marija jam descendas? — demandis Joso, sed ĉar li ne aŭdis respondon, li ektiris la eluzitan krurumon de la pantalono de sia amiko.

Antonio rigardante al Marija, mansvingis al li por silenti, sed iom poste li kaŭrfleksiĝis sub la muron kaj metis la montrofingron al la lipoj.

—Ĉu ŝi venas? Antonio, vi paliĝis, kvazaŭ en vi ne ekzistus eĉ guteto da sango, — ekgrumblis Joso tra sia hokforma kaj dekstren flankita nazo.

—Mallaŭte! Iu descendas en la kampon.

—Kiu? Ĉu Saletti? — Joso ekgapis.

—Ne. Ŝi. Silentu!

Marija iranta malsupren al la kaldrono, kantis tutgorĝe. La koro de Antonio batis rapide. Marija malfermis la provizoran pordon, eniris en la kampon kaj komencis meti la ŝarĝon sur la portotukon, kiun ŝi etendis sur la stoplejon. Joso kaj Antonio ekrigardis unu la alian sub la muro ekster la kampo kaj aŭskultis ŝian sonorantan voĉon.

Post kiam la knabino pretigis la ŝarĝon, ŝi sidiĝis sur la teron kaj traŝovis la kapon tra la portotukon, ŝi surmetis la pezaĵon surŝultren, kaj ĵus intencante leviĝi ŝi ekstrems kiam ŝi rimarkis du homojn, kiuj montriĝis super la kampo.

—Jen ili! Joso silentu!

—Eble ili ne havas pafilojn! — Joso malfermis la buŝon kiel murenfiŝo.

—Mallaŭte! Ili iras al la kampo.

—Antonio, leviĝu por vidi la pafilojn.

—Ts! Ili jam alproksimiĝis al la kampo.

—Ili pafos al ni kiel al leporoj!

—Ne tremu! Vi timas!

—Mi?

La amikoj eksilentis, por aŭskulti, kio okazos.

Marija kvazaŭ ŝtoniĝis kiam ŝi ekvidis Alfredon kaj Lukan, kaj ŝi eĉ ne povis pensi kion fari, sed restis tiel ligita en la ŝarĝo kaj apogita al ĝi. La nobelo kaj lia servisto embuske atendis la konvenan momenton rande de la kaldrono, kaj tiam ili rapide descendis en la kampon, kie ili apogis la pafilojn al la muro, kiu tute ĉirkaŭis la kampon, kaj kuris al la knabino pli frue ol ŝi povos liberiĝi el la pezaĵo.

—Bonan matenon, ĉarma Marija! He, ho, vi kutimas fruiĝi!

—Diris Alfredo kaj karesis ŝian vangon.

La knabino diris nenion, sed intencis leviĝi kun la pezaĵo. Luka retotiris la pezaĵon, kaj premis ĝin al la tero. La knabino ekstremis kaj ekkriis:

—Ho, patrino mia!

—Marija, mi ekiris ĉasi kaj kredu al mi, ke mi ne esperis, ke mi trovos vin ĉi tie.

—Lasu min libera!

—Marija, hodiaŭ vi devas ion konsoligan diri al mi! Mi ne volas preterlasi ĉi tiun unikan ŝancon. Ni solaj estas ĉi tie, neniuj vidas kaj aŭdas nin, li estas mia servisto, kial vi timas? — diris Alfredo kun tremanta voĉo.

—Se Dion vi konas, lasu min! — ekkriis Marija kaj denove intencis leviĝi, sed Alfredo repuŝis ŝin, ke ŝi falis sur la ŝarĝon kaj ekkriegis:

—Rabisto!

En tiu momento Antonio kaj Joso transsaltis la muron en la kampon, ĝuste ĉe la loko, kie la pafiloj estis apogitaj. Antonio kaŝe estis rimarkinta la lokon de la pafiloj kaj tiam li kun Joso ŝteliris kliniĝinte apud la ekstera flanko de la muro.

—Haltu! — ektondris Antonio, celante per la pafilo al la nobelo.

Alfredo kaj Luka turnis sin kaj konsterniĝis. Marija alkuris al la trovito, ŝi surgenuiĝis antaŭ li, kaj ĉirkaŭbrakis liajn genuojn, ŝi eksingultis:

—Antonio, Dio pagu al vi!

La nobelo kaj la servisto staris palaj meze de la kampo.

Luka provis fuĝi, sed Joso ekgrakegis:

—Haltu, rabisto, alie mi traboros vin!

—Donu la pafilojn, — petis Luka.

—Silentu, hundaĉo, alie mi pafos! — minacis Joso denove. Alfredo furioze ekrigardis al Antonio kaj ekpaŝis al la eliro.

—Haltu, ni kune iros en Luĉican! — anonciĝis Antonio raŭke kaj trankvile.

La nobelo rigidiĝis.

—Marija, surmetu la ŝarĝon. Vi ne spertos malbonon dum mi estas viva. Joso, atentu pri Luka!

—Se li ekmoviĝos, precize lian koron mi trafos! He, fiulo, provu fuĝi! Eĉ sankta Luko ne savos vin, ĉar mi ... paf!

—Josu, donu la pafilon! Ne frenezu! — Luka insistis afable.

—Ĉu vi volas, ke mi surspicu vin?

La nobelo tremis pro ĉagreno kaj timo, vidante la malbonhumoran mienon de Antonio, kaj lian nigriĝintan kaj malserenan vizaĝon.

Kiam Marija pretiĝis, Antonio ordonis:

—Ek al Luĉica nun!

—La friponoj iru antaŭ ni! — ekkriis Josu.

—Dek paŝojn for, — daŭrigis Antonio.

Unu horon poste, la homoj sur la ŝoseo antaŭ Luĉica mi-regis.

La humiligita nobelo kaj la timigita servisto marŝis rigardante teren antaŭ Antonio kaj Josu. Iom post ili iris Marija kun la ŝarĝo. La knabino estis ploranta. Iuj virinoj, revenantaj de la frumatena diservo afliktiĝis, vidante la povran knabino. Ili kapbalancis, mansvingis kaj iris plu, ĉiu laŭ sia vojo.

Veninte antaŭ la poŝtejon, kiu troviĝas apud la ŝoseo en Luĉica, Antonio diris al la nobelo kaj la servisto:

—Nun vi povas iri kien vi volas.

—Donu la pafilojn, — ekpetis Luka.

—Ne boju, hundaĉo! Mi frakasos vian kapon! — ekminacis Joso.

—Viaj pafiloj ne perdiĝos! — hakdiris Antonio.

—Donu la pafilon! — eksiblis Alfredo tra la dentoj.

—Ne! Danku al Dio, ke vi vivas! Foren, fiulo, pafilon vi ne indas havi. Foriĝu hejmen, salutu vian patron, la friponon, kiu forŝtelis mian heredaĵon. Komplete vi senhavigis nin!

—Joso, evitu ilin, — trankviligis Antonio.

—Se li elbuŝigos eĉ unu vorton, li plonĝos en sian propran sangon!

Post kiam Luka kaj la nobelo komprenis, ke lia persvado ne sukcesos, ili ekiris hejmen tra la arbaro.

*

La vilaĝaj infanoj iris post Antonio kaj Joso kaj kriis: —Ili havas pafilojn, pafilojn! Antonio marŝis rapide. Li surtiris la ĉapelon super la okulojn; li serioze rigardis la infanojn, kiuj proksimiĝis al li. Joso lamis post li, kliniĝante super la dekstra kokso kaj svingante per la kapo.

—Joso, kien vi portas la pafilojn? — demandis knabo.

—Al Stipe.

—Ĉu vi scias pafi?

—Jes! Mi scias, jen tiel, — li diris kaj levis la pafilon al la okulo.

—Ek, pafu!

—Ne! Bela pafilo! Ĝi apartenas al Luka. Ho, kiel la friponoj tremis!

—La ĝendarmoj enkancerigos vin, ĉar vi ŝtelis la pafilon. Ankaŭ Antonion ili fermos!

—Ni defendos nin; ni ĉiujn mortigos.

*

La negocisto Stipe, starante ĉe la kaso de sia vendejo, tenis en sia mano allogan faskon da monbiletoj. Antaŭ li sur la benko kuŝis unu centvalora monbileto kaj kelkaj dekvaloraj. Lovro, la kaleŝisto de Saletti, venis al la negocisto por ŝanĝi la centvaloran kontraŭ pluraj malplivaloraj monbiletoj. Jen kaj jen Stipe tuŝis spongeton kaj nombris la monbiletojn por la kaleŝisto. Li nombris, dum en la vendejon haste eniris Joso kaj Antonio. La negocisto konsterniĝis. Lovro turnis sin, kaj kiam li rimarkis la armitajn fiŝistojn, li terure paliĝis.

—Antonio, kies pafiloj tio estas? — demandis Stipe.

—Mi diros post kiam foriros tiu ĉi noktuo el la vendejo, — respondis Antonio kaj montris per la mano al Lovro Palotta.

Tiu ĉi viraĉo, kanajlo, kun longforma kaj razita vizaĝo, kva-zaŭ ion maĉanta, ne sciis, kion diri, nek fari.

—Lovro, jen prenu! Nombro ankoraŭfoje; eble mi eraris, — diris Stipe puŝante la dekvalorajn monbiletojn sur la tablo.

—Ho, diablo! De kie vi ekposedis tiun monon? — demandis Antonio.

Lovro malfermis sian grandan buŝon kaj rigardis al la fiŝistoj.

—Mi scias, kiel li akiris tiun monon! — eksiblis Antonio.

—Jen la kanajlo, li ŝanĝas la centvalorajn! — ekkriis Joso kaj alcelis al la kaleŝisto.

Lovro tute sintiriĝis kaj ŝovis la monbiletojn en la poŝon de la larĝa kaj longa griza jako.

—He, ne ŝanĝas li por si! Lin sendis ĉi tien la juna mastro, — defendis lin Stipe.

—Jes, la juna mastro, — ekbalbutis Lovro.

—Ja kial vi timas? Kia furiozo atakis vin? — miris Stipe pro la kaleŝisto.

—Nu, kie estas tiu via juna mastro? — ekridis Joso kvazaŭ ternante pro nazkataro.

Lovro skuiĝis, eksvingis per la kapo, kaj ekmurmuris:

—Ek serĉu lin!

—Mi jam trovis lin! — ekkriis Joso, kaj streĉis sian kolon.

—Ĉu kelkfoje la juna mastro donas al vi monon? — demandis lin Antonio gravmiene.

Lovron atakis spasmoj. Antonio trapikis lin per sia rigardo.

—Ĉu monon!... Li!... Jes, skurĝobatojn al mia dorso, — ekbalbutis Lovro.

—Antonio! — surprizegiĝis la negocisto.

—Tiu mono fariĝos naŭza por li! — Antonio ekminacis raŭke.

Lovro forŝancelis el la vendejo.

—Antonio, pro konfeso mia, mi ne komprenas viajn dirojn! Kial do vi atakis lin tiel? Kian kulpoagon li povra faris?

—Nenian!

La perpleksita Stipe skuis siajn ŝultrojn, kaj demandis:

—Kaj la pafiloj?

Antonio rakontis pri ĉio okazinta en la montaro kaj pri kiel li alpelis la nobelon al Luĉica.

—Kie estas Marija? Kaj la friponoj! — kriis la negocisto indigne.

—Ŝi foriris hejmen.

—Ja kial vi alportis la pafilojn ĉi tien? Forportu ilin al la urbestro kaj diru, ke li raportu al la tribunalo.

—La urbestro enkarcerigus nin! — diris Joso tranaze.

—Vi pravas Joso! Mi preskaŭ forgesis! La urbestro estas amiko de Saletti.

—Prave! — Antonio atestis.

—Kiel vi Antonio sciiĝis, ke la friponoj postsekvos Marijan en la montaron? — demandis Stipe.

Antonio, pensante pri Elvira kaj Marko, embarasiĝis iom kaj prisilentis al la negocisto pri la pasintvespera konversacio antaŭ la domo de la nobelo.

—Mi ne sciis certe, ke la sinjoro ekiros post Marija en la montaron, — Antonio devigis sin diri malveron. —Pasintvespere dum vespermanĝo Jela diris al Marija, ke ŝi frumatene iru alporti la faskaron de hordeo, sed mi tuj konjektis, ke Saletti atendos ŝin en la montaro.

—Jes, jes, la kanajlo tentas la knabinon, — koleris la negocisto.

—Mi kaj Joso fiŝkaptadis la tutan nokton; frumatene mi petis lin akompani min. Kiam ni venis sur la deklivon, mi rimarkis, trans la valo, ĉe la montoflanko, Marijan. Iom fore post ŝi iris du viroj; mi tuj divenis ilian intencon!

—Ĉu vere? Vi ne diris al mi pri tio! Ĉu vere vi vidis ilin? — ekmiris Joso.

La lastaj vortoj de Antonio estis veraj. Li ne volis diri al Joso, ke li vidis la virojn kun pafiloj, ĉar li timis, ke Joso forkuros.

—Kiu diris al Saletti, ke Marija iros alporti la hordeon? — demandis Stipe.

—Liaj servistoj postsekvas ŝin ĉie, — respondas Antonio.

—Ve al mi! Se vi Stipe aŭdus la kriadon de Marija! Mi tute teruriĝis! — diris Joso kaj levis buklon da flavaj haroj de sur

sia verto por montri pli precize kiel li fartis apud la muro de la kamparo.

—Antonio, vi estas brava junulo!... Povra knabino! Se vi tiel ne agus, hodiaŭ la familio de Ŝabariĉ estus hontigita. Vi savis la honestecon de Marija, kaj vi hontigis la kanajlon, Jen, tiaj aspektas la sinjoroj de Luĉica. Diablo mem elpensus ion pli maldecan! — kriis Stipe.

—Antonio, kial ni ne mortbatis ilin? — kuraĝis Joso.

—Bone ke vi tion ne faris! Nun sufiĉas la hontigo kaj la malestimo, ĝis la tribunala proklamo. Ho, kiaj kanajloj graŝiĝas en niaj regionoj! Ĉu ne sufiĉas, ke ili ekspluatas nian kompatindan popolon, sed ili eĉ volas malĉastigi niajn knabinojn. Justeco ne ekzistas plu en la mondo! Ili meritis pendumilojn! Saletti ne volas ekkoni niajn bezonojn; liaj grenujoj estas plenplenaj, liaj monuoj ŝvelkreas, dum la popolo malsatas! Kiam regis plagaj jaroj, li dum Kristnasko donadis sakon da maizo kontraŭ tri ujoj da vino, kiujn la servutuloj devis doni dum la tago de sankta Miĥaelo! Ni estas senpovaj, ĉar ni estas malriĉaj! La sinjoroj, deputitoj en Vieno ne defendas nian mizeran popolon, sed ili diskutas pri aferoj, per kiu lingvo oni instruos niajn infanojn. Dumtempe tiaj malĉastuloj, kia estas la maljuna kanajlo super Luĉica, nin ekspluatas kaj hontigas! — furiozis Stipe kaj rapide marŝas tra la vendejo.

Liaj gepatroj provis trankviligi lin, sed vane. Stipe kriis kvaŝaŭ senracia. Kiam li silentiĝis, li eniris en ĉambreton, kie li kutimis skribi. Li sidiĝis, mallevis la kapon sur la bruston, kaj komencis murmuri.

Antonio kaj Joso lasis la pafilojn en la vendejo, eliris el la domo kaj ekiris al la domo de Ŝabariĉ.

Jela kaj Marija sidis ĉe la fajrejo plorante kaj veante. Mar-

ko promenis en la kuirejo. Lia vizaĝo estis pala kaj enpensiĝinta. Post kiam la virinoj rimarkis Antonion kaj Joson, ili laŭte eksingultis. En la ĉambro sur alta lito kuŝis la maljuna Antun. La malfeliĉa maristo rigardis per siaj vitrecaj kaj larmoplenaj okuloj al la fenestroj kaj aŭskultis la singultadon de siaj edzino kaj filino.

—Ho, Dio kara, kian kulpon ni faris! — Jela suspiris klakante per siaj manoj. Mia kulpo, pri ĉio mi kulpas! Ho, povra mi! Nun mi komprenas, kial hieraŭ Luka pridemandadis min pri ĉiaĵoj. Kara mia Marija, doloro mia, ne singultu plu! Vi neniam plu iros sola el la hejmo. Ĉu vere la homoj jam freneziĝis? Ho, Dio pardonu al mi! Mi jam ne scias, kion mi parolas!

—Trankviliĝu, panjo! Marija nur ektimis. —Antonio, vi protektis la ĉastecon de nia familio. Diru al ni, kio okazis, — Marko diris kun tremanta voĉo.

—Ĉu Marija ne diris?

—Ŝi diris, sed kie troviĝas la pafiloj.

—Ilin mi donis al Stipe, ĉar li indas esti urbestro.

—Vi nomiĝas Joso, ĉu ne?

—Jes, jes, Joso. Mi bedaŭras, ke ni ne pafmortigis ilin kvaŭzaŭ leporojn.

—Ho, sankta Dio! — ekklakis Jela.

—Panjo, ne timu! — singultis Marija.

—Vi, nobla nobelo! Vi raportos al mi, kian rilaton vi havas kun mia fratino! — ekminacis Marko kaj terure ektremis.

Antonio rigardis lin ridetante, komplate, amare kaj preskaŭ malestime...

—Marko, filĉjo kara, ne impliku vin en aferojn de senkreduloj, por ke plia malbono ne trafu nin! — petis Jela.

Ekestis silento. El la ĉambro aŭdiĝis voĉo de la malsanulo.

—Filo mia, geinfanoj miaj, gardu vin de tiuj pekuloj; ne entombigu min antaŭtempe.

—Antonio, laŭ la rakonto de Marija, vi antaŭ kelkaj tagoj perpugne batis la nobelon; kial vi silentis pri tio? — demandis Marko.

—Ĉu mi silentis? Jela, ĉu mi ne diris ĉion al vi, Jela, la saman vesperon, kiam mi faligis lin sur la ŝoseon?

—Jes, vi diris, — respondis Jela.

—Se mi ekscius pri tio, ne okazus tio ĉi hodiaŭ! — Marko diris amare.

—Ni silentis, por ne malĝojigi vin; ankaŭ al Mato ni ne sciigis, por ke ne okazu plia malbono.

—Vi ne faris bone! Mi estus parolinta kun la nobelo.

—Ĉu vi estus sciigonta Maton en Jelenŝĉica, por veni ĉi tien? — demandis Antonio kun adstringeca kaj malfirma voĉo.

Marija ekremis rigardante lian vizaĝon, trans kiu tiumomente traflugis dolorega mieno.

—Neniel! Kial li venus ĉi tien? Estu mia zorgo kvitiĝi kun Saletti. Mi prudentigos lin baldaŭ! — Marko kriis kolere.

Laŭ lia bela vizaĝo sterniĝis amara zorgo kaj furioza ĉagreno.

—Jes, jes, filĉjo, estus pli konvene, ke Mato ne venu en Luĉican, kial do malĝojigi lin? Plej konvenus, ke ni petu pri konsilo sinjoron paroĥestron kaj Stipen; ili scias kion ni faru kaj al kiu ni turnu nin. Feliĉe, ke ni havas tiajn homojn en Luĉica! Sinjoro paroĥestro eĉ helpus nekredulon, des pli li helpos nin! Marko, se vi estus pastro, tiaj aferoj ne estus okazintaj al

via fratino. Kiu ja kuraĝus eĉ tuŝi fratinton de pastro? Ho, kion ni povruoj rajtas fari, ni malriĉaj fiŝistoj!

La sciigo pri la abomena konduto de Saletti disvastiĝis preskaŭ tuj tra la tuta Luĉica. Preskaŭ ĉiuj kompatis la ĉarman kaj bonan knabinon kaj ŝiajn gepatrojn. La kvieta urbeto abrupte malpaciĝis. La patrinoj zorgoplene rigardis siajn filinojn, surŝutante ilin per bonutilaj konsiloj. Joso vagis longe tra la krutaj urbostratetoj, parolante kaj klaĉante pri Marija, pri la nobelo, pri la montara kampo kaj pri la pafiloj. La virinoj laŭte interparolis trans la stratoj, ili pridemandadis, kalmuniis la nobelon, ili manklakis kaj miris pri la braveco de Joso. La infanoj kiuj ĉirkaŭis la fiŝiston, rigardis lin timeme per konsterniĝo, kaj sekvis lin de domo al domo, dum li parolis kaj parolis kvazaŭ li mortigus grandegan armeon. Joso kun roto da buboj venis al la domo de la urbestro, kaj li denove babilis kun scivolemaj najbarinoj.

—Kial vi kriaĉas antaŭ mia domo! — ekblekis Anastazija Murelli de sur la fenestro.

Nun ekestis bruego! Joso en sia heroeca vervo ekkriegis:

—Jen, jen, strigo sur la fenestro!

—Strigo! Gufo! — ekululis la buboj.

—Aĉuloj, ĉifonuloj! Iru hejmen, ke viaj patrinoj flicku viajn pantalonojn! — ekkriis Anastazija ree.

—Turpulino, olda sorĉistino, ciganino! — ŝutiĝis el ĉiuj flankoj.

Iom poste, kiam la tempesto trankviliĝis, la urbestro rigardis la flavan vizaĝon de sia edzino, kaj la harojn kiuj tremetis sur la verukoj, aŭskultante la kriadon, kiu translokiĝis en alian strateton.

VI

Sur la pitoreska monteto, kiu leviĝas pafdistance okcidente de tenebra Luĉica sub la kalva kruta flanko de griza monto, montriĝas sinjoreca palaco el inter la densaj arboj. La ronda ebena supraĵo de la monteto estas tute ĉirkaŭita de arbaro. Inter la monteto kaj la monto fendiĝis mistera ravino. Se enpenŝiĝinta maristo vagus per siaj okuloj, senkonsidere kien li navigus ene de la mirinda golfo, liaj okuloj certe alkroĉiĝus al la blanka palacfronto sur la monteto. Post kiam li rimarkus ĝin, li malfide ĵetus sian rigardon al sia fragila boato; dolorplena nostalgio spasmigus lian bruston, en sia koro li sentus terurtremon, rememorante pri siaj edzino kaj infanoj. Li pensus pri la idilia feliĉo, kiun ĝuas liaj nekonatoj sur la verda monteto, sur la trankvila malvigla loko, sed li povra ne sciis, ke apogis sin ĉe unu fenestro juna, malfeliĉa knabino, kiu envias lin pro lia sorto.

Elvira Saletti melankolie enpenŝiĝis, rigardante al la kalma marebena, kiu antaŭ ŝi briletis kaj respeguliĝis. Ŝiaj nigrobrunaj okuloj idle vagis laŭ la dezertaj regionoj de la insulo Cres serĉante en ĝiaj laŭteĝaj montopintoj la plej izolitajn valojn kaj ravinojn.

La suno pura kaj brila baldaŭ sinkos malantaŭ la altan Uĉkan. Sur ĝiaj fieraj suproj ekflamis ega fajro. La kalva Velebit kaj iuj altaj pintoj de la insuloj de Kvarner sunumis sin en la lasta ruĝa brilo. Ĉie ĉirkaŭe ĝis la vidatingo, en la tuta golfo,

kiu sterniĝas de Kapela ĝis Uĉka kaj de Osor ĝis la karsta montaro super Kraljevica, ĉie interplektiĝas, ĉie interŝanĝiĝas grandegaj ombroj kun longaj fragmentaj makuloj de la suna oro. La orienta montoĉeno de Istrijo, leviĝas kaj malleviĝas kvazaŭ giganta ondo, kiu abrupte disigas la okcidentan ĉielon kaj ombrigas la tutan maron kune kun la malgrandaj insuloj, kiuj modeste montriĝas el la maro.

La sufoka julia antaŭvespero finbrulis majeste.

Komforta malvarmeto sterniĝis sur Luĉica. La pensoj de Elvira jam longtempe flugis al la regionoj de la insulo Cres. La izoleco kaj trankvilo de la boskoj, de la deklivoj kaj la ravinoj logis ŝian animon en ilian pitoreskan sinon promesante beaton kaj kompletan sinforĝeson. Elvira eksimpatiis la misteran bordon de Cres, ŝi ofte observis ĝin konfidante al ĝi kaj akirante de ĝi senliman konsolon. La knabino ĝojis pri la ekfoliiĝo de la arbaroj tie trans la maro, kaj malĝojo premis ŝin, kiam ili komencis flaviĝi kaj velki. Dum malserenaj vintraj tagoj, vekiginte el peza dormo, ŝi kutimis rigardi el sia varma kaj mola lito tra la ŝveliĝintaj vitroj kaj ŝi ofte rimarkis, sur la montosuproj de Cres, neĝon kaj froston, kiu jam plurfoje afflktis ŝian koron.

Elvira turnis sian belegan kapon maldekstren kaj rigardis al la tombejo de Luĉica en la trankvila valo. Apud alta tombomonumento leviĝis alta sola cipreso. Tie kuŝis eterne dormante ŝia bona patrino, kiu lasis ŝin en ĉi tiu malbona mondo, en la tempo, kiam ŝi ankoraŭ estis malgranda knabineto.

La nigraj okuloj de Elvira iom malsekiĝis de larmoj, dum en la ĉambro malantaŭ ŝi subite ekknaris la pordo. La knabino spasme turnis sin kaj rimarkis sian fraton antaŭ si. Alfredo rigardis al ŝi kaj komencis paŝi laŭlonge de la ĉambro.

(Alfredo venis al Elvira por peti ŝin helpi kaj elpeti favoron de la patro, de la majuna Saletti. Lin jam la urbestro Murelli informis pri la hontindaĵo kaj pri la humiligo de Alfredo. Alfredo tre koleris antaŭ la fratino pro Murelli, nomante lin azeno, same li blasfemis la patron, kiu laŭ lia opinio, ankaŭ malestimindas. Elvira protektis la patron kaj rifuzis helpi al Alfredo, pensante pri la amata Marko kaj pri lia fratino, la bela Marija. Ŝi kaj Alfredo disiĝis kiel malamikoj.)

Elvira mallaŭte singultis...

Ŝia ĉambro estis lukse kaj ŝike aranĝita. Sur la polurita planko estis sternitaj multekostaj tapiŝoj; sur bluetaj vandoj pendis kvar grandaj pentraĵoj en larĝaj orumitaj kadroj. En unu angulo troviĝis estetike trafa, ordinara lito, kaj super ĝi ŝvebis silka baldakeno. La tuta meblaro, la seĝoj, la foteloj, la kurtenoj, estis bluaj, la tuto el silko kaj veluro. En unu ŝranko brilis orumitaj librodorsoj. Super la ŝranko staris du bustoj: Dante kaj Petrarca. La senmorta Dante rigardis severe al la ploranta Elvira, kiu estis bela samkiel lia Beatrice. Super la piano, en unu duonluma angulo de la ĉambro staris ankoraŭ unu busto. La dika glora maestro Rossini kontente ridetis kaj primiris la aflikton de la knabino, kvazaŭ dirante: Ja, estu petola kiel mia Rosina!

En la ĉambro vastiĝis intensaodoro de diversaj sapoj kaj pudroj; la sanigaodoro de la laŭra bosko, de la kverkaro, de la centjaraj tilioj, de la rosmarenoj kaj de la buntkoloraj floroj, plenigis la ĉambron, jen pli intense, jen malpli intense, laŭ la blovo de la vespera venteto, kiu petolis per la altaj silkaj kurtenoj, kvazaŭ sinjoreca infano ludus per vualo de sia lulilo songante pri kareso per la maneto al la vizaĝo de sia patrino.

Elvira ĉesis singulti. Ŝiaj plenformaj ŝultroj ne plu tremetis. Ŝi enspiris kaj levis sian kapon malrapide kaj apogante sin ŝi restis trankvila. Ŝia vizaĝo estis pala kaj larmemalseka; ŝiaj ruĝaj lipoj ankoraŭ kelktempe tremetis pro la ploro. La lipoj estis malfermitaj; la supra iomete leviĝis kaj malkovris kelkajn malgrandajn blankajn dentetojn. Ŝiaj nigraj kaj larmoplenaj okuloj estis tute malfermitaj, sed ŝi rigardis eĉ ne unu objekton en la ĉambro, sed iun alian mondon, — sian koron. Rigardante tiun ĉi ĉarman ĉastulinon, ĉiuj ŝiaj allogfortoj malaperas, ĉio perdiĝas en belega harmonio, nur la profundaj, brilantaj kaj pensoriĉaj okuloj malfermiĝas kaj obsedas per sia magia rondo, kvazaŭ oni dronus en ŝian karesan rigardon, en la profundojn de ŝia nobla animo.

Elvira ekstaris kaj ekiris al la fenestro. Ŝi estis altstatura kaj svelta. De la seĝo ĝis la fenestro distancis apenaŭ kvin paŝoj, sed ŝia korpo, la ĉarma harmonio de ŝiaj plaĉaj, rondformaj membroj moviĝis noble kaj digne ene de tiu ĉi mallonga distanco. Ŝi apogis sin al la fenestro kaj rigardis la estiĝantan nokton.

Super Velebit la ĉielo lumis, kaj super la lumo, iom pli al nordo palis belvida stelo. En la arbareto ĉirkaŭ de la domo pepis birdoj serĉantaj tranoktejojn ene de la branĉoj. El Luĉica aŭdeblis diversaj voĉoj kaj ies rido.

Elvira rigardis en la mallumon. El malantaŭ Velebit montriĝis peco de brila arĝento. La luno leviĝis lante, kaj post ĝia elkoviĝo, ĝia lumo disŝutiĝis super la tutan Kvarner kaj prilumis ankaŭ la karan vizaĝon de Elvira, kiun vualigis tristo kaj ĉagreno. Elvira spiris peze; sub la disflorinta brusto ŝian koron premis amara doloro, io bruligis ŝian animon, kie inter-

kruciĝis amaraj kaj pesimismaj antaŭsentoj, dum la ora lunlumo logis ŝin al ekzotaj mondopartoj...

Iu frapis al la pordo.

—Kiu estas?

—Estimata fraŭlino, bonvolu al vespermanĝo, — vokis la servisto.

Elvira suspiris kaj trairinte kelkajn ĉambrojn, ŝi venis en la manĝoĉambron.

—Bonan vesperon, kara paĉjo! — la knabino salutis mal-laŭte.

Marino Saletti jam sidis ĉe la tablo kaj atendis siajn infanojn. Por plirapidigi la tempon, li legis gazeton. Super la okuloj li havis verdan vizieron kontraŭ la lumo. Ĝi estas ligita al lia kapo. Saletti legis tra okulvitroj. Post kiam Elvira salutis lin, li skuis sian kapon al ŝi. La maljuna Saletti aĝis ĉirkaŭ sesdek jarojn. Li havis densan grizan, tonditan barbon.

—Kie vi troviĝis, Elvira? — la patro demandis per raŭka voĉo, palpante sian mentonon kiun kovris mallongaj pikaj haroj kvazaŭ robobroso.

—Mi estis en mia ĉambro, — respondis la knabino rigardante time al la malhela vizaĝo de la patro.

—Kie estas Alfredo? — ekmurmuris Saletti sorbante la supon kaj rigardante la teleron, super kiun li klinis sian dikan, tute rondecan kapon.

—Mi ne scias, kara paĉjo, antaŭ nelonge...

—La "karan" restigu por la postaj tempoj!

—Antaŭ nelonge li estis ĉe mi, — daŭrigis Elvira.

—Pri kio li parolis? — demandis la patro kolere.

—Kiel, paĉjo?

—Ĉu li nenion parolis pri mi?

—Jes, li petis min, ke mi diru al vi, ke vi ne riproĉu lin, — diris Elvira aŭdace.

—Mi ne riproĉas lin, sed li hontigis min! — ekkriis Saletti levinte la kapon tiom, ke sur lian pufforman kaj nigran vizaĝon falis la lumo de la lumigilo, kiu pendis super la tablo.

La nobelo metis viŝtukon al la kolumo de la ĉemizo, kaj sterninte ĝin ĉe la brusto, li apogis sin sur la tablon. Lia granda kapo eniĝis inter la larĝajn leviĝintajn ŝultrojn.

De la kapo ŝutiĝis aro da skvamoj sur malnovan bluverdan jaketon el orleano, ĉe lia nuko pufiĝis dika faldo de grasaĵo, kiu moviĝis kaj ondis laŭ la maĉado de la fortikaj makzeloj.

La manĝoĉambro estis tre vasta, kaj ĝin tutan ne povis lumigi la lumigilo pendanta super la tablo. En la anguloj de la ĉambro estis vera duonlumo. La altaj ŝrankoj vicigitaj apud la vando, estis plenaj de ĉiaspecaj manĝilaroj kaj arĝentaĵoj. Sur la muroj pendis ankaŭ kelkaj pentraĵoj, sed kion ili prezentis estas malfacile kompreni, ĉar ili estis tiel alte fiksitaj, ke sur ilin ne povis fali lumo de la lumigilo ŝirmata per verda ŝildo.

—Kie estas la sentaŭgulo? — demandis la nobelo, — ĉu li ne vespermanĝos?

—Ĉu vi volas, ke mi sonrovoku la serviston por trovi lin? — demandis Elvira mallaŭte.

—Sonorigu! — diris Saletti furioze kaj li malplenigis la glason da vino unuglute.

La nobelo manĝis rapide kaj avide; li terure dentmuelis kaj maĉis frititan kokidon prenante unu pecon post la alia per siaj dikaj, ŝvelintaj manoj, vilaj eĉ sur la fingroj mem.

—Trovu la junan sinjoron; diru al li, ke ni estas ĉetable, — ordonis Saletti al Luka, kiu enkuris en la salonon.

—Mi jam sciigis al la sinjoro, ke la vespermanĝo estas surtable, — Luka elbuŝigis humile.

—Azeno, eliru!

Luka eliris kaŝe el la ĉambro ĉirkaŭrigardante time.

—Mi petas, kara paĉjo, mi ion dirus, sed mi timas, ke vi koleros.

Viŝante per la tuko siajn grandajn lipojn, la nobelo ekgrumblis :

—Evitu min, ne tentu min!

—Sed, kara paĉjo!

—Mi ne volas aŭdi eĉ unu vorton!

—Alfredo estas juna, pardonu lin...

—Vi defendas la frenezulon? Silentu!

—Paĉjo, riproĉu lin, devigu lin promesi ne fari tion plu...

—Ĉio vanas! Li neniam taŭgos! Li disipos ĉion, kion mi pene akiris. Li estas ne nur kanajlo, sed eĉ malĉastulo. Bastardoj, trovitoj lin hontigis! Ĉu li estas nobelo? Ĉu li estas mia filo?

—Paĉjo, trankviliĝu, mi petas, trankviliĝu!

—Mi ne povas elteni tiun honton! Ankaŭ la aliaj estis junaj, sed ne..., — Saletti ne findiris, sed li forglutis la vorton surverŝante ĝin per glaso da vino.

Tiumomente en la ĉambrom eniris Alfredo. Ne elbuŝiĝinte eĉ vorton, li sidiĝis sur sian lokon. En la salono ekregis silento. La vizaĝo de Alfredo estis malserena kaj trista. La maljunulo manĝis kaj glutis eĉ pli haste ol antaŭe. La koro de Elvira batis eĉ pli intense, la tomba silento en la salono premis ŝian bruston. Ĉiu engluto kroĉiĝis en la gorgo. Fine ŝi lasis la manĝaĵon, ne sciante kion fari, ŝi komencis rigardi la penetraĵojn, kiuj pendis sur la muro kontraŭ ŝi. Rigardante rigide

la bildon de sia patrino, kiu melankolie ridetis al ŝi el la duonlumo, ŝi eksentis larmojn sur la palpebroj. La knabino penis dampi la ploron, por ne kolerigi la patron, sed ne povis deteni sin, ĉar ŝia koro ŝiriĝis pro tristo. Konsciante, ke ŝi ne povos supervenki la sentojn, ŝi ekstaris kaj iris en angulon de la granda ĉambro, kaj sidiĝinte sur ledan divanon, ŝi laŭte eksingultis. Kiam la maljuna Saletti aŭdis la singultadon de Elvira, liaj manoj komencis tremi. Rigardante furioze la filon, li elfoteliĝis, ĵetis la viŝtukon sur la tablono kaj komencis promeni en la salono per grandaj paŝoj. La nobelo estis malaltstatura kaj kun ekterorde larĝa dorso. Lia pantalono estis mallonga, ĝis maleoloj, ĉar li rapide iris, li saltadis, kvazaŭ elasta bulo. La krurumoj de la vasta pantalono ŝanceliĝis super la grandaj ŝuoj.

—Tio devas jam ĉesi en mia domo! Ĉi tie mi mastras! Ĉu vi aŭdas? Se tio ne plaĉas al vi, bonvolu foriri! — ekkriis la patro, haltinte antaŭ la filo.

—Lasu min! Mi ne estas bubaĉo, aŭ iu el viaj servistoj! — mansvingis Alfredo.

—Hontu! Nur bubaĉo? Vera malĉastulo vi estas! Vi meritas ke mi mortpafu vin.

—Finu jam! Ankaŭ en miaj vejnoj fluas sango! — ekkriis Alfredo.

—Malfeliĉulo, ne hontigu mian nomon, ne ridigu min antaŭ tiu popolaĉo, inter kiu ni vivas! Ĉu vi forgesis, kiu estas via patro? Ĉu vi opinias, ke vi estas filo de maristo?

—Ne deliru!

—Alfredo, gardu vin, por ke mi ne strangolu vin! Ĉu vi volas, ke ili batu vin?

—Vi freneziĝis!

—Silentu friponaĉo! — ekkriegis la nobelo.

—Paĉjo, trankviliĝu, mi petegas vin! — petis Elvira singultante.

Alfredo ekstaris kaj eliris el la ĉambro. La patro, tenante pistolon enmane, akompanis lin ĝisporde kun sangeca rigardo.

Elvira singultis genuanta ĉe la piedoj de la patro.

—Elvira stariĝu kaj iru en vian ĉambron!

—Paĉjo, pardonu al Alfredo; kompatu pro miaj larmoj!

—Iru, Elvira, iru... Lasu min, mi devas esti sola, mi devas...

Foriru, kara filinjo, mi petas, iru...

Elvira rigardis la patron per siaj larmoplenaj okuloj kaj foriris el la ĉambro kun malsupren klinita kapo.

La maljuna Saletti kuŝiĝis en grandan brakseĝon kaj ĉirkaŭpreninte sian kapon per ambaŭ manoj, li gapis al la pistolo, kiun li lasis sur la seĝo. Grandaj gutoj de ŝvito glitis sur la perpleksa vizaĝo. La malsupra malfirma lipo, meze kvazaŭ distranĉita, pendiĝis kaj renversiĝis, kaj tiel malkovris la fortikajn, nigriĝintajn dentojn. La vortoj de Alfredo firmiĝis en lia kapo; lia cerbo ŝiriĝis. La nobelo eksentis sin senforta kaj foriris en sian dormoĉambron. Etendinte sin sur divano, li kovris la vizaĝon per siaj vilaj brakoj. Li klopodis pensi, sed ne povis, ĉar la vortoj de la filo senĉese alrampis, trapikante lian cerbon kirlante en ĝi. Saletti tremis: la ĉemizo gluiĝis al lia malvarma ŝvito surdorse, en lia kapo muĝis, la ĉambro rondiris ĉirkaŭ li, kaj antaŭ liaj okuloj ŝvebis la ploranta juna marista virino kaj...

La saman vesperon ĉirkaŭ la dekunua, Elvira promenis antaŭ la domo. La nokto estis trankvila kaj serena. La plena luno

naĝis kviete en la mezo de la firmamento; la milda nokta venteto reve cirkulis tra arĝenta aero kaj kaĵole susuris tra la folioj de la tilioj.

Elvira suferis pro terura malĝojo, ŝia koro plenplenis de doloro kaj spleno. Ŝia animo amis Markon per nemezurebla ardo; ŝi vivis kaj suspiris nur pro li. Sen Marko ŝia vivo aspektis trista kaj vana, samkiel la soleca cipreso ĉe la tombo de ŝia patrino en la lunlume vualita valo. Marko estis ŝia ĝojo, ŝia arda suno, en lia brakumo ŝi forgesis ĉian doloron kaj malbonon, kiu ĉirkaŭis ŝin.

Elvira rimarkis Markon en sia dekkvina jaraĝo; ŝi sopiris al li kaj aspiris lin ĝis kiam ankaŭ li enamiĝis al ŝi. Ŝia patro sendis ŝin al Milano, en faman inan edukejon, sed ŝi kutimis ĉiujare veni al Luĉica kaj tie ŝi pasigis po du monatojn de sia ferio. Ok jarojn ŝi studis en Milano, kie la instruistoj admiris ŝin pro diligento kaj intelekto. En la dekseka jaro ŝi verkis poemgirlandon, kiun Italujo verve gratulis. Nun, en la deknaua, ŝia plej ŝatata libro estis la senmorta poemaro de Dante. La povra knabino ofte komparis la suferojn en la infero de Dante, kun siaj, kaj ŝi ĉiam konvinkiĝis, ke ŝiaj estas pli teruraj kaj hororplenaj. Kiomfoje ŝi jam klinis sian kapon senforta super la poemo pri Ugolina!

Elvira kaj Marko jam du jarojn sekrete ĝuis reciprokan amon, ili arde sopiris unu pri la alia, iliaj vizaĝoj brulis en dolĉaj brakumoj kaj varmaj liptuŝoj, kaj ĉiufoje, kiam ili pensis pri la estonto, ilia sango frostis kordolore...

Antonio, la fidela Antonio, nur li sola sciis pri ilia sekreta amo. Ili tute konfidis al li, ĉar se oni eĉ tranĉus lin, li ne malkaŝus la sekreton.

Elvira preskaŭ ĉiuvespere eliris promeni en la ĝardeno ĉir-

kaŭ la domo kaj ĝui freŝan noktan aeron. Ŝi ofte plendis antaŭ la patro, ke ŝi ne povas en la lito fermi siajn okulojn, kaj tial ŝi devas iom promeni por laciĝi, por povi endormiĝi. Ŝia patro, samkiel la servistaro, tute ne konjektis, ke Elvira renkontiĝas kun la ĉarma Marko, kiun ŝi amis per sia tuta ĉasta virgulina animo, kiel iam la unuaj kristanaj martirinoj amis sian konfesion.

Sur la kampanilo en Luĉica lante batis la dekunua horo. Elvira ĉirkaŭrigardis ĉiuflanken, ekrigardis al la fenestroj kaj vidinte, ke ĉie estas mallume, ŝi kaŝe malaperis malantaŭ la angulon de la domo kaj eniris en la arbareton, kiu sterniĝas sur la montosupro ĝis la ŝoseo, kiun Saletti konstruigis apud sia palaco. Sub la monteto kurbiĝas la imperiestra ŝoseo. La domfronto estas al la maro direktita, kaj antaŭ ĝi, kiel jam konate, etendiĝas malgranda ebenaĵo. Malantaŭ la domo troviĝas densa ĝardeno, ĉirkaŭ tricent paŝojn larĝa; post la ĝardeno estas ŝoseo, kiu descendas al la imperiestra ŝoseo, tiam granda ravino, kaj laste ĉefunde troviĝas apika roko.

En la arbareto post la sinjora domo displektiĝas reto de vojetoj, kiuj kurbiĝas kaj kruciĝas multmaniere. Apud la stretoj vojetoj surŝutitaj per blanka sablo, pleje elkreskis densa laŭro, kies branĉoj supre kuniĝas meze de la vojetoj por formi iaspecajn verdajn volbojn. Tiuj misteraj padoj tre similas al longaj koridoroj de antikvaj monaĥejoj. La lunlumo pene traŝoviĝas inter la densan branĉaron; nur ie-ie ĝi lumas sur la blanka sablo, kvazaŭ grandeta ora makulo. Inter la malluma laŭra verdaĵo blankas kelkaj skulptaĵoj. Al tiuj malvarmaj difektitaj grekaj diinoj estas lumigitaj ĉu kapo, ĉu ŝultro, ĉu duono de vizaĝo, rompita nazo, aŭ duono de brusto kaj kruro sur kiu iuj fingroj estas difektitaj.

Ju pli for de la domo, des pli rapide Elvira marŝis. Sub la etaj ŝuoj grincetis blanka sablo. De sur unu padeto al la alia, kaj ŝi fine venis sur la ebenaĵon. Tie la lunlumo surverŝis ŝian belegan korpon. Nun ŝi denove rapidis kaj malaperis en la malluman laŭron. Iom poste ŝi eniris la plej kaŝan lokon de la arbareto kaj abrupte ŝi haltis antaŭ junulo kiu staris indiferente apogita ĉe la piedestalo de unu skulptaĵo.

—Marko! — ekflustris la knabino kaj, klininte sian kapon, ŝi mallevis siajn manojn apud la svelta korpo.

La junulo tenis siajn brakojn krucitajn surbruste, li staris senmove rigardante al la tero.

(Ekstis kortuŝaj scenoj inter Elvira kaj Marko, kiu sincere amis Elviran. Ŝi riproĉas al li, ke li plu ne amas ŝin, ĉar li ne volas pardoni la pekon de ŝia frato Alfredo. Fine, post longtempa diskuto kaj reciproka konvinkado ili interbrakumis sin, kaj tiel brakumitaj ili transiris en estonton. Tiel ili restis ekzaltitaj en sia belega amo, ĝis kiam ilia revado ĉesis pro susuro de branĉo)

—Kio okazas? — Elvira demandis tremante.

—Ĉu vi aŭdis?

—Jes.

La branĉoj denove eksusuris tute proksime. Elvira premiĝis al Marko.

—Ne timu, kara! — diris Marko, dum forta, malalta viro eniris la laŭbon. Liaj nigraj okuloj terure ekbrilis.

—Antonio! — ambaŭ ekmiris.

—Sinjoro, fuĝu! — ekflustris Antonio. —La servistoj povus trovi vin.

—Adiaŭ, kara Elvira! Iru, iru! Adiaŭ!

—Adiaŭ! — flustris Elvira.

—Morgaŭ! Elvira, morgaŭ! Je la sama horo, — diris Marko kaj li foriris kun Antonio.

Elvira deprimita kaj malgaja ekiris lante paŝante al la domo. Meze de la arbareto ŝin renkontis Luka kaj Lovro, ili humile salutis ŝin mirante, ke ŝi ankoraŭ ne enlitiĝis.

Veninte en sian ĉambron, Elvira peze senvestiĝis kaj endormis en febro.

VII

En la malgranda kaj modesta ĉambreto, sur la sama lito, sur kiu la sveninta Mato malfermis siajn okulojn, por plene ĝui la ĉarmon de Marija, nun kuŝas la maljuna Antun, ŝia povra patro. La marista familio estas serioze maltrankviligita, ĉar ĝia estro danĝere malsanas.

La malsanulon ofte vizitas la paroĥestro, Stipe kaj aliaj bonaj homoj. Jam pasis du tagoj, depost kiam la nobelo intencis malĉastigi lian filinon kaj makuligi lian honestan nomon. Tiu malfeliĉo terure batis lin. La singultado de Marija kaj la ĝemplorado de Jela ankoraŭ pli malfortigis la jam senpovan mariston. La negocisto Stipe, por konsoli la amikon kaj la baptopatron, instigis lin kaj riproĉis promesante al li, ke li mem iros al tribunalo, eĉ se necese al la imperiestro mem, por akuzi la sinjoron sur la monteto. Antun plenfide rigardis al la okuloj de Stipe tuŝante sian mallongan grizan barbon, kiu elkreskis sur lia pala kaj malfreŝa vizaĝo dum tiu mallonga tempo de lia senpovo.

Venis gaja sabato. Brila matena suno apogis siajn radiojn al la fronto de la domo de Antun. Estas la naŭa horo. En la ĉambro regas milda duonlumo, kvazaŭ dum krepusko. Marija atente balais la plankon, poste ŝi fermis la malnovajn ŝutrotabulojn sur la fenestroj, por ke la lumo ne ĝenu la okulojn de ŝia patro. En la brilaj radioj, kiuj oblikve eniris en la ĉambron tra la truetoj de la malfirmaj ŝutroj, vibris kaj miksiĝis

kirlita polvo, kiu ne estis videbla ĉie en la grizeta kaj iomete roza aero en la ĉambro, sed nur ene de tiuj rektaj sunstrioj. Ĉar la truetoj estis plejnombre rondaj, ŝajnas, kvazaŭ oni surŝutis kelkajn diversgrandajn orajn monerojn sur la plankon kaj sur la liton. Tiuj oraj makuloj malrapide movis sin, malgrandiĝis, vastiĝis, iuloke malaperis kaj reaperis brile aliloke. Ili longiĝis kaj rampis sur la litkovrilon, sur la kusenon kaj sur la magrajn kaj nigriĝintajn manojn de la malsanulo.

—Marko, ĉu Stipe foriris al Rijeka? — demandis la patro per febla voĉo.

—Li ne foriris; mi jam parolis kun li hodiaŭ, li diris, ke li iros post du aŭ tri tagoj, — respondis Marko legante libron kaj rigardante la vizaĝon de la patro.

—Ne estus bone prokrasti tiujn aferojn. Kiam Antonio pren- nis la pafilojn de tiu krimulo? Ho ve, mia menso forlasas min!

—Antaŭ hieraŭ, paĉjo!

—Ĉu vi ne povas iri al la tribunalo?

—Kial? Ja vi scias, ke mi estas ege malfavorata de tiuj sin- joroj.

—Kial do, kara filĉjo?... Jes, jes, mi scias, ke tiuj sinjoroj malamas vin; pri ĉio kulpas la gazeto, la mensogoj, senditaj perpoŝte, mi mem ne scias de kie. Ho, kiel mi deziras deter- mini nin fine, nur se Dio donus sanon.

—Jes, kara paĉjo, vi pravas!

—Sed kial vi zorgas pro aliaj, kara filĉjo? Sciu, dum mia tuta vivo mi spertis nur malbonon post malbono!

—Ĝuste pro tio ni devas klopodi plibonigi la staton de nia popolo.

—Filĉjo, mi ne estas tiel saĝa kiel vi; mi estas maristo! Mi

ne studis tiom da jaroj kiel vi, sed multon en la mondo mi vidis...

—Ĉu en la tuta mondo estas ĉie same kiel ĉe ni?

—Kiom mi scias, ne estas; ili estas propravolaj homoj, ili estas propraj mastroj en siaj hejmoj.

—Ja kial ni same do ne mastras niajn hejmojn.

—Neniam, filĉjo!... Ĉu vi memoras, kiel via patrino ploris kaj kriegis timante, ke oni rekrutos vin; antaŭ kvar jaroj, ĉu vi memoras? He, mi vidis, kiam mi iam estis en Marsejlo, kiamaniere francoj volonte aliĝis al la militservo. Kvazaŭ ili irus nuptofesti! Ne, niaj najbarinoj ne kredus al mi, se mi tion rakontus al ili!

—Ankaŭ ni estas vilkoraj, kara paĉjo! Ja vi konas la odon el la dalmata libro.

—Jes, jes, de Kaĉiĉ, en dalmata boato stiristo ne vakas, same ankaŭ la libro de Kaĉiĉ. Sed auskultu, Marko! Oni diras, ke unu juĝisto devenas el Dalmatio; se li apartenas al ni, eble vi povus ion fari ĉe li.

—Mi konas lin; li ne apartenas al ni! — Marko svingis permane.

—Nu, konsentite, Stipe ekiru! Li estas estimata kaj honesta kaj li ne timas tiujn, kun kiuj ni ne povas konversacii! Ja, povraj ni estas! En multaj lokoj, kiujn mi vizitis, eĉ en Londono mem, oni parolas la saman lingvon, kaj riĉuloj kaj malriĉuloj. Nu, kial mi babilas. Pri tiuj aferoj vi scias pli ol mi! Nu, kie troviĝas la oldunjo kaj Marija?

—Ili foriris en la ĝardenon; ili revenos baldaŭ. —Paĉjo, mi devas iri en la poŝtoficejon.

—Iru, filĉjo, alportu la mensogojn! — la patro afable ekridetis.

Marko eliris kaj ekster la domo trovis Antonion, kiu sidante sur la tero plektis grandan vergokorbon.

—He, Antonio, kion vi plektas?

—Nason.

—Ĉu vi baldaŭ finos?

—Baldaŭ.

—Aŭdu, Antonio! Ne decas, ke vi ne konfidas min.

—Kial ne?

—Mi tre petis vin diri sincere al mi, kial vi ĉinokte venis en la arbareton. KREDU al mi, ni abrupte ektimis, ŝi kaj mi.

—Pro mi?... Parolu pli mallaŭte!

—Kompreneble! Pripensu, je la unua horo post la nokto-mezo! Ni renkontiĝas tie jam du jarojn, neniuj iam trovis nin!

—Se mi ne estus veninta, la servistoj trovus vin.

—Ĉu vi opinias, ke ili ekflaris ion?

—Kion?

—Ke mi renkontiĝas kun ŝi.

—Ili ne ekflaris.

—Antonio, mi ne komprenas vin!

—Ne utilus kompreni, se tiel ne estus.

—Diru al mi ion ajn, mi vane cerbumas!

—Jes, mi diros "ion ajn": de nun, kiam ajn vi intencos renkontiĝi kun ŝi, vi anoncu vin al mi.

—Por anonci min al vi ĉiufoje? Mi anonciĝos, tamen diru, kial?

—Jes, por gardobservi.

—Ĉu ili antaŭsentas ion; ĉu ili rimarkis vin, kiam vi portis leterojn?

—Ili ne rimarkis.

—Antonio, parolu, mi petas!... Ĉio tie okazanta rilatas al mi.

—Al mi tio rilatas eĉ pli.

—Parolu!

—Iun vesperon, estis jam malfrue, mi aŭdis konversacion inter la juna nobelo kaj la servistoj...

—Kion vi aŭdis? — Marko demandis paliĝinte.

—Li dungis ilin por mortigi min, — stoike flustris Antonio.

—Kion? — Marko skuiĝis retroire je unu paŝo.

—Jes, por ke ili mortigu min. De tiam mi iris ĉiun nokton, ankaŭ se mi ne portis leteron, en la arbareton antaŭ la domo, kaj tiel mi aŭdis ĉiujn iliajn planojn.

—Sed, ĉu vi ion aŭdis pri mi?

—Ne.

—Mi ne komprenas, kial ili mortigus vin.

—Ĉar mi ĝenas lin en liaj intencoj pri via fratino.

—Mi ĉion komprenas! Jes, ĉion...

—Probable.

—Antonio!

—Ĉe Stipe mi hieraŭ trovis Lovron, la koĉeron, ĝuste kiam li ŝanĝis multvaloran monbileton kontraŭ pluraj malplivaloroj. Stipe donis al li cent forintojn, kaj mi diris, ke mi scias la devenon de tiu ĉi mono. Li tion certe diris al Luka, kaj ambaŭ suspektas, ke iu aŭdis ilin marĉandi pri mia kapo. Mi opinias, ke ili tial ĉinokte krozis ĉirkaŭ la domo.

—Jes tial certe! Ili krozis por vidi, ĉu iu trenas sin ĉirkaŭ la domo.

—Ili devas ne ekscii, ke mi aŭdis ilin.-

—Kial?

—Ili postsekvus min, kaj kiu portus viajn leterojn?

—Vi pravas! Jen, mi ne pensis pri tio! Antonio, dankon! Sed, kion vi intencas nun?

—Gardi mian haŭton kaj ne pekigi mian animon. Se ili fripone atakos min, mi defendos min per tiu ĉi tranĉilo. Mi devas ne akuzi ilin, ĉar mi ne havas atestantojn, eĉ se mi havus, mi ne farus tion, ĉar tiam oni ekscius, kiel mi aŭdis iliajn interparolojn kaj kial mi iris tien. Se mi akuzus ilin, mi devus ne porti viajn leterojn, kaj ŝi tiam plorus..., — Antonio ne findiris, ĉar li rimarkis la komunuman serviston Tompiĉon, kiu alvenis laŭ la streta strateto. La iranta Tompiĉo ne iris samrapide, li kutimis iom kuri, kaj poste iri pli malrapide. Tia estas lia kutima irado.

—Bonan matenon, Miro! Kia novaĵo, — Marko salutis kaj demandis Tompiĉon.

—Bonan matenon, bonan matenon, sinjoro! Kiel vi dormis? Min ĉi tien sendis la sinjoro urbestro; lia edzino diris, ke mi kuru, kuru, sed mi flugis, vi ja vidas, ke mi paroli ne povas, — Miro siblis kaj mallerte svingis sian kapon kaj kunpremis la palpebrojn.

Tompiĉo estis plurjara viro. Lia korpo estis longa, la kruroj mallongaj, la ŝultroj mallarĝaj kaj ekterordinare mallevitaj.

—Miro, kiu donis ĉi tiun longan jakon al vi? Mi vetus, ke ĝi ne dolorpremas vin sub la akseloj? — Marko ekŝercis sindevige.

—Ĝin donis al mi la sinjoro urbestro. He, estus pli bone, ke ĝi estus iom larĝa! — respondis Miro, gladante ĝin ĉiuflanke permane, kvazaŭ oni lavus ĝin per sapo.

La urbestro ampleksis je tri tiaj Miroj.

—Pro kio Murelli sendis vin ĉi tien? — demandis Marko.

—Li sendis min, ja vi scias! Jes, mi estis hejme; mi razis

min, la sinjoro urbestro alvokis min, kaj lia edzino, la sinjorino Anastazija, sendis min ĉi tien, jes, pro la pafiloj...

—Kiaj pafiloj? Miro, vi frenezas!

—Fre... fre... frenezas! Mi frenezas! Pete, sinjoro Marko, aliaj, aliaj frenezas, ne mi! He, ĉu vi havas cigaron? Jes, pafiloj! La sorĉistino sendis min! Antonio, iru, iru al la urbestro.

—Mi venos! — respondis Antonio plektante la nason.

—Sciu, tuj! Li sakros al mi, se vi ne venos. Li ordonis, ke vi tuj venu kaj kunportu la pafilojn. Ne timu, Murelli ne estas malbona!

—Jes, tuj! Antaŭ la lasta juĝotago! — promesis Antonio.

—Bone, bone! Nenia malbono okazos al vi. Sinjoro Marko, dio donu sanon al vi, adiaŭ! Mi foriras. Memoru, la pafilojn, — salutis Miro kaj foriĝis saltetante.

—Antonio, vi ne iros al la urbestro!

—Mi ne iros.

—Hodiaŭ mi iros tien sur la monteton.

—Mi aŭdis tion ĉi nokte, kiam vi disiĝis de ŝi.

—Sed, kien vi?

—Mi zorgos, ke iu surprize ne trovu vin.

—Antonio, mi ne scias, kiel danki al vi!

—Je la dekunua?

—Jes, je la dekunua.

—Mi atendos vin.

—Antonio, adiaŭ!

—Feliĉon!

Post kelkaj momentoj Marko venis antaŭ la domon de la negocisto Stipe, kiu inspektis grandajn barelojn en la korto, sur kiujn la laboristoj batis ringegojn.

—Ho, Marko! Bonan matenon! — Stipe mansvingis al li.

—Vi ĉiam laboras!

—Ne ĉiu ĝuas kiel vi! Sed, kien vi ekiris?

—Venu kun mi! Mi iras al poŝtoŝicejo.

—Ĉu vi atendas letereton el Vieno?

—Stipe, vi estas bonhumora.

—Ja, kial ne esti tia? Kie do estas pli bele en la mondo ol en Luĉica? Paco, riĉa popolo, honesta kaj justa sinjoraro sur la monteto; kial aspiro pli? Marko, ĉu vere estas tiel?

—Jes, jes! — suspiris la junulo.

—Atedu iom, ke ni iru kune.

Post kiam ili alpromenis sur la ŝoseon, ili haltis antaŭ domo, kie en teretaĝo troviĝis la poŝtoŝicejo. En eta ĉambreto maljuna poŝtoŝicisto preparis, kunligis kaj sigelis tri aŭ kvar leterojn. De sur la ŝoseo oni facile povis vidi lian enpensiĝintan kapon, ĉar la fenestro estis tute malfermita.

—Bonan tagon, sinjoro Miko, ĉu venis iu poŝto? — demandis Stipe.

—Lasu min nun! Kial pro diablo vi ĝenas min? — ekkole-
ris la poŝtoŝicisto. —Ĉu vi ne vidas, ke mi havas multe da la-
boro? Bonan tagon! Jes, unu poŝto pasis, tiu el Pazin, kaj nun
ĝisknarus unu el Rijeka, — li diris rigardante tra la okulvitroj
la horloĝon pendantan sur la muro. La horloĝo surhavis nur
unu montrilon, eĉ tiun rompitan.

—Miko, vi estas strangnatura! Pro kiu diablo vi koleras? —
Stipe diras ŝerce.

—Senzorgaj vi estas! Vi ankoraŭ ne spertis la guston de la
imperiestra pankrusto. Se mi faros ion malkorekte, ĉu vi pa-
gos kvincent monerojn pro tio? Nu, kiom signifas por vi la
kvincent moneroj! Sed ankoraŭ tricent naŭdek naŭ foje tiom
egalas mia tutjara salajro!

—Ĉu venis letero el la direkto de Pazin?

—Unu; sed pli multaj venos el Rijeka, — diris la poŝt oficisto malgaje.

Ĉimomente aŭdiĝis grincetado kaj knarado de malgranda poŝta ĉaro. Pasis ioma tempo, kaj antaŭ la poŝtoficejo haltis magra ĉevalo, tute ornamita per kverkaj branĉoj por ke muŝoj ne mordu ĝin. Se oni petus ciganojn ŝteli ĝin, ili indignus pro ĝia arogo. De sur kvazaŭ rakita ĉaro saltis sur la ŝoseon la postiljono Janez, li salutis la sinjorojn de Luĉica, malfermis la malfirman keston, kaj eltirinte el ĝi flavan ledan tekon li portis ĝin en la domon.

Estis varme ĉi-tage. La ĉevalo ŝvitis pro malforteco. Rimarkinte tufon da herboj rande de la ŝoseo ĝi tiris la ĉareton post si kaj komencis mordi kaj maĉi la herbojn. Dume la poŝtoficisto elŝutis la leterojn el la sako. Li atente nombris ilin kaj rigardis ĉu iu estas destinita al Luĉica. Tra la fenestro li etendis sian kapon anoncante per indiferenta voĉo al la sinjoroj atendantaj sur la ŝoseo:

—Neniu!

—La tuta mondo forgesis pri Luĉica! — ekridetis Marko.

—Ni ne fordonu nin! Morgaŭ certe venos io, — Stipe konsolis sin. —Mi esperas... ho, jen ili! Trafspeca kompanio! — li flustris post kiam li rimarkis la urbestron kaj Alfredon de Saletti iom fore sur la ŝoseo.

—Stipe ni foriru! Mi ne volas renkonti ilin, — Marko ekiris paliĝinte vizaĝe.

—Ili opinios, ke ni timas ilin!

—Ni foriru, Stipe! Ili estas abomenindaj, kaj vi konas la impertinentecon kaj malĝentilecon de Saletti. Ni kverelos certe, sed nun ne estas oportuna tempo.

—Se ni estos devigitaj pugnobati, ni rompos iliajn nazojn!

—Stipe, mi terure ekscitiĝis.

—Trankviliĝu, ne kondu tu kiel infano. Jen, kvazaŭ du kanajloj! Jes, ili destiniĝis ĉi tien.

Ĝus atingis Alfredo kaj Murelli.

—Bonan tagon, sinjoro Stipe! Bonan tagon, sinjoroj! — aŭde salutis la rondforma urbestro kaj eniris en la domon.

Stipe kaj Alfredo intersalutis nur geste, per ioma levo de siaj ĉapeloj.

—Kiam vi, sinjoro Stipe, iros al Rijeka? — demandis la nobelo per varia voĉo.

—Ĉu vi ion deziras? — diris Stipe abrupte.

—Jes, mi bezonus la librojn, kiujn mi donis al vi antaŭ du semajnoj. Mi petas vin, demandu la librobindiston, ĉu ili estas jam riparitaj. Mi ne scias lian nomon. Mi petas vin, diru al mi la nomon de la librobindisto, por ke mi skribu al li, aŭ vi alportu al mi la librojn, — diras la nobelo spektante sian bastonon. Li estis tre perpleksita.

Marko turnis sin al la maro.

—Por ke vi legu dum tiu belega vetero! — sarkasme ekkriis Stipe. —Kiom ni scias, vi emas ĉasi, — li diris firme rigardante al liaj okuloj.

—Mi komprenas vin! Estus pli bone por vi, ke vi ne ŝercu!

—Mi ne ŝercas. Oni diras, ke ĉi-jare multiĝis leporoj, ili damaĝas surkampe, kaj mi opinias, ke oni dankos al vi, se vi pafus tiujn ĉasbestojn. Se vi ne posedas pafilojn, mi povas pruntedoni unu al vi.

—Vi estas impertinenta negoculo! — ekflamis Alfredo.

—Kanajlo! — la negocisto dentogrincis.

Alfredo rigidiĝis. Ĉi-momente el la domo haste eliris la di-ka urbestro, la poŝtoficisto kaj lia edzino.

—Ĉe la juĝejo oni ekscios, kiu estas impertinenta aŭ krimulo! — elbuŝigis Marko obtuze.

—Fripono, vi jam meritas pendumilon! — ekkriis Stipe.

—Notu, vi brutulo, kiu staras antaŭ vi! — elbuŝigis nun Alfredo per ridinda digno.

—Sinjoro Alfredo! — pacigis la urbestro.

—Brutulo mi ne estas! Via avo alvadis piednuda ĉi tien. Ankaŭ vi estus nuda, se vi ne ŝteladus kaj trompadus! — rabiis la negocisto.

Tiuj vortoj trafis Alfredon malfeliĉige.

—Stipe, lasu tiun arogantulon! — mansvingis Marko malestime.

Alfredo svingiĝis al li intencante frapi la vizaĝon, sed la negocisto forpuŝis lin per sia tuta forto for de la amiko.

Marko ekstremis, minacsigne mansvingis kaj ekkriegis:

—Kanajlo!

La urbestro prenis la nobelon subbrake kaj elirigis lin perforte kun si.

Luĉica malpacigiĝis denove, post kiam disvastiĝis la sciigo pri la kverelo antaŭ la poŝtofiĉejo. Ĉiuj pri ĉio riproĉegis al la sinjora palaco sur la monteto...

La saman posttagmezon Elvira ploris nedeteneble, aŭskultante la patron kaj la fraton kverelantajn kaj sakrantajn en la najbara ĉambro.

—Kial vi rilatas kun la brutuloj? Kia do nobelo vi estas? Vi surstrate disputas kun maristaj filoj kaj negoculoj? — kriis la maljuna Saletti.

—Ja mi jam diris al vi, ke mi hazarde renkontis ilin.

—Ne mensogu!

—Mi ne mensogas. Se mi evitus ilin, ili opinius, ke mi estas malkuraĝulo!

—Maltaŭgulo, vi kompromitis min!

—Ne riproĉu min! Kian pekon mi do faris?

—La tribunalo decidis pri tio. Hontindaĵo, hontindaĵo! La filon de Saletti akuzas maristoj! Hontu, Alfredo. Ankaŭ mi spertis la junaĝon. Malsaĝulo, vera senkapa muŝo vi estas!

—Ĉiu afero estas rebonigebla.

—Ankaŭ la fraton de la knabino vi insultis!

—Mi tute ne intencis, sed li kaj la negocisto incitis min.

—Ho, ili eksentos, kia estas la maljuna Saletti! Vi tamen estas mia posteulo, mia filo, mia sola filo. Jes, tiuj abomeninduloj devas estimi vin!... Kia miraklo! Ili protestas, rabias, ĉar vi ekdeziris junulinaĉon!

—Kial do vi riproĉis min tiome? Ĉu ne pli konvenas pace konversacii.

—Ega azenaĉo vi estas! Pri kio konversacii... La aferon oni devas kaŝi, sed oni bezonas tempon. Ili akuzos sendube; ili jam jubilas pri nia kompromitiĝo. Ho, ne ekzistas alia solvo krom malsukcesigi iliajn intencojn. Mi trovos atestantojn, kvin, dek, cent! Ja vi scias, ke mi tiun popolaĉon tute submetis.

—Malfacile; ĉi tiuj stultuloj ne volos atesti; sed, pri kio atesti?

—He! Facila afero pri tio! Ili atestu laŭ mia volo, aŭ ilia propraĵo aŭkciiĝos! Ĵurigitaj ili asertos, ke ili vidis, kiam la bas-

tardo, jes, la bastardo atakis vin... kaj forprenis vian pafilon dum ĉaso, kaj neniu junulino estis ie proksime.

—Patro, mi ne kredas, ke niaj servutuloj false ĵuros, ĉar vi scias...

—Ili ĵuros tiel! Ĉie ekzistas raciaj homoj.

—Se ni klopodos, mi komplete eltiriĝos el tiu ĉi koto.

—Jen, plej konvenus, ke vi foriru eksterlanden, dume mi kaj Murelli prokrastigos la aferon, kiel eble plej longtempe. Se estus necese, vi letterskribos el eksterlando, ke vi malsaniĝis, kaj vi ne povas reveni en la patrolandon.

—Sed, se la juĝistaro ne kredos?

—Vi aldonos en la leteron eĉ dekon da atestiloj de kuracistoj.

—Ĉu vi ŝatus, ke mi iru en Francujon?

—Laŭ via propra volo! Ju pli foren, des pli bone.

—Bone, al Parizo mi iros. Tio utilos al mi; mi ekkonos iom pli de la mondo. Mi scias, kara paĉjo, ke vi estas bona. Kelkfoje vi estas eksplodema, kaj via sango tro rapide ekbolas, sed tio estas heredaĵo. Aŭskultu, ni paciĝu!

—Fripono!... Ne disipu tro. Oni devas ŝpari eksterlande, — li diris rigardante en liajn okulojn etendante sian manon al li.

—Almenaŭ tricent forintojn monate, — proponis Alfredo.

—Bone, do tricent, eĉ ne unu moneron pli.

—Mi foriras?

—Kiel eble plej baldaŭ. Morgaŭ. Vi devas ne atendi la akuzon.

—Bone; morgaŭ!

—Alfredo eliris el la ĉambro. Lia vizaĝo respegulis ĝojon.

La maljuna Saletti rigardanta post li kaj kapbalancanta, enfoteliĝis, disvolvis iun larĝan gazeton antaŭ si kaj eklegis.

Li kovris sin preskaŭ tuta per la gazeto; nur la kruroj sub la genuoj videblis, kaj duono de la dikaj kaj vilaj fingroj surrande de la gazeto.

La juna nobelo eniris haste la ĉambron de sia fratino ride tante kaj tordante siajn dikajn nigrajn lipharojn. Sidante sur la divano Elvira kaŝis sian vizaĝon inter la molaj bluaj velurkusenoj.

—Elvira, kio okazas denove?... Vi ploras?

—Lasu min, vi malfeliĉigulo! — elflustris Elvira dolore.

Alfredo ektimis kaj rigardis ŝin mirante.

—Elvira, trankviliĝu... Mi foriros morgaŭ.

La knabino elbuŝigis eĉ ne vorton. Alfredo kapklinis, ŝultroskuis kaj enpenŝiginta silente eliris el la ĉambro...

Dum la vespermanĝo oni malmulte parolis.

Post la vespermanĝo Alfredo foriris al la urbestro Murelli, por ĝojigi sin ĉe glaso da vino. Al la patro kaj al la fratino li diris, ke li iros dormi. Murelli elkore ĝojis, vidante la junan nobelon. La urbestro havis bonegan vinon. La amikoj trinkis kaj ŝercis ĝis malfrue nokte, tre longtempe. Alfredo rakontis ĉi-aĵojn pri Parizo. La edzino kaj la filino de la urbestro fiere aŭskultis kaj admiris lin, kaj post kiam la oscedado intensiĝis, ili foriris dormi.

Alfredo ĉirkaŭrigardis la ĉambron kaj tiam vigle alrigardis la urbestron al la okuloj. La nobelo ion diris, sed li, la urbestro, dolĉe ekridetis, kaj komprenis aŭ ne komprenis tiun gravan rigardon.

—Multon vi disipas! Vi kolerigos vian patron, — flustris la urbestro.

—Murelli!

—Kiom?

—Kvincent.

—Granda sumo. Mi ne havas...

—Tss! Eĉ ne vorton! Murelli!

—Granda sumo! Vi jam ŝuldas al mi trimil kvarcent tri forintojn.

—En Parizo mi multe bezonos. Mi ne volas kolerigi la patron.

—Mi kredas, sed kvincent! Kvincent!

—Murelli!

—Tss! Por ke ne aŭdu la diablino.

—Via edzino?

—Jes, mia edzino; sed kiom vi pliigus super tiuj kvincent?

—Proponu.

—Sinjoro! Neniam! Neniam! Ĉu vi ne traktas min kiel amikon? Mia konscienco estis ĉiam senmakula. Se mi povas, mi helpos al vi, kiel amiko. He, se mi havus mian propran monon, estus facile! Mi devas peni! Kredu, mi ne ricevas sufiĉe eĉ por la tabako. Ja, kiom Maletti donas al mi? Du pocentojn!

—Maletti? Ĉu la urbestro en Jelenŝĉica?

—Jes, mi negocas per lia mono. Ek diru, kiom vi superdonos al li.

—Kvincent.

—Dum kiom da jaroj?

—Dum tri.

—Alloga monsumo, sed li koleros; sciu, ne estas sekure...

—Kial ne estas sekure?

—Ho, mi ne intencis ofendi vin.

—Kvincent, eĉ ne unu moneron pli!

—El kio vi intencas redoni tiun ĉi sumon?

—La propraĵo de Saletti valoras...

—Mi scias, milionon! Sed, se vi mortus pli frue ol via patro?

—Ha, ha, ha!

—Ĉio povas okazi! Post tri jaroj vi redonos al mi mil forintojn, ĉu jes?

—Jes! Se mi bezonos en Parizo?

—Probable! Vi skribu al mi!

La interkonsenton ili surmetis sub skriboplumon. La urbestro nombris al la nobelo kvincent forintojn. Ili poste longe trinketis kaj ŝercis, fidele, amike ĝis malfrua nokto, ĝis tre malfrua...

Jam noktomezo batis sur la kampanilo de Luĉica. En neniu domo oni vidis lumon, krom ĉe la urbestro. Sur la fenestroj de pluraj maristaj domoj rebrilis kvietaj lunlumo.

Malantaŭ la domo de Saletti, en la arbareto, flustris du viroj.

—Ĉu la juna sinjoro estas jam en la hejmo? — demandis Lovro.

—Mi opinias, ke ne. Sed kion signifas la rapida decido vojaĝi? — diris Luka.

—Al mi plaĉas lia foriro. Ni facile perlaboris kelkajn dekojn da monbiletoj.

—Ho ili povus kaŭzi al ni kapdoloron! Mi supozas, ke Antonio ĉi tie ĉirkaŭiras, kaj probable li kaŝe aŭskultis nin.

—Ankaŭ mi opinias tiel; ĉu alimaniere li povus scii, de kiu mi ricevis la centvaloran monbileton, kiun mi ŝanĝis ĉe la negocisto.

—Li nur diris, ke li scias la devenon de la tioma mono, sed li ne diris al vi, ke ilin donis la juna sinjoro mem.

—Parolu pli mallaŭte! Aŭskultu, ĉu io susuras?

—Mi aŭdas nenion, — respondis Luka.

—Eĉ se ni trovus lin, diru, kion fari tiam?

—Nenion; mi nur volas konvinkiĝi, ĉu vere li ĉi tie rampas.

—Tio certe estis Antonio, — ekflustris Lovro.

—Kiu? Kie?

—Rememoru, vi hieraŭ rakontis al mi, ke vi antaŭ kelka tempo vidis, ke iu de sur la ŝoseo kaŝis sin en la arbaro.

—Jes, mi vidis homon antaŭ mi sur la ŝoseo, sed li malaperis de antaŭ miaj okuloj. La homo havis la staturon de Antonio; sed, de tiam pasis jam longa tempo, pli ol duona jaro.

—Ni ekiru, Luka, ĉirkaŭ la domon kaj tra la arbareto ĝis nia ŝoseo. Atentu pri la branĉoj!

La servistoj komencis ĉirkaŭiri tra la arbareto irante unu post la alia, aŭskultante, mansvingante kaj trarigardante ĉiun anguleton. Ĉiu portis pezan bastonon.

Dum ili rampiris ĉe unu flanko, Marko kaj Elvira konversaciis ĉe la alia en la kutima loko, en la laŭbo.

La nokto estis belega. La luno jam alte leviĝis sur la ĉiela firmamento. Ĉarme fluis ĝia ora brilo laŭ la marebenaĵo. Reviga nokta venteto blovetis varme kaj mole en la vizaĝon de Elvira. La foliaro de la laŭroj tremetis, la rozoj malfermis sian sinon al la tenera roso, la steloj helis lukse, la brusto ŝveliĝis volupte, la revsopiroj tiriĝas tra la koroj, iaĵo am-alloga solviĝis tra la aminda aero, kaj la ombro de la alta kaj trista cipreso longiĝis laŭ la etaj montetoj sur la tombejo de Luĉica.

—Pardonu Elvira, mi ne povas plenumi vian deziron. Mi

oferus ĉion por via feliĉo, sed mian honoron mi neniam surtretos!

—Kian utilon vi havus, se vi akuzus lin? Marko, ne akuzu, obeu vian Elviran.

—Se vi amas min, vi devas ne postuli tion de mi.

—Ho, mi povra! Ja mi diris jam al vi, ke li morgaŭ foriros eksterlanden. Via fratino baldaŭ edziniĝos, dumtempe oni forgesos ĉion, kio okazis. Marko, aŭskultu min, plenumu mian peton! Pro kio inciti ankoraŭ pli grandan flamon de la malamo? Pardonu al Alfredo, estu nobla, kiel vi ĉiam estis. Marko, rigardu al mia vizaĝo, ne tiel malserene, ekridetu al mi, indulgu miajn larmojn!

—Elvira, trankviliĝu, ne ploru! Amu min, karulino, sed kun via frato mi...

—Ho, kiel senkompata estas via koro! Mia patro povas al vi... Vi ne konas lin sufiĉe.

—Neniun mi timas! Mia fratino estas ofendita, mia patri-no veas, via frato afliktis mian maljunan kaj malsanan patron, la popolo furiozas, dum vi volas, ke mi paciĝu, ke mi forgesu ĉion! Elvira, se mi tion farus, ĉu vi ne hontus antaŭ mi kaj antaŭ mia amo?

—El via koro parolas homa fiero kaj malestiminda venĝemo. Pardonu al li kaj kompatu lin! Marko, ĉu vi ne zorgas pri nia feliĉo, pri nia estonto? Ĉu vi ne povas ian oferon dediĉi al mi?

—Mi povas, sed la honoron neniam!

—Vi deziras venĝi al li; ĉu la venĝemo kongruas kun la honoro? Marko, estu nobla, estu pli taŭga ol mia frato! Alfredo faris grandan hontigon al via familio, li kondutas impertinente; mi ne protektas lin, mi ne defendas lin, sufiĉe mi preĝas

Dion por tiu malfeliĉigulo, sed mia animo suferas pro via senkompato, Marko. Mi ĉiam opiniis, ke via koro ne konas alion ol noblajn kaj sublimajn sentojn, sed nun mi ekkonas, ke vi okupiĝas pri trivialaj pensoj pri malgrava kaj onidire damaĝita digno.

—Elvira!

—Nu, vi akuzu lin, sed kio poste? Ĉu vi ne antaŭvidas, ke vi per tio malfeliĉigos vin kaj min? Mia patro rabios, li neniam permesos...

—Vi fuĝos el lia domo. Vi promesis al mi!

—Mi promesis... jes, mi promesis. Mi pretas ĉion fari, ĉar nur ene de via brakumo mi povas trovi pacon kaj senzorgon. Mi centfoje mortigus min, por ke oni kuŝigu min apud vi en la saman tombon! Marko, vi scias, ke mia koro sopiras al vi, sen vi mia vivo havus neniun sencon. Jes, mia dolĉa paradizo, rigardu ĉi tiujn larmojn, jes, vi la nura signifas ĉion por mi en la tuta mondo. Ho, mi povra! — ekploris Elvira.

—Karulinjo, trankviliĝu!

—Estos belega nokto, ĉi tiu arbareto kaŝiĝos en la mallumo, vi atendos min ĉi tie. Mi petegos mian patron, dirante, pri mia amo kaj pri mia tuta korĉagreno. Se li ne indulgos, mi forlasos la domon, kie mi naskiĝis... kie mortis mia patrino...

—Kara Elvira!

—La nokto estos belega, same kiel la nun, kaj se mi revenos ĉi tien, kiam mi brakumos vin por ekiri kun vi, la lunlumo ekflamos...

—Elvira, silente! Mi aŭdas ion... homojn...

Ili eksilentis.

—Iu kuras laŭ la ŝoseo malsupren de la monteto, — ekflustris Elvira.

—Malantaŭ la arbareto?

—Jes. Kiu en la nuna tempo estus ĉi tie?

—Mi ne scias... Probable Antonio, — respondis Marko, alklinante Elviran al sia brusto.

Sur la ŝoseo de Saletti, malantaŭ la arbareto, aŭdiĝis hastaj kaj pezaj paŝbatoj.

Marko kaj Elvira rigidiĝis, aŭdinte ekkrion:

—Bastardo! Kial vi vagas ĉi tie?

—Estas la voĉo de mia frato! — Elvira elbuŝigis.

—Ho ve, kanajlo! — tra la nokta trankvilo disvastiĝis vekrio.

—Pro Dio, kio okazas? — ekstremis la knabino.

—Silentu, Elvira!

Denove aŭdiĝis paŝoj de sur la ŝoseo.

—Aŭskultu, Elvira! Sur la ŝoseo troviĝas pluraj homoj. Nun ŝajnas, ke du homoj kuras de sur la monteto... Jen, denove silento; ili verŝajne haltis.

Kelkajn momentojn poste Elvira ekflustris:

—Aŭskultu, nun denove iu kuras, sed supren, sur la monteton.

—Jes, supren... Kio okazis?

—Ili ne estas ankoraŭ for de ni; ili troviĝas en la arbaro. Ili iras al nia domo. Marko, nekutima antaŭsento ekregas mian animon; malbono okazas!

—Mallaŭte, Elvira! Nun ili iras pli malrapide, jen ili troviĝas sur tiu pado. Jes, ili iras al la domo.

—Kie, kie? Mi ne vidas ilin; la arbareto estas densa... Jen, ili venis al la lunlumo! Ili kliniĝas kaj fleksiĝas! Marko, ili nun

ne estas malproksime... Jen, estas niaj servistoj, ŝajnas al mi... jes, niaj servistoj, Luka kaj Lovro, — flustras Elvira dismetinte la branĉojn de la laŭbo.

—Ĉu vi, Elvira, estas certa, ke tio estis la voĉo de via frato?

—Jes, certa. Sed strange; li diris al ni, al la patro kaj al mi, ke li enlitiĝos... Li verŝajne poste eliris. Jes, tio estis lia voĉo, sed kion signifas tio, ke ni ne aŭdas liajn paŝojn?

—Mi ne scias, — Marko zorgoplene respondis.

—Alfredo renkontiĝis kun Antonio...

—Certe; ja ni aŭdis, ke li atakis lin, dirante al li...

—Jes, ni aŭdis... Marko, mi tremas tuta.

—Elvira, trankviliĝu kaj ekiru hejmen. Morgaŭ ni vidos kio okazis.

—Mi volus, ke la servistoj ne rimarku min.

—La servistoj jam eniris en la domon. Iru, karulino, iru. Dolĉe dormu, mia bona Elvira. Iru, karulino, iru! Morgaŭ mi denove atendos vin ĉi tie, — Marko diris kun malfirma voĉo kaj kisis ŝin rapide meze de ŝiaj varmaj lipoj.

—Elvira ekiris laŭ mallarĝa pado, dum li rigardis post ŝi, ĝis kiam ŝi malaperis de antaŭ liaj okuloj. Marko sentis ian pezon ĉe la koro. Li enspiris profunde kaj per la mandorso viŝis sian frunton kaj enpensiĝis... Sur la kampanilo en Luĉica batis la dua horo. La junulo vekiĝis el siaj pensoj kaj eliris el la ŝirmejo kaj irinte tra la arbareto, li surpaŝis la ŝoseon, kiu descendis de sur la monteto al la imperiestra ŝoseo. Marko iris malsupren plena de zorgoj.

La ŝoseo estis surŝutita per blanka sablo. Ĉie ĉirkaŭe regis perfekta silento. Marko paŝis lante kaj rigardis al la ĉielo kaj al la arboj surverŝitaj de la lunlumo. Elvira kvazaŭ ŝvebis antaŭ liaj okuloj ene de la mirinda aero... Marko skuiĝis neatent-

dite kaj li haltis. Kelkajn paŝojn fore trans la ŝoseo, en la lunlumo, kuŝas surdorse homo. Marko alproksimiĝis kaj tuta ekstremitis. Alfredo. Sur la blanka ĉemizo kaj sur la brusto vaporis, pro la luna lumo, sango. La fortikaj kaj blankaj manoj, kiuj falis teren senmovaj, estis sangmakulitaj. Vitrecaj okuloj vaste malfermitaj gapis en la ĉarman nokton. La pala vizaĝo kaj la sangumita buŝo spasme aliformiĝis. Marko metis sian manon sur la frunton de Alfredo kaj li ŝtoniĝis. Ĝi estis malvarma.

—Sinjoro Saletti, ĉu vi aŭdas min? Sinjoro!... Mortinta!

Apud la kadavro sur la ŝoseo kuŝis pistolo. Marko ekstremitis, malvarma ŝvito surverŝis lian frunton. Li komencis pensi, kion fari. — Jes! — li kapbalancis kaj ekreiris supren sur la supron de la monteto. Li pasis tra la arbareto kaj venis antaŭ la domon de Saletti. La ombro kaŝis la fermitan pordon. Marko prenis sonorilon kaj forte skuis ĝin. Elvira kaj ŝia patro venas al la fenestro, malfermis ĝin kaj ili rimarkis homon antaŭ la domo. Nur Elvira rekonis lin en la ombro. Ŝia ĉambro estas for de la ĉambro de ŝia patro. Rimarkinte Markon ŝi surpriziĝis.

—Kiu sonoras? — ekkriis kolere la maljuna Saletti.

—Sur la ŝoseo, sub la arbareto kuŝas via filo en sango, — respondis Marko starante ĝuste sub lia fenestro.

—Kio!?

—Vidu, eble mi trompiĝis, eble li ne estas mortinta.

—Kiu vi estas? — demandis raŭke la patro.

Marko estis jam malaperinta de antaŭ la domo. Preterpasinte sub la fenestroj de Elvira, ŝajnis al li, ke iu ekĝemis. Elvira svenis kaj falis planken.

VIII

Se oni iras el Lučica, dum mateniĝo, al la norda direkto laŭ la ŝtonozaj padoj, kiuj volviĝas super la klifoplena bordo, oni ascendas sur hororaspektan rokaĵon, kaj la suno ĝoje ekbrilos. Kune kun tiu ĉi rokaĵo, paralele malsupreniĝas ankoraŭ unu super la maron, sed neniu etendas sin en la maron mem, sed ili falas vertikale kvazaŭ per hakilo tranĉitaj, en la tenebran profundan akvon. En la ravino inter tiuj ĉi du rokaĵoj, sed sur la suda flanko de la norda rokaĵo, videblas malnova sola domo, sub kiu fluas rivereto. Ĉirkaŭ la domo elkreskis aro da olivarboj, kaŝtanoj kaj figarboj. Super la tenebrajn riveretnodojn kliniĝas kaŝtanbranĉoj. Sur la suneksponita loko troviĝas iom da kultivata agro, sed se tie ne troviĝas ŝtonbaraĵoj, la torentoj ĉion forlavus ĝisŝtone, kiam peza nuboj malŝarĝas sin sur la rokaĵon. La norda rokaĵo ŝirmas la domon kaj la maldensan vitaron kontraŭ la ventegoj, kiuj ruinigus la malnovan tegmenton kaj pereigus junajn fruktoarbojn, kiam dum la kristnaskaj tagoj ventegoj kutime ekfajfas kaj ekfumias. Ene de tiu izolo loĝas la maristo Martin Koĵuliĉ kaj lia filo Joso, amiko de Antonio.

La nokto estis serena. La orienta duono de la golfo Kvarner troviĝis ankoraŭ en nebulo kaj en pala brilo de la luno, kiu jam alproksimiĝis al la Istria montego naĝante trankvile sur la blua ĉiela firmamento. Milda nokta venteto de sur la bordo glitis meze de la golfo, kiu nigris kvazaŭ larĝa strio. Ie

tie en la lunlumo rebrilis ondoŝaŭmo. Antonio, grimpante sur la rokoplenaj padoj, venis sur la supron de la rokaĵo, kiu elstaris vid-al-vide de la domo de Koĵuliĉ, kaj, sursaltinte klifon, li ekrigardis al la ravino. Tra la olivbranĉoj montriĝis iom da tegmento, parto de nigriĝinta muro kaj blankaj vitroj de fenestreto. Li decidis atendi la tagiĝon, kaj sidiĝis sur ŝtonon kaj la brakojn krucigis ĉe sia brusto. Ankoraŭfoje li rigardis al la kontraŭa deklivo por vidi, ĉu lumo videblas en la dometo de la maristo, li entiris sian kapon inter la ŝultrojn, kunpremis sin, rondfleksis sian dorson kaj komencis mute rigardi la maron.

Palaj kaj bluaj ondoj, malrapide moviĝantaj, venadis al la bordo, kie ili lante verŝiĝis plaŭdante kontraŭ la mallumaj klifoj. Antonio aŭskultis la verŝadon kaj rigardis al la malproksimo, al la oriento, de kie li atendis konsoligan lumon. La ombroj de la luno etendiĝis pli kaj pli sur la marebenajon, kaj fine ili atingis la insulojn kaj la karstan kalvaĵon de Velebit. Antonion ĉirkaŭis mallumo. Li denove rigardis orienten; liaj okuloj estis tute malfermitaj, lia dorso estiĝis rondforma, li tuta fleksiĝis. Lin ekkaptis timego; ŝajnis al li, ke ies kapo leviĝis el sub la eĝoj de la klifoj, kaj, ke iu kliniĝas kaj kurbiĝas inter la ŝtonegoj kaj klifoj, kiuj elstaras antaŭ li en la mallumo sur la soleca rokaĵo. Li surprizege rigardis kaj pro hororo krucoŝignis sin, sed vane, ĉar ŝajnis al li, ke li aŭdas iun ĝemanta raŭke kaj dolore, ke iu suspiras ie ĉirkaŭe inter la klifoj kaj la piceoj. Li turnus sin, se li povus, por rigardi en la ravinon, ke li vidu, ĉu en la marista domo jam lumas, sed li kvazaŭ ŝtoniĝis, hororo atakis lin, terurtremoj kaptis lian korpon. Li ektemis tuta, ĉar ŝajne io flirtis, io ĉirkaŭflugis, kaj kiam li eksentis ies varman elspiron sur sia nuko, ies misteran tuŝon

sur sia dorso, li rapide saltis de sur la ŝtono, ekkaŭris sur la teron, lia hararo hirtiĝis, li kaŝis sian vizaĝon, li komplete kunvolvis sin. Nun Antonio estis vera bulo el homa karno, en kiu tremas ĉiu vejneto, en kiu spasmas ĉiu nervo. La sango muĝis en liaj oreloj, la tenacajn fingrojn li enpikis en sian krispan hararon, ĉar iu vekriis tie surstrande sub la rokdeklivo, ĉar sur la ŝtonaro ĉirkaŭ li iaj malklaraj estaĵoj akriĝis tranĉilojn. Li sentis gutojn de tepida sango sur siaj manoj, li viŝis la manojn ĉe sia ĉifonita pantalono, li krucosignis sin kaj pensis pri la kliforando. Li volus ekstari kaj alkuri al la rando, por ĵeti sin en la malvarman maron, por forgesi ĉion en la akvo, ke ĉesu la teruraj turmentoj, sed sur la malluma strando inter la rokoj transverŝis sin akvo, ĝi verŝiĝis lante, kvazaŭ glu-glante en ekmovita kadavro. Antonio provis ekstari, sed li ne povis eĉ moviĝi, io kateniĝis lin al la granda ŝtono, antaŭ kiu li volviĝis. Li rigardis al la maro kaj li tuta ektemis. El la blua surfaco elmontris sin du blankaj brakoj. Antonio pene ekstaris, preninte sian koron, li apogis siajn nigrajn kaj grandajn okulojn al la brakoj. Nun ankaŭ kapo montriĝis el la maro. La frunto estis frakasita kaj pala; la disbatitaj lipoj ridetis al li. Antonio rigardis konsternite al la konata vizaĝo. La brakoj svingis kun sangigita tranĉilo, lavis ĝin en la maro, kaj svingis denove. Ĝi akra eĝo ekbrilis pure kaj hele, tiam ili forĵetis ĝin al la deklivo. La tranĉilo eksiblis tra la malluma aero, kaj frapinte kontraŭ la ŝtonaro sur la deklivo, ĝi ektintis kaj komplete dispeciĝis. Antonio kaŝpremis sin sub la roko...

Post kiam li malfermis la okulojn, li rimarkis la serenajn ĉielon oriente. Li ekstaris, rigardis al la ravino, kaj vidinte lumon en la domo de la maristo, li ekkuris malsupren laŭ la deklivo. Transpasinte la trabon, la ponton sur la rivereto, li

paŝis pli malrapide al la oblikva kampo al la domo. Kiam li proksimiĝis al la fenestro de la teretaĝa dometo, sur lian vizaĝon falis flamolumo tra fumigitaj vitroj. En la fumplena kuirejo, ĉe malalta fajrejo sidis griza kaj magra homo ĵetante sekajn branĉojn en la fajron. La branĉetoj kraketis kaj klakadis kaj la flamoj flagris alten kaj lekis la nigran feran ujon, kiu pendis je longaj ĉenoj. Ankaŭ la vizaĝon de la maljunulo prilumis la arda flamo.

Antonio ekfrapis kontraŭ la vitro, dum la maljunulo skuiĝis kaj tute malferminte siajn okulojn, li ekrigardis al la fenestro demandante:

—Kiu dia kreitaĵo?

—Martin, estas mi!

—Antonio, ĉu via voĉo estas tio?

—Jes.

—Kie estas Joso?

—Mi ne scias.

—Ĉu vi ne kaptis fiŝojn kun li?

—Ne. Malfermu!

—Jen, tuj, tuj!

La majunulo turnis ŝlosilon en la seruro, kaj kiam post longa tempo li sukcesis malfermi, li plendis:

—He, se la ferpeco en la seruro forglitas, la ŝlosilo ne povas kroĉi ĝin. Kio okazas al vi, Antonio? Vi do ne kaptadis fiŝojn ĉinokte?

—Mi ne kaptadis.

—Ja via vizaĝo aspektas kvazaŭ oni eltirus vin el toloblan-kigujo! — rimarkis la maristo, balancante per sia kapo. — Sidiĝu, Antonio, sidiĝu, — li daŭrigis, — sed kia feliĉo aŭ mal-feliĉo pelas vin ĉi tien? He, kia vetero estas ekstere? He, bela,

bela! Mi rekonas ĝin laŭ la fumo; jen ĝi plenigis la domon! Jes, jes, la vento blovas de sur la bordo. Hieraŭ vespere la suno subiris en serenaĵon. Plej konvene por navigi orienten! Sed la akvo neniel volas ekboli. Mi volus ekfumi pipon, sed ne antaŭ ol iome trinki, ne ĉe malplena stomako. Antonio, unu kulero da kafo estas bona substanco por sendormigi sin kaj purigi la gorgon.

—Kie estas Joso? — Antonio demandas gapante al la fajro.

—Li foriris fiŝkapti. He, li baldaŭ venos! Kia rabio atakis vin, Antonio? Aŭskultu, kial vi rigardas min tiel strange? Vi aspektas kvazaŭ falinta de sur mastosupro al la ferdeko!

—Martin! — Antonio elbuŝigis malklare.

—Kio! — ektimis la maristo kaj elŝovis siajn okulojn al li.

—Mi devas ne iri al Luĉica.

—Kio, vi devas ne iri?

—Jes, mi devas ne iri al Luĉica.

—Kiu malpermesas al vi?

—Aŭskultu, Martin...

—Ant... Antonio!

—Vi kaŝos min en via domo.

—Ĉu kaŝi, kaŝi?

—Jes, en via domo.

—En mia domo! Ho, al diablo ankaŭ kafo! Jen, mi stulte bruligis min! Kion, kion vi diris? Kaŝi?

—Jes, mi devas ne plu iri al Luĉica.

—Ĉu vi, ĉu vi devas ne iri?

—Tie oni kaptus min kaj oni transdonus min al ĝendarmoj.

—Kial al ĝendarmoj!?

—Jes, sciu, Alfredon...

—Salettin?

—Mi ĉinokte lin...

—Antonio!

—Li estas mortinta probable.

—Li mortinta! Ĉu vi lin?

—Jes.

—Mortigis?

—Jes, mi mortigis lin.

—Ĉu vian fraton! — Ekkriis la maristo, kaj liaj okuloj ekbrilis.

Antonio ŝtoniĝis elŝovinte siajn okulojn al la maljunulo.

—Ĉu... Fraton?... Li estis mia...?

—Jes, li estis via frato, — flustris la maristo, kaj lia kapo kolapsis brusten.

—Mi estas trovito, — elbuŝigis Antonio malklare.

—Jes, trovito, jes, filo de Saletti... Ho, mia povra edzino! — ekĝemis la maristo kovrinte sian vizaĝon per la manoj.

—Edzino! Frato!... Frato!... Saletti!... Via edzino... edzino!
—Mi ne konis ŝin.

—Vian patrinon!... Ne, ne, vi ne konis ŝin; ŝi mortis naskinte vin, dek tagojn poste, jes, dek tagojn. Ho, povra ino!

—Via edzino!... Saletti!... Jes, jes, la koĉero de Saletti, jes, li rakontis, jes, mi aŭskultis...

—Pri kio, kie li rakontis?

—Lovro, jes, li rakontis, ke la maljuna sinjoro nokte vizitadis iun virinon, ke li havas filon kun ŝi...

—Ho, malfeliĉa virino!... Jes, tiel estas. Antonio, aŭskultu min! Mi forestis de la hejmo dum kvin jaroj, mi navigis. Kiam mi ekiris velŝipe el Triesto, Jose ĵus naskiĝis. Jes, kvin jarojn mi forestis de mia hejmo!... Saletti rimarkis mian edzinon, ŝi estis juna kaj bela, la fripono tentis ŝin kaj perfortis, ĝis mal-

ĉastigo. Kiel ŝi ja povis defendi sin en tiu ĉi izolo?... Mia mal-feliĉa Marica! Antonio, jam pasis tridek jaroj de tiam, pro ŝi mi ankoraŭ nun sentas kordoloron, kvankam ŝiaj ostoj jam putriĝis en la tombo! — ĝemis la griza maristo.

—Mi estas trovito... trovito...

—Pri via naskiĝo neniuj sciis, krom ŝia onklo Kata.

—La maljuna Kata, ŝi sciis?

—Jes, la maljuna Kata ĉion sciis. Mia edzino refortiĝis post tri aŭ kvar tagoj post la nasko, sed Kata, por kaŝi la hontigon, prenis vin iun nokton kaj forportis vin en Trieston. Ŝi metis vin en fenestron de la orfejo.

—En fenestron de la orfejo?... Jes, jes, la trovito...

—Jes, en fenestron. Sed, Antonio, aŭskultu! Por ke ŝi povu repreni vin el la orfejo, ŝi pendigis ringeton ĉirkaŭ vian kolon. Kiam Kata revenis el Triesto en tiun ĉi povran dometon, ŝi trovis mian edzinon mortonta. Marica mortis post kelkaj tagoj...

—Per tranĉilo, jes, per tranĉilo, tiel, — Antonio elpremis la vortojn kaj etendis sian dekstran brakon al la flamoj.

—Oni enterigis Marican kaj diris: Ŝi mortis same kiel ni ĉiuj mortos!

—Kiam mi enŝovis la tranĉilon en lin, ŝajnis al mi, ke mi ion distranĉis en li...

—Kata prenis la etan Joson en sian hejmon, kaj pro la ĵuro al mia edzino, ke ankaŭ vin ŝi kunprenos, ŝi foriris al Triesto, por pridemandi pri vi, menciante pri la signo, kiun vi surhavis ĉirkaŭ la kolo...

—Jes, mi murdis, mi murdis...

—Oni trovis kaj donis vin al Kata, kiu alportis vin ĉi tien. La luĉicanoj kredis kaj ankoraŭ kredas, ke vi estas trovito, ke

oni ne scias pri viaj patro kaj patrino. Antonio, vi scias, ke pluraj niaj virinoj venigis ĉi tien alies infanojn, edukis ilin, kaj fine ekamis ilin kiel siajn proprajn. Kiam Kata prenis vin el la orfejo, vi ĵus plenigis la unuan jaraĝon. Vi vivis kune kun mia Joso en la domo de Kata, ĝis kiam mi rehejmiĝis, kaj poste, kiam Kata mortis...

—Alfredo mia frato!... Joso mia frato...

Antonio ploris.

La maristo proksimiĝis al li, prenis lian manon kaj diris ĝemante:

—Antonio, trankviliĝu! Jes, tiel estis, neŝanĝebla, filĉjo, ne aliigebla! Vi estas bona homo, vi jam sufiĉe trasuferis ĉi-monde, eble ankoraŭ tiom, kaj kiam vi kuŝiĝos en la tombon, vi egalos la imperiestron mem. Filĉjo, mi helpus al vi, se mi povus. Nun vi scias, kiu vi estas, vi restu ĉe ni, ni kune laboros kaj ŝiros la panon ĉiutagan.

Antonio rigardis la mariston per larmantaj okuloj. Sur lia vizaĝo sterniĝis dolora kaj trista mieno.

—Kial vi ne estis mia patro?

—Eĉ se mi ne estas via patro, vi estas al mi kara, kiel mia vera posteulo. Ne ploru, filĉjo, kia utilo?

—Mi estas trovito... Mi al Luĉica devas ne iri plu. Martin, kie mi kaŝu min?

—Ĉi tie en la domo oni trovos vin; atendu, ni pripensos. Jen, jam tagiĝis iomete. Ne timu, Antonio, oni ne trovos vin... Aŭskultu, mi aŭdas liajn paŝojn; jes, Joso alvenas.

Joso eniris en la kuirejon, portante korbeton da fiŝoj. Kiam li rimarkis Antonion, li ekkriis:

—De kie vi elmergis? Kial vi ne venis fiŝkapti kune? Paĉjo, jen, sufiĉa kvanto da fiŝoj, ni fritos ilin abunde!

—Joso, silentu! Aŭskultu pri la evento!

—Kio okazas kun vi ambaŭ? Rigardu la fiŝojn; jen, unu vivanta ankoraŭ! He, ili ne menciindas eĉ! Mi haŭlis labrakon, jes, dek funtojn, sed ĝi baraktis tien-reen, la kaptilfadeno streĉiĝis, mi malstreĉis ĝin, sed tamen ĝi ĉion rompis, forfuĝis, al diablo, kvazaŭ oni metis salon sur la voston, — ridas Joso.

Liaj manoj odoris laŭ la marfiŝoj; sur liaj fingroj gluiĝis kelkaj skvameroj, same sur lia makulita tola ĉapo.

—Joso, kien ni kaŝu Antonion? — demandis la patro.

—Kien kaŝi lin!? — miris Joso streĉante sian longan kaj magnan kolon.

—Jes, kaŝu min; mi ne ŝatas ĝendarmojn peli min.

—Kion vi ŝtelis? Ne ŝercu; vi pli emus morti pro malsato, ol ŝteli eĉ fiŝkaptilan hoketon.

—Filĉjo, Antonio nenion ŝtelis.

—Mi defendis min. Se mi ne agus tiel, li plenumus la intencon.

—Mi ne komprenas. Kian intencon.

—Jes, li mortigus min.

—Vi mortigis! — Joso spasme blovis kiel leporo, turnante la kapon.

—Jes, Alfredon, por ke li ne pafu min per pistolo.

—Vi... vi mortigis lin?

—Alfredo donis multan monon al Lovro kaj Luka, por ke ili mortigu min. Ĉinokte mi kaŭris apud la ŝoseo, malantaŭ la domo de Saletti. La servistoj trovis min. Ili havis grandajn bastonojn. Por eviti ilin, mi kuris malsupren de la monteto. Mi ne timis iliajn bastonojn, sed mian rekonon far ili. Mi es-

tis kuranta, kiam antaŭ mi aperis Alfredo. Li diris, ke mi... estas bastardo. Li etendis pistolon al mi, sed, por savi min, mi salte alproksimiĝis kaj enŝovis tranĉilon en lian bruston.

La triopo eksilentis...

—Se oni serĉos vin, ni diros, ke ni ne vidis vin, — flustris la maljuna fiŝisto.

—Ĉu li ruliĝis sur la ŝoseo, post kiam vi trapikis lin? — demandis Joso timeme.

—Mi ne scias; mi frapis kaj forkuris rapide.

—Ĉu iu vidis? — demandas Martin.

—La servistoj probable.

—Via haŭto eksentos malbonegon, se oni kaptos vin, — Joso skuis la kapon, malfacile englutante salivon.

—Kaŝu min. Joso, iru antaŭvespere al Luĉica por aŭskulti la onidirojn.

—Nu, kiel vi mortigis lin? Tiel, ĉu ne? — demandas Joso kaj etendis sian magran brakon al li.

—Jes, — kapjesis Antonio kaj enpenŝiĝinte rigardis al la flamoj.

IX

La urbestro Ermano Murelli okupiĝis iom longe en sia oficejo, foliumante kaj rigardante diversajn aktojn. Jam estis malfrue; pasis jam kompleta horo post kiam Alfredo foriris hejmen ĝoja kaj kontenta palpante la poŝon, en kiu troviĝis la mono, la kvincent forintoj. La urbestro legis ankaŭ liajn leterojn same ridetante kaj karesante sian rondan kaj ruĝan vizaĝon. La malgranda ĉambreto estis plena de fumo. Sur la tablo ankoraŭ ruĝis iom da vino en botelo. Murelli, tenante cigaron per siaj dentoj, iom flanken, supren, klinis sian kapon al la dekstra ŝultro, fermis sian dekstran okulon, por tiel eviti fumon, li spektis la subskribon de Alfredo sur la obligacio. Ankaŭ li trinkis sufiĉe de la saniga vino, ke ruĝis liaj vangoj kaj oreloj, kiuj estis vilaj interne. Ridetante super la subskribo de la nobelo, li trinketis, ŝmacis, lekis siajn lipojn kaj rigardis al la flamo de la sebkandelo, kies meĉo fumegis. La urbestro ekrigardis la polvumitan horloĝon sur la muro. La dua horo. Iom poste li ekstaras, fermis la tirkestojn, preninte la sebkandelon, ekiris al sia dormoĉambro, sed rimarkinte sur la muro malgrandan kadron, li haltis antaŭ ĝi, levis la kandelon kaj komencis legi la unuajn vortojn, presitajn sur bela papero en la kadro. Tiu bela kaj glata papero estis dekreto, per kiu la aŭtoritatoj anoncis, ke li estis honorita per ora kruceto pro granda ofero okaze de la konata ŝiporompigo. La urbestro ekridetis pri la granda sigelo de la dekreto, kontente

kapjesis, ekbalancis, paŝante kelkpaŝe li eniris silente en la dormoĉambron.

(Kvankam Murelli klopodis eniri en la ĉambron kiel eble plej silente, tamen li vekis la edzinon Anastazijan kaj la filinon Idan en la najbara ĉambro. Anastazija antaŭ iom da tempo brue ronkis. Murelli singarde eniris, tamen ŝi vekigis. Ŝi persiste demandadis lin kaj ŝi eksciis, ke li pruntedonis al Alfredo 500 forintojn. Ekestis kverelego inter la geedzoj. Dum ilia plej verva kverelo iu frapetis ĉe la dompordo. Murelli el-tiris sin el la lito kaj konstatis, ke antaŭ la pordo staras Luka, la servisto de Saletti. Li venis por sciigi al li, ke Alfredo estas murdita, kaj ke Saletti petas lin veni al li. Post kiam Anastazija aŭdis pri tio, ŝi komencis lamenti pri la 500 forintoj, ri-proĉante al la edzo, ke li pereigis la tutan domon, — ŝin kaj la filinon, — kaj minacante, ke ŝi mortigos lin, se li ne revenos de la maljuna Saletti kun la pruntitaj kvincent forintoj.)

La urbestro senĉese kruccsignis sin paŝante kun Luka el Luĉica.

—Ĉion, do ĉion oni rabis de li?

—Jes, ĉion, ĉar nenion ni trovis, ni priserĉis ĉiujn liajn poŝojn, sciu, antaŭ la ĉeestanta patro, antaŭ la maljuna sinjoro.

—Kie oni murdis lin?

—Sur la ŝoseo, malantaŭ la domo.

—Neeble! Luka, vi frenezas! Alfredo mortinta, ne, neeble!

—Ni iru, vi konvinkigis; vi vidis lin.

—Vi mensogas, Luka! Sur la ŝoseo, malantaŭ la arbareto! Ne, neeble.

—Iu viro anoncis al la maljuna sinjoro, ke lia filo kuŝas en la sango.

—Kiu viro?

—Neniu scias; Ni ĉiuj dormis tiam.

—Luka, vi estas senracia! Mi ne kredas al vi!

—La viro vekis la sinjoron, sed la sinjoro ne povis rekoni lin en la mallumo.

—Kie estas nun Alfredo? — insistis la urbestro kruccsignante sin.

—En la domo. Li estas tute sangomakulita.

—Kiel oni murdis lin?

—Per tranĉilo. Ankaŭ fraŭlino Elvira ne fartas bone. Kiam la maljuna sinjoro vekis nin, ni kuris tra la ĉambroj, kaj ni trovis ŝin sur la planko apud la fenestro. Ŝi svenis. Ni ĉiuj konsterniĝis, kaj ni kuŝigis ŝin en la liton kvazaŭ mortintan. Antaŭ ol mi ekiris al vi, la ĉambristinoj kaj aliaj virinoj diris, ke ŝi rekonsciiĝis kaj, ke ne okazos malbono.

—Ĉion do oni prirabis, ankaŭ la ĉenon kaj la horloĝon?

—Ankaŭ la monon, probable, se li havis ĉe si.

—Luka, tia sinjoro, ĉu li ne havus ĉe si multon da mono! Li certe havis plurajn centojn!

—Plurajn centojn?

—Jes, nu, kial vi surpriziĝis?

—Ĉu mi surpriziĝis?... Jes, jes, ŝajnis al mi, ke mi vidis la spiriton de Alfredo.

La urbestro kruccsignis sin.

—Ĉu vi do opinias, ke li posedis ĉe si plurajn centojn? — demandis Luka deperpleksiĝinte.

—Jes, mi opinias. Sed ĉu vi estas certa, ke oni rabis lin?

—Mi estas certa, ja antaŭ la ĉeestanta patro, antaŭ ĉiuj domanoj ni traserĉis ĉiujn liajn poŝojn. Jes, antaŭ la patro; ĉiuj estis ĉirkaŭ la kadavro, jes, ĉiuj.

—Sed, kiel vi opinias, kiu murdis lin? Ĉi tie rabistoj ne ekzistas.

—Aŭskultu, sinjoro, en mia kapo ne troviĝas tro da cerbaĵo, tamen mi ne stultas, ŝajnas al mi...

—Diru, Luka, kio ŝajnas?

—Ho, damnindaj virinoj!

—Luka! Ĉu virinoj, virinoj?

—Jes, mi opinias...

—Jes, jes, ankaŭ tio eblas. Ĉi tie en Luĉica friponoj ne ekzistas... Kiu alia estus? Jes, eble jes. Hieraŭ, kiam Alfredo intencis vangofrapi lin, li ekminacis al Alfredo...

—Sinjoro, ĉu ĝustas, ke mi ne estas sen cerbo? — asertis Luka, kaj liaj okuloj ĝoje ekbrilis, konstantinte, ke la urbestro komprenis lin.

—Se li tion faris, li ne fuĝos, ni eĉ trovos lin ĉe la alia flanko de la mondo.

—Aŭskultu min! Ĉu eble ili ambaŭ faris tion konsentinte inter si?

—Jes, vi pravas. La trovito kaj li. Kiam mi vidis hieraŭ lian minacon, mi tuj opiniis, ke el tiu ilia kverelo ne estiĝos io bona. Jen, mia antaŭsento plenumiĝis! Ĉion, do ĉion ili forprenis de li?

—Jes, ĉion, kaj la ĉenon, kaj la horloĝon kaj la monon se li havis...Atentu, ĉi tie, iom supre, ĉi tie ili murdis lin. Ankoraŭ videblas sango, — rakontis Luka, kiam ili supreniris laŭ la ŝoseo.

—Kie, kie?

—Ja, jen antaŭ vi! Ĉu vi ne vidas la koagulitan sangan? La urbestro paliĝis.

—Luka, aŭskultu, ĉu vi traserĉis tie? Ĉi tie, kie ili murdis lin,

en la fosaĵo, ie proksime? Sciu, ĉi tie eble troveblas lia monujo...

—Ni serĉos post la tagiĝo, sed mi opinias, ke tiu, kiu murdis lin, ankaŭ la monon forprenis.

—Marko?... Mi ne kredas, ke li estas ŝtelisto. Krome, kiu ne bezonas monon?

—Mi ne suspektas pri Marko; sed Antonio...

—Kredeble, ĉar li murdis laŭ ordono de sia mastro. Luka, atendu iomete; ni retroiru kelkajn paŝojn, por iom pli inspekti ĉirkaŭ la sango. Sciu, eble ni trovos la monujon...

Luka konsterniĝis kaj li reiris kun la urbestro, kiu prenis lin je la mano timante, ke li trovinta la monujon ne kaŝu ĝin. Post longtempa vana serĉado ili trapasis la arbareton kaj venis antaŭ la domon.

*

Ĉiuj teretaĝaj fenestroj de la domo de Saletti estas lumigitaj. Eniris Luka kaj la urbestro. En la vestiblo ariĝis multnombra servistaro, kvazaŭ ĉe miraklo. La pordo de unu vasta ejo estas tute malfermita. La urbestro rigardis en la ĉambron kaj paliĝis. Sur granda tablo, meze de la ĉambro, kuŝis la korpulenta kadavro de Alfredo, kovrita per blanka tuko. Estis videbla nur unu brako, kiu senmove pendis al la planko, sur kiu estis abunde verŝita akvo. Sub la tuko reliefiĝis la fortikaj membroj de la mortinta korpo. Iom for de la tablo, en unu angulo de la ĉambro, sidis Elvira vestita en negliĝo. La vizaĝon ŝi kaŝis per la manoj kaj mallevis la kapon sur la apogilon de la seĝo.

—Sinjoro, ni iru, bonvolu sur la unuan etaĝon; supre atendas vin la maljuna sinjoro, — diris Luka al la perpleksita urbestro.

—Ni iru, — flustris Murelli kaj sekvis la serviston.

Kiam ili supreniĝis sur la koridoreton en la unua etaĝo, Luka montris al la maljuna Saletti tra la malfermita pordo de ĉambro. Saletti, sidanta ĉe tablo, tenis sian kapon per manoj, apogita per la kubutoj kontraŭ la tablo.

La urbestro frapetis kaj eniris. Saletti levis malrapide sian grandan kapon, li turnis sin, ekrigardis lin kaj kapskuis. La malhela haŭtkoloro de lia nigreta vizaĝo transiĝis al flaveta; la haŭto sub la okuloj ŝveliĝis eksterordinare. Kiam la urbestro proksimiĝis al li, li montris per sia vila brako seĝon, por eksidi, kaj elbuŝigis per basa, fragmentita voĉo:

—Murdo!

(Sekvis longa traktado pri la rabomurdo kontraŭ Alfredo, ĉe kiu oni trovis nek la horloĝon nek la monon. Oni eldiras opiniojn kaj suspektojn pri ebla rabisto. La maljunaj Saletti kaj Murelli konkludis pere de konvinkado de la servistoj, ke Antonio mortigis Alfredon laŭ ordono de Marko, kiu antaŭ unu tago dum kverelo ĉe la poŝtoficejo furioze ekminacis al li. Oni devas, do, verki raporton pri la murdo, kaj sendi ĝin al Volosko kaj alvoki ĝendarmojn, por aresti Markon kaj Antonion, kaj eĉ ankaŭ Maton en Jelenŝĉica. La konversacio inter la maljunaj Saletti kaj Murelli finiĝis per hipokrita lamentado de Murelli, ke Luĉican trafis gravega malfeliĉo, okaze de la murdo de tiel virta junulo, de la ĉastanima Alfredo.)

Iom poste Saletti kaj la urbestro verkis raporton al la tribunalo. Jam antaŭ la sunleviĝo, la magistrata servisto Miro Tompiĉ ensinigis la leteron de la urbestro. Miro krucosignis sin en ĉiu rivereto. Li saltetis, iris haste kaj haltadis sur la ŝoseo, kiu kunligas Luĉican kun Volosko.

X

La orumita kruco sur la preĝeja tegmento, la maljuna heredero sur la duonruinigita murego ĉirkaŭanta Luĉican, ĉiuj fenestroj de la maristaj domoj de la orienta flanko de la urbeto, jam ĉio rebrilis kaj banis sin en la ruĝa suna lumo. La suno ardis brile kaj majeste malantaŭ la blua Velebit. Ekestis gaja dimanĉo. El la kamentuboj leviĝetis grizaj fumo, ili rampis sur la nigriĝintajn tegmentojn kaj solviĝis en la pura kaj la travidebla matena aero. La silenta Luĉica estis jam vekiĝinta el la dolĉa dormo. Sur la malaltaj fajrejoj jam bolis akvo en kafpotetoj; la maristaj filinoj lavis antaŭ la domoj siajn freŝajn vizaĝojn kaj la plenformajn kubutojn; la maljunuloj rigardantaj tra la fenestroj, preĝis la matenpreĝojn kaj palpis siajn mentonojn por pruviĝi pri la senriproĉa fajna razglatigo, kaj la junaj maristoj plukis plej belajn bukedojn el la fratinaj bazilioj, per kiuj ili ellogos honteman rideton al la ruĝaj lipoj de siaj amatinoj, kiam ili alkroĉos la bukedetojn al la floran-taj brustoj.

La sonorigisto Fran stumblis laŭ la stretaj, zorge balaitaj urbaj stratetoj, irante de sia domo en la kampanilon por voki la pian popolon al la frumatena sankta diservo. La maljunulo tusetis, plenigis sian pikilforman nazon per pistita tabako, ternis kaj tostis al si mem: Sanon, Fran! Homoj aŭdante lin, diris: Fran iras en la kampanilon. La sonorigisto survoje renkontis kelkajn homojn, kiuj rakontis al li, ke en Luĉica oka-

zis io, pri kio oni ne konjektus eĉ en sonĝo. Kiam Fran eksciis, ke rabistoj murdis la junan sinjoron de sur la monteto, li fermis la okulojn, li entiris la kolon en inter la ŝultrojn kaj rapide plenigis la naztruojn per la tabako. Gapante konsternite al la homoj, li ternis, skuiĝis kaj murmuris: Ho, Dio kompatu lin! Mi ne povas helpi al li!

Luliĝante sur siaj kurbiĝintaj kruroj, li alvadis fine al la interkrutejo, en la strateton, kie troviĝas la domo de Ŝabariĉ. La pordo estis tute malfermita. Fran etendis sian kolon, por rigardi en la kuirejon, kaj salutinte Jelan kaj Marijan, li ekdeziris bonan matenon al ili kaj elbalbutis:

—Ĉu la kafo estas jam preta? Ĝi bonodoras en la kuirejo! Eltrinku, eltrinku po unu pelveton, ja kio pli ĝuiga ekzistas en la mondo!... Do oni mortigis lin, mortigis! Certe iuj fremduloj. Kiaj aĉuloj vagas tra la mondo!

—Fran, pri kio vi parolas? Mortigis, mortigis? — miris Jela. Fran ternis.

—Sanon, Fran!

—Dio donu, bapтанino Jela. Vi do scias nenion?

—Ĵus ni ellitiĝis. Kion alian fari, estas dimanĉo! — respondis Jela.

—He, ankaŭ mi ne sciis; sed nun, irante ĉi tien, en la interkrutejo, oni diris al mi. Bapтанino, mi prefere kredus, ke ventojare la kristnasktago estus dum la granda vendredo! Jes, jes, se tio estas vero, fremduloj tion faris.

—Fran, kiu povas kompreni vin?

—Ja, disvastiĝas onidiro, ke rabistoj mortigis la filon de Saletti.

—Pri kio do vi parolas al mi? — Jela mirante krucsignis sin. Marija paliĝis.

—He, tiel oni diras, — diris la maljunulo movante siajn ŝultrojn.

—Ĉu vero estas tio? Ho, dio kara, kion mi devas aŭdi! Oni mortigis, mortigis!

—Se tio estas vero, li plu ne ekzistas! Cetere, malmultan utilon ni havis de li! — filozofiis Fran svingante permane.

—Fran, ne parolu tiel; Dio punos vin! Ho, dio indulgu lin! Multajn malĝojojn li faris al mi, multajn larmojn mi verŝis, — manklakis Jela.

—Kiam, kie oni mortigis lin? — demandis Marija timeme.

—Ĉinokte, ie malantaŭ la domo; sed kiam mi eksonoros? Baptanino, adiaŭ! — Fran salutis kaj ŝanceliĝe ekiris pluen.

La virinoj venis en la ĉambron al la malsana Antun kaj rakontis al li la novaĵon, kiun ili aŭdis de Fran. La maljuna Ŝabariĉ longe ne ĉesis miri. Post lia longa kapbalancado, li laŭte ekpreĝis por la spirito de Alfredo.

—Marko, ĉu vi vekiĝis jam? — alkriis Jela al sia filo, kiu dormis en la apuda ĉambreto.

—Jes, kion vi volas? — la filo respondis mallaŭte.

Jela kaj Marija eniris en la ĉambron kaj komencis rakonti la malbonan novaĵon. Marko, fleksinte la brakojn sub la kapon rigardis la vizaĝon de sia patrino trankvile kaj sinkoncentre.

—Marko, jam ĉie ekzistas krimuloj! Ankaŭ Fran diris, ke lin ne mortigis niaj homoj, — diris Jela.

—Kiu povas tion scii! Jen, mi ne atendis tian sciigon! — diris la junulo rigardante al la plafono.

—Vi certe ankaŭ ĉinokte promenis ĝis malfrue; ĉu vi ne aŭdis tumulton aŭ pafadon? — demandis la fratino.

—Mi ne aŭdis.

—Tion faris vojaĝantoj. Ve, tre grava peko certe tio estas!
— flustris Marija.

—Jes, jes, vojaĝantoj, — konfirmis Jela.

—Eble, — ŝultroskuis Marko.

La virinoj eliris el la ĉambro.

La vizaĝo de Marko estis tre pala. Li kutimis legi kaj lerni longe ĝis malfruaj noktaj horoj. Pri liaj eliroj por promeni post la lernado, liaj familianoj ne miris. Ili opinias, ke li eliras el la domo, por spiri freŝan aeron kaj por ripozi post la pena lernado.

Marko kuŝis surdorse. Lian ĉarman vizaĝon kovris malĝojego. Ĉiuj trajtoj de lia vizaĝo aspektis trankvilaj kaj kvietaj.

Liaj okuloj malrapide moviĝis. Li pensis la tutan nokton pri nenio, li ne volis pensi, li ne volis devualigi sin ĉirkaŭvolvitan de la sorto. Nur la figuro de Elvira ŝvebis antaŭ liaj okuloj, sed tamen ie fore en neatingebla alto. Al li ŝajnis, ke li falis en teruran abismon; la spertintaĵo de la lasta nokto malleviĝis sur lin kvazaŭ peza plumba kovrilo el abismo. En sia animo li sentis nemezureblan kaj dezertan malplenon kaj li miris pri sia stoikeco kaj kvieto. Li volus esti malfeliĉa, malĝoja kaj tretita de doloro kaj ĉagreno. Li ĉirkaŭrigardis kaj spektis la bildetojn sur la muroj, ĉio aspektis nova kaj nekonata. En la brusto li eksentis ion, nur momente, sed ĝi ne estis doloro, nek tristo, nek dolĉo, nek ĝojo. La kadavro de Alfredo ŝajnis al li kiel alta kolono prilumita de trista lunlumo. La kolono leviĝis antaŭ lia spirito kaj staris rande de lia ĝisnuna vivo. Kiam en la ĉambron enbrilis la unuaj radioj de la juna suno, en lia cerbo, sen lia volo komenciĝis disvolvadi strangaj pensoj. La tuta pensofluo, kaj la imagado estis malrapida kaj komplika. Elvira

montriĝis fore, ŝia vizaĝo brilis, ŝi tuta transformiĝis al suno, kaj li vidis la radiojn de la suno proksimiĝantaj, haltantaj duonvoje, kaj ili ne povis atingi lin, ili ne povis traŝovi sin tra la mallumo, kiu ĉirkaŭis lin, por ke ili varmigu lin kaj revivigu lian koron. Li konsciis, ke li devas esti malfeliĉa, li konsciis, ke li estas malfeliĉa kaj tial li koleris, pro sia nesentema kaj glacia koro. Li dezirus esti milda, se lin torturus nigra malespero kaj se lian koron ŝirus malĝojo.

Marko prenis malgrandan libron, kiu kuŝis sur tableto apud la lito. Li malfermis ĝin, kaj komencis legi la senmortajn strofojn, per kiuj poeto priskribis per grandioza hororo la turmenton kaj suferon de kompatinda popolo. Vortoj, vortoj, vantaj vortoj kaj nenio pli! Marko turnis la foliojn, sed ĉie nekompreneblo, ĉie vanteco, nenio reeĥas en lia koro. Li rememoras, ke multfoje larmoj sturmis en la okulojn dum legado de tiuj ĉi strofoj, kaj li ekpensis pri la pasinteco...

Trista bildo riviĝis antaŭ lia animo: ĉie nur nuda karsto kaj povra, subpremata kaj malsata popolo. Marko legis: "Panon, panon, mastro! Delonge ni ne vidis panon!" Li pene suspiris, kvazaŭ krevis lia koro, lia tuta korpo ekstremis, la libreto falis el la manoj sur lian bruston, kaj preminte la pugnon li dolore elbuŝigis:

—Elvira!...

Estis la sepa horo. Antaŭ la preĝejo kolektiĝis arego da popolo. Oni ankoraŭ sonoris por la meso. Ĉiuj interparolis pri la sama afero, pri Alfredo. Iuj rakontis, iuj demandadis, ĉiu sciis pri io, sur ĉies vizaĝo vidiĝis necerta timo kaj zorgo. Virinoj haltas laŭvoje, kapbalancis, manklakis; la maljunulinoj suspiris, kaj aŭskultis la pli junajn. Infanoj intermiksiĝis kun la popolo, ili ŝovis sin inter la maristaron, ili embarase gapis

al ili kaj atente aŭskultis ĉiun vorton. Du luĉicanoj rakontis, ke Alfredo estis ebrieta; ke lin vidis iri hejmen du noktaj gardistoj dum malfrua nokto. Antaŭ la preĝejo inter la maristoj troviĝis ankaŭ Mato Bartoliĉ. Antaŭ unu tago, sabaton, kiam li revenis per sia boato el Rijeka al Jelenŝĉica, li eksciis, ke la juna sinjoro Saletti atakis en la montaro lian fianĉinon kun intenco perforte malĉastigi ŝin. En la koro de Mato ekbolis sango, tial frumatene dum la freŝo ekiris al Luĉica, por pridemandi, por inspekti la okazaĵon, kaj por konsoli sian Marijan. Oni sciiĝis ankaŭ en Jelenŝĉica, ke Antonio kaj Joso forprenis pafilojn de la juna Saletti, nenio stranga, la du paroĥoj najbaras unu apud la alia, des pli ĉar la sciiĝo pri malbona okazaĵo rapide disvastiĝas.

Mato aŭskultis la luĉicanojn antaŭ la preĝejo kaj miregis. Oni bruegis, sed aŭdeblis: — Des pli, ni liberiĝis de li, dio punis lin, jam estis tempo, li ne tentos plu la knabinon, ankaŭ la maljunulo baldaŭ forpasos, miraklo kaj pento, dio kompatu lin...

Inter la popolo ŝteliris ankaŭ du malŝatataj luĉicanoj, por ruze informiĝi, sed al ili ĉiu diris, ke li nenion scias. Amiko de Murelli rimarkis Maton kaj tuj forkuris sur la monteton, kaj post kiam li eniris en la domon de Saletti, la urbestro demandis.

—Kion oni parolas en la urbo?

—Oni divenbabilas kaj klaĉas.

—Sed Marko kaj Antonio?

—Mi ne vidis ilin, sed Mato Bartoliĉ antaŭ nelonge estis ĉe la preĝejo.

—La negocisteto el Jelenŝĉica?

—Jes; li estas la fianĉo de Marija Ŝabariĉ.

—Mi komprenas, komprenas! Vi saĝe faris, sciigante min, ke li estas ĉi tie. Vi reiru en la urbon kaj ne revenu pli frue ol vi ekscios ion pri la duopo, pri Marko kaj Antonio.

La urbestro trovis la maljunan Saletti kaj sciigis lin pri la ĉeesto de Mato en Luĉica.

—Mato, kiu li estas? — demandis la maljuna nobelo.

—Iu negocisteto el Jelenŝĉica, tiu kies boato rompiĝis ĉi-vintre.

—Se ĝi ne rompiĝus, vi ne havus la oran kruceton.

—Dank' al vi, sen via rekomendo..., — ekridetis dolĉe la urbestro riverence.

—Sed kian signifon havas ĉi tiu negocisteto?

—Li fianĉinigi la fratinton de Marko; li estas eksplodema kaj aroganta. Sinjoro, je honesto mia, mi vetus, ke li pura ne...

—Ĉu vi opinias?

—Sendube! Li eksciis en Jelenŝĉica pri la pafiloj, kaj venis ĉinokte por venĝi. Jes, li certe...

—Ankaŭ lin oni devas postsekvi! La tutan triopon ni katenigos. Unu el ili certe estis. Ĉu pri io vi eksciis?

—Ĝis nun nenion.

—Estus bone kapti ilin tuj.

—Tio estus malfacila! — ridetis la urbestro pretekstante.

—Kial?

—Kiu kaptu ilin? La magistrata servisto foriris al Volosko, kaj eĉ se li estus ĉi tie, li utilis malmulte. La luĉicanoj ne volus eĉ tuŝi Markon, eĉ se oni al ili minacus per morto; se la imperiestro mem venus por ordoni ligi Markon, ili ne obeus lin.

—Do, nenia eblo?

—Nenia, sinjoro! Ni devos esti paciencaj ĝis la alveno de la ĝendarmoj, — la urbestro ŝultroskuis.

En la preĝejo dum la frua diservo regis senriproĉa silento. La maljuna pastro legis pli mallaŭte ol ordinare; lia voĉo tremis, kaj kiam li turnis sin al la popolo, liaj okuloj vagis sencele super la kapoj de la luĉicanoj. Ŝajnis al la homoj, ke pezaĵo falis super Luĉica; obskuraj antaŭsentoj interkruciĝis en iliaj animoj, ĉiuj sentis pezon en siaj koroj, dum la oraj sunradioj ĝoje kaj senzorge eniris en la preĝejon kaj kviete rebri- lis super la kapoj, sur la buntkoloraj roboj, sur la blankaj mu- roj kaj sur malgrandaj altaroj.

Post la diservo, Mato Bartoliĉ iris al Ŝabariĉanoj. La mal- granda familio ariĝis en la ĉambro ĉirkaŭ la lito de la malsana Antun. Mato eniris en la ĉambron, kaj Marija honteme mal- supren klinis sian ĉarman kapon.

—Bonan matenon, homoj! — salutis la fianĉo.

—Dio donu, Mato, — ili respondis.

—Antun, kiel vi fartas?

—Pli bone, bone, — diris kontente la maljuna maristo.

—Ĉu vi eksciis pri la okazaĵo? — demandis Jela.

—Jes! Ĉu vere okazis tio, pri kio oni parolas?

—Ni ne scias detale, — diris Jela.

—Kiel vi fartas, sinjoro Marko? Kaj vi, Marija?

—Bone! — respondis samtempe la gefratoj.

—Vere mi konsterniĝis aŭdinte antaŭ la preĝejo pri la mor- tigo de la sinjoro.

—Mato, kiam vi venis en Luĉican, — demandis Marko.

—Iom pli frue ol oni finsonoris por anonci la meson.

—Nigra dimanĉo tagiĝis! — lamentis Jela.

—Kial? — demandis Mato surprizite.

—Ho, tiu neatendita morto! De kiam mi vivas, io simila ankoraŭ ne okazis en Luĉica.

—Ho, kara Jela, Dio ne rekompencas ĉiusabate! Mia koro affliktiĝis, kiam mi eksciis, ke la mortinto atakis Marijan en la montaro.

—Antonio kaj Joso forprenis la pafilojn de li kaj de Luka. Li finis siajn vivotagojn, sed nur Dio scias, kiam kaj kiel ni finos la niajn. Ni lasu lin en paco! — diris Antun, levante sian dekstran manon alten kaj mallevante ĝin kaduke sur la litkovrilon.

—Marija, vi certe multe ploris! Forgesu kaj pardonu al li, — diris Mato rigardante en ŝiajn nigrajn okulojn.

—Kian utilon de la plorado? — ekridetis malĝoje la knabino al li.

—Aŭskultu al mi, pli utilis preparoli aliajn aferojn. La ulo pereis, la mondo ne pereos pro tio. Estus damaĝo, se pereus bona kaj ĉasta homo, aŭ patro de multnobraj infanoj, sed ne estus racie priplori tian ulon. La luĉicanoj sufiĉe suferis de tiu domo; ni scias kia estas lia patro, kaj certe la filo estus eĉ pli malbona, — diris Marko rigardante tra la fenestro en la maron.

—Filĉjo, vi pravas! Li mortis laŭ la antaŭdestino, ĉiu aliel, neniu scias kiel aŭ kiam! — diris Jela.

(Antun fariĝis pli bonsana. Ĉesis la zorgo de Marko, pro la ebla morto de la patro. En ilia domo Mato kun la familianoj de Ŝabariĉ konversaciis pri la mortigo de Alfredo. Tie ĉeestis Stipe kaj ankaŭ la gaja kaj kantema Tomo. La kunvenintoj fine konkludis; se Antonio mortigis Alfredon, li nenial rabis lin, sed nepre tion faris la servistoj de Alfredo, liaj partneroj. Dum kortuŝa momento, Marko konfide diris al Stipe pri lia amo al Elvira. Stipe demandis Markon, ĉu li scias, kie troviĝas

Antonio, kiu malaperis post la murdo. Post kiam Marko sincere asertis, ke la restadejo de Antonio ne estas konata al li, Stipe konsolis kaj kuraĝigis Markon, por ke li timu neniun, ĉar li ne spertos malagrablaĵojn. Samtempe venis en Luĉican la tribunala komisiono. La komisiono eniris en la ĉambron de la urbestro por esplori pri la murdo. Marko Ŝabariĉ, Mato Bartoliĉ, kaj Antonio Marola estas kulpigitaj de Murelli pro la murdo. Li ĉefe menciis la monujon.)

—Mi petas, sinjoro urbestro, diru, kie troviĝas la menciitaj homoj, — demandis la juĝisto.

—Ĉi tie en Luĉica. Mi havas fidelulojn, kiuj atentis ĉiun ilian paŝon hodiaŭ. Jes, pri unu de ili mi ne scias, pri Antonio Marola. Li estas vera kanajlo! Ĉe li ni sendube trovos la monujon de Alfredo. Mi petas, sinjoro juĝisto, ĉu vi konis la kompatintan Alfredon Saletti?

—Laŭvide.

—Kiam oni mortigis lin? — demandis unu kuracisto.

—Ĉinokte, sinjoro doktoro, ĉinokte.

—Ĉu li havas pliajn vundojn surkorpe? — la kuracisto demandis denove.

—Nur unu, jes, nur unu. Kредu al mi, sinjoroj, kредu al mi, la mortinto estis bonanima homo. Samkiel lia afliktita patro. Ĉi tiu povra popolo amegis lin, kiel propran patron, kiel sian fraton.

—Sinjoro urbestro, vi estas tre molkora, — rimarkis unu kuracisto enpensiginte.

—Mia koro krevas pro doloro, konsciante, kiom la luĉicanoj perdis per tiu ĉi malfeliĉo. Sub la tuta ĉielo ne ekzistis pli granda altruisto ol li.

—Mi petas vin, kara urbestro, kie loĝas la suspektatoj, ĉu

en la urbo aŭ en la ĉirkaŭaĵo? — la juĝisto interrompis lian parolon.

—En la urbo. Mi esperas, ke ni facile kaptos ilin.

La juĝisto enpenŝiĝis kaj petis la urbestron por sendi la magistratan serviston kun ĝendarmoj por serĉi la suspektitojn. La ĝendarmoj ekiris al la Ŝabariĉanoj, dum la juĝisto, la kuracisto kaj la skribisto ekiris al la nobelo Saletti.

Dum la traktado en la domo de la sinjoro urbestro, Mato Bartoliĉ konversaciis kun la familio de Antun Ŝabariĉ. La tempo pasis rapide, ĉar en Luĉica okazis multaj eventoj de post ilia pasinta disiĝo. Ilia amika kaj elkora interparolo fluis senobstakle, sed tamen ili ne ĝojis tiel, kiel dimanĉon, kiam Mato svatis la knabinon. Eksterordinara trankvilo sur la vizaĝo de Marko zorgigis ĉiujn.

Marija rigardis jen la fraton, jen la fianĉon. Ĉiu ŝia rideto estis morna kaj eldevegita. Jela, sidante sur malalta seĝeto, apogis la kubutojn kontraŭ la genuojn kaj per la manoj subtenis la kapon. Antun duonsidiĝis sur la liton.

—Mato, restu ĉe ni ankoraŭ momenton; ja, ne krepuskiĝas; mi vidas la insulon Cres tra la fenestro. La tago daŭros ankoraŭ du horojn, — diris Antun.

—Mi ne iros ankoraŭ; ĉar mi alvenis kun miaj amikoj, mi ankaŭ reiros kun ili, — akceptas Mato, kiu alvenis el Jelenŝiĉa kun du kamparanoj.

—Ĉu vi diris al ili, por ke ili anonciĝu, post ilia fino de la negoco? — demandis Jela.

—Jes, kara Jela, jes. Ili atendos min ĉe Stipe; ili ofertas sian vinon.

—Ne estas ankoraŭ malfrue, — ekridetis Marija melankolie kaj honteme.

—Mi havas lertajn krurojn. Mi rapidas kvazaŭ vento, — fanfaronis Mato. —Sed jen, Marko, kial vi tiel enpenŝiĝis? Ĉu hodiaŭ vi ellitiĝis sur la maldekstran piedon? Ĉar vi aspektas malĝoja, ankaŭ ni ne povas ĝoji. Kial vi senĉese cerbumas? Vi ne riproĉos al mi; mi ne scias, kiaj estas viaj dikaj libroj, mi scias nur pri remilo kaj velo.

—Nenia zorgo, kara Mato! Kredu al mi, nenia zorgo, — respondis Marko evitante la rigardon de la fratino.

—Ja, kien enŝovis sin Antonio? Jam la tutan tagon li forestas el la hejmo, — miris Jela.

—He, fiŝkaptistoj. Ja, ne zorgu pri li. Ĉu vi ne konas lian strangan konduton? — diris Marko.

—Marko, mi timas..., — diris Marija.

—Ja silentu, mi petas, kion vi timas? — la frato riproĉis ŝin.

—Kiu eniris en la kuirejon? — flustris Jela kaj rigardis al la vizaĝoj, aŭdinte pezajn kaj nekonatajn paŝojn.

Marko rapide ekstaris. Iu frapetis sur la pordon, kiu duone malfermiĝis. Miro Tompiĉ, la magistrata servisto, etendis sian kapon en la kuirejon, kaj post kiam li rimarkis Maton kaj Markon, nenion dirinte li eltiris sian kapon kaj diris al iu en la kuirejo: — Ili estas ene.

Du ĝendarmoj kun bajonetoj sur pafiloj eniris. Ĉiuj en la ĉambro ekstremis, ĉiuj ŝtoniĝis krom Marko, kiu demandis la ĝendarmojn:

—Bonvolu, sinjoroj?

—Ĉu ĉi tiu? — unu ĝendarmo demandis la magistratan serviston.

—Jes, tiu ĉi, kaj tiu alia, — respondis la servisto montrante per sia tremanta mano al Mato.

La ĝendarmoj ekrigardis grave kaj kapjesis unu al la alia.

Alirinte ĉiu al po unu el la junuloj, el poŝoj ili eligis katenojn en daŭro de palpebrumo kaj trankvile diris:

—Viajn manojn!

—Ho, Dio! — Marija kaj Jela ekkriis.

La malsana Antun, mallevinte sian kapon sur la kusenon, ekĝemis kaj svenis.

—Kio? — Marko nun paliĝis.

—Mi petas, ni ne volas ŝercon. La manojn ĉi tien! — ordonis la ĝendarmo.

—Mi volas scii, kial vi volas katenigi miajn brakojn? — trankvile demandis Marko.

—Aliaj homoj tion diros al vi; ni plenumas nian servon! — eklekis la ĝendarmo.

—Se estos bezonate iri kun vi, ne necesas ligi nin. Ni volonte obeas; ĉu ne, Mato?

—Jes ni obeas. Ni ne estas krimuloj, vi ligas nin, ni volonte obeas; ĉu ne?

Marija prenis liajn manojn, kaj singulte petis:

—Mato, obeu la ĝendarmojn; faru laŭ ilia volo. Vi estas senkulpa same kiel Marko.

—Ne ŝercu! La manojn ĉi tien! — tondre kriis la ĝendarmo.

—Ne faru tion, se vi estas baptitaj! Ili ne estas rabistoj! Li estas mia filo, kaj li estas Mato! Homoj, indulgu al mi, al povra virino! — petas Jela grincante kaj prenante la manojn de la ĝendarmoj, kiuj forigis ŝin.

Jela kaŝis sian vizaĝon per siaj manoj, apogis sin al la lito kaj malesperante ekploregis:

—Antun! Antun! Ho, honto! Mi povra!

Antun ne respondis. La virino, vidinte lin pala kaj sveninta, ŝi konsterniĝis kaj ekkriis:

—Ili mortigis mian edzon! Marija, donu vinagron! Ho, nigra tago!

La ĝendarmoj ligis la junulojn kaj ekkriis:

—Ni iru!

—Marko, Mato! Ho, Dio, kion ni pekis, — la virinoj kriegis, malesperis kaj klakis permane.

—Panjo, Marija, trankviliĝu! Ni estos liberaj baldaŭ.

—Ne ploru! Mi ne scias, kial ili ligis min, — kriis Mato rigardante al la embarasiĝinta vizaĝo de Marija.

La ĝendarmoj puŝis la junulojn el la ĉambro. Marko komplete rigardas ilin kaj hake diris:

—Mi petas trakti nin konvene! Vidu, ni obeas al vi.

Post kelkaj momentoj la luĉicanoj ŝtoniĝis, vidinte la katenitajn junulojn. Dum la ĝendarmoj pelis ilin antaŭ si tra la urbaj stratetoj, el ĉiuj flankoj aŭdiĝis grincetado de pordoj kaj fenestrumoj. La homoj etendis la kapojn el siaj domoj, ili klinis sin al la fenestroj kaj ne povis kredi al siaj okuloj. Iom da bubaĉaro iris silente post Mato kaj Marko gapante al la brilaj bajonetoj sur la fusiloj.

Jela kaj Marija plorantaj kaj veantaj frotis Antunon kaj malsekigis liajn tempiojn, por rekonsciigi lin. La povraj virinoj tremis tutkorpe pro ploro kaj doloro.

La maljuna Saletti promenis rapidpaŝe en sia ĉambro. Liaj okuloj estis pli ruĝaj ol ordinare. Liaj vangoj spasmiĝis. En lia domo, en la teretaĝo kuracistoj tranĉis la kadavron de lia filo. La maljunulo promenis, dum Elvira sidis sur divano. Per blanka tuko ŝi premis siajn okulojn. Ŝi ĉesis plori, sed ŝiaj sinjorecaj ŝultroj tremis pro mallaŭta singultado.

—Elvira, ne malĝojigu min! Mi petas vin, ĉesu singulti!...

Ho, mi ne povas plu, — suspiris Saletti kaj mallevis sin kolapse sur la apogseĝon.

—Paĉjo, vi ne scias, kiom malfeliĉa mi estas!... Povra Alfredo!

—Kara mia infano, mi petas vin, trankviliĝu! Mi petas vin; mi ne povas rigardi viajn larmojn.

(Post ioma silento la maljuna Saletti ekscite diris al la filino, ke estas strange ĉar oni ne anoncas al li, ĉu oni kaptis Maton, Antonion kaj Markon, la onidirajn murdintojn de lia filo, de Alfredo. Kiam Elvira eksciis, ke oni arestos ankaŭ Markon, ŝi komencas petegi, ke li tion ne faru, kredigante lin, ke Marko estas senkulpa. Por pruvi tion, ŝi konfesis al la patro, ke ŝi tiun nokton konversaciis kun Marko en la arbareto kaj ke ŝi senlime amas lin de sia frua junaĝo. Saletti indignis pro la filino. Li minacis, ke li mortigos ŝin, nur se ŝi mencias vorton pri Marko)

Elvira leviĝis rapide kaj ekstaris. Rigardante kuraĝe al la patro, ŝi elbuŝigis:

—Li estas nek fripono nek brutulo! Marko estas ĉio mia, kion mi havas, la plej kara en la tuta mondo. Paĉjo, mi amas lin de kiam mi konas lin, mi amas lin tutanime. La trivialajn antaŭjuĝojn mi ignoras. Mi estos lia aŭ nenies! Marko estas senkulpa! Paĉjo, Dio estas super ĉio, ne pekigu vian animon.

Saletti prenis sian grizan hararon per ambaŭ manoj kaj eliris el la ĉambro suspirante: —Mia filino! Mia Elvira!

La knabino, rigardante post li, enpenŝiĝis dummomente. Laŭ ŝia vizaĝo io ekfulmis, ŝi ekstremis kaj forkuris en sian ĉambron. Ĉirkaŭvolvinte sian kapon per granda vualo, ŝi surmetis koltukon kaj eliris el la domo. Irante tra la arbareto, laŭ soleca vojeto, ŝi direktiĝis al Luĉica. La paroĥestro Jure Rat-

koviĉ estis ŝia spirita patro. Ŝi ege adoris kaj ŝatis lin. Konvinkiĝinta, ke ŝia patro ne korfavoros, ŝi tuj rememoris pri la bona pastro, ĉar ŝi konsciis, ke li povas helpi al ŝi per bona konsilo. Dum ŝia irado tra Luĉica, oni mirante rigardis post ŝi komplete, ĉar ŝi estis favorata de la popolo pro ŝia bona kaj afabla koro. Elvira venis antaŭ la loĝejon de la paroĥestro kaj tie ŝi trovis la sonorigiston Fran. La maljunulo ŝovis sian tutan maldekstran brakon en longan boton de la paroĥestro, kaj apoginte sin kontraŭ la malalta muro, li lante trenis broson, blovante ofte en la ledon, por ke ĝi estu kiel eble plej brila. Rimarkinte Elviran, li eltiris la brakon el la boto, glatumis sian nazon per la mandorso de la brako kaj streĉinte la kolon, li ekgrumblis:

—La sinjoro ne estas hejme.

—Kien li foriris?

—Al la Ŝabariĉanoj, por konsoli ilin. Mi admonis lin ne iri, sed li neniam obeas min. La virinoj ĉiam ploras.

—Kie troviĝas la domo de la Ŝabariĉanoj? — demandis Elvira preskaŭ mallaŭte.

—Kio? Pli laŭte! — atentigis la surdeta sonorigisto, ĉirkaŭante la orelon permane.

—Kie loĝas la Ŝabariĉanoj, — Elvira ripetis pli laŭte.

—Jen, mi opiniis, ke vi loĝas en Luĉica, la filino de la sinjoro sur la monteto; vi tute similas al li!

—Jes, mi loĝas en Luĉica; jes, la filino de Saletti.

—Ankaŭ mi tion diras! Kompreneble, vi estas! Mi bone konas vin! Ĉiun fojon, kiam mi elŝutas la nigrajn krejcerojn el almozkolektujo sur la benkon en la sakristio, mi tuj scias, ke la blankaj estas la viaj, la sesoj. He, he! La almozo plej gran-

da prebendo! Kiel do vi ne scias, kie estas la domo de la Ŝabariĉanoj?

Elvira ruĝiĝis sub la nigra vualo.

—Atendu iom, mi montros al vi, — proponis la sonoristo kaj forportis la botojn en la domon.

—Ĉu la domo estas malproksime? — demandis Elvira kiam ili ekiris.

—Tie supre. Kio ja povas en Luĉica esti malproksime? En Marsejlo mi vidis placon, sur kiu povus danci tri niaj Luĉicaj! He, kiam tio estis! Momenton, Fran, momenton! Jes, jam kvindek jaroj pasis de tiam. La Ŝabariĉanoj estas bonaj homoj, kvietaj. Jela oron valoras, sed domaĝe, ke Marko ne iĝis pastro. Eĉ via patro ne pli ĝuas ol la sinjoro pastro. Jes, eĉ via patro pli ne ĝuas! Jen mi, mi estas eĉ ne kapelano, kaj kio mankus al mi, se miaj kruroj taŭgus? Krejceron post la krejcero, kaj fine tiel guto post la guto, ekestas forinto! Domaĝo, la eterna domaĝo pri Marko! Do ankaŭ vi... ankaŭ vi konsolos ilin? Vi vidos nur larmojn kaj ploron. Kompatinduloj! Eĉ satano mem tian ideon ne elpensus! La ĝendarmoj do elcerbumis, ke Marko mortigis vian fraton! Dio pardonu al mi! He, oni preskaŭ furiozfrenezis. Tial, ĉar ilia mano neniam tuŝis la benitan akvon. He, he, mi interparolos kun la maljuna Tomo; li diros al mi pri la kaŭzo de tiu ĉi misharmonio. Ĉu vi ne konas Tomon? Bona homo! Sed vi... vi ne kutimas trinki brandon, dumvintre po unu glaseto, sciu, antaŭ enlitiĝo. Jes, mi bedaŭras, ke tio okazis en via domo. Dio indulgu la spiriton de via frato, sed por diri la veron, li ne vivis ĝuste laŭ la diaj ordonoj. He, ankaŭ mi estis juna, sed ĝeni kaj tuŝi honestajn fraŭlinojn! Jen, ni atingis, vidu la pordon, tie troviĝas la Ŝabariĉanoj.

Elvira dankis al la sonorigisto, kaj paŝinte ankoraŭ kelkfoje, ŝi surtretis la sojlon de modesta marista domo. Tie ŝi iom haltis, kaj tiam elspirinte, eniris en la kuirejon. Ŝi frapetis la pordon kaj aŭdis kelkajn samtempajn voĉojn: Eniru! sed kvazaŭ ŝtoniĝinta ŝi restis antaŭ la pordo de la ĉambro. Nun Stipe malfermis la pordon de interne. Ĉiuj embarasiĝis, vidinte la ĉarman palan knabinon antaŭ la pordo.

—Fraŭlino! — ekkriis la paroĥestro ĝoje, kaj veninte al ŝi, li prenis ŝin je la mano kaj akompanis ŝin al unu seĝo. Elvira sidiĝis kaj per siaj manoj kovris la vizaĝon. En la ĉambro ekestis silento. La maljuna Ŝabariĉ jam rekonsciiĝis. Ĉi tie ĉeestis ankaŭ la paroĥestro, Stipe, Jela kaj Marija. La virinoj ploris. La ĉambro pleniĝis de ĝuiga krepusko. Marija rigardis la blankajn manojn de Elvira. La vizaĝo de la paroĥestro sereneiĝis.

—Fraŭlino Elvira, vi mem bezonas konsolon, sed evidente vi alvenis por konsoli aliajn. Bona fraŭlino, kun agrablo en mia koro mi salutas vin en tiu ĉi trista kaj modesta marista dometo. Feliĉan tempon vi alportis! Estu konsoliga anĝelo por tiuj ĉi homoj, estu matenkrepusko de feliĉo kaj de dia beno! Parolu, kara fraŭlino, malpliigu la doloron al tiu ĉi afliktita familio...

Elvira mallaŭte singultis...

Ŝia sekreta kaj sankta amo estis konata al la paroĥestro.

—Fraŭlino, trankviliĝu, fidu Dion, vi scias, ke li estas bona.

—Sinjoro paroĥestro, helpu al mi! Diru, kion fari...

Jela konsternis kaj time rigardis ŝin.

—Fraŭlino, mi aŭskultas vin kaj mi esperas, ke mi helpos al vi per mia konsilo, — elbuŝigis la paroĥestro konsolige kaj prenis ŝin je ŝiaj varmaj manoj.

—Li estas senkulpa, li parolis kun mi, kiam mian fraton...

—Ho, dank' al bona Dio! — ekkriis la paroĥestro ĝoje, kaj li levis siajn manojn kaj okulojn al la ĉielo. —Jela, Antun, Marija trankviliĝu! Marko estas libera!

—Marko! — ekstremis tri voĉoj.

—Jes, li parolis kun mi, kiam mia malfeliĉa Alfredo pereis.

—Kun vi! Kun ŝi! — remiris la tri voĉoj.

—Ĉu vi ne scias, kiu faris la krimon? — demandis Stipe.

—Mi ne scias, — flustris Elvira.

—Ĉu vi konjektas, ke Mato Bartoliĉ ne kulpas? — instigis Stipe.

—Mato?... Kiu li estas?... Jes, mi scias, mi scias, mi kredas, ke li ne kulpas, — respondis Elvira kaj tenere rigardis Marijan per siaj larmaj okuloj.

Marija prenis Elviran je la manoj, klinis sin super ŝi kaj eksingultis:

—Ho, bona fraŭlino, vi estas nia anĝelo! Parolu, vi scias, ĉu ne, vi scias, ke mia Mato ne kulpas? Diru, ke la ĝendarmoj lasu lin ...

—Kara knabino!... Marija, jen, mi konas vian nomon... Jes, multfoje mi ploris pro vi!... Marija, trankviliĝu, via Mato certe estas senkulpa. Ne timu, karulino mia!

—Mi sciis, ke vi bona estas! — elspiris Marija, volonte surgenuiĝi antaŭ ŝin, sed ŝi brakumis ŝin dirante kun tremanta voĉo: —Ĉi tien, Marija, al mia brusto!

Stipe viŝis siajn larmojn.

—Fraŭlino, ne utilus atendi. Marko..., — la paroĥestro ĉesis, ĉar la pordo malfermiĝis neatendite.

—Antonio! — ekkriis ĉiuj.

—Kie estas Marko? — demandis Antonio sentemperamente.

—Ĉe Murelli, katenita! — respondis Stipe.

—Li estas senkulpa. Alfredon mi mortigis. Ek, oni pendumu min.

—Vi mortigis lin? — ĉiuj konsterniĝis.

—Jes!

—Kie vi estis la tutan tagon? — Stipe demandis lin.

—Ĉe Martin Koĵuliĉ. Ni sendis Joston en Luĉican. Post kiam li vidis, ke la ĝendarmoj kaptis Markon kaj Maton, li kuris hejmen por anonci al mi. Jen mi. Mi ne volas, ke estu aliaj pendumitaj pro mi. Mi estas trovito, — li finis per raŭka voĉo.

Liaj okuloj senĉese fulme moviĝis. Ekrigardinte Marijan, lia frunto malsereniĝis.

—Povra Antonio, kion vi faris, — diris la paroĥestro.

—Mi defendis min. Mi estas trovito, eksteredzecido, bastardo. Al la pendumilo!

—Antonio! — flustris Marija.

Antonio ekstremis pro ŝia voĉo, li ekrigardis al ŝi kaj spasme retropaŝis kvazaŭ timigita leono.

—Ni ekiru! — flustris Elvira.

—Ni ekiru! Marko estas senkulpa! Ni ekiru, por ke Marija ne ploru..., — Antonio elbuŝigis per dampita voĉo.

Antonio prenis Elviran je ŝiaj manoj kaj tiris ŝin post si. La knabino sur la sojlo turnis sin, ĉirkaŭrigardis laŭ la ĉambro, mansvingis al Marija, al Jela kaj al la malsana Antun, kaj ŝi malaperis. Jela rigardis perpleksite post ŝi. Ŝi volis ion diri, sed la vortoj kroĉiĉis kaj ŝtopiĝis en la gorgo.

La paroĥestro kaj Stipe salutis la Ŝabariĉanojn, kaj ankaŭ ili ekiris al la urbestro. Survoje ili atingis Elviran kaj Antonion.

Dum tiaj okazaĵoj en Luĉica, la komisiono finis sian malagrablan taskon en la domo de Saletti. La kuracistoj zorge inspektis la kadavron de Alfredo. Trarigardinte la lokon de la krimago, kaj post la esploroj, ili ĉion surpaperigis.

Kiam ili revenis en la urbeton, jam krepuskiĝis.

La juĝisto tre surpriziĝis, same la kuracistoj, kiam ili rimarkis Markon Ŝabariĉ, kiu atendis ilin en la koridoro antaŭ la magistrata oficejo, sidante inter la ĝendarmoj kaj la malfeliĉa fianĉo de lia fratino.

La sinjoraro kaj Marko sen vervo intersalutis kapbalancante. La juĝisto eniris en la oficejon kaj tuj ekagis. Maton hazarde oni komencis priesplori pli frue, kaj iom poste li aŭdis la konatajn voĉojn el la koridoro.

Elvira, la paroĥestro, Stipe kaj Antonio haste eniris en la domon de la urbestro. La knabino alkuris al la junulo kaj suspiris vundite: —Marko! — ŝi ĵetis sin en lian brakumon ĉirkaŭbrakumante lin. La ĝendarmoj mirante interrigardis sin. La juĝisto malfermis la pordon kaj rimarkinte la paroĥestron kaj Stipen, li manpremis kun ili rigardante al la knabino kaj dirante:

—Estu sanaj, gesinjoroj! Kiel Dio helpas, sinjoro paroĥestro? Kiel vi, Stipe, kiel vi fartas?

—Vere malbone! — respondis la negocisto.

—Malfeliĉo, malfeliĉo! — kapbalancis la paroĥestro.

—Nek la unua, nek la lasta! — respondis la juĝisto karesante sian longan barbon.

(Sekvis esploro de la akuzitoj kaj la suspektitoj. Stipe kaj la paroĥestro atestis la evidentan senkulpecon de Marko kaj

Mato okaze de la murdo, dum Antonio malkaŝe konfesis la krimon. Li parolis pri la kaŭzoj, kiuj igis la murdon. Tiun fatalan nokton li nur defendis sian ununuran vivon kontraŭ Alfredo, kiu, renkontinte lin sur la ŝoseo, intencis mortpafi lin per pistolo. Li asertis kaj atestis, ke li ne prirabis la mortigitan Alfredon, sed tion sendube faris liaj servistoj Luka kaj Lovro. Surbaze de tiu ĉi aserto la juĝisto ordonis al la ĝendarmoj kapti la menciitajn servistojn. Ĉimomente en la ĉambro eniris la maljuna Saletti kaj li ekkonfliktis kun Antonio, kiu riproĉis antaŭ ĉiuj, ke li estas lia eksteredza filo kaj frato de la forpasinta Alfredo kaj de la gracila Elvira. Asertante pri tio, li antaŭmetis nerefuteblajn pruvojn. La maljuna Saletti rabiis. Antonio aliris al Elvira, kaj li surgenuiĝis antaŭ ŝi.)

La krispa kapo de Antonio kolapsis sur la genuojn de Elvira...

Elvira metis siajn blankajn manojn sur lian kapverton. La rozkoloraj ungoj kaj kelkiuj plenformaj fingroj kaŝiĝis en lia nigra abunda kaj krispa hararo.

La koroj de ĉiuj ĉeestantoj silente batis, ĉiuj estis kortuŝitaj, kelkaj okuloj larmis. La urbestro gapis al la ĉeestantoj el angulo. Antonio genuis antaŭ Elvira. La suno bruligis lian fortikan kolon; sur lia larĝa dorso sur la ruĝa ĉemizo troviĝis fliko sur fliko; malnova blua pantalone estis tordita supren ĝis la tenaca dika suro, liaj nudaj piedoj kelkloke vundiĝis pro la ŝtonaj padoj kaj pro la herbaĉoj.

La silenton en la ĉambro interrompis grumblego de la nobelo. La maljuna Saletti, tremanta kaj skuanta kvazaŭ leono vundita en la koron, saltis al Elvira, prenis ŝian manon, levis ĝin kaj rabie ekkriis: —Tiu ĉi bastardo mensogas, mensogas!

— li tiris ŝin post si, malfermis la pordon kaj rapide malaperis.

— Mia patro! — elspiras Antonio malespere...

Kiam li poste rakontis pri la ekscio de Martin Koĵuliĉ, ĉiuj en la ĉambro indigniĝis. La saman vesperon oni lasis liberajn Markon kaj Maton. La paroĥestro kaj Stipe garantiis pri ili per siaj havaĵoj kaj vivoj, sed tio ne estis necesa, ĉar la tuta afero klariĝis al la juĝisto kvazaŭ sur polmo.

La sekvontan tagon oni esploris Martinon Koĵuliĉ kaj lian filon Joson kiel atestantojn, sed nur pri la afero de la murdo de Alfredo. Ili ambaŭ atestis, ke Antonio venis al ili kaj ke li rakontis, kiel li mortigis la nobelon. Traserĉinte oni trovis la monujon en unu stalo de Saletti, kaj la brelokon kaj la horloĝon oni trovis en la ĉambro de la koĉero. En la monujo oni trovis iom pli ol kvincent forintojn. La urbestro Murelli, ĉeestanta la serĉadon samkiel la maljuna Saletti, vidinte la monon ekriis subite kaj senpripense:

— Tio estas mia mono!

— Kiel? — miris Saletti.

— Jes, mia mono..., — malpaciĝis la urbestro.

— Via mono?... Parolu!

— Antaŭhieraŭ, sabate, mi pruntedonis al Alfredo kvincent...

— Ĉu vi pruntedonis monon al Alfredo? Mi ne kredas!

— Kara sinjoro Saletti, ne koleru, mi petas, sciu, li kiel junulo, li povra deziris Parizon... Ne koleru, li petegis min. Mi montros al vi lian..., — persistis Murelli.

— Kion vi montros al mi?

— Lian ob... obligacion, — ekridetis la urbestro rigardante teren.

Denove Murelli spertis skandalon kaj hontigon. Saletti diris: —Mi tion ne pagos! — Sed la ĉagrenita urbestro montris la obligacion de Alfredo. La nobelo ne redonis eĉ moneron, sed insultis kaj blasfemis pro lia uzura konduto kaj minacis al li per akuzo. Murelli kvazaŭ frenezis, des pli ĉar la juĝisto konversaciinte kun Stipe kaj la paroĥestro, interparolis ankaŭ pri la ŝiprompiĝo sub Luĉica, kaj pri la meritordeno de Murelli. Post kiam li eksciis, ke Murelli forestis el Luĉica dum la ŝiprompiĝo, kion li do faru krom miri? La juĝisto diris: — Trompo, devojigo kontraŭ la alta instanco! Mi tretos la voston de tiu ĉi vulpo!

Murelli kvazaŭ freneziĝis kaj rabiĝis. Anastazija ŝiris sian hararon. Ŝia kriadado kaj minacado al la edzo, ke ŝi dronigos sin, ke ŝi ĉagrenita saltos en la maron, mildigis iomete lian ĉagrenon kaj doloron. Ŝi tiel dolĉigis liajn amarajn temperojn. Ida ploris, ŝi riproĉis siajn gepatrojn; vangofrapoj, vangofrapoj kaj denove vangofrapoj. Dum la popolo en Luĉica tondre ridegis.

Lundon posttagmeze ariĝis amaso da popolo sur la ŝoseo antaŭ Luĉica. La sinjoroj, membroj de la komisiono manpremis kun la paroĥestro kaj Stipe kaj sidiĝis en siajn kaleŝojn. La homoj ne spektis plejparte la kaleŝojn kaj la ĉevalojn, sed la foran monteton, sur kies deklivo kurbiĝis la imperiestra ŝoseo.

—Jen denove! — kriis infanoj. —Jen vidu la brilajn longajn bajonetojn sur la fusiloj! Jes, ili estas, kvinopo; du ĝendarmoj, kaj antaŭ ili la servistoj kaj Antonio. Ili atingos Volosko antaŭ la vespero; ili rapidis. Jen ili denove kaŝiĝos en la riveret-ravinon. La kompatinda Antonio! Al mi mia patro diris, ke oni ne pendumos lin, ĉar li, mortigante la sinjoron defendis

sin. Mi vidis la sangon sur la ŝoseo; ankoraŭ hieraŭ videblis la postsigno sur la loko, kie li kuŝis. Dumnokte mi timas, ke la sinjoro tirus min el la lito. Ĉi nokte mi dormis kun mia patro. Jen, kia longa barbo de tiu sinjoro! Jes, li estas juĝisto! Jen, denove videblas la bajonetoj sur la fusiloj!...

La kaleŝoj moviĝis kaj forveturis laŭ la glata ŝoseo. La juĝisto fajrigis cigaron, li sidis duonkuŝe en angulo de la kaleŝo kaj komencis mediti pri la antaŭesploro. Post ioma medito, li konkludis, ke Antonio portis la leterojn, ke li mortigis Alfredon kaj verŝajne la asizo deklaras lin senkulpa. Li estis plue konvinkita, ke la luĉicanoj estaj bonaj homoj, ke Marko kaj Mato estas tute senkulpaj, ke Alfredon rabis la servistoj kaj Murelli estas granda fripono, trompanto kaj uzuristo. Rememorante pri la bonega vino de Stipe, li konkludis en si, ke en sia vivo ĝis nun li ne vidis pli belan knabinon ol Elvira kaj milde ridetante li ekdormis.

XI

Grizaj densaj nuboj, similaj al ondego, kliniĝis super la ro kaj montopintoj, kiuj ĉirkaŭfermas nordoflanke la kaldronegon de Kvarner. Ankaŭ la fiera Uĉka surĉapeligis sian verton per plumbokolora nubaĉo, ankaŭ la trista Osor, ĉe la fora sudo, kaŝis sian vizaĝon kaj ĉirkaŭvolvis sian kapon per malhela nebulo ignorante, ke la intensa burasko razis ĝiajn nudajn ripojn kaj forpelis la molan teron en la malklaran maron. Sur la pala vintra ĉielo flugis kaj vetkuris grandaj ĉifonitaj pecoj da ombroj kaj kovris de tempo al tempo la feblan sunon, kiu klinis sin al la varma sudo. La nubombroj trenis sin super la marsurfaco, super la oldaj Istriaaj regionoj, super la deklivoj kaj la montokrestoj. La suda horizonto estis serena kaj travidebla, sed la oriento, tie super Velebit, ĝi ege survualis sin. La neĝo premis nudajn arbarojn, paŝtejojn kaj herbejojn. Ju pli proksime al la kliforiĉa bordo, des pli ĝi maldikas, ĉar la maro ĝin mordas, diras la tiea popolo. Nur super la blanka Kraljevica, la neĝo ankaŭ hodiaŭ mole falis. Super la marsurfaco razis burasko, la nordorienta vento, jen pli, jen malpli forte, laŭ la okaza sturmo el sub la nuboj al la ondiĝanta marsurfaco. Ialoke la ondoj ŝaŭmis: ialoke la maro blankis, kvazaŭ la vento forestus, kaj ie tie super la surfaco flugis frida nigra ventoblovo, kiu subite ŝveligis la buntkolorajn velojn de la italaj fiŝistoj, kiuj krozis ene meze de la golfo. Malmilda estis la vintro. La korpo de Alfredo Saletti jam

duonon de la jaro putris en la tombejo de Luĉica, sub trista kaj soleca cipreso.

Estis la lasta karnavala merkredo, simpla labortago, sed Luĉica ĝojis iel eksterorde. En la stretaj stratetoj homoj renkontis kaj atingis unu la alian kaj ĉiuj ĝoje ridis. Multaj el ili estis vestitaj solene, kiel dum Pasko, aŭ dum alia grava festotago. Ĉio vivanta en Luĉica elkuris sur la straton aŭ en la vojkrutejon, kie troviĝis la domo de Ŝabariĉ. Iuj maristoj ligis sur la manikojn, super la kubutoj, grandajn bukedojn el artefaritaj kaj orumitaj floroj, kaj multaj knabinoj surmetis tian floroj sur siajn hararojn. Do ornamitaj nuptofestantoj!

Sur la ŝoseo, antaŭ Luĉica, promenis la negocisto Stipe kaj la maristo Antun Ŝabariĉ, kiu jam tute resaniĝis post la trimonata malsano. Ili ambaŭ kuntiriĝis en pezajn kaj longajn surtutojn, sed laŭ iliaj ĉapeloj, pantalonoj kaj ŝuoj, oni tuj divenis, ke ili decidis nuptofesti. Ankaŭ aliaj homoj troviĝis sur la ŝoseo, dum kelkaj buboj foriris eĉ al Jelenŝica.

—Frosto, frosto, kara Stipe! He, grincetanta neĝo sub la piedoj! — diris la maljuna Ŝabariĉ.

—Ĝi apenaŭ je unu fingro altas. Laŭ mia opinio, la poŝto malfruos hodiaŭ. Vian filon atingis malbela vetero; la burasko kvazaŭ neniam ĉesos! He, mi razis min, kvankam hodiaŭ ne estas sabato, volonte aspekti pli juna, kaj la vento ŝiras miajn vangojn kvazaŭ per razilo. Ĉu vi estas certa, ke Marko venos?

—Li venos, Stipe, ĉial li venos. Li letterskribis al sia fratino, ke li plenumos siajn devojn, por veni ĝustatempe. Ni baldaŭ konvinkiĝos; jam estas la naŭa horo, certe la poŝto jam proksimiĝas.

—Ja, ne estus dece, se li ne ĉeestus la edziniĝon de sia fra-

tino. Tiel, kiel vi diris..., — Stipe ĉesis subite kaj ekridetis al Antun.

El la suda flanko aŭdiĝis pafado el pistolegoj kaj ĝoja kantado. Tuj poste ektondris pafoj en Luĉica.

—Ili venas el Jelenŝĉica! — ekkriis Antun.

—Verŝajne ili elvolviĝis supren sur la montokreston, vidinte Luĉican, ili salutis nin. Ho, multe da pulvo pafbrulos hodiaŭ!

—Dio gardu ilin de malbono! Stipe, la pulvo estas diablo, des pli se la junularo ebrietigas...

—Vere ili frapegas! Kvazaŭ dum milito!

—Ankaŭ tiuj el la urbo! Ĉu vi ne aŭdas la tondradon? Same, kiel tiam, kiam la imperiestro vizitis Rijekan.

—He! Tio estas miaj pistuloj, — fanfaronis Stipe. —Antun, elkore mi ĝojas, ke vi bone endomigos vian Marijan. Mi scias, oni ne regalos ŝin per luksaĵo, aŭ per ega sinjorineco, sed same kiel ŝi estas estimata, same ŝi estas diligenta kaj lerta.

—Jes, jes, ŝi scipovos labori kaj mastrumi, kontraŭ tio ne riproĉeblas, ĉar laŭ la diraĵo de niaj antaŭuloj, la domo ne apogas sin al la tero, sed al la mastrino.

—Antun, la hodiaŭa tago fariĝu feliĉa por vi. La zorgojn, kiuj trafis vin, ni forgesu! — mansvingis Stipe.

Post nelonge, sturmantaj infanoj kriis: —La nuptanoj! La nuptanoj!

Impona procesio montriĝis el malantaŭ la ŝosekurbiĝo! Ĝoja kaj sanaspekta akompanantaro venis el Jelenŝĉica. Tie troviĝis plurjaraĝuloj, junaj maristoj, infanoj kaj knabinetoj, belegaj junulinetoj, kiuj baldaŭ kandidiĝos por fianĉinoj. Tie troviĝis ankaŭ enpensigintaj kaj feliĉaj junaj edzinoj, ĉiuj estis serenaj, ĝojaj kaj sanaj kiel kornuso. Mato marŝis kun digno-

pleno, li salutis la luĉicanojn kaj svingis permane. Antonio paŝis serioze. Ĉiuj primiris lin, la infanoj gapis al li. Hodiaŭ li ne estis hirthara kaj ĉifonvestita, ĉar Mato sufiĉe penis persvadante lin survesti iom pli bonajn robojn el sia ŝranko. Li estis belaspekte kombita, ankaŭ lia barbo estis ordigita. Sur la kapo li havis nigran ĉapelon, iom tro malvastan, sed ĉu oni rimarkos tion? Liaj roboj estis el blua angla tolo. Ordinara marista vestaĵo. Oni dirus: —Vidu lin! — Ankaŭ la knabinoj dirus: —Ja li aspektas eleganta kaj bela, kvazaŭ iu el niaj maristoj!

Antonio pasigis du tagojn en Jelenŝĉica por helpi al Mato kalkblankigi la ĉambretojn en lia domo. Inter la nuptanoj troviĝis ankaŭ Pero kaj Menego. La nigrokulaj knabinoj kantis plengorĝe, la maristoj levis siajn brakojn, kaj la pistolegoj tondris unu post la alia. La povraj paseroj kaŭrantaj sub la defluiloj, tremis pro malvarmo kaj pro timo. Ili volus forflugi desur la domoj, kiuj troviĝas apud la ŝoseo, en Luĉican, sur la preĝejan tegmenton, sed ankaŭ tie la ĉielo eĥis pro la pafegoj. Ankaŭ tie tremis aliaj paseroj kaj rigardis al iaj bestaĉoj, fakte al la pistiloj de Stipe, el kiuj de momento al momento elflugis alten aro da fajreroj, kiuj tondris kaj vibrigis la aeron kaj kiuj ruliĝis sur la placo antaŭ la preĝejo. Sur la domo de Stipe flirtis granda trikoloro. La maristoj diras, ke la franca flago enhavas la samajn kolorojn, pluraj luĉicanoj admiras Stipen, kiu parolis, ke iuj sinjoroj volis malpermesi al li hisi la flagon sur la domo, kaj ke li ĉiun trian vorton ilian hakis per nur unu sia vorto.

—Saluton, Antun! Saluton, Stipe! Bonan tagon!

—Saluton, feliĉon, ĝojon! — ĝojkriis la luĉicanoj.

Antonio spektis sombre la apudstarantojn kaj ekrigardis al la kampanilo, sur kiu ekluliĝis la sonorilo.

—Ĉu Marko alvenis? — demandis Mato.

—Ni atendas lin, — respondis Antun kaj Stipe.

La nuptanaro eniris en la urbon, kaj post ĝi ankaŭ la plenkreskuloj kaj la infanoj.

La poŝtoficisto Miko montriĝis sur la fenestro kaj diris sarkasme al Antun:

—Ili fortrinkos barelon da via vino! Tiom multnombraj ili povus sturmi Luĉican. Jes, barelon da vino!

—Ili fortinku ĝin ĝoje! Sinjoro Miko, ankaŭ por vi restos glaseto; ĉu vi ne venos hodiaŭ al mi?

—Multe da laboro! — li elspiris, ekridetis kaj lekis siajn lipojn.

—Venu posttagmeze gustumi nigran kafon.

—Laŭ la cirkostancoj! — respondis la poŝtoficisto rigardante la montegon.

—Miko, kie postrestis la hodiaŭa poŝto? — demandis Stipe.

—Ĉu vi opinias, ke tie sur la ŝoseo blankas sebo?

—La neĝo altas nur je unu plandumo!

—Ankaŭ la vagonaro kutimas malfruiĝi! — Miko pledis pri la ministerio por komunikado, skuante siajn ŝultrojn.

—Silentu, ĉesu! Ŝajnas al mi, ke ie knaras, — menciis la negocisto aŭskultante.

—Jes, vi pravas! He! La oreloj taŭgas, sed la okuloj, la okuloj! — Antun plendis.

—Samtia estas mia patro. Ja, eĉ se la virinoj en la kuirejo flustrus plej atente, li povas aŭdi ilin! Kiam liaj okuloj mal-sanis, kuracistoj donis al li ian verdetan fluaĵon, kaj nun li ka-

pablas vidi tiom, ke li povas frapi la patrinan brakon, se ŝi intencas per vergo bati la katon ĉe la fajrejo. Antun, ni eniru en la domon! Ĉe sinjoro Miko estas varme.

Kiam ili eniris en la ĉambrom de la poŝtoficisto, li ekkoleris kaj kriis:

—Ho! Lasu min neĝenata! Ĉu vi ne vidas la paketojn?

—Kiu ĝenas vin? — ŝerce mansvingis Stipe.

—Ĉi tiu ĉambro! Ĉu vi scias, kio ĉi tiu ĉambro estas? Ĉu vi opinias, ke la imperiestra ĉambro similas al publika placo? Nun ne estas tempo por babilado. Jen, kioma laboro! Nur al Rijeka estas destinataj eĉ du leteroj! Kaj al Pula ankaŭ du. La maristoj, frenezuloj, senĉese skribas kaj skribas! Legu la regulojn fiksitajn sur la pordo.

—Miko, kial, pro diablo, vi koleras! En urboj oni ricevas milojn da leteroj, kaj oni povas kun ĉiu poŝtoficisto interparoli! — Stipe diris spice.

—Kion vi scias? En urboj! Ĉu en urboj ne ekzistas dekoj, tridekoj, centoj da oficistoj en unu poŝtoficejo? Ĉu vi ne vidas, ke en Luĉica ĉio premas miajn ŝultrojn. Ho povra Miko! — plendis la poŝtoficisto pri si mem, sigelante la leterojn. Tiu-momente antaŭ la domon alruliĝis la poŝta kaleŝo.

Antun kaj Stipe eliris sur la ŝoseon.

—Bonan tagon, paĉjo!

—Evidente vi sufiĉe tremis pro la malvarmo!

—Mi alvenis feliĉe! Kiel vi fartas Stipe?

—Bonfartu! Ja descendu el tiu skeletaĵo!

Marko kunprenis la robon, por ke ĝi ne alkroĉiĝu je najlo, kaj elsaltis singarde sur la ŝoseon el la eluzita kaj malfirma ĉaro.

Interkisinte kun la patro kaj la negocisto li diris:

—Ĉu vi opiniis, ke mi ne venos?

—Filĉjo, vi prave faris, ke vi venis hodiaŭ, ĉar sen vi, kiu ĝojigus vian fratinnon?

—Pri kio mi okupiĝu en Vieno? Mi vojaĝis senhalte, por atingi ĝustatempe. Do hodiaŭ okazos la geedziĝo?

—Jes, hodiaŭ. Ho, kiom Marija ĝojos pri via alveno! — ĝojkrias Stipe.

— Por diri veron mi rapidis, Vieno estas jam enuiga, ankaŭ la libroj tudas min.

—Marko, ĉu vi ree iros al Vieno?

—Ne, Stipe. Kiel vi fartas, kara amiko?

—He, bone, sed nun ni iru hejmen

—Ni iru, ni iru, ja vi scias, ke ili atendas nin! — aldonis la patro.

Ili ekiris. Marko iom ektimis kaj paliĝis post kiam li turnis sin al la monteto, kie blankis inter la senfoliaj arboj la fronto de la sinjora domo...

—Marko, ŝajnas al mi, ke viaj vangoj malfreŝiĝis. Ja kopreble, vi tro lernis! Ja, malfacilaj aferoj estas tiuj viaj ekzamenoj. Kioma tempo pasis post kiam ni la lastan fojon vidis nin? ... Atendu iom, laŭ la mia, jam kvardeko da tagoj. Jes, jes, tiom; memoru vian venon al Triesto el Vieno.

—Ĉu ankoraŭ oni estas parolantaj pri nia proceso?

—Ho, kial ne? Grandan damaĝon ĝi kaŭzis al mi, — plendis la negocisto.

—Kio okazas pri Antonio? Ĉu ankoraŭ li estas silentema?

—Li strange kondutas, same kiel antaŭe, kiel vera strangulo! — respondis la patro.

—Li povra, tamen li suferis en malliberejo dum kvar monatoj, — Marko kompatis lin.

—La krimulo sur la monteto, ankaŭ nun suferigas la popolon. He, se ekzistus justeco ĉi-monde, li ne ĝuus spektante la sunon aŭ la lunon, sed liaj ostoj putrus en karcero. Eble eĉ hodiaŭ vivus la edzino de Koĵuliĉ, se li ne estus afliktinta ŝin. Kion fari? Riĉulo monpufa ĉies inklinon ĝuas, eĉ se li la sunon deprenus de sur la ĉielo, tamen troviĝus uloj dirantaj, ke li estas bonanima homo!

—Stipe, ne koleru. Ni devas esti kontentaj pri la afero finita tiamaniere! Marko skuis siajn ŝultrojn.

—La proceso ja ne povis finiĝi pli kontentige! — mansvingis la patro.

—En la momento, kiam lin forpelis la ĝendarmoj el Luĉica, mi tuj konsciis, ke la asizo deklaras lian senkulpecon kaj la tribunalo forigos la akuzon, — asertis Marko.

—Ĉu vi memoras pri la advokato, kiu korekte pledis pri lia afero? Oni diris al mi, ke li estas la plej lerta advokato en la tuta Istrio, — mansvingis Stipe kaj li ekfajfis ĉe la fino de la frazo.

—Sed, kiomaj homoj el vi iris al Triesto? — demandis Antun.

—Ho, eĉ pli ol dekkvin; ja ĉiujn mi povus mencii rememorante, — Stipe frapis sian frunton per la mano.

—Jes preskaŭ dekkvin, — konfirmis Marko.

—Por diri sincere, mi kontente rigardis la juĝistojn kaj la tuton de la ĉeestinta sinjoraro, — denove komencis paroli Stipe. He, saĝaj homoj! Sed, ĉu vi scias kiun mi plej rigardis? La nigretan juĝiston, kiu demandadis nin. Bela viro! Oni tuj konvinkiĝas pri lia saĝeco laŭ la aspekto de lia vizaĝo! Ankaŭ la sinjorinojn super ni, ankaŭ ilin mi rigardis. La tutan tagon ili sidis tie, kvazaŭ ili ne havas aliajn zorgojn. He, riĉuloj povas

permesi al si senlaborecon! La sinjorinoj senĉese rigardis Antonion kaj la filinon de Saletti, kaj ili enmane havis vitrojn kiel en teatro, kvazaŭ binoklojn. Antun, mia koro vere doloris, kiam mi vidis la filinon de Saletti tiel trista kaj morna.

—Ŝi povra ne kulpas, ke ŝia patro estas fripono, — Antun rimarkis kaj preskaŭ timeme ekrigardis al la filo, kiu enpenŝiĝis.

—Kiam la advokato de Antonio parolis, vere, — daŭrigis Stipe, — mi ploris... Honoron al nia paroĥestro, sed tiel li ne scipovas.

—Stipe, ĉu vi opinias, ke la advokato tiel parolis por pledi pri Antonio? — demandis Marko.

—Kompreneble! — ekmiris Stipe.

—Tio estas metio; li parolis tiel por honorigi sin, — ekridetis Marko.

—Vi sinjoroj, vi ĉiuj similas unu al la alia! — rimarkis Antun bonintence.

—Tamen, senkonsidere al tio, mi ploris. Ĉiu vorto de la advokato meritis orumigon! Tiel la tuta Triesto eksciis, kiu estas Antonio kaj kiu estas la maljuna Saletti! Ĉion la advokato diris kaj malkovris. Nu, kion li nombris? Jes, ke homoj estas malhonestaj, senkoraj, ke la leĝoj ne valoras, kaj post tiam pri infanoj sen gepatroj, pri familia feliĉo, pri malfeliĉuloj, pri malbenaĵo, pri indulgo, sed kial mi babilas? Mi diras denove: mi ploris!

—Stipe, malbone kaj senorde tiu ĉi mondo kondukas! — suspiris Antun. —Ho, kiajn servistojn dungas Saletti! Ŝtelistoj kaj friponoj! He, oni vane ne diras: La tero ligis paradizon ĵure...

—Ke sekretoj monden elmergiĝas pure, — Stipe finis la

proverbon kaj daŭrigis: —Jes, friponoj! Nun ili havas sufiĉan tempon por mediti, kiel savi sian animon. Ho, kiel perfekte ili pariĝis, la friponoj, Lovro, Luka! Sako trovis sakflikaĵon. Sed tri jaroj en karceroj ne sufiĉas por tiaj friponoj.

—Luka kaj Lovro estas do kondamnitaj je tri jaroj de severa malliberejo? — demandis Marko enpensiginte.

—Se mi estus juĝinta, ili balanciĝus je pendumilo! Friponoj! — koleris Stipe. —Ĉu vi ne aŭdis ilian pledon? Sed la atestantoj ĉion refutis! La mono de Murelli kaj la mono, kiun mi ŝanĝis al la koĉero? Pri ĉio la juĝistoj eksciis kaj la sinjoroj...

—Asizo, — helpis Marko.

—Jes, la asizo, ne estas strange, ke Antonio promenas libere, dum Luka kaj Lovro putras en la friskejo.

—Ja, Stipe, mi preskaŭ forgesis gratuli al vi.

—Pro kio, kara Marko?

—Ĉu ne estas vi nia urbestro?

—Gratuli? Pro la okuloj viaj, ne ŝercu pri mi! Jes, jes, mi estas urbestro, sed tio kaŭzas al mi multajn zorgojn! — Stipe svingis per ambaŭ manoj.

—Nun fine ni havos ordon en la komunumo.

—Jes, ni havos, sed nun, unue ni devas solidigi la magistratan kason, ĉar ĝi ege malpeziĝis dum la regado de Murelli, — respondis Stipe per morna voĉo.

—La kason? — miris Marko?

—Jes, jes, la kason, se tiel nomiĝas malplena ŝranko.

—Ĉu Murelli multon defraŭdis?

—Ja diru, forŝtelis! — Ĉirkaŭ tri milojn...

—Fripono!

—Krimulo, ŝtelisto! Jes, fripono, li prirabis nin ĝis la nuda

haŭto. Oni eksciis ĉion, sed kia utilo: la stalo restu fermita post la forfuĝinta bovino.

—Kie Murelli nun troviĝas?

—Diablo forprenu lin! Kiu sciis kien li forvagis? La kruceto kaj niaj tri miloj zorgigis lin plene, sed li eltiros sin el ĉiaspeca malbonaĵo! Marko, ĉu vi konas la faktojn de la mondo? He, facilaj aferoj por tiaj krimuloj, sed malfacilaj por honestuloj! Marko, kie honestulo nestas, malĉastulo tuj ĉeestas! Jes, jes, malfacilaj tempoj ekestis kaj oni ne povas vidi ilian finon! Mi detale konas nian popolon, ĝi ne prudentiĝos ĝis severa malfavoro igos ĝin konduki racie, ĝis tegmento falos sur ĝian verton, aŭ ĝis oni forpelos ĝian idaron al kortobarilo ke ili kaŭre kunpremiĝu kaj malsatiĝintaj la buŝojn malfermu! Senpova povra popolo! Ĝi ne scipovas liberiĝi el sub la sinjoraro! El neniun flanko ĝi ricevas helpon, neniun instruas ĝin iri la ĝustan vojon, ĉar nuda kvazaŭ fingro ĝi suferas plian kaj plian laŭplaĉan prirabon. Amiko Marko, ni esperu, ke la aferoj pli-boniĝos, ke la suno varmigis ankaŭ nian malriĉularon!

—Sed kiel la luĉicanoj kondukis, dum la foriro de Murelli?

—Mi bedaŭras, ke vi forestis el la hejmo! Murelli dum la foriro ne esperis tielan pritrakton de la luĉicanoj! Multe de tumulto, rikanado kaj bruo akompanis la fuĝantan sentaŭgulon. Mi opiniis, ke li ne sukcesos forporti sian kapon viva. Jen, ni atingis la domon. Mi baldaŭ venos al vi, iujn faren-daĵojn mi devas fini. Ĉu ni ne eniros en la preĝejon? Jam oni sonorigas dum duono de la horo. He, ni flanken metos niajn zorgojn dum la hodiaŭa tago! — ĝoje kriis Stipe.

—Mi ĝuis promeni iom, por etendi miajn krurojn post la vojaĝo, ili ja rigidiĝis sur la ĉareto. Stipe, ni vidu nin baldaŭ!
— Marko mansvinge salutis lin.

—Ne permesu, ke ni devos atendi vin! — ekkriis Antun post li!

Stipe ne rediris, sed haste paŝante al sia domo li levis ambaŭ brakojn kaj svingis, kvazaŭ dirante: Mi venos, mi venos!

Stipe venis en la domon, por dekanti vinon en du vinujojn destinitajn por la nuptofestantoj.

La patro kaj la filo portantaj po unu kofreton, ekiris pluen laŭ la mallarĝaj stratetoj kaj salutadis la homojn, kiujn ili renkontadis dumvoje.

La nuptofestantoj plenigis la domon de Ŝabariĉ, eĉ antaŭ ĝi ariĝis multe da popolo. Marija invitis al la nuptofesto siajn amikinojn, kamaradinojn kaj najbarinojn. La junaj knabinoj kortuŝe rigardis kaj spektis la belan edziniĝontinon, ili admiris ŝiajn robojn, la florkronon, ŝiajn fingroringojn. Marija estas tre enpenŝiginta, kaj aspektis kvazaŭ malĝoja, sed ene de ŝiaj nigraj kaj eksterordinare brilantaj okuloj kaŝe brulis dolĉa ardaĵo, ene de ŝia ĉarma pupilo de tempo al tempo ekbrilis lumradio de trankvila kaj nemezurebla feliĉo.

Jela havis sufiĉe da laboro pri la ampleksa fajrejo, sur kiu digne staris grandaj potoj, laŭvice unu apud la alia. La maljunulino ligis grandan viŝtukon je la zono; grandaj ŝvitgutoj elŝoviĝis sur ŝia sulkiĝinta frunto, ŝi profunde spiris kaj kole- ris pro la virkato kaj pro iuj najbarinoj, kiuj helpis al ŝi kuiri. En la malgranda kuirejo estis ĉio ordigita, lavita kaj purigita; la tuta dometo aspektis eksterordinare solene. Marija plendis al sia patrino zorgante, ke Marko eble ne venos, ĉar pasis jam la tempo kiam la poŝta kaleŝo kutime venas al Luĉica. La patrino kaj Mato konsolis ŝin, kiam bubo alkuris, haste spiranta anoncis, ke Marko ĵus venis. Marija ekĝojis, ŝia vizaĝo serene- niĝis, ŝiaj lipoj ĝoje ekridetis; ja ŝi petoliĝis kaj maltrankviliĝis

pli ol iam ajn antaŭe. La koro de Mato degelis pro feliĉo, ĉiuj liaj sentoj speguliĝis en la okuloj, kiuj tenere karesis la vizaĝon de Marija per daŭraj rigardoj. Jela miris pro sia filino kaj per avertaj ridetoj ŝi riproĉis pro ŝia troa ĝojo, kiu ne konvenas, ĉar ŝi nun foriras el la naskiĝdomo, for de sia patrino, kun kiu ŝi vivis nur feliĉe kaj bonorde. La maljunulino okupis sin ĉe la potoj, ŝi suspiris kaj pensis: — Ho, Dio kara, mi edukis ilin, mi penis multe por kreskigi ilin, kaj nun ili lasas min en mia maljuna aĝo. Jam hodiaŭ Marija ennestiĝos aliloke, kaj Marko estas sinjoro, ankaŭ li ne enuos ĉi tie en Luĉica. Mi kaj mia Antun restos solaj kvazaŭ du arbotrunkoj ĉirkaŭbrulitaj surkampe!

Marija moviĝis endome, ŝi pudore ridetis al la nuptofestantoj, ŝi spektis jen tion, jen ĉi tion, kaj rememorinte pri tiom de la plaĉaj objektoj dum la pasintaj tagoj, la verdanta bazilio tenere karesata per ŝiaj okuloj kortuŝis ŝin grave. Tristo vualis ŝian vizaĝon, dolora rideto montriĝis sur ŝiaj ruĝaj lipoj. Iranta enĉambre ŝi haltis antaŭ fenestro kaj rigardis al la maro. La vitroj malklariĝis pro ŝia elspiro. Ŝi perfingre skribis la nomon de sia trezoro...

Mato staris post ŝi, sana, ĝoja, bonstata kaj beata, sed ne en sinkopo, kun sanganta kapo, kiel...

Starante post ŝi, li rigardis ŝian skribadon kaj ĉirkaŭpremis tenere ŝian sveltan zonon. Ŝi turnis sin, ekrigardis en liajn okulojn kaj ekflustras: —Mato! — kaj kelkaj grajnoformaj larmeroj ekglitis laŭ ŝia ĉarma vizaĝo.

—Marija, kion signifas ĉi tiuj larmoj?

—Mato, mi memoras pri la survivra skribo de via nomo pasintan vintron, rememoru, kiam vi sur la lito...

—Karulino mia, ne pensu plu pri tio!

—Mi ne pensos, Mato, — la knabino ekridetis konfide kaj milde ekrigardis en liajn okulojn.

Antun kaj lia filo Marko stumble eniris la kuirejon. Jela brakumis la filon singultante feliĉa. Marija kaj Mato kuris el la ĉambro. Ili brakumis kaj kisis sin. Marija apogis sian kapon sur la bruston de la frato, kaj ŝi metis sian dekstran brakon ĉirkaŭ lia kolo kaj ekploris.

—Franjo kara, kial vi ploras?

—Marko, mi jam opiniis, ke vi ne venos.

—Ĉu mi ne skribis el Vieno al vi, ke mi venos, se iel ajn mi povos. Certe promesi mi ne povis, ĉar nur antaŭ tri tagoj mi plenumis la ekzamenojn.

—Mi konjektis, kara filĉjo, pri via alveno, ke vi pliĝojigu nin.

—Sed, kara panjo, kial ne ĝoji?

—Nu, kiel ĝoji sen vi? Kion oni opinias, se vi ne venos? Jes, oni dirus, ke vi hontas pri ni, vi estas sinjoro, ke vi forgesos nin, ke vi ne bezonas nin plu.

—Ne parolu tiel! Kial vi ĉagrenas pro klaĉemaj langoj? — Antun riproĉis la edzinon.

—Vi pravas, Antun, riproĉu mian bapтанinon! Ja, kiel aspektus la aferoj, se ni atentus pri la najbaraj babiladoj, — diris ŝerce najbarino.

—Marko, ĉu vi ne reiros al Vieno plu? — diris la patrino per peza spiro el sia brusto.

—Mi finis la studadon, sciu; nu kiel diri tion? Mi fariĝis kuracisto, doktoro.

—Ekde nun neniu mortos en la tuta mondo! — alridetis la patrino.

—Panjo, ne kolerigu lin! — petas Marija.

—Panjo, ne obeu Marijan! Elŝutu la zorgojn el via koro, por tiel plifaciligi la vivon! — ŝercis la juna kuracisto.

—Filĉjo, mi iĝus beata, se vi estus obeinta min!

—Mi obeinta vin!... Jes, jes, mi komprenas!

—Se vi estus estiĝinta pastro ... jes, pastro, pastro!

—Kial, pro diablo vi ĉagreniĝas! Dio pardonu al mi! Vi, ol-dunjo trankviliĝu jam! Marko, ne priatentu ŝian parolon! — ŝerce diris Antun, kaj sekve la nuptanoj ekridis.

—Se Marko estus obeinta min, la luĉcanoj ne spertintus pli da ĝojo ol vidi hodiaŭ kiel frato nuptocelebras al sia fratino!

—Kiel vi fartas, kara Mato? — demandis Marko metinte siajn manojn sur liajn ŝultrojn.

—Bone... bone, — respondis la edziĝonto ridetante.

—Kaj vi, Antonio? — donu vian manon!

—Jen! — Antonio etendis sian dekstran brakon rapide kaj li rigardis al la okuloj de Marko.

—Vere, bela vi estas hodiaŭ! Apenaŭ oni povas rekoni vin en tiuj vestaĵoj! — Marko ĝojis pro li.

Antonio, skuis siajn ŝultrojn seninterese kaj eliris el la domo.

—Strangulo! — Marko balancis sian kapon, kaj frapinte per polmo al polmo, li daŭrigis: —Nun ek en la ĉambron por ordigi min iom. Ĉu ni baldaŭ ekiros en la preĝejon?

—Jes, jes, — kapjesis maljunulino.

Marko kaj Marija eniris en ĉambreton, en kiu ne troviĝis la nuptanoj. Estante tiel solaj, la frato prenis la fratinton je la ŝultroj, ekrigardis serioze al ŝiaj okuloj kaj demandis ŝin mal-laŭte:

—Kiam vi ricevis mian leteron?

- Antaŭhierau.
- Ĉu vi trovis en ĝi ankaŭ la alian por...?
Marija kapjesis.
- Kiam vi sendis ĝin al ŝi?
- Antonio troviĝis du tagojn en Jelenŝtica.
Marko enpensigis. Lia frunto malsereniĝis.
- Hierau matene mi vidis Elviran, — flustris Marija.
- Tiel do?... Marija, mi petas vin, parolu!
- Vian leteron mi ne povis transdoni al ŝi, ĉar mi ne havis ĝin ĉe mi.
- Kion vi faris do tiam?
- Kiam ni eliris el la preĝejo, mi flustris al ŝi: Fraŭlino, mi havas leteron destinitan al vi. Antonio ne estas en Luĉica, atendu por ĝi morgaŭ nokte, malantaŭ la domo. Ankaŭ Marko probable venos el Vieno morgaŭ.
- Ĉion tiel vi diris al ŝi?
- Jes, rapide. Mi iris apud ŝi kelkajn paŝojn.
- Ĉu ŝi komprenis viajn vortojn?
- Sendube; ŝi kapjesis al mi.
- Ĉu ŝi kapjesis?
- Jes, kvazaŭ dirante: Bone, mi komprenas!
- Ĉu vi ofte renkontas ŝin.
- Tre malofte. Oni diras, ke ŝia patro atente gardas ŝin.
- Kiom de la leteroj vi transdonis al ŝi?
- Ja mi reskribis al vi; du.
- Antonio do transdonis nur unu.
- Jes, unu.
- Ĉu iu alia rimarkis, vian transdonon de la letero al ŝi aŭ la ŝian al vi?
- Neniu alia, mi opinias!

—Kiel Antonio kondutas?

—Depost nia alveno el Triesto, li elparolis apenaŭ cent vortojn.

—Marija, vi estas feliĉa!

—Mi ne estas pro vi...

—Kara franjo, baldaŭ vi ek genuos antaŭ la altaro!

Marko brakumis ŝin, kaj mallevis sian kapon sur ŝian ŝultron...

El la kuirejo aŭdiĝis la voĉo de Stipe.

—La baptopatro venis, — flustris Marija.

—Marija, Marko, Mato, nuptanoj, sinjoro parohestro troviĝas jam en la preĝejo! — kriis Stipe.

La gefratoj eliris el la ĉambreto. Multnombra nuptanaro! Antaŭ la domo oni ĝojkriis, kantis kaj ĝojis. Mato ridetis; Pero kaj Menego, liaj maristoj, rilatas kun ruĝa vino, kiu kvazaŭ ridetas el grandaj boteloj sur la tablo.

—Menego, kiam vi edziĝos? Kiam ni nuptofestos ĉe vi? — Stipe demandis la mariston.

—Sufiĉan tempon oni havas ĝis tiam; la inaro ne mankos!
— respondis Pero al li.

—Ek en la preĝejon! Ĝoje! — ekkriis Stipe.

—Ĝojon! Ĝojon! — kriis la nuptanoj.

Jela aspergis la geedziĝontojn per benita akvo, ŝi malĝoje ekrigardis la filon Marko, ŝi suspiris kaj forviŝis siajn larmojn. La nuptanaro eliris el la domo, la homkolono ekiris al la preĝejo laŭ la malgranda strateto. Antaŭ la preĝejo kolektiĝis homamaso. Ĉies okuloj direktiĝis al Marija kaj Mato. La nuptanoj eniris en la templon de Dio. Antonio eniris lasta. En la preĝejo regis silento, nur de tempo al tempo la vento skuis la

altajn fenestrojn. La paroĥestro benis la sanktan ligon kaj demandis la junajn geedzojn...

Antonio staris rigida malantaŭ la preĝeja pordo. Post kiam li aŭdis la respondojn de Marija al la demandoj de la paroĥestro, li skuiĝis, li mallevis siajn brakojn apud la korpon, li eksentis mallumon antaŭ siaj okuloj, kaj lia kapo kolapsis brusten... Senfortigita, kun fendita koro, li kaŝe eliris el la preĝejo.

Iom poste la nov-geedzoj montriĝis sur la sojlo de la preĝejo. Pafiloj tondris, pistolegoj krakis, la malnovaj pistiloj tremigis la preĝejon. La verda hedero tremis sur la duone ruiniĝinta murego, infanoj kriegis surbrake de siaj patrinoj, kaj paseroj freneziĝis pro timo, aŭdace ili elflugis el sub la tegoloj por disiĝi en la arbustoj diskutonte pri la puno kiu trafis ilin. La nuptofestantoj laŭte bruegis en la stretaj stratetoj, tra la tuta Luĉica oni aŭdis nur ĝojan jubiladon kaj popolkantojn.

Antaŭ la preĝejo daŭre ruliĝis la pistiloj de Stipe, ankoraŭ la ĉielo tremis pro la ega tondrado, dum en la plej vasta ĉambro en la domo de Stipe oni jam dancis tradiciajn popoldancojn. La planko knaris, la vizaĝoj ruĝis, la maristoj dancis, kantis kaj klakis permane kun ekkrioj al la knabinoj: Turniĝu, kara, tiel, tiel! Ho, ĝoje, suno mia! Frapu, frapu, pomo ruĝa! Plue, plue, tiel, tiel! La maristoj kantis dancante, ili instigis siajn amantinojn, ili kuraĝigis ilin per dolĉaj vortoj, ja oni ĝuas rigardante tiujn fortikajn, ĝojajn kaj fierajn gejunulojn, tiujn ornamitajn nuptofestantojn, tiujn lertajn maristajn filinojn, sveltajn, fleksajn, kies ĉiu vejneto vibris, kiuj afable ridetis al siaj kundancantoj turniĝante ĉirkaŭ ili.

Dum la dancado de la nuptofestantoj, Marko en sia ĉambro skribis sur blanka papero. Fininte la skribadon, li faldis

ĝin, sigelis kaj ekiris serĉi sian fidelan Antonion. Li demandis kaj demandis pri li, sed neniu vidis lin. Fine knabo diris, ke li vidis Antonion malantaŭ la preĝejo, ĉe la malnova muro. Marko ekiris al la murrestaĵoj kaj li rimarkis Antonion, kiu mergis sian kapon en unu de la murfendaĵoj, de kie videblis la tuta golfo. Kiam li proksimiĝis al li, li frapetis lin ĉe lia ŝultro. Antonio surpriziĝis, li eltiris sian kapon el la fendaĵo kaj timigita ekrigardis al li.

—Antonio...

—Mi aŭskultas.

—Kion vi faras ĉi tie?

—Nenion; mi rigardas al la maro, — li diris abrupte.

—Kiu malbonaĵoj insidas vin? Via vizaĝo aspektas kvazaŭ oni eltiris vin el tombo!

—El tombo? — Antonio ekgrumblis mallaŭte.

—Jes, jes... Antonio, metu ĉi tiun leteron en poŝon. Mi anoncas al ŝi, ke mi venis hodiaŭ en Luĉican kaj mi volas konversacii kun ŝi morgaŭ. Ĉinokte iru sur la monteton kaj transdonu la leteron al ŝi.

—Vana vojaĝo.

—Kial?

—Strange! Ĉu ni ne distrumpetis ĉie, ke vi amas ŝin?

—Kia do konsekvenco de tio?

—Ŝia patro gardas ŝin. Ŝi ne scias, ke mi venos.

—Ŝi scias; Marija sciigis al ŝi hieraŭ, ke ŝi atendu vin malantaŭ la domo.

—Ŝi ne venos.

—Mi mem irus, sed kion oni dirus, se mi forestus el la domo hodiaŭ? Mi malĝojigus miajn gepatrojn, ĉar ili divenus,

kien mi estus foririnta. Plue, Elvira ne atendas min hodiaŭ, sed morgaŭ ŝi iel aranĝos resti kun mi iom pli longe.

—Malfacile.

—Vi opinias tiel?

—Kiam mi intencis transdoni vian lastan leteron, antaŭ dekkvin tagoj, mi rondiris ĉirkaŭ la domo, por ke ŝi rimarku min, sed vane, eĉ probable la patro min, li, jes li, ŝia...

—La patro.

—Probable, ke li rimarkis min dufoje.

—Sed, kiel vi transdonis la leteron?

—Iun tagon, kiam ŝi iris el la preĝejo, mi antaŭen preteriris ŝin, de fore mi eksvingis per la letero kaj mi kuŝigis ĝin sur la vojon.

—Ĉu ŝi rimarkis ĝin?

—Jes, mi vidis ŝin levinte ĝin.

—Jes, vi pravas, ŝi ja respondis je ĉiu letero.

—Parolu pli mallaŭte.

—Antonio, mia povra Antonio! Kiam ni lastfoje estis en Triesto, mi ne havis tempon demandi vin pri io ajn. Kiel vi pasigis la tempon en la malliberejo?

—Pli bone ol hodiaŭ...

—Mi ne komprenas vin.

—Mi ĉie fartas same, ĉu ĉe nuptofesto, aŭ ĉu en malliberejo.

—Kial vi, homo, tiel parolas? — Marko demandis lin prenite liajn manojn amikece.

—Mi bastardo...

—Ne frenezu!... Antonio, iru do post la sesa horo. Elvira certe venos.

—Malfacile. Li, la maljuna... li gardas.

—Vi ne ŝatas iri sur la monteton.

—Jes, mi ne ŝatas.

—Kial do?

—Ĉar mi devus paroli kun ŝi, — li elŝovis trans sia lango.

—Ĉu vi ja timas Elviran? Antonio, ŝi estas tiel bonkora.

—Jes, bonkora.

—Iru, mi petas vin! Vera turmento trafas min. Vi faros grandan komplezon al mi kaj al ŝi.

—Li... li... gardas...

—Ŝia patro jam dormos tiuhore.

—Mi iros... jes... mi iros.

—Dankon, Antonio! Mi petas vin, estu ĝoja almenaŭ hodiaŭ.

Antonio ekstremis. Marko surpriziĝis kaj demandis lin:

—Ja diru al mi, kio okazas kun vi?

—Jes, mi iros, post la deka horo, — li flustris kaj turninte la dorson al Marko li malrapide foriris. Marko, rigardante post li per malĝoja rigardo, suspiris:

—Povra mia Antonio!

Longa vintra nokto enŝoviĝis en la golfon de Kvarner. Tenebraj nuboj vualigis la ĉielon. La vento iom malintensiĝis. El Luĉica aŭdeblis sporada krakado de pistolegoj, ankoraŭ oni aŭdis ululadon de la nupta popolkanto tra la malhela, peza, plumbeca mallumo. En la domo de Ŝabariĉ sidis la nuptanoj ĉe ĝojiga vespermanĝo. Ili plenigis tri ĉambretojn, dum en la kuirejo aparte lokiĝis infanoj, kiuj vete kverelis pri la pli belaj pecoj de la flava viandfritaĵo. Antaŭ ili regaliĝis abundego, pro tio ili hodiaŭ ne bezonas skrapi ostojn per tranĉiloj. La nuptanoj sufiĉe dancis antaŭ kaj post la tagmanĝo, eĉ ĝis la malluma nokto. Kiam la negocisto Stipe frapis permane la

malsupraĵon de unu el liaj grandaj bareloj, ĝi malĝoje reeĥis en la supra duono de la duonmalplenigita barelo. Sekve de tio, la okuloj de la plejparta ĉeestantaro brilis kaj la oreloj ruĝis. Sur ĉies vizaĝo flagris ĝojo. La nuptanoj kantis kaj refrenis; rapide viciĝis spritaj tostparoloj. Jen parolas la paroĥestro, jen Marko, kaj Stipe, poste ankaŭ Menego, en kies parolon enplektiĝis tiu de la amiko Pero. La ĝojo kaj la ĝojkrioj daŭris kaj daŭris!

—Marija, mi estas scivolema, kiel vi akomodigos en Jelenŝĉica, — flustris Mato.

Marija milde ridetis kaj rigardis malsupren, dum li daŭrigis:

—He, nur du horojn ankoraŭ, kaj ni ekiru el Luĉica. Ho, kiom aspiras nin miaj gepatroj!

—Kial ni irus en tia malbela nokto, — riproĉis al li la juna novedzino milde kaj honteme.

—Ja ni estas junaj, karulino! Je la dua horo post la noktomezo vin brakumos mia patrino ĉe la sojlo de nia domo. Sen forta vento, malvarmo ne ekzistas. Mi mem intencis ekiri pli frue de ĉi tie. Rigardu, kara mia, rigardu, kiel Stipe elkore ĝojas.

—Sed Marko ne estas bonhumora, — rimarkis Marija kaj ŝi ekridetis melankolie.

—Kie estas Antonio?

—Antaŭ ne longe mi vidis lin en la kuirejo, — Marija elbuŝigis mallaŭte kaj enpenŝiĝis...

Sur la monteto, antaŭ la domo de Saletti, staris homo meze de senfolia arbaro kaj rigardis al Luĉica, kie sangkoloro brilis la fenestroj de nur unu domo. La kampanilo elstaris en la nokta mallumo kvazaŭ giganta fantomo; en kvieta valo rebri-

lis granda marĉo, dum iom fore, la kirketo en la tombejo. Densaj kaj pezaj nuboj malleviĝis super la teron, la malluma horizonto premiĝis de ĉiuj flankoj kaj katenis la tristecan vintan noktopejsaĝon kaj la koron de Antonio. Raraj neĝflokaj kirliĝis en la frosta mallumo. La burasko blovis per varia intenseco, dum la nudaj branĉoj de la arbustoj, kiuj mistere elstaris, frapis unu la alian, gratis sin reciproke kaj tremis kva-zaŭ olda mortintoskeleto. La vastan, rigidan kaj frostan silenton interrompis raŭka bojado kaj trista ululado de malsataj hundoj, pafilkrakado kaj sekretaj voĉoj, kiuj alflugis el la urbeto. Ie malproksime muĝis ankaŭ la vento; aere io ekstremis, ekflirtis, ekĉirpis kaj ekfajfis.

Jam delonge batis la naŭa horo de sur la kampanilo. Antonio streĉis siajn grandajn okulojn en la sangajn fenestrojn en Luĉica. Lian nemezureblan malĝojon, kiu sterniĝis laŭ lia vizaĝo, ĉirkaŭvolvis la malluma nokto. Li rigardis al la fenestroj kun malfacila kaj intensa spirado. Dikaj ŝvitgutoj trapenetris el lia frosta frunto. Venena serpento ĉirkaŭvolvis lian vunditan koron kaj ĝi ĉirkaŭpremis ĝin per siaj malvarmaj kaj feraj ringoj, sed ne povante rompi kaj dispecigi ĝin. Antonio ĝuus en la ĉirkaŭanta nokto, se lia koro ne estus krevinta, se el tiu ĉi povra koro ne estus elverŝiĝinta kaj disiĝinta la naŭza mallumo, kiu plenigis kaj nigrigis ĉiujn spacojn...

Ankoraŭfoje krakis pafilo en Luĉica, ankoraŭ oni povis aŭdi diversajn voĉojn el la marista domo.

La nuptanoj de Ŝabariĉ ĝoje vespermanĝis...

La nuboj pendis super la arbaroj, la horizonto kunpremiĝis, en la nebulo malaperis la kampanilo kaj la kirketo sur la tombejo. La neĝo falis kirle; la flokoj plioftiĝis, kelkaj jam

blankiĝis sur la nigra barbo de Antonio kaj sur liaj larĝaj ŝultroj. La fenestroj ankoraŭ sangis...

Antonio ploris...

Seniluziiĝinta pro doloro, li levis la kapon de sur sia brusto kaj rigardis al la urbeto. Ĉie mallume kvazaŭ en tombo. Li ekiris pluen laŭ la konata pado, kaj kiam li leviĝis sur la montetpinton, li ĉirkaŭiris la kvietan sinjoran palacon kaj li haltis ne fore malantaŭ ĝi, en la bosko. Rigida, silenta estis la ĝardeno de Elvira. La neĝo flugetis sur la laŭron. La padetojn kaj la ebenaj supraĵoj blankiĝis per ĝi. Inter la arbustoj blankas kaj glaciigas la skulptaĵoj de la nudaj diinoj.

Antonio rigardis kaj rigardis al la sinjora palaco. Post ioma atendado li ekaŭdis grinceton. En la domo de Saletti, malantaŭe, malfermiĝis la malgranda pordo. Antonio ektemis. El la domo aperis nigra silueto kaj ĝi ekiris, irante haste, al la kaŝejo, kie kutimas interparoli Marko kaj Elvira.

Antonio, konvinkinta, ke tiu estaĵo estas virino, ekiris post ŝi. Post kiam Elvira venis en la kaŝanguleton, ŝi apogis sin kontraŭ la postamenton de skulptaĵo, kiu estis starigita tie. La knabino surhavis komplete nigran vestaĵon. Kiam ŝi rimarkis, ke al ŝi proksimiĝas homo, ŝi ekvokis mallaŭte:

—Antonio!

—Jen letero, — Antonio diris, kiam li paŝis antaŭ ŝin, kaj transdoninte la leteron, li intencis tuj foriri.

—Atendu, mi petas! —Ĉu Marko venis? — flustris la knabino.

—Jes hodiaŭ.

—Li nenion sciigis al mi...

—Legu la leteron...

(Elvira pridemandis Antonion pri la nuptofesto en la domo

de Marko Ŝabariĉ, ankaŭ pri la humuro de Marko. Antonio klopodis lasi Elvira sola tuj, pravigante sian maltrankvilan foriron, ke la patro de Elvira ilin trovos interparolantajn ĉi tie. Antonio komprenis tiujn aferojn dum la juĝa priesploro, ke li kaŝe postsekvas ĉiun paŝon de Elvira. Al Antonio ne plaĉis ankaŭ tio, ke Elvira kompatis lin pro lia povra destino, kaj pro malbonaĵoj kaj maljustaĵoj, kiuj trafis lin dum lia vivo pro la kulpo de ŝia patro. Sed Elvira kun sia fratina mildeco ne for-lasis lin.)

—Silentu! Mi aŭdas paŝojn, — ekflustris Antonio.

—Ho, Dio!

—Silentu! Homo!

—Tio estas mia patro, — ektimis Elvira kaj ŝi alpremiĝis al Antonio.

—Ha, vi naŭza senhontulino, mi trovis vin! — ekblekis la maljuna Saletti, kaj preninta Elvira per sia maldekstra mano, li tiris ŝin al si, dum li etendis la dekstran al Antonio. Pistolego ekfulmis kaj ekkrakis. Antonio ekteminte, eligis sian tranĉilon el la zono, li saltis sur Saletti kaj per sia tuta forto enŝovis ĝin en lian bruston. La maljunulo balanciĝis kaj renversiĝis en neĝon. Elvira ekĝemis, svenis kaj falis sur la korpon de la patro. La okuloj de Antonio ekbrilis. Li levis la knabinon surbraken, haste eliris el la ĝardeno, rapidis malsupren de la monteto kaj malaperis en la mallumo...

La nuptofestantoj de Marija finis la vespermanĝon. Marko tostis per elkoraj vortoj, sed kriado en la kuirejo interrompis lian parolon. Ĉiuj miris pro la krioj. Antonio pala haste eniris en la ĉambron, portante Elviran surbrake.

La nuptanoj konsterniĝis kaj ŝtoniĝis.

Antonio kuŝigis Elviran sur la liton, li ekrigardis al Marija, Mato kaj al Marko, kaj li raŭke kaj seniluziiĝinte elbuŝigis:

—Marko, jen ŝi por vi! Vi ĉiuj estas feliĉaj, nur la trovito estas malbenita!

Marko alsaltis al Elvira, kaj post kiam ŝi malfermis siajn okulojn, li ekkriis:

—Antonio, kion vi faris?

Sed intertempe Antonio malaperis.

Marko forskuis la neĝon de sur Elvira, li ektimis kaj li mal-esperiĝinta ekkriis:

—Elvira, vi estas sangigita ĉe la ŝultro!

—Ĝi ne estas mia sango... Probable ĝi estas de Antonio, — elspiris Elvira, kaj ŝi fermis siajn nigrajn okulojn.

XII

Du tagojn post la edziniĝo de Marija en Luĉican venis la komisiono por inspekti la kadavron de la maljuna Saletti. La kuracistoj sekcis la vundon, tra kiu elĉerpiĝis la sango el la koro de la nobelo, kaj vidinte la mortinton antaŭ si, la komisiono registris en la protokolo, ke tiu sola vundo kaŭzis la morton. La ĝendarmoj serĉis Antonion ĉie, sed vane.

Malmultaj homoj akompanis Salettin al la tombejo. Neĝo ŝute faladis dum la enterigo. Sub la soleca cipreso faŭke malfermiĝis profunda fosaĵo, kaj apud ĝi, sur la grasa argila tero, staris nigra portilo. La neĝo blankis sur la paroĥestro, sur la homoj, sur la kapo kaj la ŝultroj de la juna knabino, kiu kliniĝis super la ĉerkon kaj apogis sian vizaĝon sur la ĉerkokovrilon. Apud la knabino staris Marko Ŝabariĉ kaj rigardis la kirlantajn neĝflokojn super la malfermita tombo, kie ili trankviliĝintaj descendis laŭ ĝia vakaĵo al la mola fundo, kie ili tuj malaperis, kiam ili falis sur la malsekan teron...

Dum la paroĥestro preĝis super la mortinto, iuj buboj vagis laŭ la tombejo por nombri la krucojn, kiuj elstaris el la neĝo. Rimarkinte ion strangan sub unu neĝa araĵo, inter du tombmontetoj, ili ektimis kaj kuris al homoj por diri, ke homo kuŝas tie sub la neĝo. La homoj ekmiris, ili ekiris kun la buboj al la loko, ili forigis la neĝon kaj konsterniĝis.

Antonio!

Ĉe unu lia flanko la neĝo estis sangemakulita. Kiam la pa-

roĥestro eksciis, ke Antonion oni trovis mortinta, li plenpulte elspiris, li ekrigardis la malserenan ĉielon kaj petis la homojn meti la trovitan korpon en ĉerkon, kiu estis en la tombeja dometo. Nun la homoj komencis ĵeti teron per ŝoveliloj sur la tombon de la nobelo. La knabino mallevis sian kapon sur la ŝultron de Marko, ŝi tremis pro plorado kaj aflikto.

Dum oni fosis alian kavon proksime de Saletti, ĉe la kontraŭa flanko de la cipreso, la paroĥestro preĝis kun la aliaj en la malgranda kirketo por la spirito de Antonio. Iu kamparano tombofosanto konjektis, ke probable Antonio intencis iri al Martin Koĵuliĉ laŭ la vojeto apud la tombejo, sed li kolapsis kaj konscia, ke li ne povos iri pluen, li trenis sin ĝis la tombo-monteto, kie li finis siajn malĝojajn tagojn... La sama tombofosanto asertas, ke sub la tombmonteton estis enterigita la trovito, kiu dronis okaze de la ŝiprompiĝo sub Luĉica.

Marko viŝis la vizaĝon de Antonio, li sekigis kaj ordigis lian nigran hararon kaj inspektis la vundon sub la ŝultro, super la koro. Forviŝinte la koagulitan sangon de sur lia larĝa brusto, li rigardis mute kaj dolore al la palaj vangoj, al la kunpremitaj bluetaj lipoj kaj al la rigidiĝintaj kaj vaste malfermitaj okuloj. Ardaĵ kaj abundaj larmoj glitis gute laŭ la vizaĝo de Marko, post kiam li mallevis la pezan kaj malvarman dekstran manon de sia fidela Antonio.

Kiam post ioma tempo la ŝnuregoj gratis la tristajn bretojn, kaj sur ilin tondre falis la unuaj terbuloj. En la soleca cipreso eksusuris la vento, ĝi ekbalancis la branĉojn kaj deskuis iom da neĝo sur la ĉerkon de Antonio. En la tombon mallevis po unu bulon da tero ankaŭ la paroĥestro, Marko kaj Elvira, fratino de la mortinto.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-096-1